eLIBRO

*Frans G. Bengtsson*

# Orm la Ruĝa

INKO

*Frans G. Bengtsson*
**ORM LA RUĜA**

*Tradukis el la sveda:*
Bertil Nilsson

*e*LIBRO

*Aranĝis: Franko Luin*

*Ĉi tiu* e*Libro ekzistas ankaŭ en presita versio. Aĉetu ĝin ĉe la Libroservo de UEA (www.uea.org), ĉe vialanda libro-servo aŭ rekte ĉe la eldonejo*
Eldona Societo Esperanto,
Vikingagatan 24
SE-113 42 Stockholm
Svedio
(eldona@esperanto.se)

**ISBN 91-7303-010-4**
*inko@omnibus.se*
*http://www.omnibus.se/inko*

INKO · SE-13542 TYRESÖ · SVEDIO
NOVEMBRO 2000

# PROLOGO

## Pri la stato de la razitoj en Skanio en la epoko de reĝo Harald Bludenta.

Multaj maltrankvilaj viroj forlasis Skanion kun Bue kaj Vagn, sed ne trovis sukceson en Hjörungavåg; aliaj akompanis Styrbjörn al Upsalo kaj falis kun li. Kiam sciiĝis hejme, ke malmultaj revenos, oni recitis funebropoemojn kaj starigis memorŝtonojn, kaj poste ĉiuj prudentaj homoj akordiĝis pri tio, ke ĉio, kio okazis, estas tre bona, ĉar nun oni povas esperi pri pli da kvieto ol antaŭe kaj malpli da disparceligoj kaj interŝanĝoj de posedaĵoj helpe de eĝaj feroj. Nun venis abundaj jaroj, kun sekalo kaj haringoj, kaj la plimulto bone prosperis; sed tiuj, kiuj pensis, ke la rikoltoj malfruas, ekspediciis al Anglolando kaj Irlando kaj sukcese batalis, kaj multaj restis tie.

Nun razitoj komencis veni al Skanio, kaj de la lando de la saksoj kaj de Anglolando, por prediki la kristanan instruon. Ili havis multon pri kio rakonti, kaj komence homoj estis scivolemaj kaj volonte aŭskultis; kaj al virinoj ŝajnis amuze esti trempitaj de la fremduloj kaj ricevi blankan ĉemizon donace. Sed baldaŭ ekmankis ĉemizoj al la fremduloj; kaj homoj ĉesis aŭskulti iliajn predikojn, kiuj ŝajnis lacigaj kaj ne tre kredindaj; cetere ili parolis en balbuta lingvaĵo, kiun ili lernis en Hedeby aŭ sur la okcidentaj insuloj, kaj tial ŝajnis infanecaj laŭ prudento.

Tial la kristanigado malmulte progresis; kaj la razitoj, kiuj multe parolis pri paco kaj kiuj antaŭ ĉio brulis pro perfortemo kontraŭ la dioj, de tempo al tempo estis kaptitaj de religiaj homoj kaj pendigitaj en sanktaj fraksenoj kaj penetritaj de sagoj kaj donacitaj al la birdoj de Odin. Sed aliajn, kiuj venis norden en la arbarojn de Geingio, kie nur malmulte da religio estis, tiujn oni bonvenigis kaj kondukis ligitajn al foiroj en Smolando kaj ŝanĝis ilin por bovoj kaj kastoraj feloj. Kiel sklavoj de la smolandanoj kelkaj kreskigis la harojn kaj sentis malkontenton pri Jehovah kaj meritis la manĝon; sed la plimulto daŭre volis faligi la diojn kaj trempi virinojn kaj infanojn, prefere ol senŝtonigi kampojn kaj mueli grenon, kaj kaŭzis al siaj mastroj tiom da ĉagreno, ke baldaŭ la geingoj ne ricevis du trijarajn smolandajn bovojn por plentaŭga pastro ne pagante aldonon de salo aŭ fulita drapo. Tiam regis en la limregiono malbona humoro kontraŭ la razitoj.

Iun someron informo trakuris la tutan Danoregnon, ke reĝo Harald Bludenta aniĝis al la nova instruo. En sia juneco li jam faris provon, sed urĝe repaŝis, sed nun li definitive transiris. Ĉar reĝo Harald estis nun maljuna, kaj jam longe lin turmentis akra doloro en la dorso, tiel ke ne multan ĝojon donis al li liaj biero kaj virinoj, kaj saĝaj episkopoj, kiujn sendis la imperiestro, jam frotis lin per ursograso plifortigita per apostolnomoj kaj vindis lin en ŝafofeloj kaj donis al li benitan herbinfuzaĵon anstataŭ biero kaj signis krucon inter liaj ŝultroj kaj elsorĉis el li multajn diablojn, ĝis malaperis la doloro kaj fariĝis la reĝo kristano.

La piuloj tiam promesis, ke pli terura mizero lin trafos, se li denove sin submetos al oferado aŭ montros senfervoron en la kredo. Tial reĝo Harald ordonis, estante denove movkapabla kaj povante preni al si junan maŭran sklavinon, kiun Olof kun la Gemoj, reĝo de Cork, sendis al li kiel amikan donacon, ke ĉiuj lasu sin kristanigi; kaj

malgraŭ tio, ke tia parolo de homo, kiu mem devenis de Odin, ŝajnis stranga, multaj lin obeis, ĉar li longe regis kun bona fortuno kaj tial havis aŭtoritaton en la lando. Tiujn, kiuj perfortis kontraŭ pastroj, li juĝis per plej severaj punoj; kaj en Skanio la nombro de pastroj kreskis, kaj preĝejojn oni konstruis sur la ebenaĵo; kaj oni ĉesis sin turni al la malnovaj dioj krom ĉe surmaraj krizoj kaj brutmalsanoj.

Sed en Geingio oni multe ridis pri ĉio tio. Ĉar la popolo en la arbaroj apud la limo havis pli da ridemo ol la prudenta popolo sur la argilo de la ebenaĵo, kaj pri la ordonoj de reĝoj ili plej multe ridis. En tiuj regionoj malmultaj havis potencon atingantan pli foren ol la dekstra mano, kaj inter Jellinge kaj Geingio estis longa distanco eĉ por plej grandaj reĝoj. En antikvaj tagoj, en la epoko de Harald Hildetand kaj Ivar Vidfamne kaj antaŭ ĝi, reĝoj kutimis veni al Geingio por ĉasi urobovojn en la vastaj arbaroj, sed malofte por aliaj celoj. Post tiam la urobovoj malaperis, kaj kun ili malaperis la vizitoj de reĝoj; kaj se nun iu reĝo incitiĝis pro ilia malobeemo aŭ malabunda imposto kaj minacis, ke li venos, li kutime tiun respondon ricevis, ke neniaj urobovoj estis videblaj en la regiono, sed ke ili informos lin, kiam tiaj sin montros, kaj amike akceptos lin tiam. Tial jam longe estis proverbo ĉe la loĝantoj apud la limo, ke al ili neniu reĝo venos, antaŭ ol revenos la urobovoj.

Tiel ĉio restis, kia ĝi ĉiam estis, en Geingio, kaj nenia kristanismo radikiĝis tie. La pastroj, kiuj provis iri tien, daŭre estis vendataj trans la limon, sed kelkaj geingoj opiniis, ke oni propre devus ilin tuj mortigi kaj ekmiliti kontraŭ la avara popolo en Sunnerbo kaj Allbo pro tio, ke la pagoj de la smolandanoj ne donis akcepteblan profiton en la komerco.

UNUA PARTO

# La longa vojaĝo

UNUA ĈAPITRO

## Pri la bienulo Toste kaj la domanaro.

Ĉe la bordo la popolo loĝis en vilaĝoj, pro pli facila sinnutrado kaj por plia sekureco; ĉar albordiĝojn ofte provis ŝipanaroj, kiuj Skanion ĉirkaŭvelis, kaj en la printempo, kiam forirante ili volis sin provizi per malmultpreza freŝa manĝo, kaj en la aŭtuno, kiam kun manoj malplenaj ili revenis de ekspedicioj sensukcesaj. Kornojn oni blovis en la nokto, kiam albordiĝintan aron oni rimarkis, kaj vokis najbarojn por helpo; kaj kelkfoje hejmaj homoj en bona vilaĝo povis mem preni unu aŭ du ŝipojn de fremduloj nesingardaj, kaj posedi belan predon por montri al forestintoj de la vilaĝo, kiam la longŝipoj venis hejmen por vintra ripozo.

Sed al riĉaj kaj fieraj viroj, kiuj propran ŝipon posedis, estis ĝene havi najbarojn proksime al si, kaj ili preferis loĝi izole, ĉar, eĉ estante sur la maro, ili siajn bienojn defendigis per bonaj viroj hejme restantaj. En la regiono de Kullen sin trovis multaj tiaj grandbienuloj; al la riĉaj kamparanoj tie gluiĝis la famo, ke ili estas pli fieraj ol tiuj en aliaj lokoj. Estante hejme ili volonte kverelis inter si, malgraŭ tio, ke vasta spaco estis inter la bienoj; sed ili ofte forestis, ĉar de infaneco ili rigardadis super la maron, kaj ĉiu el ili ĝin konsideris sia propra paŝtejo, kie ĉiuj, kiujn li renkontas, kulpas mem pro tiu malbonŝanco.

Loĝis tie bienulo nomata Toste, viro kun bona reputacio kaj

granda marveturanto; malgraŭ tio, ke li estis jam ne juna, li daŭre kondukis sian ŝipon kaj iris eksterlandon ĉiujn somerojn. Li havis parencojn en Limerick sur Irlando, inter la vikingoj ekloĝintaj tie, kaj li kutimis iri tien por komerci kaj por helpi al la ĉefulo, kiu estis de la sango de Lodbrok, preni imposton de la ejroj kaj de iliaj monaĥejoj kaj preĝejoj. Nun la bonaj konjunkturoj por vikingoj sur Irlando jam komencis dekliniĝi, post kiam Muirkjartach kun la Ledomanteloj, reĝo de Connacht, rondiris la insulon kun la ŝirmila flanko turnita kontraŭ la maro; ĉar nun la enloĝantoj sin defendis pli bone ol antaŭe kaj pli vole sekvis siajn reĝojn, tiel ke kostis multe da peno kolekti imposton de ili; eĉ monaĥejoj kaj preĝejoj, kiujn oni pli frue facile prirabis, nun jam konstruis altajn turojn el ŝtonoj, kie la pastroj sin kaŝis kun siaj trezoroj, kaj ne estis eble ilin atingi per fajro nek per armiloj. Tial multaj inter la viroj de Toste nun opiniis, ke estus pli bone direkti la vojaĝojn al Anglolando aŭ Frankoregno, kie la cirkonstancoj estas pli bonaj, kaj pli estus gajnebla per malpli da peno; sed Toste sentis sin pli komforte, kiam li agis laŭ sia kutimo, kaj li pensis, ke li estas tro maljuna provi landojn, kie li sin ne sentas hejme.

Lia edzino nomiĝis Åsa kaj devenis el la regiono de la arbaroj. Ŝi havis senlacan langon kaj estis iom batalema laŭ humoro, kaj Toste foje diris, ke nenian antaŭsignon li povas rimarki de tio, ke ŝi mildiĝos kun la jaroj, kiel ordinare okazas al viroj; sed ŝi estis bona mastrino de domo kaj bone zorgis pri la bieno, dum Toste forestadis. Ŝi jam naskis al li kvin filojn kaj tri filinojn, sed al la filoj bonŝanco ne estis. La unue naskita jam frue pereis dum festo de geedziĝo, kiam li, gaja pro biero, volis montri, ke li povas rajdi sur bovo; la post tiu naskitan la ondoj kaptis dum ŝtormo dum lia unua vojaĝo. Sed plej kruele la malbonsorto frapis la kvaran, kies nomo estis Are, ĉar en somero, kiam li havis dek naŭ jarojn, li gravedigis

la edzinojn de du najbaroj, dum iliaj edzoj estis ekster lando, kaj per tio kaŭzis grandan malordon kaj multan mokon kaj ankaŭ grandajn elspezojn al Toste, kiam revenis la edzoj. Post tio li fariĝis melankolia kaj hontema antaŭ homoj kaj mortigis viron, kiu tro multe ŝercis pri lia braveco, kaj post tio fuĝis el la lando. Kuris la famo, ke li sin aligis al svedaj komercistoj kaj iris orienten kun ili por ne renkonti homojn, kiuj scias pri liaj ĉagrenoj; sed post tio oni nenion aŭdis pri li. Åsa sonĝis pri nigra ĉevalo kun sango sur la ŝultroj, kaj el tio ŝi sciis, ke li mortis.

Restis do post tio du filoj al Åsa kaj Toste. La pli maljuna nomiĝis Odd; li estis viro de malalta staturo kaj fortika kresko, kurbkrura kaj forta, malmolmana kaj pripensema antaŭ parolo; frue li prenis parton en la vojaĝoj de Toste kaj havis lertan manon pri ŝipo kaj armiloj. Hejme lin baldaŭ ekregis malbona humoro, ĉar estis al li malfacile pasigi la vintrojn; kaj tiam ofte leviĝis kverelo inter li kaj Åsa. Li kutimis diri, ke li sen ŝanĝeblo estas tia, ke al li pli bongustas ranca, sala manĝo sur la ŝipo, ol rostaĵo ĉe la julo en la domo; sed Åsa diris, ke neniam ŝi rimarkis, ke li estis tiu, kiu prenis plej malmulte el la plej bona de tio, kion ŝi surtabligis. Ĉiun tagon li dormis tiom, ke li plendis, ke li malbone dormas en la noktoj; eĉ kiam li prenas servistinon al si sur la litopajlon, li diris, ne tre pliboniĝas. Åsa malŝatis, ke li kuŝas kun ŝiaj servistinoj: facile ili el tio fariĝos trofieraj kaj arogantaj kontraŭ sia mastrino, kaj Odd prefere edziĝu. Sed Odd diris, ke tio ne urĝas: tiujn virinojn, kun kiuj li sin sentis plej komforte, li trovis sur Irlando, kaj iun de tiu speco li ne bone povas venigi hejmen kun si; ĉar en tiu okazo li povus supozi, ke inter ŝi kaj Åsa okazos batalo per bekoj kaj ungoj. Tiam Åsa incitiĝis kaj demandis, ĉu li tie sidas kaj deziras, ke ŝi mortu. Okazis, ke Odd respondis, ke en tiu afero ŝi agu tiel, kiel al ŝi ŝajnas pli bone: li ne

volas doni al ŝi konsilojn en tiu afero, sed eltenos ion ajn, kio okazos.

Malgraŭ tio, ke li malrapide vortigis siajn pensojn, Åsa ne ĉiam venkis en la vortoluktoj kontraŭ li; ŝi kutimis diri, ke severa estis la sorto kontraŭ ŝi, ke ŝi perdis tri bonajn filojn, kaj restas nur tiu, kiun ŝi plej facile povus malhavi.

Pli bone akordis Odd kun Toste; tuj kiam venis la printempo, kaj ekodoris gudro ĉirkaŭ boatejoj kaj pontoj, lia humoro malpeziĝis. Tiam li kelkfoje provis eĉ kunmeti kantojn, kvankam tio estis malfacila por li: pri tio, kiel la kampo de la aŭko nun estas preta por plugado; aŭ kiel la ĉevaloj de la maro baldaŭ lin portos al la somerolando.

Sed grandan renomon kiel poeto li neniam akiris kaj plej malmulte inter la edziniĝopretaj bienulfilinoj en la regiono. Malofte oni vidis lin returne rigardi, kiam li forvelis.

Lia frato estis la plej juna inter ĉiuj infanoj de Toste kaj okuljuvelo de sia patrino; lia nomo estis Orm. Li rapide kreskis kaj fariĝis alta kaj osteca, kaj Åsa multe lamentis pro lia malgraseco; tuj kiam li ne manĝis multe pli ol la plenkreskintoj, ŝi ĉiam kredis, ke ŝi lin perdos kaj diris, ke lia manĝomalemo kaŭzos lian pereon. Orm ŝatis manĝon kaj malofte plendis pro la zorgoj de sia patrino pri lia nutrado, sed Toste kaj Odd kelkfoje gruntis koncerne delikatajn pecojn, kiujn ŝi destinis al li. Kiel infano li kelkajn fojojn estis malsana; kaj poste Åsa neniam povis kredi, ke lia sano estas bona, sed konstante lin ĉirkaŭis per timo kaj admonoj kaj kelkfoje kaŭzis, ke li sin sentas plena de danĝeraj suferoj kaj en granda bezono de sanktigita bulbo, magiaj kantoj kaj varmaj argilkruĉoj, kiam lian plej gravan malsanon kaŭzis tromanĝado de hordea griaĵo kaj lardo.

Kun lia kreskado la ĉagrenoj de Åsa plimultiĝis. Estis ŝia espero, ke li fariĝu rimarkinda homo kaj ĉefulo; ŝi ofte kun kontento

diris al Toste, ke li montras signojn, ke li fariĝos granda kaj forta kaj ke li jam estas tiel saĝa en siaj paroloj, ke ŝajnas, ke en ĉio li similas sian patrinon; sed ŝi estis plena de timo pro ĉiuj danĝeroj, kiuj lin renkontos sur la vojoj de viroj. Ofte ŝi parolis kun li pri la malbonsortoj de liaj fratoj kaj promesigis lin, ke li evitu bovojn, estu singarda sur ŝipoj kaj neniam kuŝu kun la edzinoj de aliaj viroj; sed krom tio multaj aliaj aferoj povus okazi al li, kaj ŝi ne sciis, kion fari (tiel ke ŝi sin trovis en granda embaraso). Kiam li havis dek ses jarojn kaj preparis sin por iri kun la aliaj, Åsa tion malpermesis, ĉar li estus ankoraŭ tro juna kaj havus tro delikatan sanstaton; kaj kiam Toste demandis, ĉu ŝi por ĉiam intencas lin eduki kiel kuirejan ĉefulon kaj virinheroon, ŝi eksplodis per tia furiozo, ke Toste ektimis kaj lasis ŝin kaj ĝojis, ke li mem povis foriri kiel eble plej rapide.

En tiu aŭtuno Toste kaj Odd malfrue revenis kaj estis perdintaj tiom el la ŝipanaro, ke la restintoj apenaŭ sufiĉis por la remiloj; sed ili tamen estis kontentaj kaj havis multon por rakonti. En Limerick la gajno estis malgranda, ĉar la ejraj reĝoj en Munster jam fariĝis tiel potencaj, ke al la vikingoj tie restis preskaŭ nur defendi sin mem; sed amikoj de Toste, kiuj estis tie kun siaj ŝipoj, demandis lin, ĉu li volas partopreni atakon kontraŭ somermeza foiro, kiu okazas en Merioneth en Kimrujo, en loko kie vikingoj neniam estis, sed kien oni nun povus iri helpe de kelkaj fidindaj vojmontristoj, kiujn la amikoj de Toste tenis en preteco. Odd persvadis Toste, ke ili partoprenu, kaj ankaŭ la ŝipanaro volis; kaj en sep ŝipoj ili albordiĝis apud Merioneth kaj marŝis ĝenan distancon en la landon kaj nerimarkite venis al la foiro. Fariĝis akra batalo kun certa homperdo, kaj la vikingoj venkis kaj konkeris grandan predon en formo de varoj kaj kaptitoj. Post tio ili velveturis al Cork kaj vendis siajn kaptitojn, ĉar en Cork de longa tempo kolektiĝis sklavkomercistoj de ĉiuj anguloj de la mondo por elekti inter la kaptoj, kiujn la vikingoj portis

tien; kaj la reĝo tie, Olof kun la Gemoj, kiu estis kristano kaj tre maljuna kaj saĝa, kutimis mem aĉeti tiujn, kiujn li trovis konvenaj, por poste permesi al parencoj reaĉeti ilin kun bona profito por li. De Cork ili velis hejmen en forta societo por ne fali en la manojn de piratoj, ĉar ili havis malmultan emon batali kun malforta ŝipanaro kaj multaj riĉaĵoj en la ŝipo. Tiel ili sukcesis neatakite ĉirkaŭiri Skagen, kie kutimis homoj de Vik kaj Vestfold embuski por kapti riĉe ŝarĝitajn ŝipojn hejmenvelantajn.

Post kiam la ŝipanaro ricevis sian parton de la predo, restis multe al Toste; kaj, pesinte sian arĝenton en sia kamero, li diris, ke vojaĝo tia, kia tiu ĉi, povas esti bona fino de liaj ekspedicioj, kaj estontece li intencas resti hejme, tiom pli ĉar lia korpo komencas rigidiĝi, kaj Odd nun povas prizorgi ĉion tiel bone kiel li mem kaj cetere havos helpon de Orm. Odd diris, ke li opinias tion saĝa parolo. Sed Åsa tuj diris, ke ĝi ne estas saĝa; ĉar sen dubo multe da arĝento estas akirita, sed tiom da homoj manĝas ĉe ili ĉiun vintron, ke tio ne longe sufiĉos; kaj ĉu oni povas fidi, ke Odd ne malŝparos la tutan profiton por siaj virinoj sur Irlando, se li eĉ zorgus pri tio, ke li revenu hejmen; kaj Toste devus kompreni, ke la rigidecon en la dorso li ricevas sidante senlabora ĉe la fajro dum la vintroj, ne kiam li estas sur la maro, kaj al ŝi estas jam sufiĉe, ke ŝi stumblas super liaj kruroj dum unu duono de la jaro. Ŝi ne povas kompreni, ŝi diris, kiaj estas viroj nuntempe, ĉar la frato de ŝia propra avo, Sven Ratnazo, granda heroo inter geingoj, pereis kiel viro en batalo kontraŭ smolandanoj, tri jarojn post kiam li ankoraŭ drinkis ĉiujn sub la tablon ĉe la edziĝofesto de sia plej maljuna nepo, kaj nun oni aŭdas virojn en siaj plej bonaj jaroj paroli pri doloroj, kaj ili ne hontas morti sur pajlo kiel bovinoj. Sed nun Toste kaj Odd kaj ĉiuj revenintoj ricevos bonan bieron kiel bonvenaĵon, el kvanto kiu bongustos al ili; kaj Toste forpelu tiajn pensojn el sia kapo kaj tostu por same bona vo-

jaĝo en la venonta jaro, kaj post tio ili havos bonan vintron kune, se nur neniu faros al ŝi ĉagrenojn per tiaspeca parolaĉo.

Post kiam ŝi foriris por prizorgi la bieron, diris Odd, ke eble Sven Ratnazo elektis la smolandanojn kiel la pli bonan alternativon, se ĉiuj virinoj en tiu familio faris tiom da bruo kiel ŝi; kaj Toste diris, ke li ne volas tutplene kontraŭdiri tion, sed ke ŝi estas multmaniere brava virino kaj ke li ne volas pli ol necese ŝin inciti; kaj ankaŭ Odd ne devas tion fari.

En tiu vintro ĉiuj rimarkis, ke Åsa iam-tiam iris pala kaj premata prizorgante siajn devojn kaj ke ŝia lango kuris malpli rapide ol kutime; pli ol iam antaŭe ŝi zorgis pri Orm, kaj kelkfoje ŝi haltis kaj lin rigardis, kvazaŭ ŝi havus vizion. Orm estis jam plenkreska kaj povis laŭ forto konkuri kun ĉiuj samaĝaj kaj multaj pli aĝaj. Li estis ruĝhara kaj havis helan haŭton kaj larĝan spacon inter la okuloj. Li estis kurtnaza kaj larĝbuŝa, longbraka kaj iom kurbdorsa; li estis moviĝema kaj rapida kaj traktante arkon kaj lancon pli lerta ol la plej multaj. Li facile falis en furiozon, kaj tiam li povis sin blinde ĵeti sur tiun, kiu lin incitis; kaj eĉ Odd, kiu pli frue kun plezuro lin paligis kaj furiozigis, nun jam fariĝis singarda kun li, ĉar lia forto lin faris danĝera. Sed cetere li estis trankvila kaj obeema kaj ankoraŭ konservis la kutimon en ĉio sin submeti al la deziroj de Åsa, malgraŭ tio, ke li iam-tiam kverelis kun ŝi, kiam ŝiaj zorgoj ŝajnis al li ĝenaj.

Nun Toste donis al li armilojn de viro, glavon kaj larĝan hakilon kaj bonan helmon, kaj Orm mem faris ŝirmilon; sed maŝkiraso mankis, ĉar neniu en la domo konvenis al li, kaj nuntempe malmultaj maŝforĝistoj restis en la lando, ĉar la plimulto el ili iris eksterlanden, al Anglolando aŭ al la jarlo en Rueno, kie ricevis ili pli altan pagon. Toste opiniis, ke Orm povas por kelka tempo kontentiĝi kun leda ĉemizo, ĝis li povos havigi al si bonan ĉemizon sur Irlando: tie

ĉiam troviĝas batalkostumoj de mortintoj en ĉiuj havenoj je malaltaj prezoj.

Kiam ili en iu tago sidis ĉe la manĝo parolante pri tio, Åsa metis sian vizaĝon kontraŭ la brakojn kaj komencis plori. Ĉiuj silentiĝis kaj rigardis al ŝi, ĉar nur malofte ŝi faligis larmojn; Odd demandis, ĉu ŝi havas dentodoloron. Åsa viŝis al si la vizaĝon kaj sin turnis al Toste; ŝi diris, ke la parolo pri vestoj de mortintoj ŝajnis al ŝi malbona antaŭsigno, kaj ŝi estas jam certa, ke Orm pereos, tuj kiam li sekvos ilin sur la maron; ĉar jam tri fojojn ŝi en siaj sonĝoj vidis lin kuŝi sanganta sur ŝipbenko, kaj ĉiuj scias, ke ŝiaj sonĝoj estas fidindaj. Tial ŝi nun volas peti al Toste, ke li estu bona al ŝi kaj ne pereigu la vivon de Orm sennecese, sed lasu lin resti hejme dum tiu ĉi somero; ĉar ŝi kredas, ke la danĝero lin minacos nun, baldaŭ, kaj se li povos ĝin transvivi, li eble estos malpli minacata poste.

Orm demandis, ĉu ŝi povis vidi en la sonĝo, kie li estis vundita. Åsa diris, ke ŝi ĉiun fojon tuj vekiĝis pro teruro ĉe la vido; sed ŝi vidis, ke liaj haroj estis sangaj kaj lia vizaĝo tre pala, kaj tiu ĉi sonĝo ŝin jam multe premis, ĉiam pli kiam ĝi revenis, sed pli frue ŝi nenion volis diri.

Toste sidis pensema kaj poste diris, ke li ne multon scias pri sonĝoj kaj neniam havis timojn pro tiaj aferoj.

—Ĉar la maljunaj homoj kutimis diri, ke kiel ŝpinos la Ŝpinistinoj, tiel estos. Sed kiam nun vi, Åsa, jam tri fojojn sonĝis la saman sonĝon, tiam ĝi eble tamen estas averto; kaj ni jam perdis sufiĉe da filoj. Tial mi ne kontraŭdiros al vi en tio ĉi; kaj Orm povos resti hejme dum tiu ĉi somero, se li mem konsentas. Al mi nun estas la sento, ke mi bone povas vojaĝi ankoraŭ unu fojon; tiel eble estos plej bone por ni ĉiuj.

Odd konsentis kun Toste, ĉar li multajn fojojn rimarkis, ke la sonĝoj de Åsa realiĝis. Orm ne estis kontenta pri tio, kion oni deci-

dis, sed li havis la kutimon sin submeti al la deziroj de Åsa en gravaj aferoj; kaj post tio nenio pli estis parolata pri tio.

Kiam la printempo jam venis, kaj sufiĉe da viroj el la interno de la lando jam konsentis kun Toste pri loko inter lia ŝipanaro, li kaj Odd forvelis kiel kutime, kaj Orm restis hejme. Li portis malkontenton kontraŭ Åsa, kaj kelkfoje li sin ŝajnigis malsana por ŝin timigi; sed kiam ŝi urĝiĝis per zorgado kaj kuraco, li mem ekkredis tion, kion li ŝajnigis, kaj havis malmulte da ĝuo el sia ludo. Åsa ne povis forgesi sian sonĝon, kaj spite al ĉiuj ĉagrenoj, kiujn li kaŭzis, ŝi ĝojis, ke ŝi lin havas en la hejmo.

Sed en tiu somero tamen komenciĝis lia unua vojaĝo, kaj Åsa ne estis konsultita.

DUA ĈAPITRO

## Pri la ekspedicio de Krok kaj kiel Orm ekvojaĝis.

En la kvardeka jaro de la regado de Harald Bludenta, ses some rojn antaŭ la militiro de la Jomsvikingoj al Norvegujo, tri ŝipoj kun novaj veloj kaj bone ekipitaj per viroj forlasis Lister kaj sin direktis suden por rabi inter la vendoj. La ĉefulo nomiĝis Krok. Li estis homo malhela, alta, osteca kaj tre forta; lia reputacio en la regiono estis granda, ĉar li facile elpensis sentimajn planojn kaj kutimis moki homojn, kiujn frapis malsukcesoj, kaj klarigi kiel pli bone li aranĝus aferojn. Neniam li mem multon faris, sed fartis plej bone rakontante, kion li baldaŭ faros; sed nun li jam tiel longe ekscitis la junulojn de la regiono per paroloj pri predo, kiun bravaj homoj povus akiri dum mallonga iro kontraŭ la vendoj, ke viroj kuniradis kaj ŝipoj estis ekipitaj kaj li mem estis elektita ĉefulo por la ekspedicio. Multo estas gajnebla inter la vendoj, li diris; antaŭ ĉio regas certeco pri granda kapto de arĝento, sukceno kaj sklavoj.

Krok kaj liaj ŝipanoj venis al la bordo de la vendoj, atingis rivereton kaj remi supren kontraŭ forta fluo, ĝis ili alvenis fortikaĵon el ligno kun palisaro trans la rivero. Ĉi tie ili surbordiĝis en frua mateno, kaj ili proksimiĝis al la vendoj irante ĉirkaŭ iliaj lignaj konstruoj. Sed la vendoj estis multaj kaj diligente pafadis sagojn, kaj la ŝipanoj de Krok estis lacaj pro peza remado; akra batalo okazis antaŭ ol fuĝis la vendoj. Tiam Krok jam perdis valorajn ŝipanojn, kaj kiam

estis kalkulata la predo, ĝia konsisto montriĝis kelkaj feraj bolpotoj kaj kelkaj ŝafofelaj peltaĵoj. Ili sin returnis kaj remis malsupren laŭ la rivero kaj faris provon ĉe alia loko pli okcidente; sed ankaŭ tiu vilaĝo sin bone defendis; kaj post akra lukto, en kiu ili denove suferis homperdojn, la viroj de Krok akiris kelkajn fumaĵitajn porkoduonojn, difektan kirasĉemizon kaj kolĉenon el malgrandaj eluzitaj arĝentomoneroj.

Ili siajn mortintojn enterigis ĉe la bordo kaj interkonsiliĝis; kaj al Krok estis malfacile klarigi, kial la ekspedicio ne montriĝis tia, kia li ĝin antaŭdiris. Sed per prudentaj vortoj li sukcesis trankviligi siajn kunŝipanojn. Por hazarda kaj okaza malsukceso, li diris, oni ĉiam estu preta; vera vikingo ne rezignas pro unu aŭ alia bagatelo; la vendoj komencas fariĝi pli malfacile venkeblaj ol antaŭe, kaj li nun volas prezenti bonan proponon, kiu alportos profiton al ĉiuj. Oni provu atakon sur Bornholmo, ĉar ĝiaj riĉaĵoj estas bone konataj al ĉiuj, kaj malmultaj luktokapablaj homoj restas sur la insulo, ĉar ili lastatempe de tie iris al Anglolando. Albordiĝo tie donos per malmulta peno abundan profiton el oro kaj ankaŭ el murtapiŝoj kaj belaj armiloj.

Ili trovis tion bona parolo kaj retrovis sian fidon; ili levis la velojn kaj direktis la ŝipojn al Bornholmo kaj venis tien en frua mateno, kaj ili remis laŭ la orienta bordo en senvento kaj leviĝanta nebulo por serĉi oportunan albordiĝejon. Ili remadis proksime unu al alia kaj bonhumoro regis inter ili, sed ili sin tenis silentaj por klopodi al nerimarkita albordiĝo. Tiam ili antaŭ si aŭdis sonon de grincantaj remilteniloj kaj regule trempataj remilplatoj kaj videtis tra la nebulo solan longŝipon venantan el malantaŭ terlango kaj proksimiĝantan de rekte antaŭe kun nebremsata remado. Ĉiuj siajn okulojn direktis al la ŝipo, kiu estis granda kaj bela, kun ruĝa drakokapo kaj dudek paroj da remiloj, kaj ili ĝojis, ke ĝi estas sola; kaj Krok ordonis, ke ĉiuj ŝipanoj, kiuj ne remas, prenu siajn armilojn kaj ek-

staru pretaj, ĉar jen multo estos gajnebla. Sed la sola ŝipo proksimiĝis, kvazaŭ ĝiaj ŝipanoj nenion rimarkus; kaj korpulenta viro en ĝia pruo, kun larĝa barbo sub frapmarkita helmo, metis la manon antaŭ la buŝon, kiam ĝi alvenis proksime, kaj kriis raŭkvoĉe:

—Nin evitu aŭ batalu !

Krok ridis, kaj liaj ŝipanoj ridis kun li, kaj li rekriis:

—Ĉu vi vidis tri ŝipojn eviti unu?

—Eĉ pli mi vidis, kriis senpacience la korpulentulo; ĉar la plimulto cedas vojon al Styrbjörn. Sed nun tuj elektu, kion vi volas !

Tiam Krok nenion pli diris, sed cedis vojon kaj ripozigis la remilojn dum la fremda ŝipo pasis; kaj neniu glavo estis elingigita en la ŝipoj de Krok. Ili vidis altstaturan junan viron en blua mantelo kaj kun blondaj lanugoj sur la mentono, kiu estis sin levinta de sia ripozloko apud la direktilisto en la fremda ŝipo, kaj kiu staris kun lanco en mano rigardante ilin per duonfermitaj okuloj kaj post tio vaste oscedis; poste li formetis la lancon kaj reripozis; kaj la viroj de Krok komprenis, ke li estas Björn Olofsson, nomata Styrbjörn, forpelita nevo de la reĝo en Upsalo, kiu malofte cedas pro ŝtormo kaj neniam pro lukto, kaj kiun malmultaj deziras renkonti sur la maro. Lia ŝipo daŭrigis sian iron kaj malaperis suden en la nebuloj; sed al Krok kaj liaj ŝipanoj estis malfacile retrovi la bonhumoron.

Ili remis ĝis la orientaj insuletoj, kie ne loĝas homoj, kaj albordiĝis tie, boligis nutraĵojn kaj longe interkonsiliĝis; multaj nun opiniis, ke ili prefere reveladu hejmen pro tio, ke la malbonŝanco ilin akompanis eĉ ĝis Bornholmo. Ĉar kiam Styrbjörn remadas laŭ tiu bordo, tiam certe multaj Jomsvikingoj estas sur la insulo, kaj tiam aliaj homoj nenion povas fari. Kelkaj diris, ke eble al ili ne estas spaco sur la maro, se ili ne havas ĉefulon de la formato de Styrbjörn, kiu ne cedas sen neceso.

Krok komence estis pli ŝparvorta ol kutime; sed li albordigis

bieron por ĉiuj; kaj post kiam ili trinkis, li komencis ilin rekuraĝigi. Laŭ unu vidmaniero estis malbonŝance, ke ili renkontis Styrbjörn, li voleme tion rekonas; sed laŭ alia maniero estis granda bonŝanco, ke ili lin renkontis tiel, kiel okazis; ĉar se ili estus renkontintaj liajn homojn aŭ aliajn Jomsvikingojn sur la tero de la insulo, tio kaŭzus al ili gravan damaĝon. Ĉiuj Jomsvikingoj, kaj aparte la viroj de Styrbjörn, estas duone berserkoj, foje rezistaj kontraŭ fero, kaj ili frapas per ambaŭ manoj same tiel bone, kiel la plej lertaj bataluloj de Lister. Ke li ne volis ataki la ŝipon de Styrbjörn, tio eble al senpensulo ŝajnis stranga konduto; sed li opinias, ke li havis bonan kaŭzon por sia reteniĝemo, kaj estis bonŝance, ke lia prudento lin retenis en bona horo. Ĉar ne estas verŝajne, ke sentera pirato posedas grandan ŝparitaĵon, kio valoras akran lukton; ili mem ne surmariĝis por gajni vakuan gloron, sed por akiri predon; tial li opiniis pli ĝuste pensi pri la bono de ĉiuj ol pri sia propra reputacio, kaj pripenso klarigus al ĉiuj el ili, ke en tio li agis kiel ĉefulo devas agi.

Komencinte tiel disblovi la suspektojn de siaj ŝipanoj, Krok ankaŭ mem sin sentis fortigita de siaj vortoj; kaj li daŭre malkonsilis al ili nun reiri hejmen. Ĉar la hejmanoj en Lister, li diris, estas akralanga homspeco; aparte estus ĝene revidi la virinojn, ĉar ili farus multajn demandojn pri iliaj faritaj heroaĵoj, ilia predo kaj frua reveno. Neniu viro kun bona famo volas sin elmeti al tia klaĉo, kaj la reiron hejmen ili prokrastu, ĝis ia valoraĵo akirita valoros hejmenporton. Kio nun gravas, estas akordiĝi pri tio, ke ili sin tenu kune kaj montru persiston kaj trovu bonan celon por pludaŭra vojaĝo; kaj antaŭ ol mem plue paroli, li volonte aŭskultos la opinion de prudentaj viroj pri la afero.

Unu proponis, ke ili iru al la lando de la kuroj kaj de la livernoj, kie profita predo sin trovus; sed tio ne vekis aprobon, ĉar viroj kun pli fidinda informiĝo sciis, ke la sveoj ĉiun someron multnombre

rabadas en tiuj landoj kaj malŝatas vidi fremdulojn veni kun samaj intencoj. Alia aŭdis, ke en la tuta mondo la plej granda kvanto da arĝento sin trovas sur Gotlando, kaj opiniis, ke ili faru provon tie; sed aliaj, kiuj havis aldonan scion, diris, ke la gotoj nuntempe, post sia riĉiĝo, loĝas en forte defendeblaj vilaĝoj, por kies konkerpreno estas necesa granda batalantaro.

Kaptis la parolon post tio tria viro, kaj lia nomo estis Berse. Li parolis post pensado kaj ĝuis ĝeneralan estimon pro sia saĝo. Li diris, ke komencas fariĝi malvasta kaj tropopolata la Balta Maro, kie nun tro multaj rabadas kaj kie eĉ la vendoj komencis scii, kiel sin defendi. Ĉar revojaĝo hejmen ne konvenas al ili – en tio li opinias same kiel Krok – velado okcidenten estus pripensinda ebleco. Li neniam estis en tiu direkto; sed viroj de Skanio, kun kiuj li havis konversacion ĉe foiro en la pasinta somero, estis en Anglolando kaj Bretonlando kun Toke Gormsson kaj Sigvalde Jarlo, kaj multon ili havis por diri laŭde pri la vojaĝoj. Ili pavis per froringoj kaj multekostaj vestoj; laŭ iliaj diroj la vikingoj, kiuj por iom longa tempo eklоĝis apud frankaj riverbuŝoj por rabadi interne en la lando, ofte havas grafofilinojn por sinamuzo en la lito kaj urbestrojn kaj abatojn kiel servistojn. Ĉu liaj skaniaj informintoj per tiuj asertoj strikte sin tenis je la vero, li ne scias, sed konsiderante kio estas normala fidindeco, estus eble prudente forpreni proksimume la duonon. Certe estas tamen, ke tiuj hejmenvenintoj faris impreson de tre granda bonstato, tiel ke ili eĉ regalis lin, blekingan fremdulon, per grandega kvanto da forta biero ne ŝtelante, post kiam li ekdormis, liajn posedaĵojn; kaj tial ne ĉio povas esti mensoga, kion oni ja bone scias ankaŭ el aliaj fontoj. Kie skanianoj bone eltenas, tie ankaŭ blekingoj povus prosperi; kaj tial, finis Berse, li volonte provos vojaĝon okcidenten, se la pli multaj opinios kiel li.

Multaj kriis konsenton je tio, sed aliaj diris, ke la nutraĵprovizo

estas tro malabunda por sufiĉi, ĝis ili atingos la grasajn landojn okcidente.

Tiam Krok denove kaptis la vorton kaj diris, ke Berse prezentis ĝuste tiun proponon, kiun li mem estis prezentonta. Aldone al tio, kion diris Berse pri grafofilinoj kaj riĉaj abatoj, por kiuj ordinare grandaj elaĉetsumoj estas pagataj, li volis ion aldoni, kio estas ĝenerale konata de vojaĝintaj homoj, nome, ke troviĝas ne malpli ol cent sesdek grandaj aŭ malpli grandaj reĝoj, el kiuj ĉiuj posedas trezorojn kaj belegajn virinojn, kaj kies batalulo j luktas vestitaj en nur tolaj vestaĵoj kaj do ne povas esti malfacile venkeblaj. La sola malfacilaĵo estus pasi tra la Sundo, kie oni ofte renkontas sintrudajn homojn. Sed tri ŝipoj bone ekipitaj per viroj, kiujn ne kuraĝis ataki eĉ Styrbjörn, altrudus al si respekton eĉ tie; cetere estas en ĉi tiu sezono la plimulto de la vikingoj de tiu regiono jam irintaj okcidenten; krom tio venos baldaŭ senlunaj noktoj. Kio mankas en nutraĵprovizo, estos facile havigebla tuj post trapaso de la Sundo.

Nun ĉiuj denove havis bonan humoron kaj opiniis la planon bona kaj ke Krok estas la plej kompetenta laŭ prudento kaj en scioj, kaj ĉiu fieris trovi sin sufiĉe sentima por vojaĝo okcidenten, ĉar el ilia regiono neniu ŝipo en memoro de vivantaj homoj provis tian vojaĝon.

Ili levis la velojn kaj venis al Möen kaj restis tie unu tagon kaj unu nokton kaj atente gvatis kaj atendis favoran venton. Post tio ili en ŝtorma vetero direktis sin tra la Sundo kaj pasis en la vespero tra ĝia kolo ne renkontante malamikojn; nokte ili atingis senventon malantaŭ Kullen kaj faris decidon serĉi nutraĵojn. Tri grupoj surbordiĝis, kaj ĉiu iris laŭ sia direkto. Bonŝanco akompanis la grupon de Krok, kaj ili alvenis al ŝafpaŝtejo proksime al granda bieno kaj sukcesis mortigi la paŝtiston kaj lian hundon, antaŭ ol tiuj atingis fari alarmon. Poste ili kaptis la ŝafojn kaj tranĉis al ili la kolon, tiel

multajn, kiom ili povis porti kun si; sed tiam estiĝis multa blekado, kaj Krok ordonis al siaj ŝipanoj rapidi.

Ili ree sin direktis al la ŝipoj laŭ tiu vojeto, laŭlonge de kiu ili venis, ĉiu portanta ŝafon sur la ŝultro, kaj rapidis, kiom ili povis. Ili aŭdis malantaŭ si kriojn de homoj, kiuj vekiĝis en la domo, kaj baldaŭ aŭdiĝis furioza bojado de hundoj, kiujn oni lasis liberaj en iliaj spuroj. Post tio sonis pli fore virina voĉo, kiu tranĉis tra la bruo de hundoj kaj viroj kaj kriis ”Atendu! Haltu!” kaj plurajn fojojn vokis ”Orm!” kaj poste kriis ”Atendu!” tre akre kaj malespere. Malfacile estis al la ŝipanoj de Krok paŝi rapide kun siaj ŝarĝoj, ĉar la vojeto estis ŝtonriĉa kaj kruta, kaj la nokto estis nuba kaj ankoraŭ preskaŭ malluma. Krok mem iris la lasta en la vico kaj portis sian ŝafon sur la ŝultro, kaj per la alia mano li tenis hakilon. Li preferis ne fari batalon pro la ŝafoj, ĉar ne tre sence estus riski vivojn kaj membrojn pro tiom ete; per malmildaj vortoj li pelis siajn ŝipanojn, kiam ili stumblis aŭ malrapide paŝis.

La ŝipoj naĝis apud du tri plataj rokoj, kaj la ŝipanoj evitis alpuŝiĝon per remiloj; ili estis pretaj debordiĝi post reveno de Krok, ĉar la aliaj grupoj jam revenis nenion trovinte; kelkaj atendis sur la tero por asisti al Krok, se tio necesos. Restis malmultaj paŝoj ĝis la ŝipoj, kiam du grandaj hundoj venis kuregante laŭ la vojeto. Unu saltis kontraŭ Krok, sed tiu paŝis flanken kaj ĝin trafis per la hakilo; la alia per granda salto sin ĵetis preter li kaj trafis viron, kiu iris antaŭ Krok, kaj pro sia rapido lin renversis kaj mordis al li la kolon. Iuj el la atendantoj alrapidis kaj mortigis la hundon; sed kiam ili kaj Krok sin klinis super la mordito, ili vidis, ke multe ŝiriĝis al li la kolo kaj ke rapide li mortsangas.

En tiu momento venis ĵetlanco, kiu preskaŭ tuŝis Krok, kaj du viroj kuris la deklivon malsupren kaj sur la rokojn; ili kuris tiel forte, ke ili lasis ĉiujn el sia akompanantaro post si. La pli antaŭa, kiu

ne portis helmon nek ŝirmilon, sed kiu tenis mallongan glavon en la mano, stumblis kaj falis antaŭen sur la rokojn; du lancoj pasis super li kaj trafis lian akompananton, kiu falis kaj restis kuŝanta. Sed la senhelmulo tuj stariĝis kaj ululis kiel lupo; li sin ĵetis kontraŭ viron, kiu alkuris kun levita glavo, kiam li falis, kaj tiun li faligis per frapo sur la tempion. Post tio li kuris kontraŭ Krok, kiu estis al li la plej proksima; kaj ĉio tio ĉi okazis tre rapide. Li forte kaj rapide frapis en la direkto al Krok; sed Krok ankoraŭ portis sian ŝafon kaj per ĝi sin ŝirmis; kaj en tiu sama momento li mem frapis per returnita hakilo kaj trafis sian kontraŭulon sur la frunton, tiel ke tiu falis sen konscio. Krok sin klinis super li kaj povis vidi, ke li estas junulo, ruĝhara kaj kurtnaza kaj kun pala haŭto; per la fingroj li palpis, kie trafis la hakfrapilo, kaj trovis la kranion sen frakaso.

—Mi portos kun mi ambaŭ, kaj ŝafon kaj bovidon, diris Krok; li remu anstataŭ la mortigito.

Li lin levis kaj portis sur la ŝipon kaj lin metis sub rembenkon; kaj portinte ĉion sur la ŝipon krom du viroj, kiujn ili forlasis mortintaj, ili debordigis la ŝipojn, kaj en tiu sama momento granda grupo da persekutantoj atingis la bordon. Jam komencis lumiĝi, kaj kelkaj lancoj estis ĵetataj kontraŭ la ŝipoj, sed kaŭzis nenian damaĝon. La remistoj movis siajn remilojn kun forto, ĝojaj pro tio, ke ili havas freŝan nutraĵon en la ŝipo; kaj ili jam atingis certan distancon de la bordo, kiam ili inter la figuroj sur la bordo ekvidis virinon en longa blua robo kaj kun flirtantaj haroj, kiu kuregis ĝis la rando de la rokoj kaj etendis la brakojn kontraŭ la ŝipoj kaj vokis. Ŝiaj vokoj ilin atingis sole kiel rompiĝema tono super la akvo, sed ŝi tie longe restadis post tiam, kiam nenio plu aŭdeblis.

En tiu maniero Orm, la filo de Toste, kiu kun la tempo konatiĝis kiel Orm la Ruĝa, aŭ Orm, kiu vaste vojaĝis, komencis sian unuan vojaĝon.

TRIA ĈAPITRO

# Kiel ili veladis suden kaj trovis bonan gvidanton

Malsataj la viroj de Krok alvenis Väderön reminte la tutan distancon ĝis tiu insulo, kie ili albordiĝis kaj tretis la grundon por kolekti hejtaĵon kaj kuiri al si gustan manĝon; tie loĝis sole nur kelkaj maljunaj fiŝistoj, kiuj pro sia mizero estis sekuraj kontraŭ rabistoj. Pecigante la ŝafojn ili laŭdis ilian grasecon kaj la abundan printempan paŝtaĵon, kiu devas troviĝi sur Kullen; ili fiksis la pecojn al la lancoj kaj tenis ilin en la fajro kaj ŝmacis, kiam la graso komencis sibli, ĉar longa tempo pasis, de kiam ili flaris tian bonodoron. Multaj reciproke rakontis al si pri tio, kiam ili laste pasintan fojon gustumis tiajn delikatajn pecojn, kaj akordo estiĝis inter ĉiuj, ke la vojaĝo okcidenten bone komenciĝis. Poste ili komencis manĝi, tiel ke fluis la graso laŭ la barboj.

Orm jam denove ricevis konscion, sed ne fartis tute komforte; veninte sur la teron kun la aliaj li malfacile staris sur la piedoj. Li eksidis kaj tenis la kapon inter siaj manoj kaj alparolate ne respondis. Sed post mallonga tempo, vominte kaj trinkinte akvon, li fartis pli bone, kaj kiam la fritodoro eksentiĝis, li levis la kapon kiel nove vekiĝinto kaj rigardis al la viroj ĉirkaŭ si. Tiu, kiu sidis plej proksime apud li, faris amikan grimacon kaj tranĉis pecon de sia viandpeco kaj ĝin etendis al li.

—Prenu kaj manĝu, li diris. Pli bongustan fritaĵon vi neniam gustumis.

—Tion mi scias, respondis Orm, ĉar mi mem regalas.

Li prenis la pecon kaj ne manĝante tenis ĝin per la fingroj. Ĉirkaŭrigardante li zorge ekzamenis viron post viro en la rondo kaj post tio diris:

—Kie estas tiu, kiun mi frapis? Ĉu li mortis?

—Li mortis, respondis lia najbaro, sed neniu ĉi tie devas lin venĝi, kaj vi remos anstataŭ li. Lia remilo estas tiu antaŭ mi, kaj tial estas prefere, ke ni fariĝu amikoj. Mi nomiĝas Toke, kiel vi nomiĝas?

Orm menciis sian nomon kaj poste demandis:

—Ĉu bonan reputacion havis tiu, kiun mi mortigis?

—Iom malrapidema li estis, kiel vi rimarkis, diris Toke, kaj li ne manipulis armilojn same kompetente kiel mi, sed tio estus tro granda postulo, ĉar mi estas unu el la plej lertaj tie ĉi. Sed li estis forta kaj memfida viro kaj havis bonan reputacion; li nomiĝis Åle, kaj lia patro semas da sekalo dek ok barelojn, kaj li ekspediciis sur la maron jam du fojojn. Kaj se vi remos kiel li, vi ne malbone remos.

Kiam tion aŭdis Orm, lia humoro videble pliboniĝis, kaj li komencis manĝi. Sed post mallonge li demandis:

—Kiu min faligis?

Proksime sidis Krok kaj aŭdis lian demandon. Li ridis kaj levis sian hakilon kaj finmaĉis kaj diris:

—Jen kiu vin kisis; se ŝi estus vin mordinta, vi ne demandus.

Orm rigardis al Krok per grandaj okuloj, kiujn palpebrumo ne kovris, poste li suspiris kaj diris:

—Mi ne portis helmon kaj perdis la spiradon, alie elturniĝus eble aliel la aferoj.

—Memfida vi estas, skaniano, diris Krok, kaj jam pensas, ke vi estas batalulo. Sed vi ankoraŭ estas tro juna kaj ne havas prudenton

de batalulo. Ĉar prudenta viro ne elkuras sen helmo pro kelkaj ŝafoj; ne, eĉ ne se lia propra edzino estus ŝtelita. Sed laŭ mia kredo vi estas viro kun bonŝanco, kaj eble vi alportos bonŝancon al ni ĉiuj. Vian propran bonŝancon ni jam vidis en tri manieroj. Vi falis pro la ŝtonoj, kiam du lancoj flugis kontraŭ vi, kaj neniu el ni venĝos pro Åle, kiun vi mortigis, kaj mi ne mortigis vin, ĉar mi volis remiston anstataŭ li. Tial mi kredas, ke via bonŝanco estas granda kaj povos utili al ni, kaj nun mi donas al vi pacon de ni ĉiuj, dum vi zorgos pri la remilo de Åle.

Ĉiuj ŝipanoj opiniis tion bona parolo de Krok. Orm manĝis kaj pripensis; post tio li diris:

—Mi akceptas vian pacon; kaj mi ne kredas, ke estas necese honti pro tio, malgraŭ tio, ke vi ŝtelis ŝafojn de mi. Sed kiel sklavo mi ne volas remi, ĉar mi venas de bona familio; kaj malgraŭ tio, ke mi estas juna, mi opinias min viro kun reputacio, post kiam mi mortigis tiel bonan ŝipanon kiel Åle. Tial mi volas rericevi mian glavon.

Leviĝis nun multa interkonsiliĝo pri tio. Kelkaj opiniis, ke al la postulo de Orm mankas modero kaj ke li devus esti kontenta je tio, ke li la vivon ricevis donace; sed aliaj diris, ke memfido ne estas malvirto ĉe junulo kaj ke oni devas montri respekton al homo kun bonŝanco; kaj Toke ridis kaj demandis, ĉu vere troviĝas multaj viroj, kiuj inter tri ŝipanaroj sentas timon antaŭ junulo kun glavo. Viro portanta la nomon Kalv, kiu kontraŭis la postulon de Orm, volis interbatali kun Toke pro ties vortoj; kaj Toke deklaris, ke li volas, tuj post kiam li finmanĝis la bongustan pecon de reno, kiun li ĝuste nun maĉas. Sed Krok malpermesis ĉian interbatalon pro tia afero, kaj fine Orm rericevis sian glavon kaj estis decidite, ke lia estonta konduto elmontru, ĉu ili konsideru lin kaptito aŭ kamarado. Sed por la glavo, kiu estis bona armilo, Orm donu pagon al Krok, tuj post kiam oni tian gajnos dum la vojaĝo.

Blovis nun malforta brizo, kaj Krok diris, ke venis la horo forveli kun ĝi. Ĉiuj enŝipiĝis, kaj la ŝipoj direktiĝis tra Kategato kun plenblovitaj veloj. Orm rerigardis super la maron kaj diris, ke por Krok estas tre bonŝance, ke ne multaj ŝipoj restas hejme en la regiono dum ĉi tiu sezono, ĉar alie lia patrino, se li bone ŝin konas, estus sur la maro persekutante ilin kun duona loĝantaro de Kullen en la ŝipoj.

Post tio li lavis sian vundon sur la frunto kaj fortrempis la sangon el siaj haroj; kaj Krok diris, ke la cikatro sur la frunto estos montrinda al virinoj. Poste Toke alportis malnovan ledan helmon kun feraj stangetoj; ĝi ne multe ŝirmos, li diris, sed li ĝin trovis ĉe la vendoj kaj neniun pli bonan povas proponi. Kontraŭ hakilo, li diris, ĝi malmulte taŭgas, sed tamen estos pli bona ol nenio. Orm ĝin provis, kaj oni trovis, ke ĝi konvenos al lia kapo, kiam malaperos la ŝvelaĵo. Orm dankis al Toke; kaj nun ambaŭ sciis, ke ili estos amikoj.

Ili ĉirkaŭvelis Skagen pelataj de bona vento kaj tie oferis laŭ malnova moro al Ägir kaj lia tuta parencaro, kaj ŝafoviandon kaj lardon kaj trinkaĵon, kaj longe akompanis ilin kriantaj mevoj, kaj tion ili konsideris bona signo. Ili stiris laŭlonge la jutlandan bordon, kie la lando estis dezerta kaj trabskeletoj de rompiĝintaj ŝipoj ofte estis videblaj sur la sablo; pli sude ili vizitis kelkajn insuletojn kaj trovis akvon kaj nutraĵon, sed cetere nenion. Ili daŭrigis pli suden laŭ la bordo; kaj plejparte la vento favoris ilin, tiel ke la neneceso multe remi tenis la virojn je bona humoro. Toke diris, ke eble Orm havas ankaŭ veterbonŝancon aldone al ĉio alia: veterbonŝanco estas inter la plej preferindaj dotitaĵoj, kiujn viro povas havi, kaj vere Orm povas flegi esperon pri bona estonteco. Orm kredis, ke Toke tre kredeble pravas; sed Krok ne same opiniis. La veterbonŝanco estas la mia, li diris, ĉar vento kaj vetero nin favoris plejeble ekde komenco, longe antaŭ ol Orm alvenis; kaj se mi ne fidus mian ve-

terbonŝancon, mi neniam kuraĝus entrepreni ĉi tiun ekspedicion. Sed la ŝanco de Orm estas favora, eĉ se ĝi ne similas al la mia, kaj ju pli da bonŝanculoj estas en la ŝipo, des pli bone estas por ni ĉiuj.

La saĝa Berse samopiniis en tio kaj diris, ke viroj sen bonŝanco vivas pli riske ol ĉiuj aliaj.

—Ĉar super viroj povas venki viroj, kaj super armiloj armiloj, por la dioj ekzistas oferoj, kaj kontraŭ magio magio, sed en okazo de malbonŝanco oni nenion povas kontraŭmeti.

Toke diris, ke li ne scias, ĉu li siaparte havas grandan bonŝancon krom en tio, ke lia fiŝkapta bonŝanco ĉiam estis bona. El kvereloj kun aliaj viroj li sin ĉiam eltiris sukcese, sed tio eble pli dependas de forteco kaj lerteco ol de bonŝanco.

—Sed nun, li diris, mi havas scivolemon, ĉu mi dum ĉi tiu vojaĝo havos bonan orobonŝancon kaj virinobonŝancon; ĉar multon mi aŭdis pri ĉiuj belaĵoj, kiuj sin trovas okcidente, kaj pasis jam longa tempo, de kiam mi tenis ororingon aŭ virinon en la mano. Sed eĉ se mi trovos pli da arĝento ol oro kaj ne trovos grafofilinon, kiel Berse intencas fari, sed nur ordinarajn frankajn junulinojn, mi ne plendos; ĉar mi ne estas homo trofiera.

Krok diris, ke Toke devos dum ankoraŭ kelka tempo praktiki paciencon, kiel ajn granda lia avido je tio aŭ alia, kaj Toke opiniis tion kredebla; ĉar ne ŝajnas, li opiniis, ke oro kaj virinoj abundas en ĉi tiuj regionoj.

Ili vojaĝis laŭ malaltaj bordoj, kie krom sablo kaj marĉoj kaj maloftaj fiŝistkabanoj nenio estis videbla; ili pasis terlangojn, kie estis starigitaj altaj krucoj, kaj tiam ili komprenis, ke ili jam atingis la landon de la kristanoj kaj la frankajn bordojn. Ĉar la kleraj ŝipanoj havis scion, ke la granda imperiestro Karlo, prapatro de ĉiuj imperiestroj, la unua starigis tiajn krucojn, ke ili fortimigu normanajn marveturantojn de la lando; sed la dioj de la normanoj estis pli for-

taj ol la liaj. Kontraŭ minacaj puŝventoj kaj por tranoktadoj ili trovis ŝirmon en golfoj kaj markoloj, kaj ili vidis akvojn pli salajn kaj pli verdajn ol tiujn, kiujn ili jam antaŭe konis, sin levi kaj mallevi ĉe fluso kaj malfluso. Neniujn ŝipojn ili vidis kaj neniujn homojn, sed foje postsignojn de iama kultivado; ĉar antikve, antaŭ ol venis la nordlandanoj, estis tie abunde da vilaĝoj. Sed nun jam delonge ĉio estis rabita kaj dezertigita, kaj nur distance en la sudo marveturantoj nuntempe povis havi fidon pri profito.

Ili venis ĝis tie, kie la maro estas malvasta inter Anglolando kaj la kontinento; kaj leviĝis paroloj pri tio, ĉu ili iru al Anglolando. Ĉar ili sciis, ke ĵus mortis reĝo Edgar, kaj lin postsekvis nematuraj filoj; tio levis la landon al bona famo inter vikingoj. Sed Krok kaj Berse kaj aliaj inter la plej saĝaj tenis la opinion, ke la lando de la frankoj ankoraŭ ĉiam estas la pli bona, se oni nur atingas sufiĉe suden; ĉar la reĝo de Frankoregno kaj la imperiestro de Germanlando sin trovas en batalo unu kontraŭ la alia pri siaj limlandoj, kaj kiam io tia plenumiĝas, tiam la bordaj regionoj kutime estas altkvalita grundo por normanoj.

Tial ili restis ĉe la franka flanko; sed ili nun sin tenis je pli granda distanco de la bordo ol antaŭe kaj akre observadis en ĉiuj direktoj; ĉar ili nun atingis tiun landon, kiun normanoj konkeris de la reĝo de Frankoregno; kaj certe tie oni povis vidi iun kaj alian malnovan krucon ĉe terlangoj kaj riverbuŝoj, sed pli ofte palisojn, sur kiuj barbaj kapoj estis metitaj kiel signoj, ke la mastroj de la lando ne volonte akceptos marveturantojn de la hejmlando ĉe ĉi tiuj bordoj. Krok kaj liaj ŝipanoj opiniis, ke tia nekomplezo kontraŭ samgentanoj grande hontigas tiujn homojn, kiuj kun riĉaĵoj sidas en ĉi tiu lando, sed kion oni povas atendi, ili diris, de homoj, kiuj venis de Skanio kaj Selando; kaj ili demandis al Orm, ĉu li havas parencojn en ĉi tiu lando. Orm respondis, ke li tion ne kredas, ĉar liaj paren-

coj ĉiam veladis al Irlando; sed la metado de kapoj sur palisojn estas afero, kiun li revoku en memoron reveninte hejmen, ĉar tio povos sin montri utila por la ŝafbredado. Pri tio ĉiuj ridis kaj opiniis, ke li scias bone respondi.

Ili sin metis en embuskon ĉe riverbuŝo kaj kaptis kelkajn fiŝistboatojn, sed trovis en ili malmulte da valoro, kaj el la viroj en la boatoj ili neniun respondon povis eltiri, kiam ili demandis, ĉu riĉaj vilaĝoj troviĝas proksime; post mortigo de kelkaj el ili kaj tamen nenia komprenebla respondo de la aliaj, ili lasis ilin vivaj, ĉar ili mizere aspektis kaj ne taŭgis kiel remistoj nek por vendo. Pli ol unu fojon ili nokte surtretis la bordon, sed akiris malmulton; ĉar la popolo loĝis en tro grandaj kaj bone defendataj vilaĝoj, kaj ili devis rerapidi sur la ŝipojn, tiel ke superforto ne ĉirkaŭu ilin. Ili esperis, ke estu baldaŭ preterpasita la lando, kie regas normanoj.

En iu vespero ili renkontis kvar longŝipojn, kiuj estis remataj de sude; aspektis, ke ili portas pezan ŝarĝon, kaj Krok igis siajn ŝipojn proksimiĝi por vidi, kiom da viroj estas en ili. Estis kvieta vespero, kaj malrapide ili reciproke sin proksimigis; la fremduloj metis sur la maston de la plej antaŭa ŝipo longan ŝildon kun la pinto turnita supren kiel signon, ke ili proksimiĝas kiel amikoj; kaj la ŝipanoj de Krok parolis kun ili je distanco de lancoĵeto, dum ili klopodis reciproke pritaksi sian forton. La fremduloj diris, ke ili havas sian originon en Jutlando kaj estas survoje hejmen post longdaŭra ekspedicio. Kun sep ŝipoj ili antaŭan someron prirabis Bretonlandon kaj post tio fore en la sudo; poste ili travintris sur insulo antaŭ la riverbuŝo de Loaro kaj ankaŭ ekspediciis laŭ la rivero; sed post tio severa epidemio frapis inter ili, kaj nun ili reiras hejmen per tiuj ŝipoj, por kiuj sufiĉas la ŝipanoj. Koncerne sian predon ili respondis, ke saĝa marveturanto neniam laŭdas sian profiton antaŭ ol li sekure ĝin metis sur la grundon, sed tiom ili povas diri, ĉar ili ĉe tiu ĉi renkonto

sin trovas sufiĉe fortaj por protekti tion, kion ili akiris, ke ili siaparte ne volas plendi. Kun malbonaj konjunkturoj, kompare kun pli frue, oni devas kalkuli, kiel ajn foren oni iras; sed tiu, kiun trafas la bonŝanco trovi nerabitan regionon en Bretonlando aŭ pli sude, ankoraŭ povas ricevi kompenson pro peno.

Krok demandis, ĉu ili havas vinon aŭ bonan bieron por interŝanĝo kontraŭ lardo kaj sekigita fiŝo; kaj samtempe li provis proksimiĝi al ili, ĉar lin obsedis severa tento riski atakon kontraŭ ili kaj per tio tuj ricevi bonan profiton. Sed la ĉefulo tuj metis siajn ŝipojn unu apud alia kun la pruoj direktitaj kontraŭ Krok, kaj respondis, ke ili intencas reteni sian vinon kaj sian bieron por propra uzo.

—Sed bonvenu pli proksimen, li diris al Krok, se ion alian vi volas gustumi.

Krok pesis lancon per la mano kaj ŝajnis necerta, kion fari; sed tiam maltrankvilo estiĝis en unu el la fremdaj ŝipoj. Sin montris du viroj en lukto unu kun la alia ĉe la ŝiprando, kaj poste ambaŭ falis en la akvon en ĉirkaŭbrako. Ambaŭ submergiĝis, kaj unu el ili sin ne plu montris; sed la alia venis al la surfaco je malgranda distanco de la ŝipoj kaj submergiĝis denove, kiam lanco estis ĵetita post li de tiuj, kiujn li forlasis. Vokoj aŭdiĝis de la jutaj ŝipoj, sed kiam la ŝipanoj de Krok demandis, kio estas, ili nenian respondon ricevis. Nun krepusko komencis veni, kaj post mallonga replikinterŝanĝo la fremduloj daŭrigis sian remadon, antaŭ ol Krok decidis pri atako. Toke, kiu sidis ĉe sia baborda remilo proksime al Orm en la ŝipo de Krok, nun vokis al Krok.

—Venu vidi! Mia fiŝkapta bonŝanco ĉiam pli boniĝas.

Unu mano tenis la remilon de Toke kaj alia tiun de Orm, kaj inter ili naĝis sur la akvosurfaco vizaĝo, kaj ĝi rigardis supren al la ŝipo. Ĝi havis grandajn okulojn, nigrajn harojn, nigran barbon kaj estis tre pala.

—Tiu certe estas brava viro kaj bona naĝanto, diris unu el la ŝipanoj; li pasis sub la ŝipo por sin savi de la jutoj.

—Li certe ankaŭ estas saĝa viro, diris alia, ĉar li fuĝas al ni kiel al pli bonaj homoj ol ili.

—Li estas nigra kiel trolo kaj flavepala kiel mortulo, diris tria, kaj apenaŭ aspektas kiel homo, kiu alportas bonŝancon; danĝere povas esti enŝipigi tian.

Nun leviĝis argumentoj por kaj kontraŭ tio, kaj kelkaj kriis demandojn al la viro en la akvo; sed li kuŝadis senmova kaj firme sin tenis je la remiloj, palpebrumis kaj balanciĝis pro la ondoj. Fine Krok ordonis, ke oni lin prenu en la ŝipon; ili ja povos poste lin mortigi, li diris al la kontraŭantoj, se tio montriĝos pli bona.

Toke kaj Orm entiris siajn remilojn kaj helpis la viron sur la ŝipon; li havis flavan haŭton kaj fortikan staturon, estis nuda ĝis la talio kaj havis por sinkovro nur kelkajn ĉifonojn. Li ŝanceliĝis kaj apenaŭ kapablis stari sur la piedoj, sed li pugnigis la manon kontraŭ la malaperantaj jutaj ŝipoj kaj kraĉis en ilia direkto kaj grincis per la dentoj kaj ion kriis; poste li falis pro ondoskuo, sed tuj restariĝis sur siaj piedoj kaj frapis sian bruston kaj etendis siajn brakojn kontraŭ la ĉielo kaj vokis per ŝanĝita voĉo sed per vortoj, kiujn neniu komprenis. En sia maljunaĝo Orm kutimis diri, kiam li rakontis pri siaj rememoroj, ke neniam li aŭdis pli koleran dentogrincadon kaj ankaŭ ne pli melankolian kaj pli sonoran voĉon, ol kiam la fremdulo vokis kontraŭ la ĉielo.

Li ŝajnis mirinda por ili ĉiuj; ili multe lin demandis pri tio, kiu li estas kaj kio okazis al li. Iujn el la demandoj li komprenis kaj kapablis respondi per kriplaj vortoj en norda lingvaĵo; ŝajnis al ili, ke li ne volas remi en sabatoj kaj ke tio estas la kaŭzo de lia malamo kontraŭ tiuj, el kies manoj li ĵus fuĝis; sed en tio ili ne vidis sencon, kaj kelkaj kredis, ke li estas frapita de frenezo. Ili donis al li manĝi

kaj trinki; kaj avide li manĝis fabojn kaj fiŝon, sed salan lardon li forpuŝis kun timego. Krok diris, ke li povos taŭgi kiel remisto, kaj je la fino de la vojaĝo li povos esti vendita por bela sumo. Berse, daŭrigis Krok, eble kun sia saĝo povos lin kompreni kaj eltrovi, ĉu li havas utilajn informojn pri la terpartoj, de kie li venas.

Dum la sekvantaj tagoj Berse ofte kune sidis kun la fremdulo, dum ili interparolis kiel eble bone. Berse estis trankvila kaj pacienca homo, manĝemulo kaj kompetenta en versfarado, kiu enŝipiĝis pro tio, ke li volis eviti sian kvereleman edzinon; li havis bonan kapablon kompreni kaj multe da scioj, kaj iom post iom li sukcesis kompreni ĉiam pli el tio, kion diris la fremdulo. Kaj tion li sciigis al Krok kaj la aliaj.

—Li ne estas freneza malgraŭ tio, ke tiel sajnas, diris Berse, li ankaŭ ne estas juto, kaj tion oni ja nete vidas. Sed li diras, ke li estas judo. Ĝi estas popolo el oriento, kiu mortigis viron, kiun la kristanoj opinias dio. Tiu mortigo okazis antaŭ longe; sed la kristanoj ĉiam plu tenas grandan malamon kontraŭ la judoj pro tio kaj volonte ilin mortigas kaj ne akceptas repaciĝon aŭ punpagon. Tial plej multaj judoj loĝas ĉe la kordova kalifo, ĉar tie la mortigita viro ne estas konsiderata dio.

Berse aldonis, ke li mem pli frue ion similan aŭdis, kaj multaj el la ŝipanoj diris, ke ankaŭ ili aŭdis similajn famojn; Orm diris, ke li aŭdis, ke la mortigito estis najlita sur ligno, same kiel faris la filoj de Lodbrok antaŭ longe kontraŭ la ĉefa pastro en Anglolando. Sed kiel oni povas lin teni dio, post kiam la judoj lin mortigis, neniu komprenis, ĉar veran dion homoj ne povas mortigi. Post tio Berse daŭrigis rakonti, kion li komprenis el la paroloj de la fremdulo:

—Li estis sklavo ĉe la jutoj dum unu jaro kaj tie multe suferis, ĉar remi en sabatoj li ne povis; ĉar la dio de la judoj koleriĝas kontraŭ ĉiu judo, kiu ion faras en tiu tago. Sed tion la jutoj ne povis

kompreni malgraŭ tio, ke li multfoje volis ĝin al ili klarigi; ili lin batis kaj igis lin malsati, kiam li ne volis remi. Ĉe ili li lernis tiun iomon, kiun li scias el nia lingvo; sed kiam li parolas pri ili, li ilin malbenas en sia propra lingvo, ĉar li ne posedas sufiĉe da vortoj en la nia. Li diris, ke li multe ploris ĉe ili kaj vokis al sia dio pri helpo; kiam niaj ŝipoj venis proksime li komprenis, ke la dio estis aŭdinta liajn vokojn, kaj kun si en la maron li prenis viron, kiu lin multe batis. Li preĝis al sia dio, ke tiu estu ŝirmilo por li mem, sed pereigu la alian; tial neniu lanco lin trafis, kaj li ricevis forton naĝi sub nia ŝipo; tian forton posedas la nomo de lia dio, ke li ĝin ne volas elparoli, kiom ajn mi penas lin persvadi. Tion li diras pri la jutoj kaj la sinsavo de ili; sed pli multe li havas por diri, kion li kredas utila por ni. En tio tamen estas multo, kion mi ne kapablas klare kompreni.

Krok diris, ke malfacile estas kredi, ke iu dio faras penon helpi al tia mizera ĉifonulo, kiom ajn li vokas, sed ke la viro nekontesteble agis brave kaj lerte; kaj la ŝipanoj scivolis, kial ĉi tiu kurioza fremdulo kun abomeno forpuŝis lardon, sed tamen estis avida je malpli bongusta nutraĵo. Berse respondis, ke pri lardo ŝajnas esti tiel, kiel estas pri remado en sabatoj: la dio de la judoj koleriĝas, kiam li vidas judon manĝi lardon, sed kial li koleriĝas pro tia afero, Berse ne komprenis. Supozeble, li diris, la dio mem tiom ŝatas tian nutraĵon, ke li ĝin envias al sia popolo; kaj la ŝipanoj akceptis tion kiel kredeblan klarigon kaj sin mem nomis feliĉaj, ke ili havas diojn, kiuj sin ne miksas en tiajn aferojn.

Nun ĉiuj havis scivolemon pri tio, kion utilan al ili diros la judo; kaj fine Berse atingis komprenon de la plimulto:

—Li diras, ke li estas riĉulo en sia lando, ĉe la kordova imperiestro; li nomiĝas Salaman kaj estas arĝentisto, kaj li diras, ke li ankaŭ estas granda poeto. Lin kaptis kristana mastro el nordo, kiu faris rabekspedicion al lia regiono. Tiu permesis al li havigi grandan el-

aĉetsumon kaj poste lin vendis al sklavkomercisto, ĉar la kristanoj ofte ne tenas promeson al judoj pro la mortigo de la dio. La sklavkomercisto lin vendis al marveturantaj komercistoj, kaj de tiuj lin rabis jutoj kaj fatalo estis al li, ke ili tuj en sabato lin metis ĉe remilon. Certe li nun malamas tiujn jutojn kun granda malamo; sed ĝi tamen estas malgranda kompare kun la malamo, kiun li sentas kontraŭ la kristana mastro, kiu lin perfidis. Tiu mastro estas tre riĉa kaj loĝas je marŝdistanco de unu tago de la maro; li diras, ke volonte li nin gvidos ĝis tie, ke ni de tiu mastro rabu ĉion, kion li posedas, kaj bruligu lian domon kaj elpiku liajn okulojn kaj lin elmetu nuda sur arbusta kaj ŝtona grundo. Li diras, ke tie estas ricaĵoj por ni ĉiuj.

Ĉiuj opiniis, ke tio estas la plej bona novaĵo, kiun ili lastatempe aŭdis, kaj Salaman, kiu sidis apud Berse dum ties rakontado kaj atente aŭskultis ĉion, kion li povis kompreni, kriante saltleviĝis kaj aspektis tre ĝoja kaj sin ĵetis vizaĝaltere antaŭ Krok kaj metis buklon de sia barbo en la buŝon kaj ĝin maĉis; poste li prenis unu piedon de Krok kaj ĝin metis sur sian nukon, dum li fervore babilis, kvankam neniu lin komprenis. Post ioma trankviliĝo li komencis serĉi inter la vortoj, kiujn li konis; li diris, ke li volas fidele servi al Krok kaj ties ŝipanoj, ĝis ili akiros tiujn riĉaĵojn kaj li mem venĝos sin; sed li volas ricevi certan promeson, ke al li mem estu permesite elpiki la okulojn de la kristana mastro. Krok kaj Berse diris, ke tio estas akceptebla postulo.

En ĉiuj tri ŝipoj nun ekestis multa babilado pri tio, kaj humoro estis plejeble bona; ili diris, ke eble la bonŝanco de la fremdulo ne tre favoras lin mem, se oni juĝas pri tio, kio okazis al li, sed ke ĝi eble des pli favoras ilin, kaj Toke opiniis, ke neniam li pli sukcese fiŝkaptis. Ili kondutis amike kontraŭ la judo kaj elserĉis kelkajn vestojn por li kaj donis al li bieron por trinki malgraŭ tio, ke malmulto restis al ili. La lando, kien li volis gvidi ilin, nomiĝis Leon, kaj oni sciis prok-

simume kie ĝi situas: dekstre inter la lando de la frankoj kaj tiu de la kordova kalifo; eble je distanco de kvintaga bona velado suden de la terlango de Bretonlando, kiun ili nun vidis. Denove ili oferis al la marpopolo kaj ricevis bonan venton kaj stiris for de la bordo.

KVARA ĈAPITRO

## Kiel la ŝipanoj de Krok atingis la regnon de Ramiro kaj faris profitan viziton.

Rakontante en sia maljuna aĝo pri siaj travivaĵoj Orm ofte diris, ke li ne povas plendi pri la tagoj kun Krok malgraŭ tio, ke nevole li aliĝis al tiu ekspedicio. La frapo sur la kranio kaŭzis doloron nur dum mallonga tempo; kaj kun la ŝipanoj li bone akordis, tiel ke baldaŭ neniu pensis pri tio, ke propre li estas ilia kaptito. Kun plezuro ili rememoris la bongustajn ŝafojn, kiujn ricevis ili ĉe li, kaj ankaŭ en aliaj manieroj li ilin kontentigis. Li konis tiom da poemoj kiom Berse kaj de sia patrino lernis ilin eldiri kun tono de poeto; kaj li ankaŭ kapablis kredige rakonti malverajn historiojn, kvankam li mem rekonis, ke en tiu arto Toke lin superas. Tial ili aprecis lin kiel bonan kaj lertan kamaradon, kiu povis proponi amuzan tempopasigon dum longaj tagoj kun senŝanĝa vento, kiam neniu bezonis remi.

Kelkaj en la ŝipo plendis pro tio, ke Krok forlasis Bretonlandon sen antaŭaj klopodoj havigi novan freŝan nutraĵon; ĉar la nutraĵo en la ŝipo komencis gusti malfreŝe. La lardo estis ranca, la seka fiŝo ŝima, la faruno acida, la pano verma kaj la akvo putra; sed Krok kaj la spertaj viroj konsideris tion nutraĵo plej bonkvalita, pri kiu devus plendi neniu marveturanto. Orm manĝis siajn pecojn kun bona apetito, sed dum la manĝado li ofte rakontis pri la frandaĵoj, je kiuj

li kutimis hejme. Berse diris, ke al li ŝajnas, ke estas saĝa kaj dia ordo, ke oni kun komforto kaj bona apetito sur la maro manĝas tian nutraĵon, kiun oni hejme sur la tero ne povus proponi al sklavoj nek al hundoj, sed nur al porkoj; ĉar se tiel ne estus, longaj vojaĝoj sur la maro estus tro malfacilaj.

Toke diris, ke al li sentiĝas plej peze, ke elĉerpiĝis la biero. Li ne estas malfacile kontentigebla persono, li diris, kaj li pensas, ke li povas se necese manĝi kion ajn, eĉ siajn fokfelajn ŝuojn, sed nur en akompano de bongusta biero. Ne eblas eĉ imagi, li diris, vivon sen biero, nek sur maro nek sur tero; kaj li persiste demandadis la judon pri la biero en la lando, al kiu ili venos, sed ne bone informiĝis. Li rakontis pri grandaj festenoj kaj drinkadkunvenoj, kiujn li partoprenis, kaj bedaŭris, ke li tiam ne kaptis la okazon ankoraŭ pli drinki.

La duan nokton sur la maro ili ricevis fortan venton kaj ondadon kaj ĝojis, ke la ĉielo restas serena, ĉar nun ili navigadis laŭ la steloj. Krok komencis timi, ke ili venos sur la senliman maron; sed la plej markonantaj homoj diris, ke kiom ajn oni velados suden, oni trovos landon maldekstre krom nur ĉe Njorvasundo, kie iras la marvojo al Romo, kiu situas meze en la mondo. Pli malfacilan taskon havas tiuj, kiuj veladas de Norvegujo ĝis Islando, diris Berse, ĉar preter Islando neniu lando estas trovebla, sed nur dezerta maro sen fino.

La judo estis stelkonanto kaj diris, ke li havas lertecon en trovado de ĝusta direkto; sed malmulte helpa estis tio, ĉar liaj steloj portis fremdajn nomojn, kaj lin mem frapis marmalsano. Kaj ĝi frapis ankaŭ kontraŭ Orm; li kaj Salaman sin tenis je la ŝiprando unu apud la alia en granda mizero kaj kredis, ke ili pereos. La judo multe kriadis en sia propra lingvo, kiam li ne vomis, kaj Orm diris al li, ke li silentu, eĉ se al li doloras; sed li respondis, ke li alvokas sian dion, kiu estas en la ventego. Tiam Orm lin kaptis je la nuko kaj diris, ke

kiom ajn malsana li mem estas, li tamen lin ĵetos en la maron, se li ankoraŭ eĉ nur unufoje vokos, ĉar laŭ lia opinio jam sufiĉe blovas, kaj mankas bezono pli proksimen alvoki la dion.

Silentiĝis Salaman, kaj en la mateno kvietiĝis la vetero, kaj ambaŭ ekfartis pli bone. La vizaĝo de Salaman estis tre verdeca, sed li amike ridetis kontraŭ Orm, ne montrante koleron, kaj fingromontris trans la maro al la sunleviĝo. Li serĉis inter la vortoj konataj al si kaj diris, ke tio estas la ruĝaj flugiloj ĉe la ekstremo de la maro kaj ke tie estas lia dio. Orm respondis, ke al li sajnas pli bone, ke li sin tenas je tiu distanco.

Matene ili povis videti montojn distance antaŭ si. Ili venis ĝis apud la bordo kaj pene trovis ŝirman golfon por la ŝipoj; la judo diris, ke li ne konas tiun regionon. Ili surbordiĝis kaj tuj sin trovis en batalo kontraŭ loĝantoj, kiuj tie loĝis dense; tiuj baldaŭ fuĝis, kaj la ŝipanoj de Krok traserĉis iliajn kabanojn kaj revenis kun kaproj kaj aliaj nutraĵoj kaj iuj kaptitoj. Fajroj estis aranĝataj; kaj ĉiuj ĝojis, ke ili sekure sidas sur la grundo kaj denove gustumas frititan viandon. Toke ege serĉadis bieron, sed trovis nur iujn felajn sakojn plenajn de vino, kiu estis tiom adstringa kaj acida, ke li asertis, ke glutante ĝin li sentas la ventron ŝrumpi. Tial ne estis eble al li mem ĉion trinki, sed li fordonacis la restaĵojn kaj sidis poste dum la tuta vespero sola ĉe si mem kaj kantis malgaje kun larmoj en la barbo. Berse konsilis, ke oni ne lin ĝenu, ĉar drinkinta ĝis plorado li estas danĝera homo.

Salaman interparolis kun la kaptitoj; poste li sciigis, ke ili sin trovas en la lando de la kastilia grafo kaj ke la loko, kien li volas ilin konduki, situas malproksime okcidenten. Krok diris, ke ili ĝisatendu alian venton por iri en tiu direkto kaj ke dume ili manĝu bonguste kaj abunde; sed ĝene fariĝos, li opiniis, se grandaj malamikaj grupoj ilin tie atakos, kiam la vento blovos de la maro, aŭ se mala-

mikaj ŝipoj baros la vojon el la golfo. Salaman nun klarigis laŭ sia kapablo, ke tiu risko estas negranda; ĉar la grafo de Kastilio apenaŭ havas eĉ unu ŝipon sur la maro kaj por kuntiri trupon, kiu povos fari damaĝon al ili, li bezonos konsiderindan tempon. Antaŭe, li diris, la grafo de Kastilio estis potenca, sed nun li estas tre subpremita de la kalifo kaj devas pagi imposton al li; ĉar, ekster imperiestro Otto en Germanlando kaj imperiestro Bazilio en Konstantinopolo, neniu en la mondo estas potenca kiel la kalifo en Kordovo. Multe ridis pri tio la ŝipanoj kaj diris, ke parolas la judo laŭ sia malmulta kompreno, sed ke li estas nesufiĉe informita pri tiuj aferoj. Ĉu neniam li aŭdis pri reĝo Harald de Danlando? ili demandis. Kaj ĉu li ne scias, ke reĝo Harald estas plej potenca el ĉiuj?

Orm ankoraŭ estis laca pro sia marmalsano kaj ne havis bonan apetiton kaj pensis, ke li eble fariĝos serioze malsana, ĉar li ofte havis timojn pri sia sano. Li baldaŭ ekdormis apud fajro kaj bone dormis; sed dum la nokto, kiam silentiĝis la bivako, vekis lin Toke. Tiu ploris kaj diris, ke Orm estas lia sola amiko, kaj li volas kanti por li kanzoneton, kiu ĵus venis al li en la memoron; ĝi temas pri du ursidoj, li diris, kaj kiam li estis infano, lia patrino ĝin instruis al li, kaj ĝi estas plej bela el ĉiuj kanzonetoj, kiujn li konas. Post tiuj vortoj li eksidis apud Orm, viŝis la larmojn kaj ekkantis. Orm estis tia, ke li malfacile kapablis montri amikecon, kiam iu lin vekis el bona dormo; li nenion diris, sed sin turnis kaj klopodis redormi.

Ne multe da sia kanzoneto Toke rememoris, kaj denove li ekmalĝojis; li diris, ke dum la tuta vespero li sidis sola kaj neniu venis societi kun li. Plej multe lin ofendis, ke eĉ ne Orm havis zorgojn pri li en lia ĉagreno; ĉar ĉiam li konsideris Orm sia amiko ekde ilia unua renkonto, sed nun li ekkomprenis, ke li estas fripono kaj ĉikanulo kiel ĉiuj skanianoj; kaj kiam ido malbone kondutas, tiam bastonado estas sola ĝusta kontraŭrimedo.

Li sin levis por serĉi bastonon; nun plene vekiĝis Orm kaj eksidis. Kiam Toke vidis tion, li provis piedbaton, sed en sama momento Orm kaptis fajraĵon kaj ĝin ĵetis kontraŭ la vizaĝo de Toke. Meze en la piedbato Toke evitis la fajraĵon kaj falis sur la dorson, sed li rapide ekstaris kaj nun havis blankan vizaĝon kaj furiozon. Ankaŭ Orm rapide ekstaris. Estis klara lunlumo; sed pro furiozo Orm vidis ruĝajn makulojn, kiam li sin ĵetis kontraŭ Toke, kiu klopodis eltiri sian glavon; Orm formetis jam la sian kaj ne havis tempon ĝin rekapti. Toke estis granda kaj forta homo kun larĝaj ŝultroj kaj kolosaj manoj; Orm ankoraŭ ne atingis sian plenan forton, sed jam estis forta sufiĉe por kontraŭstari la pli multajn. Li sukcesis meti unu brakon ĉirkaŭ la nukon de Toke kaj per sia alia mano kaptis lian manartikon, tiel ke elingigo de la glavo ne eblis; sed Toke firme kaptis liajn vestojn kaj sin rektigis per ekpuŝo kaj lin ĵetis kun la kruroj ĉielen super sia ŝultro. Sed Orm ne tute malkaptis malgraŭ tio, ke li havis impreson, kvazaŭ li rompiĝus; li sin turnis ĉirkaŭen kaj metis genuon kontraŭ la dorson de Toke kaj sin ĵetis malantaŭen kun Toke super si. Poste li uzis ĉiujn fortojn kaj ruliĝis, tiel ke Toke ekkuŝis sub li kun la vizaĝo kontraŭ la grundo. Multaj vekiĝis dum la lukto; kaj Berse alkuris kun ŝnuro dirante, ke jen kion atendi, post kiam Toke tiom drinkis. Li nun estis firme ligita mane kaj piede malgraŭ tio, ke li forte kontraŭstaris. Li baldaŭ trankviliĝis kaj post mallonge vokis al Orm, ke nun li rememoras la reston de la kanzoneto; li komencis kanti, sed Berse verŝis akvon sur lin, kaj post tio li ekdormis.

Kiam la postan matenon li vekiĝis, li plendis pro tio, ke li estas ligita, kaj nenion li memoris; li aŭdis pri tio, kio okazis, kaj sentis penton kontraŭ Orm kaj diris, ke lia malbona fortuno estas fari ĉagrenojn, kiam li drinkis; ĉar biero vere donas al li alian naturon kaj vino eble same. Li volis ekscii, ĉu Orm tenas koleron kontraŭ li pro tio, kio okazis. Orm respondis, ke li ne tenas koleron kaj ke li ankaŭ

estontece volonte partoprenos interfrapeton, kiam Toke emos; sed unu promeson Toke devas fari, nome sin deteni de kantado; ĉar kanto de nokthirundo, aŭ de maljuna korniko sur provizeja tegmento, estus multe pli bela ol liaj noktkanzonoj. Pri tio Toke ridis, kaj li promesis fari klopodojn al pli bona konduto koncerne tion; ĉar li estis homo senkolera, kiam biero aŭ vino lin ne ŝanĝis.

Ĉiuj opiniis, ke malgraŭ sia juneco Orm ĉi tiun provon pasis pli bone ol oni rajtus atendi; ĉar ĉe la plimulto da okazoj gravaj postsignoj restis sur la homoj, kiuj falis en la manojn de Toke, kiam tiu drinkis ĝis larmoj; kaj pro tio Orm estis multe pli alte estimata de si kaj aliaj. Ili post ĉi tiu okazaĵo komencis lin nomi Orm la Ruĝa, ne nur pro liaj ruĝaj haroj, sed ankaŭ ĉar li sin montris homo, kiu povas renkontigi severon per severo, kaj kiun oni ne incitu sen neceso.

Post kelkaj tagoj venis favora vento, kaj la ŝipoj debordiĝis. Ili sin tenis distance de la bordo por eviti danĝerajn fluojn kaj sin direktis okcidenten laŭ la bordo de la regno de Ramiro kaj ĉirkaŭvelis la terlangon, kiu situas plej okcidente. Ili nun remis suden laŭ kruta kaj distranĉita bordo kaj poste tra arkipelago, kiun trovis la viroj simila al tiu hejme en Blekingio, ĝis ili atingis riverbuŝon, kiun la judo serĉis per rigardo. En ĝin ili sin direktis kun la maraltiĝo, kaj ili remis supren laŭ la rivero, ĝis torentoj ilin haltigis. Ili suriris la grundon kaj interkonsiliĝis kaj igis Salaman priskribi la restantan distancon. Li diris, ke bravaj homoj bezonos malpli ol unu tagon por atingi, ĝis kie sidas la homo, al kiu li volas sin venĝi, nome unu el la limgrafoj de reĝo Ramiro, portanta la nomon Ordono: la plej granda rabisto kaj perfortulo, li diris, el ĉiuj laŭ la tuta limo de la kristanoj.

Krok kaj Berse lin zorgeme pridemandis pri la fortikaĵo, pri ĝia forto kaj situo kaj pri tio, kiom da defendantoj la limgrafo kutime tenas ĉe si tie. Ĝi situas en tia roka kaj malfacile alirebla regiono,

diris Salaman, ke la soldataro de la kalifo, kiu je pli granda parto konsistas el rajdantoj, neniam venis proksime al ĝi. Tial ĝi estas bona rifuĝejo por rabistoj kaj tenas grandajn riĉaĵojn. Ĝi estas konstruita el kverkaj trunkoj kaj ŝirmata de tera remparo kun palisoj, kaj la nombro de defendantoj estas ne pli ol ducent. Pro tio, ke ĝi situas tiel kaŝite, Salaman tenis la kredon, ke la gardado ne estas tre atenta, kaj ofte la pli granda parto de la defendantoj rabekspedicias en la sudo.

Krok diris, ke la nombro de la defendantoj al li kaŭzas malpli da maltrankvilo ol la remparo kaj palisaro, kiuj povus grave malhelpi rapidan eniron. Iuj el la viroj diris, ke facile ili povos bruligi la palisaron; sed Berse respondis, ke, se ĉio brulos, ili ne multe povos ĝoji pro la riĉaĵoj. Ili fine venis al decido, ke ili fidu bonŝancon kaj la plej oportunan enirmanieron difinu post alveno; kvardek viroj restu apud la ŝipoj, kaj la aliaj ekiru, kiam vespere estos malvarmete. Lotoj decidis, kiuj restu, ĉar ĉiuj preferis ĉeesti, kie riĉaĵoj estos gajneblaj.

Ili ekzamenis siajn armilojn kaj dormis en kverkareto dum la plej varmegaj horoj; post tio ili sin fortigis per nutraĵo kaj, kiam venis vespero, ekiris la ŝipanaro; kune ili sumis cent tridek ses viroj. La unua marŝis Krok kun la judo kaj Berse, kaj post ili sekvis viro post viro; kelkaj portis maŝkirasojn, aliaj ledajn ĉemizojn, la pli multaj portis glavon kaj lancon, sed kelkaj havis hakilon, kaj ĉiuj portis ŝirmilon kaj helmon. Orm marŝis kun Toke, kiu diris, ke bone estas, ke eblas la gambojn moligi post la multa sidado sur la rembenko.

Ili marŝis tra sovaĝejo, kie videblis neniu homa loĝejo; ĉar tiu limregiono inter la kristanoj kaj la andaluzoj estis jam longe dezerta. Ili sekvis la nordan bordon de la rivero kaj vadis tra multaj riveretoj; la mallumo densiĝis, kaj ili ripozis kaj atendis la lunleviĝon. Post tio ili turnis norden tra valo kaj nun rapide marŝis sur plata grundo; kaj Salaman pruviĝis bona vojmontranto, ĉar antaŭ tagiĝo ili

atingis la proksimon de la fortikaĵo. Ripozante ili tie senmove kuŝis inter kelkaj arbustodensaĵoj kaj direktis la rigardon antaŭen por distingi tion, kio distingeblis en la pala lunlumo. Ilia kuraĝo malkreskis ĉe la vido de la palisaroj, ĉar tiuj estis faritaj el dikaj trunkoj kaj havis mezuron de pli ol duobla viralteco; kaj la pordego havis superkonstruon kaj aspektis tre fortika.

Krok diris, ke eble ne estos facile bruligi tian lignon kaj ke li preferus preni la fortikaĵon sen fajro; sed eble alia eliro ne troviĝas; ili portu antaŭen vergofaskojn kaj ilin amasigu ĉe la palisaro kaj ekbruligu ilin kaj esperu, ke ne ĉio brulos. Li demandis Berse, ĉu tiu havas proponon pli taŭgan; sed Berse gratis al si la kapon kaj suspiris kaj diris, ke pli bonan proponon li ne havas malgraŭ tio, ke li malŝatas uzi fajron. Ankaŭ ne Salaman pli taŭge konsilis, sed diris, ke li devos kontentiĝi vidante la perfidulon bruli, malgraŭ tio, ke li kovis esperon pri pli bona venĝo.

Nun venis Toke rampante al Krok kaj Berse kaj demandis, kion oni atendas: li havas soifon, kaj ju pli frue ili sturmos la fortikaĵon, des pli frue li trovos ion por trinki. Krok diris, ke malfacile estos eniri. Toke respondis, ke se li ricevos kvin lancojn, li kredos sin kapabla montri, ke li scias fari aliajn aferojn ol remi kaj trinki bieron. Ili demandis, kion li intencas; sed li respondis nur, ke li, se ĉio iros glate, al ili faros vojon en la fortikaĵon, kaj ke la posedantoj de la lancoj devas esti pretaj provizi la pruntaĵojn per novaj teniloj post rericevo. Berse, kiu lin jam longe konis, diris, ke ili donu al li la lancojn. Tiel estis, kaj Toke dehakis la tenilojn malantaŭ la fero, tiel ke restis ulnolongaj stangetoj post la klingoj. Poste li diris, ke li estas preta; kaj li kaj Krok komencis singarde rampi kontraŭ la remparo, kaŝitaj de arbustoj kaj ŝtonoj, kun elektitaj viroj malantaŭ si. Du tri kokoj aŭdiĝis kokoriki en la fortikaĵo, sed cetere ĉio estis silenta kaj kvieta.

Je malgranda distanco de la pordego ili rampis sur la remparon. Toke ekstaris apud la palisaro; je iom pli ol ulno super la grundo li enŝovis lancoklingon inter du trunkojn kaj puŝis per tuta forto, por ke ĝi fiksiĝu firme. Pli alte, en la apuda fendeto, li fiksis duan klingon; kaj kiam ili fine sen bruo estis firme fiksitaj, li singarde metis la piedojn sur la tenilstumpojn kaj fiksis trian klingon pli alte en alia fendeto. Sed ne eblis al li, tiel starante, fiksi la trian firme sen bruo; kaj Krok, kiu nun vidis, kia estas lia plano, faris signon, ke li paŝu malsupren, kaj diris, ke ne plu eblas sen martelo, eĉ se tio signifas, ke ili devas ĝeni la dormon de kelkaj personoj. Post tio li prenis la restantajn lancoklingojn kaj la lokon de Toke sur la jam firmaj ŝtupoj; li enpuŝis la trian per du tri frapoj de sia hakilmartelo kaj post tio en sama maniero fiksis la kvaran kaj la kvinan oblikve supre. Laŭ ordo de alfikso li paŝis sur ilin kaj tiel atingis la supron de la palisaro.

En tiu momento aŭdiĝis krioj kaj bruoj en la fortikaĵo kun forta blovado en kornoj, sed aliaj homoj sekvis sur la ŝtuparo de Toke tiel rapide, kiel eblis grimpi, kaj venis post Krok. Laŭ la interna flanko de la palisaro sin etendis ligna planko por pafarkistoj; Krok kaj la aliaj, kiuj lin sekvis, venis sur ĝin kaj frapis per hakoj kelkajn konfuzvekitajn virojn, kiuj alkuris kun lancoj kaj pafarkoj. Nun trafis ilin sagoj de malsupre, kaj du aŭ tri vundiĝis; sed Krok kaj la aliaj kuris laŭ la lignoplanko ĝis la pordego kaj tie malsuprensaltis por rapide ĝin malfermi, tiel ke povu enkuri ĉiuj atakantoj. Tie ekestis akra batalo, ĉar multaj el la defendantoj jam atingis ĝis tie, kaj multaj alkuris en ĉiu momento. Unu el tiuj dudek viroj, kiuj sekvis Krok, pendis sur la palisaro kun sago en la okulo, kaj tri aliaj jam falis pro sagoj, kiam ili kuris sur la lignoplanko; sed tiuj, kiuj atingis la grundon, dense kolektiĝis kaj, aŭdigante batalvokon, venis kun lancoj kaj glavoj en la pordegan koridoron, kie regis mallumo kaj granda kunpuŝiĝo, ĉar nun malamikoj estis antaŭ ili kaj malantaŭ ili.

Respondon ricevis ilia batalvoko de ekstere, ĉar la viroj tie kuris al la remparo, kiam ili vidis la provon rikolti sukceson; multaj komencis haki kontraŭ la pordegon per hakiloj, dum aliaj grimpis sur la ŝtuparo de Toke kaj venis oportune por asisti tiujn, kiuj sin trovis en la pordegejo. La lukto tie estis necerta kun amikoj kaj malamikoj en intermikso; Krok faligis plurajn per sia hakilo, sed estis mem trafita per batalklabo de alta viro, kiu havis plektitan barbon kaj aspektis kiel ĉefulo; la helmo ŝirmis, sed Krok ŝanceliĝis kaj falis sur la genuoj. En puŝiĝo de ŝildoj kaj viroj, kie uzo de lancoj ne plu eblis, kaj la piedoj glitis en sango, Toke kaj Orm kaj du tri aliaj fine venis al la pordego kaj forŝovis la riglilojn kaj tiuj malamikoj, kiuj ne sukcesis forkuri, estis tuj morthakitaj.

Nun timego kaptis la kristanojn, kaj ili fuĝis persekutataj de la morto. Salaman, kiu troviĝis inter la unuaj, kiuj pasis la pordegon, kuris kvazaŭ li estus freneza kaj stumblis super la falintoj kaj trovis glavon sur la grundo kaj ĝin svingis super sia kapo laŭtege kriante, ke ĉiuj rapidu al la ĉefa konstruo; kaj Krok, ankoraŭ konfuzita de la frapo kaj ne povanta stari, la samon kriis de tie, kie li kuŝis apud la pordegejo. Multaj el la viroj enkuris kabanojn, kiuj staris interne de la remparo, por nuligi la soifon aŭ serĉi virinojn; sed la pli multaj sekvis la fuĝantojn ĝis la granda kastela domo en la mezo, kie fuĝantoj plenigis la enirejon. La persekutantoj envenis kun ili, antaŭ ol povis esti fermita la pordego, kaj en la domo okazis denove batalo, kiam vidis la fuĝantoj, ke kontraŭstaro estas necesa. La granda homo kun plektita barbo kuraĝe luktis kaj faligis du virojn, kiuj iris kontraŭ li; sed li estis premita en angulon, ricevis hakojn kaj falis kun gravaj vundoj. Salaman, kiu ĝisvenis kiam li falis, sin ĵetis al li, lin kaptis je la barbo kaj fervore kriis kraĉante sur lin; sed ŝajnis, ke la alia ne multe komprenis, sed skuis la korpon, palpebrumis kaj mortis.

Salaman eklamentis pri tio, ke glitis for de li la plena venĝo kaj ke ne li mem frapis sian malamikon; kaj la restantaj kristanoj ĉesis sin defendi, kiam falis ilia ĉefo. Oni lasis vivi kelkajn el ili, ĉar povos ili esti utilaj; kaj la venkintoj abunde prenis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn, kaj bieron kaj vinon. Post tio predo estis serĉata en la fortikaĵo; kaj kvereloj leviĝis pri tiuj virinoj, kiuj sin kaŝis en anguletoj kaj estis trovitaj tie, ĉar dum longa tempo la ŝipanoj ne havis virinojn. Ĉio de la predo estis kolektita sur unu loko — moneroj, ornamaĵoj, armiloj, vestoj, tapiŝoj, kirasoj, kuiriloj, rajdiloj, jungiloj, arĝentopladoj kaj pli —; kaj kiam ĉio estis kolektita, ili vidis, ke tie estas pli ol iu povis imagi; ĉar ĉi tie, diris Salaman, troviĝas multjara rabitaĵo prenita ĉe la andaluzoj. Krok, kiu denove povis stari sur la piedoj kaj ricevis ĉirkaŭ la kapo ĉifonon trempitan en vino, ĝojis ĉe la vido, sed timis, ke malfacile estos porti ĉion en la ŝipoj; sed Berse kredis, ke ĉion ili povos porti:

—Ĉar neniu, li diris, plendas pri peza ŝarĝo, kiam ĝi estas predo.

En tiu tago ili sin amuzis en granda kontento per tio, kion ili akiris, kaj poste dormis; en la nokto ili ekmarŝis kontraŭ la ŝipoj. Ĉiuj kaptitoj estis peze ŝarĝitaj, kaj ankaŭ la ŝipanoj multon portis. Kelkaj andaluzaj kaptitoj estis trovitaj en la kelo de la fortikaĵo; ili fluigis larmojn de feliĉo pro sia liberiĝo, sed aspektis mizeraj kaj ne multe kapablis porti. Ili ricevis liberon kaj akompanis dum la remarŝo por poste kun Salaman daŭrigi suden ĝis la propra regiono. Estis kaptitaj kelkaj azenoj, kaj Krok estis metita sur unu el ili kaj rajdis pinte de la vico kun siaj gamboj pendantaj ĝis la grundo. Post li oni kondukis aliajn, ŝarĝitajn per nutraĵo kaj biero; iliaj ŝarĝoj rapide malpeziĝis, ĉar ofte volis la ŝipanoj ripozi kaj sin refreŝigi.

Berse klopodis ilin rapidigi por rapide atingi la ŝipojn. Li havis maltrankvilon pro persekuto, ĉar el la homoj en la fortikaĵo kelkaj

fuĝis kaj eble malproksimen kuris kaj vokis helpon; sed la pli multaj el la ŝipanoj estis gajaj kaj duone ebriaj kaj malmulte atentis pri tio, kion li diris. Orm portis pakon da silka ŝtofo, bronzan spegulon kaj grandan pelvon, kiu kaŭzis al li grandan ĝenon; Toke portis sur la ŝultro grandan lignokeston kun belaj garnaĵoj, plenan de multaj aferoj, kaj kondukis ĉe la mano knabinon, kiu ekplaĉis al li kaj kiun li volis reteni kiel eble plej longe. Li multe ridis kaj diris al Orm, ke li esperas, ke la knabino estas filino de la limgrafo, sed post tio li fariĝis melankolia pro la penso, ke ne estos spaco por ŝi en la ŝipo. Li estis stumblema pro ĉio, kion li trinkis; sed ŝajnis, ke la knabino jam estas zorgema por li kaj lin apogas, kiam li stumblas. Ŝi havis belan staturon kaj estis tre juna; kaj Orm diris, ke malofte li vidis tiel belan knabinon kiel ŝi, kaj ke estus dezirinde havi tiel bonan virinbonŝancon, kiel Toke havas. Sed Toke respondis, ke kiel ajn bonaj amikoj ili estas, li ne povos ŝin dividi kun Orm, ĉar li ŝin tro multe ŝatas kaj ŝin volas reteni por si mem, se tio estas ebla.

Ili revenis al la ŝipoj, kaj granda ĝojo ekestis inter tiuj, kiuj restis, kiam ili vidis la abundan predon; ĉar ĝi estu dividata inter ĉiuj. Salaman ricevis grandan dankon kaj riĉajn donacojn kaj poste plumarŝis kun la liberigitaj kaptitoj; li havis fervoran deziron forlasi la regionon de la kristanoj. Toke, kiu daŭre drinkis, ekploris aŭdinte, ke formarŝis Salaman, kaj li diris, ke nun neniu lin helpos paroli kun la knabino, kaj elingiginte sian glavon li volis postkuri. Sed Orm kaj la aliaj sukcesis lin trankviligi sen perforto; kaj li endormiĝis apud la knabino, post kiam li ŝin ligis al si, tiel ke ŝi ne forkuru aŭ estu ŝtelita, dum li dormas.

La postan matenon ili ekdividis la predon, kaj tio ne estis facila. Ĉiu havu egalan parton; sed Krok kaj Berse kaj la stiristoj kaj ankoraŭ iuj havu trioble; kaj malgraŭ tio, ke oni taskis al la plej saĝaj ĉion dividi juste, estis malfacile ĉiujn kontentigi. Berse diris, ke ĉar

grandparte pro Toke estis konkerita la fortikaĵo, ankaŭ li devas ricevi trioble; kaj ĉiuj trovis tion justa. Sed Toke mem diris, ke lin kontentigos unuobla parto, se anstataŭe estos al li permesate sian knabinon preni sur la ŝipon kaj ŝin tie reteni sen ĝeno.

—Ĉar volonte mi ŝin kunportos hejmen, li diris, malgraŭ tio, ke mi ne estas certa, ĉu ŝi estas grafofilino. Jam nun mi kun ŝi sentas komforton, kaj ankoraŭ pli bone estos, kiam ni unu la alian komprenos kaj ŝi parolos nian lingvon.

Berse diris, ke ĉi tio lasta eble ne estos avantaĝo tia, kia kredas ĝin Toke, kaj post tio Krok diris, ke tiel pezigitaj estos la ŝipoj pro la granda predo, malgraŭ dekalkulo de dek unu falintaj ŝipanoj, ke li apenaŭ kredas, ke spaco restos por la knabino: pli kredeble, ke ankaŭ parton de la malplej valora predo ili devos restigi.

Tiam Toke ekstaris kaj levis la knabinon sur sia ŝultro kaj petis, ke ĉiu zorge ekzamenu, kiel bela kaj bele kreskinta ŝi estas.

—Ŝajnas al mi, ke ŝi povos veki deziron ĉe la plej multaj, li diris. Kaj se nun iu ĉi tie troviĝas, kiu ŝin sufiĉe avidas, tiam mi nun tuj volas lukti kun li en tiu maniero, kiu al li ŝajnas la plej bona, per glavo aŭ hakilo. Kiu venkos, tiu la knabinon retenos; kaj kiu mortos, tiu pli malpezigos la ŝipon, ol pezigos ĝin ŝi; kaj post tia dispono mi ŝin tamen povos kunporti hejmen.

La knabino sin tenis per unu mano je la vangobarbo de Toke kaj fariĝis ruĝa kaj baraktis per la kruroj kaj la alian manon metis antaŭ la okulojn, sed ĝin denove forprenis kaj ŝajnis ĝoja esti tiel prigapata; kaj ĉiuj opiniis, ke la propono de Toke estis lerte elpensita. Sed malgraŭ la beleco de la knabino neniu volis lukti kontraŭ li, ĉar ĉiuj havis ŝaton al li kaj krom tio timon, ĉar li estis forta kaj lerte manipulis armilojn.

Post kiam estis la tuta predo dividita kaj surŝipigita, estis decidite, ke Toke kunportu sian knabinon en la ŝipo de Krok malgraŭ

tio, ke ĝi estis peze ŝarĝita; ĉar tian rekompencon li meritis pro tio, kion li faris ĉe la fortikaĵo. Ili nun interkonsilis por decidi pri la hejmeniro; estis decidite, ke ili navigadu laŭ la bordoj, se tion necesigos la vetero, sed se tio ne necesos, ili klopodu atingi Irlandon, por hejmeniri pasante la skotan arkipelagon; ĉar havante tiel riĉan ŝarĝon ili tro multe riskus velante hejmen sur malvastaj akvosurfacoj, sur kiuj ili povos atendi renkontiĝojn.

Post tio ili manĝis kaj trinkis, kiom ili povis, ĉar nun mangaĵoj kaj trinkaĵoj troviĝis abunde, kaj iom da nutraĵo devis esti lasita; kaj ĉiuj estis plenaj de ŝercoj kaj ĝojo kaj rakontis unu al aliaj, kion ili havigos al si per siaj riĉaĵoj post hejmenreveno. Post tio ili ekvojaĝis kaj remis malsupren laŭ la rivero. Krok nun iom resaniĝis; sed la subĉefulo de unu el al aliaj ŝipoj falis ĉe la fortikaĵo, kaj Berse ekkomandis en ties ŝipo. Toke kaj Orm sidis kiel antaŭe ĉe siaj remiloj en la ŝipo de Krok kaj havis malpezan remadon laŭ la fluo; Toke tenis sian rigardon al la knabino, kiu plejparte sidis apud liaj genuoj, kaj li gardis, ke neniu proksimiĝu al ŝi nenecese.

KVINA ĈAPITRO

## Kiel la bonŝanco de Krok du fojojn ŝanĝiĝis kaj kiel Orm fariĝis maldekstramanulo.

Ĉe forflua tajdo ili alvenis la golfon, en kiun la rivero fluis, kaj oferis sakon da vino kaj kaldronon da viando por sukcesa hejmenvojaĝo; poste ili levis la velojn kaj entiris la remilojn kaj kun malforta vento velis laŭ la longo de la golfo. La peze ŝarĝitaj ŝipoj naĝis profunde en la akvo kaj moviĝis malrapide antaŭen; kaj Krok diris, ke antaŭ ol ili vidos hejmajn bordojn estos supozeble remado bezonata, kiu sentiĝos en la brakoj. Tio, Orm diris en siaj maljunaj tagoj, estis la plej malbonaŭguraj vortoj, kiujn li aŭdis de iu homo; ĉar per ili rompiĝis la bonŝanco de Krok, kiu ĝis tiam estis plej eble bona dum la tuta vojaĝo; estis kvazaŭ iu dio aŭskultus kaj volus tuj konfirmi la veron de liaj vortoj.

Sep ŝipoj venis el malantaŭ la suda terlango kaj sin direktis norden, sed turnis internen en la golfon, kiam ili vidis la ŝipojn de Krok kaj per rapidaj remiloj senprokraste proksimiĝis. Estis ŝipoj de alia speco, ol ĝis tiam vidis la ŝipanoj de Krok: longaj, malaltaj kaj malpeze naĝantaj sur la akvo. Ili estis plenaj de armitaj viroj kun nigraj barboj kaj kun tukoj kaj pendaĵoj ĉirkaŭ la helmoj; kaj la viroj ĉe la remiloj, du ĉe ĉiu, estis nudaj kun rebriloj sur la malhelaj haŭtoj. Ili remadis antaŭen kun raŭkaj krioj kaj ĉe akra bruo de malgrandaj

tamburoj.

La ŝipoj de Krok tuj sin lokis unu apud alia kaj sin tenis proksime al la bordo kun eble plej mallonga distanco inter si, tiel ke ili ne estu ĉirkaŭitaj. Sed Krok ne volis mallevi la velojn; ĉar se la vento fortiĝos, li diris, ĝi helpos al ili. Toke devis urĝe ĉirkaŭigi kaj bone kovri sian virinon per pakoj de predo, tiel ke ŝi estu sekura kontraŭ sagoj kaj lancoj. Orm lin helpis, kaj poste ili sin starigis ĉe la ŝiprando kun la aliaj. Orm nun estis bone armita; en la fortikaĵo li sin provizis per maŝĉemizo, ŝildo kaj bona helmo. Viro apud ili demandis, ĉu tiuj fremduloj estas kristanoj, kiuj venas por venĝi; sed Orm opiniis pli kredeble, ke ili apartenas al la popolo de la kalifo, ĉar neniu kruco estas videbla sur iliaj ŝildoj kaj standardoj. Toke diris, ke li ĝojas, ke li povas komenci la batalon nesoifa, ĉar ŝajnas, ke ĝi estos varmega.

—Kaj tiuj, kiuj travivos, li diris, havos ion por rakonti, ĉar tiuj homoj aspektas fervoraj kaj estas multaj kompare kun ni.

La fremduloj nun estis proksimaj kaj pafis svarmojn da sagoj; ili lerte remis kaj sukcesis ĉirkaŭi la ŝipojn kaj atakis el ĉiuj flankoj, kie ili povis. Tiu ŝipo, kiun kondukis Berse, iris plej proksime al la bordo, kaj inter ĝi kaj la bordo neniu povis veni; sed la ŝipo de Krok estis la plej dekstra, kaj tie tuj fariĝis akra batalo. Du ŝipoj de la fremduloj sin lokis unu apud la alia laŭ la longo de ĝia almara flanko; ili sin alkroĉis per ĉenoj kaj graploj, kaj la viroj kuris kriegante de la ekstera ŝipo al la proksima kaj komencis ĉiuj grimpi al la ŝipo de Krok. Ili alkuris kun superforto kaj granda furiozo kaj scipovis rapide manipuli siajn armilojn; la ŝipo de Krok nun estis tre pezigita kaj restis malantaŭ la du aliaj. Tria malamika ŝipo penetris inter ili kaj la bordo kaj sukcesis alkroĉi sin; la batalo nun evoluis tiel, ke la ŝipo de Berse kaj la tria ŝipo moviĝis en la golfo al la maro kun kvar malamikaj ŝipoj ĉirkaŭ si, kontraŭ kiuj ili plenforte batalis, dum la

ŝipo de Krok restis samloke kaj batalis kontraŭ tri. La vento nun fortiĝis, kaj la du ŝipoj de Berse moviĝis ĉiam pli al la maro aŭdigante laŭtan batalbruon kaj kun larĝaj sangostrioj post si en la akvo.

Malmulte da tempo restis al la ŝipanoj de Krok pensi pri la ŝipoj de Berse kaj vidi, kiel marŝas la aferoj por ili, ĉar al ĉiu sufiĉis la okupo kontraŭbatali la malamikojn, kiuj lin atakis. Tiom da malamikoj transvenis per unu fojo unu ŝiprandon, ke la ŝipo kliniĝis kaj preskaŭ renversiĝis; kaj malgraŭ tio, ke multaj estis frapitaj kaj falis en la akvon aŭ reen en sian ŝipon, tamen sufiĉe multaj restis, kaj ĉiam pli sekvis el ambaŭ flankoj. Krok kuraĝe luktis, kaj tiuj, kiujn li trafis, ne plu havis ion por diri; sed baldaŭ li vidis, ke la superforto de la malamikoj estas tro granda. Li tiam forĵetis la ŝildon kaj kuris laŭ la ŝiprando kaj svingis sian hakilon per ambaŭ manoj kaj dishakis du el la ĉenoj, kiuj fiksis la ŝipojn unu al alia; sed falinta malamiko kaptis unu el liaj kruroj, kaj en tiu sama momento li ricevis lancopikon inter la ŝultroj kaj falis antaŭen en la malamikan ŝipon, kie multaj sin ĵetis sur lin, kaj li estis kaptita kaj ligita.

Nun multaj el la ŝipanoj de Krok falis kiel eble plej longe sin defendinte; kaj fine la tuta ŝipo estis sen ŝipanoj krom kelkaj, kiuj estis premitaj al la pruo; Toke kaj Orm estis inter ili. Toke havis sagon en la femuro, sed povis ankoraŭ stari; Orm havis vundon sur la frunto kaj malbone vidis pro la sango, kiu fluis al li en la okulojn. Ambaŭ estis tre lacaj. La glavo de Toke rompiĝis kontraŭ la feron de ŝildo; li paŝis malantaŭen kaj venis proksime al barelo da biero, kiu estis prenita de la fortikaĵo kaj metita en la pruon. Li forĵetis la glavostumpon kaj prenis la barelon per ambaŭ manoj kaj sukcesis ĝin levi super sia kapo.

—Al io ĝi ankoraŭ povas utili, li diris, kaj ĝin ĵetis kontraŭ la plej proksimajn malamikojn, tiel ke unu aŭ du frakasiĝis kaj multaj falis.

Li nun vokis al Orm kaj al la aliaj, ke ĉi tie restos nenio farebla, kaj per tio li saltis kun kapo antaŭe en la akvon por klopodi naĝi ĝis la bordo. Orm kaj la aliaj, ĉiuj kiuj povis sin forŝiri de la malamikoj, postsaltis. Lancoj kaj sagoj persekutis ilin, kaj kelkaj estis trafitaj; Orm subakviĝis kaj venis ree al la surfaco kaj naĝis kiel eble bone. En siaj maljunaj tagoj li diris pri tio, ke malmulte estas pli ĝene ol naĝi vestita per maŝĉemizo, kiam oni estas laca kaj la ĉemizo estas malvasta. Baldaŭ kaj Toke kaj Orm estis tute sen fortoj kaj preskaŭ dronis; unu el la malamikaj ŝipoj postsekvis ilin, kaj nenion ili povis fari, sed ili estis levitaj el la akvo kaj ligitaj.

Nun la fremduloj estis venkintaj kaj remis al la bordo por ekzameni sian gajnon kaj enterigi siajn mortintojn. La mortintajn ŝipanojn de Krok ili ĵetis en la maron, kaj ili komencis serĉfosadi en la ŝarĝo; la kaptitoj estis kondukitaj sur la bordon kaj eksidis sur la grundo, kun ligitaj brakoj kaj zorge gardataj; ili kune estis naŭ, kaj ĉiuj havis vundojn. Ili atendis mortigon kaj sidis silentaj kaj rigardis la maron; la ŝipoj de Berse kaj la malamikoj, kiuj malaperis kun ili, ne estis videblaj.

Toke suspiris kaj komencis murmuri por si mem; post tio li diris:

Iam bieron
mi disipis;
valhale mi trinkos
medon laŭ sort' .

Orm kuŝis surdorse kaj rigardis la ĉielon; li diris:

Lakton kaj panon,
kie naskiĝis,
trinkus prefere
mi: hejme en kort' .

Krok estis la plej malgaja, ĉar dum la tuta ekspedicio li sin sentis bonŝanculo kaj heroo, kaj nun li vidis sian bonŝancon rapide rompiĝi; li vidis la mortigitojn esti ĵetataj en la maron kaj diris:

Marplugistoj el
pen’ profitis;
jen la pago:
malica mort’ .

Toke diris, ke superas lian supozon tio, ke tri poetoj estas en la societo.

—Kvankam via lerteco fari versojn ne egalas la mian, li diris al Orm kaj Krok, tamen ekzistas ankaŭ por vi la konsolo, ke ĉe la bankedo de la dioj la poetoj trinkas el la plej grandaj kornoj.

Nun aŭdiĝis krioj, kaj multa vokado ekbruis en la ŝipo, ĉar la fremduloj trovis la junulinon en ŝia kaŝejo. Ili ŝin venigis sur la bordon, kaj ŝajnis, ke fariĝos kverelo pri tio, al kiu ŝi apartenos, ĉar multaj viroj ŝin tiris, dum ili akre grakadis kaj tremigis la nigrajn barbojn. Toke diris:

—Pri la birdino luktas la kornikoj, kiam la akcipitro sidas kun flugilo rompita.

La knabino estis kondukita al la ĉefulo de la fremduloj; li estis grasa homo kun parte griza barbo kaj ororingoj en la oreloj; li portis ruĝan mantelon kaj en la mano arĝentan martelon kun longa, blanka tenilo. Li ŝin rigardis kaj karesis sian barbon; poste li ŝin alparolis, kaj oni povis rimarki, ke ili povas unu la alian kompreni. La knabino havis iom por diri, kaj plurfoje ŝi fingromontris en la direkto al la kaptitoj; sed ĉe iuj el liaj demandoj, kiam ankaŭ li fingromontris al ili, ŝi disetendis la manojn kaj skuis la kapon. La ĉefulo de la fremduloj kapklinis; post tio li donis al ŝi ordonon, je kiu ŝaj-

nis, ke ŝi preferus ĝin ne obei, ĉar ŝi etendis la manojn al la ĉielo kaj vokis; sed kiam li kun severa voĉo ŝin denove alparolis, ŝi fariĝis cedema kaj demetis la vestojn kaj staris nuda antaŭ li. Ĉiuj liaj viroj suspiris kaj gratis al si la barbon kaj ravite murmuris, ĉar ŝi estis tre bela de verto ĝis plando. La ĉefulo ŝin igis ĉirkaŭe turniĝi, kaj li zorgeme ŝin ekzamenis; li palpis ŝiajn harojn, kiuj estis longaj kaj brunaj, kaj li tuŝis ŝian haŭton; poste li stariĝis kaj premis sigelringon, kiun li portis sur unu mezfingro, kontraŭ ŝiajn ventron kaj bruston kaj lipojn; kaj, ion dirante al la siaj, li deprenis sian ruĝan mantelon kaj ĝin pendigis ĉirkaŭ ŝi. Ĉe liaj vortoj ĉiuj liaj viroj metis manon kontraŭ la frunton kaj respekteme murmuris kaj sin klinis. La junulino nun sin revestis, sed retenis la ruĝan mantelon; manĝaĵo kaj trinkaĵo estis portataj al ŝi, kaj ŝajne ĉiuj ŝin rigardis kun respekto.

La kaptitoj sidis silentaj kaj rigardis tion; kaj kiam la knabino ricevis la mantelon ĉirkaŭ si, kaj oni donis al ŝi mangaĵon kaj trinkaĵon, diris Orm, ke ŝajnas, ke ŝi havas la plej favoran bonŝancon el ĉiuj, kiuj estis en la ŝipo de Krok. Toke tion konsentis kaj diris, ke estas severa fato por li nur nun ŝin vidi en ŝia plena beleco, kiam ŝi jam falis en la manojn de alia; ĉar nur mallonge ŝi apartenis al li, kaj multaj aferoj urĝis; kaj nun, li diris, li povus plori ĉe la penso, ke li neniam povos fendi la kranion de la grasventra grizbarbulo, kiu ŝin palpis.

—Sed tiun esperon mi kovas, li aldonis, ke malmultan ĝojon ŝi donos al la maljunulo; ĉar ekde la unua horo mi trovis ŝin bonkonduta kaj prudenta, kvankam ni ne povis interparoli; kaj tial ŝi certe ne malfruos puŝi ponardon en la korpon de tiu antikva virkapro.

Krok sidis silenta kaj premita de sia fatalo, turnita al la maro, ne zorgante pri tio, kio okazas sur la bordo; nun li vokis, kaj samtempe la fremduloj komencis fervore brui, ĉar kvar ŝipoj estis videblaj en la golfo kaj proksimiĝis; tio estis la ŝipoj, kiuj batalis kontraŭ Ber-

se. Ili estis malrapide remataj, kaj baldaŭ estis videble, ke unu el ili naĝis profunde en la akvo kaj havis damaĝon: unu ŝiprando estis rompita mezŝipe kaj multaj remiloj rompitaj.

Malgraŭ tio, ke la kaptitoj estis melankoliaj pro sia malbonŝanco, malfortaj pro siaj vundoj kaj tre turmentataj de soifo, ili tamen ĉiuj ekridis ĉe tiu vido. Ĉar ili tuj komprenis, ke unu el la ŝipoj de Berse sukcesis ĝin rami, kiam fortiĝis la vento ekster la golfo, kaj la malamikoj devis sin deteni de plua batalo, kiam restis al ili nur tri bonaj ŝipoj, kaj ili reremis kun la damaĝita. Nun iuj komencis esperi, ke Berse revenos kaj ilin savos. Sed Krok diris:

—Li perdis multajn ŝipanojn, ĉar li havis malamikojn en la ŝipo kaj estis tute okupita, kiam mi laste lin vidis. Kaj facile li povas kompreni, ke nemultaj el ni vivas, ĉar li ne vidis nian ŝipon forlasi la golfon. Tial li preferos penadi hejmen kun tio, kion li havas, ĉu per ambaŭ ŝipoj, ĉu per unu, se la ŝipanoj ne sufiĉas por ambaŭ. Kaj se li atingos hejmon eĉ per unu nur, la ekspedicio de Krok estos rakontata kaj vivos bone en la memoroj en Lister. Sed nin ili nun certe mortigos el indigno pro tio, ke du niaj ŝipoj sin savis.

La vero de tiuj lastaj vortoj de Krok tamen ne konfirmiĝis, ĉar fine ili ricevis akvon kaj nutraĵon, kaj viro venis al ili kaj flegis iliajn vundojn. Ili tiam komprenis, ke ili estos sklavoj; iuj opiniis, ke morti estus preferinde, dum aliaj hezitis, kion preferi. La ĉefulo de la fremduloj igis remsklavojn veni kaj paroli kun ili; tiuj ŝajnis veni de multaj diversaj popoloj kaj klopodis per multspecaj sonoj kaj blekoj; sed neniu parolis lingvon, kiun la kaptitoj povis kompreni. La fremduloj restis en tiu loko dum kelkaj tagoj kaj riparis la damaĝitan ŝipon.

En tiu ŝipo multaj remistoj mortis, kiam la ŝipo de Berse ĝin ramis, kaj la kaptitoj devis ilin anstataŭi. Ili kutimis je remado, kaj la laboro ŝajnis al ili komence ne tro peza, ĉar ĉi tie sidis ĉe ĉiu remilo du remistoj. Sed ili devis remi preskaŭ nudaj, kio komence ŝaj-

nis al ili granda honto, kaj ĉiu havis unu kruron katenita al ĉeno. Kompare kun la aliaj ilia haŭto komence estis tre blanka; iliaj dorsoj brulvundiĝis de la suno, kaj ĉiu sunleviĝo portis al ili plian turmenton. Sed post kelka tempo ili hardiĝis kaj forgesis kalkuli tagojn kaj sciis nenion krom remi kaj dormi kaj senti malsaton kaj soifon kaj ricevi trinkaĵon kaj nutri sin kaj post tio denove remi. Fine ili akiris tian kapablon, ke ili povis, lacaj pro pli ol ordinare peza penado, ekdormi ĉe la remilo kaj tamen remi kiel la aliaj, ne perdante la ritmon kaj ne altirante la vipon de la pelisto. Tiam ili jam estis plentaŭgaj remsklavoj.

Ili remis en varmego kaj en torenta pluvo, kelktempe en agrabla malvarmeto, sed neniam en malvarmo. Ili estis sklavoj de la kalifo, sed ili ne multe sciis, kien ili remas kaj al kio servas iliaj penoj. Ili remis laŭ krutaj bordoj kaj riĉaj malaltaj landoj kaj kun granda peno supren larĝajn riverojn kun forta fluo; sur la strando ili vidis virojn brunajn kaj nigrajn kaj kelkfoje malproksime virinojn, kiuj portis vualojn; ili pasis tra Njorvasundo kaj venis ĝis kie ĉesis la potenco de la kalifo, kaj ili vidis riĉajn insulojn kaj belajn urbojn, kiuj ĉiuj estis sennomaj por ili. Ili albordiĝis en grandaj havenoj kaj estis enfermitaj en sklavdomoj, ĝis denove estis tempo por elremi; ili remis penege persekutante fremdajn ŝipojn, ĝis iliaj koroj preskaŭ krevis, kaj spiregante kuŝis antaŭenklinitaj dum atakoj, kiujn rigardi ili pro laceco ne povis.

Ili sentis nenian malĝojon kaj nenian esperon kaj neniujn diojn alvokis; al ili sufiĉis remi kaj priatenti tiun, kiu per vipo remigis ilin. Lin ili malamis per granda malamo, kiam li ekscitis ilin per la vipo, sed ankoraŭ pli, kiam li dum severa remado ĉirkaŭiris kaj enŝovis al ili en la buŝon grandajn panpecojn trempitajn en acida vino; ĉar tiam ili sciis, ke ili devos remi sen ripozo tiel longe, kiel ili kapablos. Liajn vortojn ili ne komprenis; sed baldaŭ ili lernis el la sono de lia

voĉo scii, kiom da frapoj li intencas doni al malzorganto; kaj al ili feliĉo estis imagi, ke li kruele mortos kun gorĝo disŝirita aŭ dorso skurĝita, ĝis elrigardos liaj ostoj tra la sango.

En siaj maljunaj tagoj Orm diris pri tiu tempo, ke ĝia travivado estis longa, sed eblas rapide ĝin rakonti; ĉar ĉiu tago similis al aliaj, kvazaŭ estus la tempo senŝanĝa. Sed kelkaj signoj montris al li, ke pasis la tempo; unu estis lia barbo. Li estis la sola, kiu eksidis ĉe la remilo kiel senbarba junulo, sed baldaŭ lia barbo komencis kreski kaj eĉ pli ruĝa fariĝis ol liaj haroj, kaj fine ĝi estis tiel longa, ke ĝi tuŝis la remilon, kiam li sin klinis super ĝi. Pli longa ĝi ne fariĝis, ĉar la movoj de la remilo ĝin elfrotis je tiu longeco; kaj el ĉiuj manieroj prizorgi la barbon, li kutimis diri, tiu estas la plej malbona.

La alia signo estis la kresko de lia forto. Li estis forta, kiam oni ligis lin al la remilo kaj jam ricevis kutimon remi en la ŝipo de Krok; sed la peno de sklavoj estis pli severa ol tiu de liberaj homoj, kaj komence povis kapturniĝo kaj senforto ekposedi lin ĉe longtempa remado, kiu forte streĉis lin. Li vidis virojn krevigi sian koron kaj ricevi sangan ŝaŭmon en la barbo kaj fali malantaŭen sur la benko kun konvulsioj en la korpo kaj morti kaj esti ĵetitaj en la maron; sed li sciis, ke eblas elekti inter nur du aferoj: remi tiel longe kiel la aliaj remas, eĉ se li remos ĝismorte, aŭ altiri al si la vipon de la pelisto. Li kutimis diri, ke konstante li elektis la unuan, kvankam ĝi ne estis tre alstrebinda; ĉar unu fojon tuj en la komenco li spertis la vipon, kaj post tio li sciis, ke se tio ankoraŭfoje okazos, tiam furiozo posedos lin, kaj lia morto estos certa.

Tial li remis laŭ sia plej granda kapablo, eĉ kiam kapturniĝo posedis lin kaj brakoj kaj dorso doloris; sed post kelka tempo li ne multe rimarkis lacecon. Lia forteco ĉiam pli kreskis, kaj li devis zorgi, ke li ne tiru tro forte kaj ne rompu la remilon, kiun li nun sentis kiel bastoneton en siaj manoj, ĉar rompita remilo kaŭzis severan

admonon per la vipo. Dum la tuta tempo kiel remsklavo de la kalifo li remis babordan remilon; el tio venis tio stranga, ke li dekstramana eksidis ĉe la remilo kaj ĝin forlasis maldekstramana. Dum sia tuta vivo post tio li manovris kaj kuleron kaj glavon per sia maldekstra mano, nur ĵetante lancojn li estis ĉiam plu dekstramana. Tiu forto, kiun li tie akiris kaj kiu superis tiun de aliaj viroj, bone konserviĝis, kaj la plejmulto de ĝi restis al li ankoraŭ dum lia maljuna aĝo.

Sed ankaŭ tria signo, krom la kreskado de liaj barbo kaj forto, atentigis al li, kiel pasas la tempo dum la penado ĉe la remilo; tio estis, ke li iom komencis kompreni el la lingvo de fremduloj, komence unu aŭ alian vorton, poste ĉiam pli. Kelkaj sklavoj venis el foraj landoj sude kaj oriente kaj parolis lingvojn similajn al bojaĉo de hundoj, kiujn komprenis neniuj krom ili mem; aliaj estis kaptitoj el kristanoj norde kaj parolis por si apartan lingvon, sed multaj estis andaluzoj, kiuj estis ligitaj al la remilo kiel rabistoj kaj ribeluloj, aŭ ĉar ili incitis la kalifon per novaj instruoj pri siaj dio kaj profeto; kaj tiuj parolis la araban, same kiel iliaj mastroj. Ankaŭ la pelisto kun la vipo parolis tiun lingvon, kaj ĉar por ĉiu remisto estis utile klopodi kompreni, kion deziras tiu viro, li fariĝis por Orm bona lingvoinstruanto ne penante pri tio.

Ĝi estis malfacile komprenebla lingvo kaj ankoraŭ multe pli malfacile eldirebla, kun sonoj sidantaj profunde en la gorĝo kaj similantaj plej multe al korva grakado kaj rana kvakado; kaj al Orm kaj liaj kamaradoj ŝajnis strange, ke ĉi tiuj fremduloj volas fari al si la ĝenon elpremi tiajn malfacilojn sonojn anstataŭ paroli kiel faras homoj el la nordo. Sed Orm sin montris pli lernema pri ĉi tiu lingvo ol iu alia; eble ĉar li estis la plej juna, eble ankaŭ ĉar al li ĉiam estis facile lerni tiajn malfacilajn vortojn, kiaj troviĝas en malnovaj poemoj, eĉ kiam li iliajn sencojn ne komprenis.

Tial okazis, ke Orm estis la unua, kiu komencis kompreni, kion oni diris al ili, kaj li ankaŭ estis la sola, kiu per unu aŭ alia vorto povis respondi. Pro tio li fariĝis parolanto kaj interpretanto por siaj kunfratoj, tiel ke ordonoj estis direktataj al li; li devis informiĝi pri multaj aferoj por la aliaj, farante demandojn laŭ sia kapablo al tiaj remantoj, kiuj parolis la araban kaj havis sciojn. Kvankam li estis la plej juna inter la normanoj kaj sklavo kiel la aliaj, li en tiu maniero komencis aperi kiel ĉefulo, ĉar nek Krok nek Toke povis ion lerni el la fremda lingvo; kaj poste Orm ĉiam diris, ke post favora bonŝanco, forteco kaj lerteco kun armiloj ekzistas por homo inter fremduloj nenio pli utila ol lernokapablo.

La ŝipo portis kvindek soldatojn; kaj la remantoj estis kune sepdek du ĉe dek ok paroj da remiloj. De benko al benko oni multe murmuris pri iu aŭ alia ebleco ellasiĝi el la katenoj kaj superforti la soldatojn kaj akiri liberecon; sed la katenoj ĉirkaŭ la maleoloj estis fortikaj kaj zorge kontrolataj, kaj gardistoj ĉiam deĵoris, kiam la ŝipo estis ankrita; kaj ankaŭ ĉe bataloj kontraŭ malamikaj ŝipoj oni taskis al iuj el la soldatoj gardi la sklavojn kaj mortigi ĉiun, kiu montrus maltrankvilon. Kiam ili estis kondukitaj de la ŝipo en iu el la grandaj milithavenoj de la kalifo kaj estis enŝlositaj en sklavdomoj, ĝis la ŝipoj denove surmariĝis, ili estis tenataj sub severa gardo kaj neniam estis permesitaj kolektiĝi multope, kaj pro ĉio tio ĉi ŝajnis al ili ĉiuj, ke nenion alian ili povas atendi krom remi ĝis venos morto, aŭ ĝis iu malamika ŝipo venkos kaj eble ilin liberigos. Sed la ŝipoj de la kalifo estis multaj kaj ĉiam havis superforton, kaj tial ankaŭ ne ĉi tiu ebleco estis tre realeca. Tiuj, kiuj per obstino kaj insultoj oponis, estis skurĝataj ĝis morto aŭ estis vivaj ĵetitaj en la maron, sed foje, kiam la afero koncernis fortajn remantojn, ili estis kastritaj kaj devis daŭrigi la remadon; kaj kvankam la sklavoj neniam havis eblon proksimiĝi al virinoj, ili opiniis tiun punon la plej kruela el ĉiuj.

Eĉ kiam Orm en sia maljuneco rakontis pri sia remsklaveco, li memoris la lokon de ĉiu samlandano en la ŝipo, kaj ankaŭ la plimulto de la aliaj; li povis en sia rakontado iri de remilo al remilo kaj diri, de kia karaktero estis la viroj, kiuj tie sidis, kaj kiuj mortis, kaj kiel aliaj prenis iliajn lokojn, kaj kiuj estis plej multe skurĝataj. Li diris, ke ne estas malfacile al li memori ĉion tion, ĉar en siaj sonĝoj li ofte denove sidas en tiu ŝipo kaj vidas streĉitajn dorsojn antaŭ si, kun vundoj de la vipo, kaj aŭdas la ĝemadon de la viroj ĉe peza remado kaj ĉiam ankaŭ la proksimiĝantajn paŝojn de la pelisto malantaŭ si. Estis necesa fortika ligno en lia lito, ke ĝi ne rompiĝu, kiam li en ĝi serĉis apogon por remiltiro en la sonĝo; kaj li diris, ke neniu feliĉo povas superi tiun, kiun li spertas, kiam li vekiĝas kaj trovas, ke li nur sonĝis.

Tri remilojn antaŭ Orm, ĉe babordo kiel li, sidis Krok, kaj li estis nun homo ŝanĝita. Estis evidente al Orm kaj la aliaj, ke remsklaveco estas al li pli severe prema ol al iu el la aliaj, ĉar li estis homo kun kutimo ordoni, kiu longe fidis sian bonŝancon. Li nun estis silenta kaj malofte respondis alparolon de tiuj samlandanoj, kiuj sidis plej proksime al li; kaj malgraŭ tio, ke li per sia granda forto facile povus prizorgi la remadon, li remis kvazaŭ duone dormanta kaj ŝajnis konstante absorbita en pensoj pri io alia. Okazis, ke li fariĝis malrapida, ke lia remilo perdis la ritmon; tiam li ricevis akrajn vipofrapojn de la pelisto. Neniu lin aŭdis ĉe tiuj okazoj lamenti, eĉ ne lin aŭdis murmuri malbenon; li forte prenis la remilon kaj retrovis la ritmon, sed lia rigardo penseme sekvis la peliston, kiam tiu reprenis sian iradon, same tiel, kiel homo rigardas sintrudan vespon, kiun frapi ne eblas.

La kamarado de Krok ĉe la remilo portis la nomon Gunne; li plendis pri tio, ke multaj vipofrapoj trafis lin pro Krok; sed Krok malmulte respondis al tiuj plendoj. Sed fine je iu okazo, kiam la pe-

listo jam forte frapis ilin ambaŭ, kaj la lamentado kaj kolero de Gunne estis pli granda ol kutime, Krok rigardis al li tiel, kvazaŭ li nur nun lin rimarkus, kaj diris:

—Paciencu, Gunne, ĉar ne longe vi havos ĝenon pro mi. Mi estas ĉefulo kaj ne adaptita al tio ĉi, sed restas al mi unu aferon prizorgi, se sufiĉos por ĝi mia bonŝanco.

Post tio li nenion pli diris, kaj kion prizorgi li intencas, pri tio informiĝi Gunne ne povis.

Plej proksime antaŭ Orm sidis du viroj kun la nomoj Halle kaj Ögmund; ili multe parolis inter si pri grasaj tagoj, kiujn ili travivis, pri nutraĵo kaj biero kaj junulinoj en ilia hejmregiono, kaj multajn manierojn morti ili elpensis por la pelisto; sed ian manieron lin atingi ili neniam trovis. Orm mem sidis apud nigrebruna fremdulo, kies lango pro iu malbonago lia estis fortranĉita; tiu lerte remis, kaj la vipo malofte lin tuŝis, sed Orm preferus samlandanon apud si, aŭ almenaŭ homon parolkapablan. La plej malbona, ŝajnis al Orm, estis, ke la senlangulo, kiu ne kapablis paroli, des pli kapablis tusi, per tusado pli terura ol ĉia alia tusado, kiun aŭdis Orm; tiam lia vizaĝo fariĝis griza, kaj li spiradis kiel elmarigita fiŝo kaj aspektis tiel mizera, ke ne estis atendeble, ke li longe vivos. Tio kaŭzis timojn ĉe Orm pri lia propra sano. Ĉar ŝajnis al li, ke la vivo kiel remsklavo ne multe valoras; sed pro tusado li ne volas morti, tion li sciis aŭdinte la senlangulon. Li fariĝis deprimita pro tiuj pensoj kaj deziris, ke Toke sidu pli proksime.

Toke sidis plurajn remilojn malantaŭ Orm, kaj eblis al ili interparoli nur malofte, kiam ili estis kondukataj de aŭ reen al la ŝipo; ĉar en la sklavdomo ili sidis katenitaj kvarope en malgrandaj kameroj laŭ siaj lokoj ĉe la remiloj. Al Toke restis lia malnova humoro, kaj li ankoraŭ povis trovi aferojn, pri kiuj ridi; li ofte kverelis kun sia benkkamarado, viro nomata Tume, kiu laŭ la opinio de Toke faris

malpli ol duonon de la remado kaj pli ol duonon de la sinnutrado; li kompilis insultpoemojn, iam pri Tume, iam pri la pelisto, kaj ilin kantis kiel remadkanzonojn, tiel ke Orm kaj la aliaj ilin aŭskultu.

Sed plej multe li sin okupis je elpensado de rimedo liberiĝi; kaj la unuan fojon, kiam li kaj Orm povis interparoli, li malkaŝis, ke li havas bonan planon preskaŭ preta: li bezonas nur konvenan pecon de fero. Per tia estus eble rompi ĉeneron en la piedkateno; tio devus okazi en malluma nokto, kiam la ŝipo ripozas en haveno kaj ĉiuj dormas krom la noktgardistoj; viro post viro ricevu la feron kaj silente rompu la katenojn. Kiam ĉiuj normanoj jam estus liberaj, restus nur strangolado de la noktgardistoj sen bruo en la mallumo kaj prenado de iliaj armiloj; veninte sur la teron ili certe trovos pluan eliron.

Orm diris, ke tio estus bona plano, se ĝi nur estus efektivigebla; kaj en la strangolado de la gardistoj, se la afero kontraŭ lia supozo marŝus ĝis tio, li kredas, ke li povos preni utilan parton. Sed de kie ili ricevos la feron? Kaj kiel nudaj homoj, ĉiam observataj, nevidate povos porti en la ŝipon ion tian? Toke suspiris kaj diris, ke jen malfacilaĵoj, kiuj valoras pripensadon; sed pli bona plano ne estas trovebla, kaj oni vidu, kio okazos, kaj esperu, ke sin montros bonŝanca okazo.

Li ankaŭ venis en interparolon kun Krok kaj rakontis al tiu pri sia plano; sed Krok distrite aŭskultis kaj malmulte respondis.

Iom da tempo poste la ŝipo estis tirita sur la grundon en ŝipriparejo de la kalifo por esti skrapata kaj peĉata; multaj el la sklavoj, duope katenitaj, estis okupataj per tiu laboro, kaj la normanoj, kiuj havis bonan kapablon en ŝipripara metio, estis inter ili. Armitaj gardistoj staris ĉirkaŭ ili, kaj la pelisto ĉirkaŭiris kun sia vipo kaj rapidigis la laboron; du gardistoj kun arkoj kaj glavoj lin ĉie akompanis por lin ŝirmi. Proksime al la ŝipo peĉo estis varmigata en granda kaldrono, kaj

apud ĝi staris barelo kun trinkakvo por la sklavoj.

Krok kaj Gunne staris ĉe la barelo kaj trinkis, kiam unu el la sklavoj venis portante sian kamaradon, kiu falis dum la laboro kaj vundis sian piedon, tiel ke li ne povis stari per ĝi; li estis sidigita kaj ricevis por trinki, kaj la pelisto venis por vidi, kio okazas. La vundito kuŝis sur la grundo kaj ĝemis, kaj la pelisto, kiu estis suspektema, lin vipofrapis por vidi, ĉu li povas ekstari. Sed la vundito restis kuŝanta, kaj ĉiu en la proksimeco tenis sian rigardon al li.

Krok staris malmultpaŝe malantaŭe, ĉe la alia flanko de la barelo; li sin movis pli proksimen kaj tiris post si Gunne, kaj lia apatio jam subite malaperis. Kiam li estis sufiĉe proksima kaj vidis, ke la kateno estas sufiĉe longa, li faris alsalton kaj kaptis la peliston je la zono kaj la nuko kaj lin svingis en la aeron. Tiu laŭte muĝis, kaj la gardisto, kiu staris plej proksime, sin turnis kaj puŝis la glavon en Krok. Sed ŝajne Krok nenion rimarkis, sed faris du tri paŝojn flanken kaj metis la peliston kun kapo malsupren en la bolantan peĉon; en tiu sama momento la alia gardisto lin glavobatis sur la kapon. Krok ŝanceliĝis sed tenis la rigardon al tio, kio estis videbla de la pelisto; li ridis kaj diris:

—Nun revenis al mi la bonŝanco.

Tiam li falis kaj mortis; kaj de ĉiuj sklavoj, kiuj vidis la peliston tiel fini sian vivon, eliris granda ĝojkrio. Sed la ŝipanoj de Krok ankaŭ sentis funebron, kaj poste ili ofte parolis inter si pri la ago de Krok kaj pri liaj lastaj vortoj. Ili akordis pri tio, ke li agis kiel ĉefulo; kaj ili esperis, ke la pelisto, kiam li staris en la kaldrono, vivis sufiĉe longe por senti bone la peĉon. Toke faris strofon je la honoro de Krok:

> Pli ol vipfrapon spertis
> mem la vipint', kun la kapo
> funde de l' varma lavsi-

telo de l' marĉevalo.
Krok, kiun sort' kruela
igis remilosklavo,
prenis liberon, venĝon:
jam lia sort' boniĝis.

Kiam ili denove elremis, ili havis novan peliston; sed ĉiuj opiniis, ke ili povas rimarki, ke tiu proprigis al si instruon de la okazaĵo kaj pli singarde uzas la vipon.

SESA ĈAPITRO

# Pri la judo Salaman kaj la regentedzino Subaida kaj kiel Orm ricevis la glavon Blulango.

La senlangulo, kiu remis saman remilon kiel Orm, fariĝis ĉiam pli mizera kaj fine taŭgis por malmulto; kaj kiam la ŝipo foje estis en Malago, unu el la sudaj milithavenoj de la kalifo, oni forprenis lin por meti alian sur lian lokon. Orm dum la lasta tempo devis fari la pli grandan parton ĉe sia remilo kaj scivolemis, ĉu li ricevos pli bonan kamaradon; sekvantan matenon tiu venis en la ŝipon. Li estis trenata al la ŝipo de kvar soldatoj, al kiuj estis pene lin transporti sur la alŝipa irtabulo, kaj jam distance oni rimarkis, ke li ne perdis la langon. Li estis juna kaj bela viro, senbarba kaj gracia, kaj li kriis kaj malbenis pli ol oni iam aŭdis sur la ŝipo.

Li estis portata al sia loko kaj tenata tie, dum oni ligis lin al la piedĉeno; kelkaj larmoj tiam fluis sur liaj vangoj, sed ŝajnis, ke ilin kaŭzis plejparte lia kolero. Kaj la ŝipestro kaj la pelisto venis lin vidi; li tuj komencis ilin superŝuti per minacoj kaj insultoj aplikante al ili multajn nomojn neniam ĝis tiam aŭditajn, kaj ĉiuj remistoj kredis, ke li tuj estos severe vipata. Sed la ŝipestro kaj la pelisto nur karesis al si la barbon kaj alprenis penseman mienon kaj zorge legis dokumenton, kiun la soldatoj alportis; je kelkaj linioj ili kapjesis, je aliaj ili kapneis kaj pripenseme parolis inter si, dum la novulo kriis al ili

kaj ilin nomis putinfiloj, lardomanĝantoj kaj koitantoj kun azeninoj. Fine, skuinte la vipon kontraŭ li kaj admoninte al silento, la pelisto foriris kun la ŝipestro; kaj tiam la novulo sen reteno ekploris kaj lia tuta korpo skuiĝis.

Ĉion tion ĉi Orm trovis rimarkinda, kaj li pensis, ke tiu novulo ne multe asistos ĉe la remilo, se li ne estos vipata; sed li tamen ĝojis pro tio, ke li ricevis parolkapablan kamaradon anstataŭ la senlangulo. Komence la noveveninto tamen ne havis multon por diri al Orm malgraŭ amika alparolo, kaj ankaŭ lia remado estis malforta; estis en ĉiu maniero malfacile por li adaptiĝi, kaj komence li tre furiozadis pri la nutraĵo, kiun ili ricevis, kvankam tiu laŭ la opinio de Orm certe estis malabunda, sed ĉiam tre bongusta. Sed Orm estis pacienca pri li kaj remis por ambaŭ kaj parolis kuraĝige al li tiom, kiom li povis, kaj demandis pli ol unu fojon, kiu li estas kaj kial li alvenis tien. La alia fiere rigardis al li kaj ektiris la ŝultrojn; fine li respondis, ke li estas homo de nobla familio kaj ne alkutimiĝis al tio, ke li estu pridemandata de sklavoj, kiuj eĉ ne scias paroli kapable. Tiam Orm diris:

—Pro tio, kion vi nun diris, mi povus preni vin je la nuko, tiel ke vi ĝin sentus; sed estas pli bone, ke ni tenu pacon inter ni kaj konatiĝu. Sklavoj ni estas ĉiuj ĉi tie, vi same kiel ni; kaj pli ol vi en ĉi tiu ŝipo devenas de bona familio, kaj al tiuj mi apartenas. Orm mi nomiĝas kaj mi estas filo de ĉefulo. Kaj estas vero, ke mi malmulte scias vian lingvon, sed vi pli malscias la mian, el kiu vi eĉ ne konas unu vorton. Tial ŝajnas al mi, ke ni estas same bonaj, vi kaj mi; aŭ se iu el ni estas pli bona, supozeble ne vi estas tiu.

—Vi malbone parolas, respondis la noveveninto, sed ŝajnas, ke vi havas bonan prudenton. Konsente, ke vi estas de altranga familio en via propra tribo, sed kun mi vi ne povas konkuri; ĉar patrinlinie mi devenas de tiu sama tribo, al kiu apartenis la Profeto, paco

restu ĉe li. Kaj sciu, ke mia lingvo estas tiu de Allah mem, dum la diabloj elpensis la aliajn por malhelpi al la vera instruo. Tial ni ne estas egaluloj, vi kaj mi. Mia nomo estas Khalid, filo de Yazid; mia patro havis altan oficon ĉe la kalifo, kaj mi posedas grandajn riĉaĵojn kaj min okupas nur per mia parko, miaj bankedoj kaj per muziko kaj poezio. Estas vero, ke mi nun min okupas per alia afero, sed tio ne longe daŭros, vermoj maĉu la okulojn de tiu, kiu min sendis ĉi tien! Mi kompilis kanzonojn, kiuj estas kantataj en tuta Malago, kaj malmultaj poetoj nun vivantaj egalas min.

Orm diris, ke supozeble abunde da poetoj sin trovas en la regno de la kalifo, ĉar unu tian li jam renkontis pli frue. Khalid diris, ke iusence ili estas multnombraj, ĉar multaj klopodas fari poezion; sed la veraj poetoj estas malmultaj.

Ili nun komencis bone akordi malgraŭ tio, ke Khalid restis malforta remanto kaj dum iuj periodoj apenaŭ povis fari ian ajn utilan laboron, ĉar liaj manoj estis senhaŭtigitaj de la remilo; baldaŭ li rakontis al Orm, kial li estis sklavigita kiel remisto. Multon li devis eldiri plurfoje kaj klarigi per aliaj vortoj, ĉar li estis malfacile komprenebla; sed Orm fine komprenis la pli grandan parton.

Khalid diris, ke lia malbonŝanco venis el tio, ke la plej bela virgulino en tuta Malago estas filino de la vicestro de la kalifo en la urbo, kaj tiu vicestro estas homo de malaltranga origino kaj malica spirito. Sed la beleco de lia filino estas tiel granda, ke eĉ ne poeto povus revi pri io pli bela, kaj ŝin Khalid unu fojon hazarde ekvidis nevualita ĉe rikoltfesto. Post tio li amis ŝin pli ol ĉiujn virinojn kaj je ŝia gloro kreis kantojn, kiuj fandiĝas en la buŝo. Restante sur tegmento proksime al ŝia domo li sukcesis ŝin ekvidi, kiam ŝi troviĝis sola sur sia tegmento. Tiam li fervore ŝin salutis etendante la manojn al ŝi, kaj tio ŝin persvadis levi denove la vualon. Tio estis signo, ke ankaŭ ŝi amas lin; kaj pro ŝia granda beleco li sentis sin ravita.

Certiĝinte ke la knabino bonvolas al li, li faris riĉajn donacojn al ŝia servistino kaj pere de ŝi sendis mesaĝojn. Post tio la vicestro forveturis por raporti al la kalifo pri sia oficado, kaj la knabino sendis al Khalid ruĝan floron. Tiam Khalid sin transvestis en maljunulinon; kaj helpate de la sklavino li envenis al la knabino kaj plurajn fojojn amorĝuis kun ŝi. Sed unu tagon en la urbo ŝia frato alkuris kontraŭ li kun glavo, kaj en la lukto tiu, pro la batallerteco de Khalid, estis vundita. Post tio la vicestro revenis hejmen, kaj Khalid estis arestita kaj kondukita antaŭ lin.

Ĉe tiuj vortoj Khalid malheliĝis pro furiozo; li kun malamo kraĉis kaj kriis malbenojn pri la vicestro. Post tio li daŭrigis:

—Laŭ la leĝo li havis neniun akuzon kontraŭ mi. Estas vere, ke mi faris amoron kun lia filino; sed kompense mi enmetis ŝin en belajn kantojn; kaj ke viro kun deveno kiel la mia ne povas edzinigi malaltoriginan filinon de berbero, tion eĉ ŝia patro devus kompreni. Lian filon mi vundis; sed tiu estis atakinta min, kaj nur pro mia mildeco mi lasis lin forkuri vivanta. Pro tio tiu vicestro devus senti dankemon al mi, se li estus justema homo, sed anstataŭe li konsiliĝis kun sia malico, kiu estas plej granda en Malago, kaj jen kion li elpensis. Aŭskultu, ho pagano, kaj miru!

Orm volonte aŭskultis, kvankam multaj vortoj estis nekonataj al li; kaj la viroj, kiuj sidis sur la plej proksimaj benkoj ankaŭ aŭskultis, ĉar Khalid eldiris sian rakonton per laŭta voĉo.

—Li legigis unu el miaj plej belaj poemoj kaj demandis, ĉu mi ĝin faris. Kaj mi respondis, ke ĉiu homo en Malago konas tiun poemon kaj scias, ke mi ĝin faris, ĉar ĝi estas odo pri Malago, kaj la plej bona iam kreita. En tiu poemo troviĝas ĉi tiuj linioj:

> Mi scias kun plena cert', se nur la Profet' ĉe ni
> al si de la vit-rikolt' permesus gustumon,

neniam li, kiel nun, forbarus, pro sciomank',
en sia severa libr' uvsuko-konsumon.
Feliĉa, kun ruĝa most' sur barb' kaj pokalo plena,
li estus per laŭd' de l' vin' garninta klerlumon.

Tion recitinte Khalid ekploris kaj diris, ke pro tiuj versoj li estis kondamnita al remado. Ĉar la kalifo, kiu estas vartanto de la ĝusta instruo kaj anstataŭanto de la Profeto sur la tero, decidis, ke ĉiu, kiu insultas la Profeton aŭ mallaŭdas lian instruon, estu severe punata; kaj la venĝavida vicestro nun trovis ĉi tiun manieron plej bona por, sub ŝajno de justeco, sin venĝi kontraŭ li.

—Konsolas min, ke tio ĉi ne daŭros longe; ĉar mia familio estas pli potenca ol la lia kaj ĝuas favoron de la kalifo, kaj tial mia liberiĝo baldaŭ venos. Kaj tial neniu ĉi tie en la ŝipo kuraĝas min tuŝi per la vipo; ili scias, ke oni ne senpune uzas perforton kontraŭ parenco de la Profeto.

Orm demandis, kiam vivis la Profeto, kaj Khalid diris, ke li vivis antaŭ tricent kvindek jaroj. Orm tiam diris, ke vere estis tiu Profeto potenca homo, se li ankoraŭ povas protekti siajn parencojn kaj ankoraŭ decidi, kion trinku lia popolo. Neniu viro hejme en Skanio iam havis tiel grandan potencon, eĉ ne Ivar Vidfamne, kiu estis la plej potenca homo iam vivinta tie.

—Sed ja vero estas, li aldonis, ke hejme ĉe ni neniu ŝovas sian nazon en tion, kion trinkas alia, ne reĝoj nek aliaj.

La kapablo de Orm multe kreskis, post kiam fariĝis Khalid lia kamarado, ĉar tiu konstante parolis kaj havis multon por rakonti; kaj post kelka tempo li scivolis, kie situas la lando de Orm kaj kio kaŭzis la sidadon de Orm sur tiu benko. Orm tiam rakontis al li pri la ekspedicio de Krok kaj kiel li mem ekvojaĝis kaj pri tio, kio poste okazis. Ĉion rakontinte laŭ sia eblo, li diris:

—Multo de tio ĉi okazis pro nia renkonto kun tiu judo Salaman. Eble li estis homo kun bonŝanco, ĉar li estis liberigita el sia kaptiteco; kaj dum li estis kun ni, ĉio okazis bone al ni. Li diris, ke li estas potenca homo en urbo nomata Toledo, kie li estas forĝisto de arĝento kaj plej elstara inter poetoj.

Khalid diris, ke li bone konas lin, ĉar liaj arĝentaĵoj estas vaste famaj; kaj ankaŭ kiel poeto li estas bona konsiderante, ke li estas Toledano.

—Kaj antaŭ ne longe, diris Khalid, mi aŭdis migrantan bardon el la nordo kanti poemon de li; kaj en ĝi li priskribis, kiel li falis en la manojn de asturia limgrafo kaj estis tre turmentata de tiu, kaj kiel li sin poste liberigis kaj gvidis sovaĝajn rabistojn kontraŭ lia fortikaĵo kaj sturmis ĝin kaj mortigis la limgrafon kaj metis lian kapon sur palison al la kornikoj kaj portis hejmen liajn trezorojn. En sia simpleco ĝi estis taŭge kompilita peco, sed sen tiu moleco en la tono uzata de bonaj poetoj en Malago.

—Abunde li sin laŭdas, diris Orm, kaj se li povis tiom plenumi por sin venĝi kontraŭ malamiko, devus ebli al li ion fari por rekompenci amikojn, kiuj lin multe helpis. Ni lin liberigis el sklaveco kaj konkeris la fortikaĵon kaj plenumis lian venĝon; kaj se li estas potenca homo en la lando, li povus fari al ni, kiuj sidas ĉi tie, servon. Ĉar kiel ni en alia maniero fariĝos liberaj, mi ne scias.

Khalid diris, ke Salaman estas konata pro siaj riĉaĵoj kaj ke li havas bonan reputacion ĉe la kalifo malgraŭ tio, ke li ne sin tenas al la ĝusta instruo. Orm nun komencis senti esperon, sed menciis nenion al siaj samlandanoj pri tio, kion sciigis al li Khalid. Finiĝis tiel, ke Khalid promesis sendi mesaĝon kaj saluton al Salaman en Toledo, tuj kiam li mem liberiĝos.

Kiam la tagoj pasis sen tio, ke liberiĝo okazis al Khalid, tiu fariĝis ĉiam pli maltrankvila kaj multe furiozis kontraŭ siaj indiferen-

taj parencoj; li ankaŭ komencis elpensi grandan poemon pri la pereigaj efikoj de vino, pri kiu li esperis, ke iu ĝin povos surpaperigi en iu haveno kaj sendi ĝin al la kalifo, tiel ke liaj veraj pensoj pri tiu temo fariĝu konataj; sed kiam li venis al la tasko laŭde prikanti akvon kaj citronan sukon kiel ion pli preferindan ol vino, lia versfara kapablo malkreskis. Malgraŭ tio, ke li en siaj horoj de deprimiĝo daŭre kriis insultojn kontraŭ la ŝipestroj, li estis neniam tuŝata per la vipo; kaj tion Orm konsideris favora signo pri tio, ke li ne longe restos tie.

Iun matenon en iu el la orientaj havenoj, post kiam la ŝipo kun multaj aliaj revenis de prema persekuto post afrikaj marrabistoj, kvar viroj venis sur la ŝipon, kaj kiam Khalid ilin ekvidis, ekestis turniĝo en lia kapo pro ĝojo, kaj la demandojn de Orm li ne aŭdis. Unu estis oficisto kun granda kapvesto kaj ĝispieda kaftano: li transdonis al la ŝipestro leteron, kiun tiu tuŝis per sia frunto kaj poste kun respekto legis; la alia ŝajnis parenco de Khalid, ĉar tuj kiam tiu estis malligita de la ĉeno, ili brakumis kaj ploris kaj interŝanĝis kisojn kaj babilis tre rapide samtempe. La du aliaj viroj estis servistoj, kiuj portis vestojn kaj korbojn; ili vestis Khalid per bela vesto kaj proponis al li manĝon. Orm lin vokis por lin memorigi pri la promeso; sed Khalid jam riproĉis al sia parenco pro tio, ke tiu forgesis venigi barbiron, kaj nenion aŭdis. Poste Khalid kun sia societo forlasis la ŝipon, kaj la ŝipestro kaj la ŝipanoj lin respekte salutis, kiam li foriris; li fiere kapklinis kaj ŝajnis, kvazaŭ li apenaŭ iun vidus, kaj li malaperis brakenbrake kun sia parenco.

Orm pro tio fariĝis melankolia; ĉar Khalid estis por li bona societo, kaj eble tiu nun en sia libereco sin sentas tro altranga por memori, kion li promesis. Alian viron oni lokis apud Orm, grasan komerciston, kiu pesis per falsaj peziloj; tiu baldaŭ laciĝis kaj taŭgis al ne multe, kaj kiam de tempo al tempo la vipo lin trafis, li multe ĝe-

madis kaj murmuris piajn litaniojn por si mem. Li donis al Orm malmulte da ĝojo, kaj tiun tempon en la ŝipo Orm sentis kiel la plej malfacilan. Li kroĉis esperon al Khalid kaj Salaman, sed ĉiam malpli dum la tempo pasis.

Sed fine en Kadizo okazis ilia tago de bonŝanco. Ĉefulo venis al la ŝipo kun soldatoj, kaj ĉiujn normanojn ili malligis de iliaj piedferoj; ili ricevis vestojn kaj ŝuojn kaj estis kondukataj al alia ŝipo, kiu sin direktis kontraŭflue laŭ la granda rivero ĉe Kordovo. Ili devis asisti ĉe la remado supren laŭ la rivero, sed sen katenoj kaj vipo kaj kun anstataŭantoj; ili povis sidi kune kaj sen malhelpo interparoli por la unua fojo post longa tempo. Ili nun estis remsklavoj dum du jaroj kaj pli granda parto de la tria; kaj Toke, kiu multe kantis kaj ridis, diris, ke kio nun okazos al ili, li ne scias, sed unu aferon li scias: urĝas, ke li povu ĉesigi sian soifon. Sed Orm diris al li, ke li pri tio prefere atendu ĝis oportuna okazo; ĉar estus nekonvene, se perfortaĵoj okazus nun, kaj laŭkutime tiaj okazas laŭ lia memoro, kiam Toke ĉesigas sian soifon. Toke konsentis pri tio, ke li devas atendi, sed diris, ke tiu atendo estos malfacila. Ili ĉiuj sin demandis, kio okazos, kaj Orm nun rakontis pri tio, kiel li parolis kun Khalid pri la judo. Ili tiam eldiris multan laŭdon pri la judo kaj ankaŭ pri Orm, kaj malgraŭ tio, ke Orm inter ili estis la plej juna, ili ĉiuj konsideris lin sia ĉefulo.

Orm demandis la soldatestron, kio okazos al ili kaj pri tio, ĉu li konas la judon Salaman; sed la soldatestro sciis nur tion, ke li laŭ siaj ordonoj devas konduki ilin al Kordovo, kaj la judon li ne konas.

Ili venis al la urbo de la kalifo kaj vidis ĝin etendiĝi ambaŭflanke de la rivero kun dense situantaj domoj kaj blankaj palacoj kaj palmĝardenoj kaj turoj. Ili miris pro ĝia grandeco kaj beleco, kiuj superis ĉion, kion ili antaŭe kredis; kaj ĝia riĉeco ŝajnis al ili tiel granda,

ke ĝi povus sufiĉi por abunda prirabado de marvojaĝantoj de la tuta dana regno.

Ili estis kondukataj en la urbon kaj scivoleme rigardis la multecon da homoj; la viroj plendis pri tio, ke nemultaj virinoj estas videblaj kaj ke nemulte estas videbla de tiuj, kiuj troviĝas en la stratoj, ĉar ĉiam ili estas kovritaj kaj vualitaj.

—Ne multe estus bezonata, diris Toke, ke virino ŝajnus al mi bela nun, se mi nur venus en rilaton kun ŝi; ĉar jam tri jarojn ni estas inter ĉi tiu popolo, kaj dum tiu tempo mi ne rilatis kun eĉ unu.

—Se ni ricevos liberecon, diris Ögmund, ni povos abunde rilati kun virinoj ĉi tie same kiel iu ajn; ĉar la viroj ĉi tie laŭ aspekto ne povas konkuri kun ni.

—Ĉiu viro en ĉi tiu lando, diris Orm, rajtas teni kvar edzinojn, post kiam li akceptis la Profeton kaj ties instruon. Sed farinte tion, li rajtas neniam trinki vinon.

—Tiu elekto ne estas facila, diris Toke, ĉar ilia biero estas malforta laŭ mia gusto. Sed eble ni ĝis nun ne gustumis ilian plej bonan. Kaj kvar virinoj ŝajnas al mi laŭ mia bezono.

Ili venis al granda bieno, kie multaj soldatoj troviĝis, kaj dormis tie tiun nokton. En la sekvanta mateno alvenis fremdulo, kiu ilin kondukis al domo proksima; ili tie ricevis prizorgon de banistoj kaj barbiroj, kaj malvarma trinkaĵo estis proponata al ili en malgrandaj belaj pelvetoj. Poste ili ricevis pli molajn vestojn, kiuj ne tiom frotis la haŭton; ĉar estinte dum longa tempo nudaj, ili sentis vestojn raspaj kontraŭ la haŭto. Ili reciproke sin rigardis kaj ridis pri tio, kiel ŝanĝiĝis ilia aspekto; kaj en granda surprizo pri ĉio tio ĉi ili estis kondukataj en manĝosalonon, kie viro venis renkonte kaj bonvenigis al ili. Ili tuj rekonis Salaman malgraŭ tio, ke li nun ŝajnis alia, ol kiam ili laste lin vidis; nun ĉio atestis, ke li estas riĉa kaj potenca homo.

Li montris amikecon al ili kaj proponis al ili manĝi kaj trinki kaj konduti kvazaŭ en propra domo; sed li forgesis la plej multon de tio, kion li sciis de normana lingvo, kaj tial nur Orm povis paroli kun li. Li diris, ke li faris kiom eble por ili, post kiam li aŭdis, en kia malfacila stato ili sin trovas; ĉar iam ili faris al li plej grandan servon, kaj nun estas al li ĝojige, ke li povas ilin rekompenci. Orm lin dankis laŭ sia plej bona kapablo; sed plej multe li volis ekscii, li diris, ĉu ili nun estas liberaj homoj aŭ ĉiam plu sklavoj.

Salaman respondis, ke sklavoj de la kalifo ili restos, tion ŝanĝi li ne povas; sed ili de nun servos en la gvardio, kiu konsistas el la plej taŭgaj el la militkaptitoj de la kalifo kaj el sklavoj aĉetitaj en fremdaj landoj. Tian gvardion, li diris, la kordovaj kalifoj ĉiam havis, ĉar tiel ili sentis sin pli sekuraj ol kun armitaj regnanoj sub sia propra tegmento, kiujn parencoj kaj amikoj pli facile povus logi al ribelo, kiam malkontento regas en la lando.

Sed antaŭ ilia aliĝo al la gvardio, li diris, ili nun estos liaj gastoj por sin iom refreŝigi post siaj penoj; kaj ĉe li ili restis dum kvin tagoj kaj same bonfartis, kiel herooj ĉe la tablo de Odin. Multajn frandaĵojn ili manĝis, kaj trinkaĵoj estis portataj al ili, tuj kiam ili tion deziris; muzikistoj ludis por ili, kaj ili ĉiun vesperon fariĝis gajaj pro vino, ĉar al Salaman neniu profeto malpermesis tiun trinkaĵon. Sed Orm kaj la aliaj ĉiam gardis per okulo Toke, ke li ne tro drinku kaj ekploru kaj fariĝu danĝera. Ilia gastiganto proponis al ĉiu el ili junan sklavinon por societo en la lito, kaj tio ilin plej multe ĝojigis. Ili ĉiuj lin laŭdis kiel grandaniman homon kaj ĉefulon, bona kvazaŭ li venus de normana gento; kaj Toke diris, ke malofte fiŝkapto estis tiel valora kiel tiu, per kiu li eltiris tiun noblan judon el la akvo. Ili kuŝis longe en la matenoj, sur pli molaj kusenoj ol iam ili konis; kaj ĉe la tablo ili amike kverelis pri tio, kiu el ili ricevis la plej bonan sklavinon, kaj neniu volis forŝanĝi la sian.

La trian vesperon Salaman diris al Orm kaj Toke, ke ili lin akompanu; ĉar troviĝas ankoraŭ unu persono, kiun ili danku pro sia liberiĝo kaj kiu eble pli faris por ili ol li. Ili lin akompanis tra multaj stratetoj; kaj Orm demandis, ĉu Khalid, la granda poeto el Malago, venis al Kordovo kaj ĉu lin ili renkontos. Respondis Salaman, ke tiu, kiun ili renkontos, estas pli altranga ol Khalid.

—Kaj nur fremdulo, li kun decida tono aldonis, povas kredi, ke tiu Khalid estas elstara poeto, eĉ se li mem tion pretendas. Kiam mi nombras la vere grandajn poetojn, kiuj nun vivas en la regno de la kalifo, ni sume estas nur kvin; kaj Khalid neniam estos unu el ni, kiel ajn diligente li ludos per la rimoj. Sed vi estas prava, Orm, kiam vi pensas amike pri li, ĉar sen lia mesaĝo mi nenion scius pri vi kaj viaj samlandanoj, kaj tial, se vi lin renkontos, kaj li sin nomas poeto, vi ne kontraŭdiru lin.

Orm respondis, ke li posedas sufiĉe da prudento por ne kontraŭdiri poetojn koncerne ilian eminentecon; kaj nun Toke scivolis, kial li devas partopreni en tiu promeno, kiam li ne komprenas la konversacion kaj kiam li tiom bonfartus en la domo. Salaman diris, ke lia ĉeesto estas necesa, ĉar tia estas la ordono.

Ili venis al ĉirkaŭbarita ĝardeno kaj al malvasta pordo, kiu estis malfermita antaŭ ili; ili enpaŝis kaj iris antaŭen inter belaj arboj kaj multkoloraj herboj kaj alvenis lokon, kie ludis granda fontano, kaj klara akvo fluis inter floroj kaj herboj en malgrandaj serpentumantaj riveretoj. El la kontraŭa direkto venis portseĝo, portata de kvar sklavoj, kaj malantaŭ ĝi iris du sklavinoj kaj du nigraj viroj kun glavoj.

Salaman haltis kaj Orm kaj Toke same; la portseĝo estis mallevita kaj la sklavinoj alkuris kaj ekstaris respekte ĉeflanke, kiam vualita virino elpaŝis. Salaman ŝin profunde salutis tri fojojn kun siaj manoj kontraŭ sia frunto kaj Orm kaj Toke komprenis, ke ŝi devas

esti de reĝa familio; sed ili restis starantaj, ĉar sin kurbigi antaŭ virino ŝajnis al ili nedeca konduto por viroj.

Ŝi fiere kapklinis al Salaman kaj rigardis al Orm kaj Toke kaj ion murmuris sub sia vualo, kaj ŝiaj okuloj montris amikecon. Salaman denove sin klinis antaŭ ŝi kaj post tio diris:

—Bataluloj de Nordlando, danku Ŝian Moŝtinon Subaida: ŝia potenco vin liberigis.

Tiam Orm diris al ŝi:

—Se vi asistis en nia liberiĝo, ni ŝuldas al vi plej grandan dankon. Sed ni ne scias, kiu vi estas, kaj ne scias, kial vi montris al ni tian favoron.

—Tamen ni jam renkontiĝis, ŝi diris, kaj eble vi ambaŭ ne tute min forgesis de tiam.

Per tio ŝi forŝovis la vualon, kaj la judo denove riverencis. Toke palpis al si la barbon kaj diris al Orm:

—Ja estas mia knabino de la fortikaĵo, kaj ŝi estas nun eĉ pli bela ol tiam. Ŝi nepre havis favoran bonŝancon, ĉar depost tiam ŝi fariĝis reĝino. Kaj mi volus scii, ĉu ŝi ĝojas min revidi.

Ŝi rigardis al Toke kaj diris:

—Kial vi parolas al via amiko kaj ne al mi?

Orm respondis, ke Toke ne scikapablas la araban, sed ke li ŝin rekonas kaj opinias, ke ŝia beleco estas eĉ pli granda, ol kiam li laste ŝin vidis.

—Kaj ni ambaŭ ĝojas, Orm diris, ke vi pasis al potenco kaj feliĉo; ĉar al ni ŝajnas, ke ambaŭ vi meritas.

Ŝi rigardis al Orm kaj ridetis kaj diris:

—Sed vi, ruĝa viro, same kiel mi, lernis ĉi tiun lingvon. Kiu estas pli brava batalanto, vi aŭ via amiko, kiu estis mia mastro?

—Oni opinias nin ambaŭ bravaj, diris Orm, sed mi estas juna kaj ĝis nun ne travivis tiom, kiom li, kaj li akiris grandan reputaci-

on tiun fojon, kiam ni konkeris la fortikaĵon, kie vi troviĝis. Tial mi pensas, ke li ankoraŭ estas pli brava el ni, kvankam li mem ne kapablas tion diri al vi en la lingvo de ĉi tiu lando. Sed pli brava ol ni estis Krok, nia ĉefulo, sed li jam mortis.

Ŝi diris, ke ŝi memoras Krok kaj ke bravaj ĉefuloj malofte longe vivas. Orm rakontis, kiel li mortis, kaj ŝi konsente kapsignis; post tio ŝi diris:

—Inter vi kaj mi la sorto mirinde teksis. Vi konkeris la fortikaĵon de mia patro kaj mortigis lin kaj la plimulton de tiuj, kiuj troviĝis tie, kaj pro tio mi devus min venĝi kontraŭ vi. Sed mia patro estis kruela homo kaj plej kruela kontraŭ mia patrino, kaj mi lin malamis kaj lin timis, kvazaŭ li estus vila satano. Ke morto lin trafis, ŝajnis al mi bone, kaj mi ne malĝojis pro tio, ke mi venis inter fremdulojn, ankaŭ ne pro tio, ke via amiko min amis, kvankam estis ĉagreno, ke ni ne povis interparoli. Mi ne tre ŝatis la odoron de lia barbo, sed liaj okuloj estis gajaj, kaj lia rido estis amika, kaj tion mi ŝatis, kaj liaj manoj ne perfortis, kiam li min tuŝis, ankaŭ kiam li estis ebria kaj urĝema pro deziro. Neniu bluaĵo ekestis sur mia korpo, kiam mi estis kun li, kaj survoje al la ŝipo li malpezan ŝarĝon metis sur min. Tial mi en tiu tempo volonte lin akompanus al via lando. Tion diru al li.

Orm ripetis al Toke, kion ŝi diris. Tiu kontente aŭskultis kaj diris:

—Jen vi vidas, kia estas mia bonŝanco ĉe virinoj. Sed ŝi estas el ĉiuj la plej bona. Tion vi diru al ŝi de mi. Ĉu vi kredas, ke ŝi intencas min fari eminenta persono en ĉi tiu lando?

Orm respondis, ke pri tio ŝi nenion menciis, kaj doninte al ŝi la saluton de Toke, li ŝin petis rakonti, kio okazis al ŝi, de kiam ili disiris.

—La ŝipestro min kondukis ĝis tie ĉi en Kordovo, ŝi diris, kaj li

mem min ne tuŝis malgraŭ tio, ke mi devis stari nuda antaŭ li. Li vidis en mi bonan donacon al sia mastro, la veziro. Nun mi apartenas al Almansur, la veziro de la kalifo, kiu estas plej potenca en la lando, kaj post instruado al mi pri la instruoj de la Profeto, li levis mian rangon de sklavino al plejfavorata edzino, ĉar li trovis mian belecon pli granda ol tiun de ĉiuj aliaj. Estu laŭdata Allah pro tio! Tiel per vi la sorto min favoris, ĉar se vi ne estus venintaj al la fortikaĵo, mi ankoraŭ nun sidus tie, timante mian patron, kaj ricevus nebonan edzon malgraŭ mia beleco. Kaj tial mi volis helpi al vi laŭ mia kapablo, kiam Salaman, kiu forĝas miajn plej belajn juvelojn, sciigis al mi, ke vi ankoraŭ vivas.

—Al tri ni ŝuldas dankon, diris Orm, ĉar ili helpis al ni forlasi la ŝipbenkon: al vi, al Salaman kaj al viro en Malago, kiu sin nomas Khalid. Sed nun ni scias, ke via potenco estas la plej granda, kaj tial ni dankas al vi plej multe. Kaj tio estas nia bonŝanco, ke ni renkontis tiajn personojn, kiaj estas vi kaj la du aliaj, ĉar alie ni ankoraŭ sidus ĉe la remiloj kaj nenion atendus krom morton. Nun ni volonte ekservos al via mastro kaj lin asistos kontraŭ liaj malamikoj. Sed estas rimarkinde, ke vi havis potencon lin persvadi favore al nia liberiĝo; ĉar ekde la tempo de la Lodbrok-filoj, ni normanaj marveturantoj estas, ĉu ne, konsiderataj malamikoj ĉi tie.

—Tiun servon vi faris al mia mastro Almansur, ke vi konkeris la fortikaĵon de mia patro kaj ŝovis min en lian manon. Kaj estas inter ni konate, ke tiuj, kiuj venas de via lando, fidelas al siaj promesoj kaj brave batalas. Ĉar kaj la kalifo Abderraĥman la Granda kaj lia patro, la emiro Abdallah, havis en siaj gvardioj multajn normanojn; ili tiam multe prirabadis hispanajn bordojn, sed de tiam malmultaj venis, kaj antaŭ vi neniuj estas en la gvardio. Kaj se vi nun fidele servos al mia mastro Almansur, via soldo estos bona; al vi kaj al viaj samlan-

danoj la ĉefulo de la gvardio donos kompletajn batalkostumojn kaj bonajn armilojn. Sed al vi ambaŭ mi havas donacon.

Ŝi vokis unu el la sklavoj de apud la portseĝo, kaj tiu alpaŝis kun du glavoj; ilin kompletigis bele ornamitaj ingoj kaj zonoj kun pezaj arĝentaj umbetoj. Unu el ili ŝi transdonis al Orm kaj la alian al Toke. Ili akceptis kun granda ĝojo, ĉar la stato de senarmileco, kiun oni ĝis nun trudis al ili, naskis ĉe ili mankosenton. Ili eltiris la glavojn kaj ekzamenis zorge la klingojn kaj provis, kiel konvenas la manteniloj al la manoj. Salaman rigardis la glavojn kaj diris:

—Tiuj estas forĝitaj en Toledo, kie troviĝas la plej kompetentaj forĝistoj kaj por arĝento kaj por ŝtalo. Ankoraŭ oni tie forĝas la glavojn rektaj, kiel oni faris en la epoko de la gotaj reĝoj, antaŭ ol venis la servantoj de la Profeto al ĉi tiu lando. Kaj pli bonajn glavojn neniu forĝas.

Toke laŭte ridis pro kontento kaj murmuris por si mem kaj diris:

Longe la lignon remilan
palpis luktista man':
nun estas bele, ree
klingon luktistan porti.

Orm ne volis malsuperi al li en kunmetado de versoj; li pripensis kaj etendis la glavon antaŭ si kaj diris:

Jen livamane mi levas
glavon de l' bela dam',
kiel ĉe l' dioj Tiro:
povas Serpent' jam mordi.

Subaida ridis kaj diris:

—Doni al viro glavon estas kiel doni al virino spegulon: por ne-

nio alia la okuloj. Sed bone estas vidi, ke tiom bonveniĝas donacoj; ili donu al vi bonŝancon.

Orm diris al ŝi:

—Ni nun nin sentas kiel ĉefuloj, Toke kaj mi; ĉar tiel bonajn glavojn ni neniam vidis. Se via mastro Almansur similas al vi, li meritas servadon.

Nun finon atingis la renkonto; ĉar Subaida diris, ke venis la tempo por ŝi adiaŭi al ili kaj ke eble ili ŝin ankoraŭ iun fojon revidos; kaj per tio ŝi eniris la portseĝon kaj estis forportata.

Ili revenis kun Salaman al lia domo, kaj ĉiuj havis multon por diri laŭde al Subaida kaj pri ŝiaj bonaj donacoj. Salaman diris, ke li ŝin konas jam pli ol unu jaron; ĉar plurajn fojojn li al ŝi vendis juvelojn, kaj li tuj vidis, ke ŝi estas tiu sama knabino, kiun akiris Toke en la fortikaĵo de la malica limgrafo, malgraŭ ke ŝia beleco de tiam fariĝis pli granda. Toke diris:

—Ŝi estas bela kaj bonkora kaj tenas en bona memoro tiun, kiun ŝi ŝatis; kaj por mi estas malfacile, kiam mi ŝin nun revidas, scii, ke ŝi edziniĝis al altrangulo. Sed estas bone, ke ŝi ne apartenas al tiu dikventra maljunulo kun la arĝentomartelo, kiu nin kaptis; ĉar tio estus pli kruela sento. Kaj mi ne volas tro plendi nun; ĉar la knabino, kiun donis al mi Salaman, ne havas mankon.

Nun Orm faris demandojn pri tiu Almansur, la mastro de Subaida, kaj pri tio, kiel li povas esti la plej potenca homo en la lando, ĉar ja tia devus esti la kalifo; kaj Salaman klarigis la staton de tiuj aferoj. La antaŭa kalifo en Kordovo, Haŝam la Erudicia, filo de Abderraĥman la Granda, estis potenca sinjoro, kvankam li pasigis la pli grandan parton de sia tempo legante librojn kaj konversaciante kun erudiciuloj; mortinte li postlasis junan filon portantan la nomon Hiŝam kaj estantan nun kalifo. Kaj por administri la regnon dum ties infaneco Haŝam enoficigis la plej talentan el siaj oficistoj kune

kun sia favorata edzino, la patrino de la infano, kaj tiuj trovis la potencon dolĉa kaj restigis la junan kalifon enfermita en kastelo, pretendante, ke li estas tro pia por sin miksi en mondajn aferojn. Kaj dum sia regado de la regno tiu oficisto plurfoje venkadis kontraŭ la kristanoj en la nordo kaj pro tio ricevis la nomon Almansur, ”venkanto”. La reĝino, patrino de la kalifo, jam longe amis Almansur pli ol ion alian sur la tero; sed ŝi kaŭzis al li enuon; ĉar ŝi estis pli maljuna ol li kaj ofte kverelema koncerne la potencon; kaj tial ankaŭ ŝi nun sidas enfermita kiel ŝia filo la kalifo, kaj Almansur sola regas en la lando en la nomo de la kalifo. Kaj pro tio, kion li faris kontraŭ la kalifo kaj la patrino de la kalifo, multaj lin malamas; sed multaj lin amas pro liaj venkoj kontraŭ la kristanoj; kaj por sia gvardio el fremduloj li estas bona mastro, ĉar ĝin li fidas kiel ŝirmon kontraŭ ĉiuj tiuj, kiuj havas en si envion kaj malamon kontraŭ li. Kaj tial estas supozeble, ke Orm kaj liaj samlandanoj havos prosperajn tagojn en la palaco de Almansur, kiam paco regas, sed ankaŭ batalojn laŭ sia apetito; ĉar ĉiun someron Almansur kutimas elmarŝi kun granda armeo, aŭ kontraŭ la reĝo de Asturio aŭ kontraŭ la grafo de Kastilio aŭ kontraŭ la reĝo de Navaro kaj la aragonaj grafoj plej norde apud la limo de la frankoj. Por ĉiuj tiuj li estas granda teruro, tiel ke ili ofte volas pagi al li tributon por savi sin de lia vizito.

—Sed por ili estas malfacile sin savi de li per pagoj, daŭrigis Salaman; kaj tio dependas de tio, ke li estas homo malfeliĉa. Li estas potenca kaj venkanta, kaj en ĉiuj entreprenoj li spertis sukceson, kaj tamen ni ĉiuj scias, ke konstante li estas turmentata de granda timego. Ĉar li perfortis kontraŭ la kalifo, kiu estas la ombro de la Profeto, kaj de tiu li ŝtelis la potencon; kaj pro tio li timas la koleron de Allah, kaj li ne havas pacon en sia animo. Ĉiun jaron li klopodas malkolerigi Allah per nova marŝo kontraŭ la kristanoj; kaj tial li ne akceptas tributon de ĉiuj kristanaj princoj samtempe kaj nur dum

mallonga tempo de ĉiu; ĉar kelkajn li ĉiam volas disponi al si, por ke li povu ilin kun fervoro plagi per glavo. El ĉiuj militestroj, kiuj naskiĝis en ĉi tiu lando, li estas la plej granda; kaj solenan ĵuron li faris, ke li mortu militante kun sia vizaĝo turnita kontraŭ la adorantoj de pluraj dioj, kiuj kredas, ke la filo de Jozefo estis dio. Malmulte li atentas pri poezio kaj muziko, kaj malprospere estas por poetoj nun, kompare kun la tempo de Haŝam la Erudicia; sed ripozante li trovas ĝuon en oraĵoj, arĝentaĵoj kaj juvelŝtonoj, kaj tial mi ne apartenas al tiuj, kiuj plendas pri li. Ĉi tiun domon ĉi tie en Kordovo mi havigis al mi, por ke mi pli komforte povu komercadi kun li; li longe prosperu kaj ĉion bonan ĝuu, ĉar por arĝentisto li vere estas bona mastro.

Tion kaj pli Salaman rakontis al Orm, kaj Orm ĝin ripetis al Toke kaj la aliaj; kaj ĉiuj akordis pri tio, ke tiu Almansur devas esti rimarkinda regnestro. Sed lian timon antaŭ Allah estis por ili malfacile kompreni, ĉar por normanoj estis timo antaŭ la dioj nekonata.

Antaŭ ol venis la horo, kiam ili forlasu la domon de la judo, li donis al ili bonajn konsilojn pri multaj aferoj; kaj al Toke li donis konsilon, ke tiu estontece ne lasu rimarki, ke iam Subaida apartenis al li.

—Ĉar regnestroj ne pli ol ni ŝatas virojn, kiuj rilatis kun iliaj virinoj, li diris; kaj ŝi estis brava, ke ŝi kuraĝis renkonti vin du, eĉ kiam ĉeestis atestantoj, kiuj vidis, ke ĉio okazis dece. Almansur estas observema sinjoro en tio kiel en ĉiaj aliaj aferoj, kaj tial Toke devas sin gardi.

Toke diris, ke sin kaŝas en tio nenia danĝero; kaj ke alia afero nun plej multe okupas al li la pensojn, nome kiel trovi bonan nomon por lia glavo. Ĉar glavo tia, kia estas lia, certe estas forĝaĵo same bona kiel la glavo Gram, kiu apartenis al Sigurd, aŭ Mimming, kiu apartenis al Didrik, aŭ Skofnung, kiun portis Rolf Krake; kaj tial

ĝi devus havi nomon kiel ili. Tamen li ne povis iun trovi, kiu ŝajnis al li sufiĉe bona, malgraŭ tio, ke li multe pripensis. Sed Orm nomis la sian Blulango.

Ili forlasis Salaman kun multaj dankoj kaj estis kondukitaj en la palacon de Almansur, kie akceptis ilin soldatestro; ili ricevis batal-kostumojn kaj kompletan armilaron kaj ekservis en la gvardio. Kaj por siaj sep samlandanoj Orm estis ĉefulo.

SEPA ĈAPITRO

# Pri la servado de Orm ĉe Almansur kaj kiel li forvelis kun la sonorilo de sankta Jakobo.

Orm ekservis ĉe la gvardio en Kordovo en la oka jaro de la regado de la kalifo Hiŝam; tio estis tri jarojn antaŭ la militekspedicio de Bue Dika kaj Vagn Åkesson al Norvegujo. Kaj tie li servis dum kvar jaroj.

La viroj en la gvardio ĝuis grandan reputacion kaj estis pli bonege vestitaj ol aliaj. Iliaj maŝkirasoj estis malpezaj kaj maldikaj sed pli delikate forĝitaj kaj pli bone harditaj ol ĉiuj kirasforĝaĵoj iam viditaj de Orm kaj liaj ŝipanoj. Iliaj helmoj brilis arĝente, kaj super la kiraso ili foje portis skarlatajn mantelojn; kaj iliaj ŝildoj havis laŭrande festonojn de belaj skribsignoj. Samaj signoj estis broditaj sur la granda flago de Almansur, kiu dum ties militmarŝoj ĉiam estis portata antaŭ li, kaj ilia signifo estis: neniu venkas krom Allah.

Kiam Orm kaj liaj ŝipanoj por la unua fojo venis ĝis antaŭ Almansur, por esti metitaj antaŭ ties vido de la kolonelo de la gvardio, ili surpriziĝis vidante lin, ĉar ili kredis lin laŭ formato de heroo. Li estis nerimarkinda persono, sengrasa kaj duone kalva kun verdeflava vizaĝhaŭto kaj pezaj palpebroj; li sidis inter kusenoj sur larĝa kuŝmeblo kaj malrapide gratis al si la barbon, dum li tre rapide parolis al du oficistoj, kiuj sidis sur la planko antaŭ li kaj notis liajn

ordonojn. Sur tablo apud lia sidloko staris skatolo el kupro kaj apud ĝi pelvo kun fruktoj kaj granda plektita kaĝo; en ĝi kelkaj malgrandaj simioj ludis kaj ĉirkaŭkuris sur rado. Dum skribis la oficistoj, kion li laste diris, li prenis fruktojn kaj ilin enŝovis inter la latojn de la kaĝo kaj rigardis, kiel interbatas la simioj pri la donaco kaj etendas siajn manetojn por pli; sed li ne ridetis vidante iliajn artifikojn, sed fiksrigardis ilin kun melankolia mieno, dum li enpuŝis pli da fruktoj kaj denove ekparolis al la skribistoj.

Post mallonge li lasis la skribistojn kaj ordonis al sia kolonelo, ke tiu proksimiĝu kun siaj gvardianoj; li levis la okulojn de la kaĝo kaj rigardis Orm kaj la aliajn. Liaj okuloj estis nigraj kaj malĝojaj; sed estis kvazaŭ io brulus kaj fajrerus funde de ili, tiel ke al ĉiuj estis malfacile renkonti lian rigardon pli ol mallonge. Li zorge ekzamenis la virojn, unu post alia, kaj koncede kapklinis.

—Ĉi tiuj aspektas kiel bataluloj, li diris al sia kolonelo. Ĉu ili komprenas nian lingvon?

La kolonelo elmontris Orm kaj diris, ke tiu komprenas la araban, sed la aliaj malmulton aŭ nenion komprenas kaj ke tiuj konsideras Orm sia ĉefulo.

Almansur diris al Orm:

—Kia via nomo?

Orm diris sian nomon kaj diris, kion ĝi signifas. Almansur diris:

—Kiu estas via reĝo?

—Harald Gormsson, diris Orm; kaj li estas mastro de la tuta dana regno.

—Lian nomon mi neniam aŭdis, diris Almansur.

—Pro tio vi ĝoju, mastro, respondis Orm; ĉar tiel vaste, kiel naĝas liaj ŝipoj, reĝoj paliĝas pro tiu nomo.

Almansur rigardis al Orm; poste li diris:

—Ŝajnas al mi, ke via lango rapide moviĝas kaj eble vi prave portas vian nomon. Ĉu via reĝo estas amiko de la frankoj?

Orm ridetis kaj respondis:

—Li estis amiko de ili, kiam li suferis ĝenojn en sia propra lando. Sed kiam bonŝanco favoras lin, li bruligas iliajn urbojn, en Franklando kaj en Sakslando. Kaj bonŝanco multe lin favoras.

—Povas esti, ke li estas bona reĝo, diris Almansur. Kiu estas via dio?

—Pli malfacile estas tiun demandon respondi, mastro, diris Orm. Miaj dioj estas la dioj de mia popolo, kaj ili estas konsiderataj fortaj, same kiel ni. Ili estas multaj; sed kelkaj el ili estas aĝaj, tiel ke malmultaj sin koncernas pri ili krom la bardoj. Thor estas la nomo de la plej forta; li estas ruĝa kiel mi kaj estas konsiderata amiko de ĉiuj homoj. Sed Odin nomiĝas la plej saĝa; li estas dio de bataluloj, kaj oni diras, ke dank' al li ni normanoj estas la plej lertaj batalantoj. Sed ĉu iu el ili ion faris por mi, tion mi ne scias; kaj certe estas, ke mi malmulton faris por ili. Kaj ili ŝajnas al mi sin trovi malproksime de ĉi tiu lando.

—Nun nete aŭskultu, pagano, kion mi diras, diris Almansur: Nenia dio ekzistas krom Allah. Ne diru, ke ili estas multaj, kaj ne diru, ke ili estas tri; estos favore al vi en la tago de juĝo, se ne tiel vi parolas. Allah estas unu, Eterna, Altsitua; kaj Muĥammad estas lia profeto. Jen la vero, ĝin vi kredu. Kiam mi militas kontraŭ la kristanoj, mi ĝin faras por Allah kaj la Profeto; kaj malbone estus, se batalantoj en mia armeo ne farus al ili honoron. Tial vi kaj viaj samlandanoj ekde nun ne alvoku dion alian krom la ĝustan.

Orm respondis:

—Estas kutimo ĉe ni normanoj, ne sen neceso alvoki niajn diojn; ĉar ni ne volas ilin tedi per krioj. Estante en ĉi tiu lando nenian dion ni alvokis de tiam, kiam ni donis oferaĵon al la mardio por

sukcesa hejmeniro; kaj tiun fojon ĝi estis al nenia utilo, ĉar tuj poste venis viaj ŝipoj, kaj ni, kiuj ĉi tie staras, estis kaptitaj. Povas esti, ke niaj dioj malmulte potencas en ĉi tiu lando; kaj tial, sinjoro, mi volonte estos plaĉa al vi, tenante min al via dio ĉi tie ĉe vi. Kaj la aliajn mi demandos, se vi volas, kion ili pensas pri tiu afero.

Almansur jese klinis la kapon; kaj Orm diris al siaj samlandanoj:

—Li diras, ke ni devas nin teni al lia dio. Li havas nur unu, kaj ĝi nomiĝas Allah kaj malŝatas aliajn diojn. Mi kredas, ke lia dio estas forta en ĉi tiu lando, sed niaj dioj estas malfortaj tiel malproksime de la hejmlando. Ni akiros pli bonan reputacion agante en tio laŭ la kutimo ĉi tie, kaj ni estus senprudentaj agante kontraŭ la volo de Almansur en tiu afero.

La viroj opiniis, ke ili ne havas grandan eblecon elekti, ĉar estus stulte inciti tian sinjoron kiel Almansur; kaj ĉe la fino Orm ree sin turnis al Almansur kaj diris, ke ili ĉiuj volas sin teni al Allah kaj neniun alian alvoki.

Nun Almansur lasis voki du pastrojn kaj unu juĝiston, kaj antaŭ ili Orm kaj liaj viroj devis eldiri la sanktajn vortojn de la servanto de Muĥammad, la samajn, kiujn Almansur diris al Orm, ke ne sin trovas dio krom Allah kaj ke Muĥammad estas lia profeto. Al ĉiuj, krom al Orm, estis malfacile formi la vortojn malgraŭ tio, ke ili estis zorge diktitaj.

Kiam ili estis pretaj, Almansur aspektis kontenta kaj diris al siaj pastroj, ke li opinias, ke li faris al Allah grandan servon per tio ĉi, kaj pri tio ili konsentis kun li. Li ŝovis sian manon en la kupran skatolon, kiu staris sur lia tablo, kaj el ĝi li prenis ormonerojn kaj donis al ĉiu el la viroj dek kvin monerojn kaj al Orm duoble. Ili lin dankis, kaj poste ili estis kondukitaj de la gvardiestro al ilia kazerno.

Toke diris:

—Nun ni maldungis niajn proprajn diojn, kaj tio povas esti ĝu-

sta en fremda lando, kie regas aliaj; sed se mi iam revenos hejmen, tiam mi pli zorgos pri ili ol pri tiu Allah. Sed ĉi tie mi kredas, ke li estas la pli bona, kaj pro li ni jam ricevis oron. Kaj mi ankoraŭ pli alte taksos lin, kiam li ankaŭ donos al mi virinojn.

Baldaŭ poste Almansur ordonis militiron kontraŭ la kristanoj kaj marŝis norden kun sia gvardio kaj sufiĉe granda armeo kaj rabadis dum tri monatoj en Navaro kaj en la aragonaj graflandoj; Orm kaj liaj viroj akiris tie kaj predon kaj virinojn kaj trovis kontentiĝon en la servado. Estontece de tiam ili militis kun Almansur printempe kaj aŭtune, sed ili restis en Kordovo dum la plej malagrabla somervarmo kaj dum tiu sezono, kiun la sudlandanoj nomis vintro. Ili klopodis adaptiĝi al la moroj de la lando kaj trovis malmulton priplendebla ĉe Almansur; ĉar ofte li donis al ili abundajn donacojn por teni ilian sindonemon potenca, kaj kion ili akiris dum sturmoj kaj aliaj rabadoj, tion ili rajtis reteni por si, post kiam kvinono estis dekalkulita por li.

Sed servi al Allah kaj kontentigi la Profeton kelkfoje ŝajnis al ili malfacile. Kiam ili dum la militekspedicioj trovis vinon kaj lardon ĉe la kristanoj, estis al ili malpermesite tion ĝui malgraŭ tio, ke ili je ambaŭ forte sopiris; kaj tiun malpermeson, kiu ŝajnis al ili pli stulta ol io ajn antaŭe aŭdita, ili malofte kuraĝis malobei, ĉar Almansur estis tre severa pri tiuj aferoj. Preĝoj al Allah kaj sinklinoj por la Profeto ŝajnis al ili tro ofte okazi, ĉar matene kaj vespere dum la militiroj la tuta armeo de Almansur sin fleksis surgenue turnante vizaĝon en tiu direkto, kie laŭdire situas la urbo de la Profeto, kaj ĉiu devis plurajn fojojn sin klini kun frunto ĝis la tero. Tio ŝajnis al ili nedeca por viroj kaj inda nur je rido, kaj neniam ili povis sin tute al tio kutimigi; sed ili akordis pri tio, ke ili laŭeble sin adaptu kaj agu tiel, kiel agas ĉiuj aliaj.

Ili sin distingis kiel batalantoj kaj akiris grandan reputacion in-

ter ĉiuj en la gvardio. Ili mem sin konsideris la plej bonaj tie; kaj kiam predo estis disdividota, neniuj disputis ilian rajton. Ili kune estis ok: Orm kaj Toke, Halle kaj Ögmund; Tume, reminta kun Toke; Gunne, reminta kun Krok; Rapp, unuokula; kaj Ulf, kiu estis plej maljuna kaj kiu antaŭ longe ĉe julfesteno ricevis glavobaton, kiu fendis lian vangon de la buŝangulo, kaj post tio oni nomis lin Rikanlupo, ĉar lia nomo signifas lupo kaj lia buŝo estis oblikva kaj pli larĝa ol tiu de aliaj. Ilia bonŝanco nun estis tiel bona, ke nur unu inter ili perdis sian vivon dum tiuj kvar jaroj, kiujn ili pasigis ĉe Almansur.

Ili multe sin movis dum tiu tempo; ĉar kiam la barbo de Almansur komencis griziĝi, li fariĝis ĉiam pli senripoza en siaj militiroj kontraŭ la kristanoj kaj ĉiam malpli sidis en paco en Kordovo. Ili lin akompanis, kiam li atingis plej norden, al Pamplono en la regno Navaro, kaj du fojojn vane sturmis tiun urbon kaj trian fojon ĝin konkeris kaj prirabis; tie Tume, reminta kun Toke, mortis pro ŝtono de katapulto. Ili ĉeestis en la ŝipo de Almansur mem al Majorko, kie la vicreganto de la insuloj fariĝis ribelema, kaj ili gardostaris, kiam li senkapigis lin kaj tridek da liaj parencoj. Ili luktis en polvo kaj prema varmego en granda batalo ĉe Henares, kie batalantoj de la kastilia grafo sin alkroĉis, sed fine estis cirkaŭitaj kaj faligitaj, kaj kie en la vespero la falintaj kristanoj estis kuntrenitaj kaj amasigitaj ĝis konsiderinda alteco, de kie unu el la pastroj de Almansur vokis la servantojn de la Profeto al preĝo. Post tio ili faris grandajn militekspediciojn al la regno Leon, kie reĝo Sanĉo la Dika estis severe premata, ĝis liaj propraj viroj lin trovis senutila, ekde kiam li pro sia graso ne povis sidi sur ĉevalo, kaj ili lin detronigis kaj venis al Almansur kun tributo.

Dum ĉiuj tiuj militiroj Orm kaj liaj samlandanoj miris pri la saĝo kaj potenco kaj granda bonŝanco, kiun havis Almansur ĉe siaj

entreprenoj, sed plej multe pri la timo, kiun li havis antaŭ Allah, kaj pri la maniero, kiun li elpensis por tute kontentigi sian dion. La polvo, kiu sin metis sur liaj vestoj kaj ŝuoj dum militiroj, estis en ĉiu vespero kolektita de liaj servistoj kaj konservata en saketo el silko, kaj post ĉiu militiro tiu polvo estis portata al Kordovo. Li jam decidis, ke li estu enterigita kun ĉio el la polvo de siaj militoj kontraŭ la kristanoj; ĉar la Profeto diris: Beataj estas tiuj, kiuj tretis polvajn padojn militante kontraŭ la nefidelaj.

Sed malgraŭ ĉiu tiu polvo la timo de Almansur antaŭ Allah ne cedis; fine li decidis elfari ion pli grandan ol ĉion alian, nome detrui la sanktan urbon de la kristanoj en Asturio, kie la apostolo Jakobo, la granda miraklofaranto, kuŝis en tombo. En la dekdua jaro de la kalifo Hiŝam, kiu jaro estis la kvara jaro de servado de Orm kaj liaj kunuloj ĉe Almansur, tiu lasta en la aŭtuno kolektis pli grandan armeon ol iam antaŭe kaj marŝis nordokcidenten tra la Malplena Lando, kiu estis la malnova limregiono inter la andaluzoj kaj la asturiaj kristanoj.

Li alvenis la regionon de la kristanoj trans la senhomejo, tra kiu laŭ homa memoro neniu andaluza armeo pasis; kaj nun ĉiutage ekflamis bataloj, ĉar la kristanoj bone sin defendis inter la montoj kaj ravinoj. En iu vespero, kiam la armeo jam haltis, kaj Almansur post vesperpreĝo ripozis en sia granda tendo, la kristanoj surprizatakis kaj estis komence sukcesaj; unu grupo penetris en la bivakon kaj granda bruo naskiĝis, kun batalvokoj kaj helpokrioj. Almansur urĝe forlasis sian tendon, kun helmo kaj glavo, sed sen maŝkiraso, por vidi, kio okazas; Orm kaj du el liaj kunuloj, Halle kaj Rapp la Unuokula, gardostaris en tiu vespero antaŭ la tendopordo. Venis sammomente kun plej eble granda rapido kelkaj rajdantaj malamikoj kontraŭ la tendon; kaj kiam ili vidis Almansur, ili lin rekonis pro lia verda helmvualo (ĉar sole nur li en la armeo portis tiun koloron) kaj

ili ululis pro fervoro kaj ĵetis siajn lancojn kontraŭ li. Estis duonmallume, kaj Almansur estis maljuna kaj ne povis sin forklini de la lancoj; sed Orm, kiu staris plej proksime, alkuris kaj lin puŝis antaŭen sur la teron kaj kaptis du lancojn per sia ŝildo kaj unu per sia ŝultro. Kvara lanco skrapis flankon de Almansur, kiu kuŝis sur la tero, tiel ke sango elfluis. Halle kaj Rapp kuris kontraŭ la malamikojn kaj ĵetis siajn lancojn kaj faligis unu, kaj nun alvenis homoj el ĉiuj flankoj kaj la kristanoj estis mortigitaj aŭ forpelitaj.

Orm eltiris la lancon, kiu lin trafis, kaj donis helpon al Almansur kaj ne sciis certe, kion tiu opinios pri tio, ke li estis falpuŝita. Sed Almansur estis kontenta pro sia vundo, kiu estis la unua, kiun li ricevis; ĉar lin tre feliĉigis verŝi sangon por Allah, kiam damaĝo ne estis pli grava. Li lasis alvoki tri el siaj ĉefoj de rajdistoj kaj riproĉis ilin antaŭ siaj kunvenintaj ĉefoj, ke ili malatente gardis la bivakon. Ili sin ĵetis sur la teron antaŭ liaj piedoj kaj ploris kaj konfesis sian fuŝon; kaj poste Almansur koncedis al ili, kiel estis al li kutimo, kiam li estis milde agordita, tempon por eldiro de preĝoj kaj levfikso de barboj, antaŭ ol estis iliaj kapoj dehakitaj.

Al Halle kaj Rapp li donis po manplenon da oro; kaj poste, dum ankoraŭ restis ĉiuj ĉefoj de la armeo, li venigis alpaŝi Orm. Tiun li rigardis kaj diris:

—Vi uzis forton kontraŭ via mastro, ruĝbarbulo, kaj al neniu soldato tio estas permesita. Kaj faligante min sur la teron vi damaĝis mian gloron. Kion vi respondas?

—Multaj lancoj estis en la aero, diris Orm, kaj nenio alia estis farebla. Kaj laŭ mia kredo, mastro, estas via gloro tia, ke ĉi tiu afero ne damaĝis ĝin. Cetere vi falis antaŭen kontraŭ la malamikon, tiel ke neniu povos diri, ke vi cedis.

Almansur sidis silenta kaj fingrumis sian barbon; poste li konsente klinis la kapon kaj diris:

—Vian defendon mi juĝas bona. Kaj mian vivon vi savis, kaj ĝi ankoraŭ povas esti iom valora.

Li nun lasis el sia trezorkesto elpreni pezan kolĉenon el oro kaj diris:

—Mi vidas, ke lanco pikis al vi la ŝultron, kaj supozeble tio sentiĝas. Sed jen kuraco kontraŭ la doloro.

Li metis la ĉenon ĉirkaŭ la kolon de Orm, kaj tio estis malofta honoro; post tio Orm kaj liaj kunuloj estis sub la favoro de Almansur pli ol antaŭe. Toke ekzamenis la ĉenon kaj ĝojis, ke Orm tian valoraĵon akiris.

—Kaj tio estas certa, li diris, ke neniu mastro pli meritas servadon ol Almansur. Sed tamen mi opinias tre bonŝance por vi, Orm, kaj por ni, ke vi ne faligis lin sur lia dorso.

Nun la armeo pluen marŝis; kaj fine ili alvenis la sanktan urbon de la kristanoj, kie kuŝis la apostolo Jakobo en tombo, super kiu estis konstruita granda templo. Tie leviĝis batalo, ĉar la kristanoj kredis, ke ilia apostolo ilin helpos, kaj luktis ĝis ili ne plu kapablis; sed fine ili estis supervenkitaj de Almansur, kaj la urbo estis sturmita kaj bruligita.

Ĝis tie grandaj trezoroj estis venigitaj de la kristanoj en la tuta lando, ĉar ĉi tiun urbon neniam minacis malamiko; kaj ili kaptis grandan predon kaj akiris multajn kaptitojn. Kion Almansur pli ol ĉion volis detruita, estis la granda preĝejo super la tombo de la apostolo; sed ĝi estis el ŝtono kaj rezistis bruligon. Li tial okupigis kaptitojn kaj virojn el sia propra armeo per ĝia disrompo. En ĝia turo pendis dek du grandaj sonoriloj nomataj laŭ la apostoloj; ili bele sonoris kaj la kristanoj ilin aprecis kiel mirindaĵojn kaj plej multe la plej grandan, kies nomo estis Jakobo.

Almansur ordonis, ke tiuj sonoriloj estu portataj al Kordovo de la kristanaj kaptitoj, kie ili estu metitaj en la granda moskeo kun la

buŝegoj supren kaj estu plenigitaj per bonodora oleo kaj brulu kiel grandaj lampoj glorante Allah kaj la Profeton. Estis peze ilin porti kaj grandaj portlitoj estis muntitaj; po sesdek kaptitoj alterne portu ĉiun sonorilon. Sed la sonorilo de Jakobo estis tro peza, tiel ke ne eblis konstrui portilon por ĝi; ankaŭ ne eblis ĝin transporti sur la tramontaraj vojetoj per vagono tirata de bovoj. Malgraŭ tio Almansur neniel deziris lasi tiun sonorilon, kiun li konsideris sia plej bela predo.

Li konstruigis platformon, sur kiu la sonorilo staru, kaj ĝi estu trenata sur rultraboj ĝis proksima rivero kaj estu portata per ŝipo al Kordovo. Kiam la platformo estis preta kun rultraboj sube, stangoj estis ŝovitaj tra la sonorila anso, kaj multaj provis levi la sonorilon ĝis sur la platformo; sed la sudlandanoj ne posedis sufiĉajn altecon kaj fortojn kaj uzante pli longajn stangojn, por ke estu spaco por multaj levi, la stangoj rompiĝis, kaj la sonorilo restis sur la tero. Orm kaj liaj kunuloj alvenis la lokon kaj rigardis kaj ridis. Toke diris:

—Por ses plenkreskintoj ĝia levado ne estus malfacila.

—Laŭ mia kredo kvar sufiĉos, diris Orm.

Post tio li kaj Toke kaj Ögmund kaj Rapp la Unuokula aliris la sonorilon kaj metis mallongan stangon tra ĝia anso kaj ĝin levis sur la platformon.

Almansur jam alvenis surĉevale kaj haltis kaj rigardis tion; li alvokis Orm kaj diris:

—Al vi kaj al viaj kunuloj Allah donis grandan forton, estu laŭdata lia nomo! Kaj ŝajnas al mi, ke vi kaj viaj kunuloj estas konvenaj homoj por movi ĉi tiun sonorilon sur ŝipon kaj ĝin transporti al Kordovo; ĉar neniuj aliaj povas ĝin manipuli.

Orm sin klinis antaŭ li kaj diris, ke tiu tasko ne ŝajnas al li malfacila.

Post tio Almansur lasis elekti aron da bonaj sklavoj inter la kap-

titoj; ili trenu la sonorilon ĝis la rivero, kie tiu estas navigebla, kaj remu la ŝipon, kiu estis konkerita de la asturoj kaj tie atendis. Du oficistoj el la kancelario de Almansur estis kunsenditaj por kontroli la vojaĝon.

Ŝnurojn oni nun fiksis al la platformo, kaj kun sonorilo kaj tirantoj Orm kaj liaj kunuloj ekiris; kelkaj sklavoj tiris, aliaj manipulis la rultrabojn. Estis ĝena marŝo, ĉar plejparte la vojo deklivis malsupren, kaj iujn fojojn la sonorilo ekruliĝis sen reguligo, tiel ke en la komenco du tri sklavoj ŝanĝantaj rultrabojn frakasiĝis. Sed Orm fiksigis tirŝnurojn al la malantaŭo de la platformo, tiel ke ili povis bremsi ĉe krutaj lokoj; kaj nun la afero marŝis pli glate, kaj ili alvenis riveron, kie atendis la ŝipo.

Ĝi estis komerca ŝipo, ne granda sed bone konstruita kaj kun ferdeko; ĝi havis dek parojn da remiloj kaj ankaŭ maston kaj velon. Orm kaj liaj kunuloj levis la sonorilon sur la ŝipon kaj ĝin firme fiksis per ŝnuroj kaj blokoj; post tio ili dismetis la sklavojn sur iliajn lokojn ĉe la remiloj kaj ekiris malsupren laŭ la rivero. Tiu fluis okcidenten, norde de tiu rivero, laŭ kiu iam estis remata la ŝipo de Krok ĝis la fortikaĵo de la limgrafo; kaj por la normanoj estis plaĉa la sento, ke ree ili estas mastroj sur ŝipo.

La viroj de Orm interŝanĝe gardis la remistojn kaj ilin trovis obstinaj kaj mallertaj; ili malĝojis vidi, ke neniaj krurkatenoj sin trovis, tiel ke ili dum la tuta nokto devis gardi la remistojn; kaj tamen kelkaj, kiuj estis vipataj per vergoj, sukcesis forkuri. Ĉiuj akordis pri tio, ke same malkapablajn remistojn neniam antaŭe iu vidis, kaj ke tian situacion ili ne povos elteni ĝis Kordovo.

Atinginte la riverbuŝon ili vidis multajn militŝipojn de Almansur, kiuj ne povis navigi sur la rivero; la pli multaj el la soldatoj estis senditaj en la landon por asisti en la prirabo de la asturoj. La kunuloj de Orm ekĝojis pro la vido, kaj Orm tuj sendis la du skri-

bistojn por pruntepreni krurkatenojn ĉe la ŝipestroj, ĝis li ricevis laŭ sia bezono. La sklavoj nun estis alforĝitaj; kaj Orm ĉi tie ankaŭ ricevis provianton por sia vojaĝo, ĉar la distanco ĝis Kordovo estis longa. Post tio li lasis resti la ŝipon apud la militŝipoj en ŝirmata golfo por atendi pli favoran veteron por velado.

En la vespero Orm forlasis la ŝipon kune kun Toke kaj Gunne, kaj lasis al la aliaj ĝin gardi. Ili iris laŭ la strando ĝis kelkaj fiŝistaj budoj, kie komercistoj aranĝis por si ejon kaj aĉetis predon kaj vendis bezonaĵojn al la ŝipanaroj. Kiam ili venis ĝis la proksimo de unu el la budoj, ili vidis ses ŝipanojn ĝin eniri, kaj Gunne subite haltis.

—Jen pasis homoj, kun kiuj ni havas aferon, li diris. Ĉu vi vidis la du antaŭajn?

Nek Orm nek Toke ilin rimarkis.

—Estas tiuj, kiuj mortigis Krok, diris Gunne.

Orm paliĝis kaj tremo lin kaptis.

—Do, ili sufiĉe vivis, li diris.

Ili tiris siajn glavojn. Orm kaj Toke portis la donacojn de la regentedzino Subaida. Toke ĝis nun ne trovis nomon por sia glavo, sambonan kiel Blulango.

—Krok rangas antaŭ Almansur, diris Orm; kaj jen sin proponas venĝo al ni ĉiuj, sed plej multe al mi, kiu estas ĉefulo post li. Kuru ĝis malantaŭ la budo, vi du, tiel ke neniu fuĝu laŭ tiu direkto.

Ambaŭ gablaj flankoj havis pordojn; Orm eniris la plej proksiman kaj trovis interne la ses virojn kaj la komerciston. Tiu lasta ekkaŭris inter kelkaj sakoj, kiam li vidis Orm kun nuda glavo, sed la ses ŝipanoj eltiris siajn armilojn kaj kriis demandojn. La budo estis malvasta kaj malluma, sed Orm tuj vidis unu el tiuj, kiuj mortigis Krok.

—Ĉu vesperpreĝon vi elbuŝis? li diris kaj frapis al li sur la kolon, tiel ke la kapo leviĝis.

Nun du viroj faris hakojn kontraŭ Orm, tiel ke li estis plene okupita; la du aliaj kuris al la malantaŭa pordo, sed tra ĝi eniris Toke kaj Gunne. Toke tuj faligis unu kaj kriante la nomon de Krok li rapide provis frapi duan; nun kreiĝis granda kunpuŝiĝo inter la varoj en la budo. Iu viro saltis sur benkon kaj hakis kontraŭ Orm, sed la glavo entranĉiĝis en plafonan trabon, kaj Orm ĵetis sian ŝildon kontraŭ lian vizaĝon; la ŝildpikilo trafis al li en la okulon kaj li falis kaj senmoviĝis. La lukto post tio estis mallonga. La dua, kiu partoprenis la mortigon de Krok, estis faligita de Gunne; Orm faligis du virojn, kaj Toke tri; sed la komerciston, kiu ne multe videblis en la angulo, kie li sin kaŝis, ili lasis nevundita, ĉar lin ne koncernis tiu afero.

Kiam ili kun sangaj armiloj elpaŝis el la budo, kelkaj viroj venis renkonte al ili por vidi, kio kaŭzas la bruon, sed ĉe la vido ili sin turnis kaj forkuris. Toke etendis sian glavon antaŭ si: sango forfluis viskece laŭ la klingo kaj formis grandajn gutojn ĉe la pinto.

—Nun mi donas al vi nomon, fratino de Blulango, li diris. Ruĝbeko estos via nomo post nun.

Orm rigardis la fugantajn virojn.

—Prefere ankaŭ ni rapidu, li diris, ĉar ni nun estas senprotektaj en ĉi tiu lando. Sed tion la venĝo valoras.

Ili rapidis al la ŝipo kaj rakontis al la aliaj pri tio, kio okazis; la ŝipo tuj debordiĝis malgraŭ tio, ke estis mallume. Ĉiuj ĝojis, ke Krok estas venĝita, kaj ili komprenis, ke nun urĝas la foriro de la lando; ili ĉiuj kunlaboris en la tasko rapidigi la remistojn. Orm mem staris ĉe la stirilo kaj gvatis en la mallumon; la du skribistoj de Almansur, kiuj ne sciis, kio okazis, ripetis demandojn al li, sed malmultajn respondojn ricevis; fine la ŝipo forlasis sukcese la golfon kaj ricevis venton de sude, tiel ke ili povis hisi la velon. Ili sin direktis norden kaj for de la lando ĝis tagiĝo, kaj neniu persekutanta ŝipo estis videbla.

Ili vidis kelkajn insulojn dekstre kaj albordiĝis ĉe unu. Tie ili surterigis la du skribistojn kaj sendis per ili mesaĝon al Almansur.

—De tia mastro ni ne volas fuĝi sensalute, diris Orm. Tial diru al li de ni ĉiuj, ke estis nia fato tia, ke ni devis mortigi ses el liaj viroj, ĉar ni ŝuldis venĝon al Krok, nia ĉefulo; kaj la vivoj de ses ne estas tro multe kompare kun lia. Ni prenas la ŝipon kaj ĝiajn sklavojn, kaj tiun perdon Almansur certe preskaŭ ne rimarkos; kaj ankaŭ la sonorilon ni prenas, ĉar ĝi donas stabilecon al la ŝipo, kaj danĝeraj maroj estas antaŭ ni. Ni ĉiuj pensas, ke li por ni estis bona mastro; kaj se tio ĉi ne intervenus, ni volonte lin pli servus, sed ĉar nun tiel okazis, jen nia sola eblo de li forkuri vivaj.

La skribistoj promesis ĉi tion transdiri vorton post vorto tiel, kiel ĝin Orm eldiris; kaj li aldonis:

—Ankaŭ estus bone, se vi ambaŭ, kiam vi revenos Kordovon, volos transdoni saluton de ni al riĉa judo nomata Salaman, kiu estas poeto kaj arĝentisto, kaj al li eldiri nian dankon, ĉar li estis al ni bona amiko; ĉar certe ni lin neniam plu vidos.

—Kaj diru al la regentedzino Subaida, diris Toke, ke du nordlandanoj, kiujn ŝi konas, sendas al ŝi dankon kaj saluton. Kaj diru al ŝi ankaŭ tion, ke la glavoj, kiujn ŝi donacis al ni, estis por ni tre utilaj, kaj ke neniu defekto estas sur la eĝoj malgraŭ tio, ke ili estis abunde uzataj. Sed tio estu dirata, kiam Almansur ne aŭdas.

La skribistoj uzis siajn skribilojn kaj notis ĉion; kaj post tio ili estis forlasitaj sur la insulo, ricevinte nutraĵon laŭ supoze bezona kvanto, ĝis trovos ilin iu ŝipo aŭ ili mem sukcesos sin transporti ĝis la ĉeflanda tero.

Ĉiuj remistoj baraktis kaj ululis laŭtege, kiam nun la ŝipo sin direktis al la marvasto, kaj estis evidente, ke ankaŭ ili volis resti tie, kie estis forlasitaj la skribistoj.

La ŝipanoj de Orm devis ĉirkaŭpaŝi kun vergoj kaj ŝnurpecoj

por ilin trankviligi kaj remigi, ĉar senvento nun regis, kaj urĝis forlasi ĉi tiujn akvospacojn.

—Bone, ke ili portas krurkatenojn, diris Gunne, ĉar saltus alie ĉiuj en la maron spite niajn glavojn; sed malbone estas, ke ni ne pruntis vipon, kiam ni ricevis katenojn, ĉar ŝajnas, ke malsufiĉe mordas vergoj kaj ŝnurstumpoj tiajn obstinajn homojn.

—Estas rimarkinde, ke vi pravas, diris Toke; ĉar kiam ni mem sidis sur rembenkoj, ni apenaŭ kredis, ke ni laŭdos utila sklavovipon.

—Propra dorso plej doloras, jen vero, diris Gunne, sed nun necesas, ke la dorsoj de ĉi tiuj viroj eĉ pli doloru, por ke estu ebla nia forkuro.

Konsentis Toke pri tio, kaj ili rekomencis la ĉirkaŭiron kaj vergis la remistojn laŭ ebleco por rapidigi la ŝipon. Sed la remado iris malglate, ĉar la remistoj ne sukcesis remadi ritme. Orm tion vidis kaj diris:

—Per nuraj vergobatoj ni ne instruos al ili remadon, kiam ili ne havas rutinon, sed eble helpos la sonorilo en tio.

Li prenis hakilon kaj ekstaris apud la sonorilo kaj ĝin frapis per la hakilkapo en rema ritmo; tiam el la sonorilo venis forta sonoro, kaj la remistoj ekaŭskultis, tiel ke la remado ekiris pli bone. Orm lasis siajn ŝipanojn interŝanĝe frapi la ritmon; ili eltrovis, ke se ili frapas per lignoklabo volvita per ledo, ili elbatas la plej belan sonoron, kaj tio ilin tre plezurigis.

Sed baldaŭ vento denove favoris ilin, kaj remado ne plu necesis; la vento ĉiam pli kreskis kaj fariĝis ŝtormo, tiel ke danĝero leviĝis. Tiam Rikanlupo diris, ke jen tio, kion ili atendu komencinte la vojaĝon sen oferaĵoj al la maruloj. Iuj kontraŭdiris memorigante pri la ofero, kiun ili iam faris, antaŭ ol la ŝipoj de Almansur faris al ili malbonon. Gunne opiniis, ke plej sekure estus oferi al Allah, kaj du

aŭ tri konsentis; sed Toke diris, ke li ne kredas, ke Allah havas grandan potencon sur la maroj. Tiam Orm diris:

—Laŭ mia kredo neniu povas scii precize, kiel potenca estas ĉiu dio kaj kiel li povas utili al ni; kaj eble estus preferinde, ke ni ne neglektu unu pro alia. Kaj certe estas, ke unu jam utilis al ni dum ĉi tiu vojaĝo, kaj tiu estas Sankta Jakobo; ĉar lia sonorilo donas stabilecon al la ŝipo, kaj ĝi ankaŭ donis asiston al la remado. Lin ni tial ne forgesu.

La ŝipanoj trovis tion ĝusta parolo, kaj ili nun oferis viandon kaj trinkaĵon al Ägir, Allah kaj Sankta Jakobo kaj post tio sin sentis pli sekuraj.

Ili nun ne precize sciis sian pozicion, krom ke ili sin trovas je sufiĉe longa distanco for de Asturio. Sed ili sciis, ke sin direktante norden, kien pelas ilin la ŝtormo, kaj ne drivante tro okcidenten, ili fine trovos landon, aŭ Irlandon aŭ Anglolandon aŭ Bretonlandon. Tial ili konservis kuraĝon kaj trairis la ŝtormon kaj videtis la stelojn du tri fojojn kaj kredis, ke ili sin ĝuste direktas.

Ilia plej granda ĉagreno estis la sklavoj; ĉar malgraŭ tio, ke tiuj nun ne bezonis remi, ili fariĝis mizeraj pro teruro kaj marmalsano kaj malseko kaj malvarmo, tiel ke ĉiuj fariĝis verdecaj kaj dentoklakis kaj du aŭ tri mortis. Malmulte da varmaj vestoj estis en la ŝipo, kaj en ĉiu tago fariĝis ĉiam pli malvarme, ĉar estis jam malfrua aŭtuno. Orm kaj liaj ŝipanoj ĉagreniĝis pro la mizerstato de la sklavoj kaj ilin prizorgis laŭ ebleco; kaj kiam ili kapablis manĝi, ili ricevis la plej bonan nutraĵon; ĉar alteriĝintaj, tiuj sklavoj estos valoraj.

La ŝtormo fine trankviliĝis, kaj dum unu tago estis bela vetero kaj bona vento, kaj ili sin direktis nordorienten; kaj la sklavoj vigliĝis en la sunbrilo. Sed vespere la vento tute formortis, kaj nebulo sterniĝis kaj fariĝis ĉiam pli densa. Ĝi estis malvarma kaj malseka, tiel ke ĉiuj malvarmis, sed plej multe la sklavoj; eĉ ne venteto venis, kaj

la ŝipo sin movis nur supren malsupren sur longe etendiĝantaj huloj. Orm diris:

—Nun ni sidas malbone; ĉar se ni restos kaj atendos venton, la sklavoj mortos pro malvarmo; kaj se ni remigos ilin, ili supozeble ankaŭ mortos pro la mizera stato, en kiu ili sin trovas. Kaj multe da vojgvido ni ankaŭ ne havas, dum nek suno nek steloj videblas.

—Al mi ŝajnas preferinde ilin remigi, diris Rapp; ĉar tio donas varmon. Kaj ni stiru laŭ la direkto de la huloj, ĉar la ŝtormo venis de sude; io alia ne gvidos nin, dum daŭros la nebulo.

Ili trovis bona la konsilon de Rapp; kaj la sklavoj devis ekremi malgraŭ tio, ke ili multe plendis kaj havis malmulte da fortoj. Interŝanĝe la ŝipanoj frapis ritmon sur la sonorilon, kaj ŝajnis al ili, ke ĝi nun sonoras eĉ pli bele ol antaŭe, kun longa sonoro post ĉiu frapo, tiel ke ĝi estis al ili bona societo en la nebulo. Iujn fojojn ili permesis al la sklavoj ripozi kaj dormi, sed cetere ili remis dum la tuta nokto kaj stiris laŭ la huloj; kaj ĉiam ankoraŭ la nebulo estis same densa.

Matene Ögmund staris ĉe la stirilo, kaj Rapp frapadis la sonorilon; la ceteraj dormis. Subite ambaŭ ekaŭskultis kaj unu la alian rigardis kaj post tio denove aŭskultis: mallaŭta sonoro venis el malproksime. Ili surpriziĝis kaj vekis la aliajn, kaj ĉiuj aŭskultis. La sonoro aŭdiĝis ĉiam plu, kaj ĝi ŝajnis veni el antaŭe.

—Aŭdiĝas kvazaŭ pli multaj ol ni remus kun sonorilo, diris Toke.

—Ni iru singarde nun, diris Rikanlupo, ĉar tio ĉi povas esti Ran kaj ŝiaj filinoj, kiuj logas marveturantojn per kantoj kaj ludoj.

—Laŭ mi la sono aŭdiĝas kvazaŭ nanoj forĝus, diris Halle, kaj ankaŭ al tio estas danĝere proksimiĝi. Eble ni nin trovas apud insuleto, kie troloj loĝas.

La mallaŭta sonoro el fore daŭris, kaj nun ĉiuj sentis timon kaj atendis, kion diros Orm. Ankaŭ la sklavoj aŭskultis kaj komencis

fervore kvaki; sed ilia lingvo estis nekonata al Orm kaj liaj ŝipanoj. Neniu povas scii, kio estas ĉi tio, diris Orm; sed estus krize, se tiel malmulte nin timigus. Tial ni remu pluen kiel antaŭe kaj gvatu laŭ eblo. Kaj neniam mi aŭdis, ke troloj sin montrus matene.

Ili konsentis pri tio, kaj la remado estis daŭrigata; la fremda sonorado nun fariĝis pli laŭta. Etaj ventopuŝoj venis renkonte al ili, kaj la nebulo komencis sin levi; ekkriis ĉiuj samfoje, ke ili vidas bordon. Ĝi estis ŝtonoriĉa bordo kaj aspektis kiel insulo aŭ terlango; la sonoro klare venis de tie, sed nun ĝi ĉesis. Ili vidis verdajn herbojn kaj kelkajn paŝtiĝantajn kaprojn; post tio ili vidis kelkajn kabanojn, kaj apud ili viroj staris kaj rigardis la ŝipon.

—Ŝajnas al mi, ke tio similas nek trolojn nek filinojn de Ran, diris Orm. Ĉi tie ni surteriĝu por vidi, ĝis kie ni venis.

Ili tiel faris; kaj la viroj sur la insulo ne montris timon vidante armitajn homojn surteriĝi, sed amike venis renkonte kaj ilin salutis. Ili estis ses, ĉiuj maljunaj, kun blankaj barboj kaj longaj brunaj manteloj; kaj kion ili diris, tion neniu povis kompreni.

—Al kiu lando ni venis, diris Orm, kaj kies homoj vi estas?

Unu el la maljunuloj komprenis liajn vortojn kaj vokis al la aliaj: Lochlannach, Lochlannach! kaj respondis al li en lia propra lingvo:

—Vi venis al Irlando, kaj ni estas servantoj de Sankta Finnian.

Kiam Orm kaj liaj ŝipanoj tion aŭdis, ili sentis grandan ĝojon kaj pensis, ke ili preskaŭ estas hejme. Ili nun povis vidi, ke ili trafis malgrandan insulon, kaj trans ĝi ili povis videti la bordon de Irlando. Sur la malgranda insulo sin trovis nur la maljunuloj kaj iliaj kaproj.

La maljunuloj vigle parolis inter si kaj montris surpriziĝon; kiu nordan lingvon komprenis, tiu diris poste al Orm.

—Vi parolas lingvon de nordlanduloj, kaj tiun mi komprenas, ĉar kiam juna mi multe rilatis kun nordlandanoj, antaŭ ol mi venis al ĉi tiu insulo. Sed certa mi estas, ke neniam mi vidis virojn de

Lochlann vestitaj kiel vi kaj viaj ŝipanoj. De kie vi venas? Ĉu vi estas blankaj aŭ nigraj Lochlannach? Kaj kiel estas, ke vi navigadas sonorante? Hodiaŭ estas la tago de Sankta Brandan, kaj ni sonorigis nian sonorilon honorigante kaj memorigante pri li, kaj tiam ni aŭdis vian sonorilon respondi de la maro; kaj ni kredis, ke eble Sankta Brandan mem nin respondas, ĉar li estis granda marveturanto. Sed vi ĉiuj estas baptitaj en la nomo de Jesuo Kristo, ĉu ne, ĉar vi navigadas kun sankta sono?

—Li scias babili, la maljunulo, diris Toke; kaj jen, Orm, estas por vi multo, kion respondi.

Orm respondis al la maljunulo:

—Ni estas nigraj Lochlannach, viroj de la regno de reĝo Harald; sed ĉu reĝo Harald ankoraŭ vivas mi ne scias, ĉar jam longe ni estas for de hejme. Sed niaj manteloj kaj vestoj estas hispanaj, ĉar ni venas de Andaluzio, kie ni servis gravan sinjoron nomatan Almansur. Kaj nia snorilo nomiĝas Jakobo, kaj ĝi venas de preĝejo en Asturio, kie sin trovas la tombo de la apostolo Jakobo, kaj ĝi estis la plej granda el ĉiuj sonoriloj tie, sed rakonti pri tio, kial ĝi estas en nia ŝipo, estus nun tro daŭra afero. Pri Kristo ni havas konon; sed tie, de kie ni venas, oni ne tre honoras lin, kaj baptitoj ni ne estas. Sed ĉar vi mem ja estas kristanoj, eble estos plezure por vi aŭdi, ke ĉe niaj remiloj sidas kristanoj. Ili estas niaj sklavoj kaj venas de tiu sama loko kiel la sonorilo, kaj nun ili estas eluzitaj pro la vojaĝo kaj ne taŭgas multon. Tial estus bone ilin surterigi ĉi tie, tiel ke ili ripozu, antaŭ ol ni daŭrigos nian vojaĝon. Kaj antaŭ ni vi ne havu timon; ĉar vi aspektas kiel bonuloj, kaj ni ne estas perfortuloj kontraŭ tiuj, kiuj ne nin kontraŭstaras. Iuj el viaj kaproj ja konsumiĝos, sed jen la plej grava, kion vi devos elteni pro ni; ni ne intencas longe resti.

Kiam la maljunuloj ĉion tion jam komprenis, ili kapjesis kaj amike ridetis, kaj ilia proparolanto diris, ke ne malofte ili loĝigis

marveturantojn sur sia insulo, kaj ke ordinare neniu faris kontraŭ ili malbonon.

—Ĉar ni mem kontraŭ neniu faras maljuston, li diris, kaj neniun alian propraĵon ni havas krom la kaproj kaj nia rapokampo kaj niaj kabanoj; krom tio la tuta insulo apartenas al Sankta Finnian, kaj li estas potenca ĉe Dio kaj tenas sian manon super ni. Kaj niajn kaprojn li abunde benis en ĉi tiu jaro, ke nutraĵo ne manku. Tial volu preni la malmulton, kiun ni povas doni; kaj ĝojas ni maljunuloj, kiuj plej ofte sidas solaj tie ĉi, aŭskulti homojn vaste vojaĝintajn.

La sklavoj estis nun surterigitaj, kaj same la ŝipo; kaj Orm kaj liaj ŝipanoj nun ripozadis sur la insulo de Sankta Finnian kaj bone akordis kun la monaĥoj. Ili kun tiuj fiŝkaptis kun sukceso kaj nutris la sklavojn, ĝis aspektis tiuj malpli mizeraj; kaj Orm kaj la aliaj devis multon rakonti pri siaj aventuroj al la monaĥoj, ĉar malgraŭ granda ĝeno pro la neceso de interpretado, la maljunuloj scivolemis pri novaĵoj el foraj landoj. Sed plej multe ili admiris la sonorilon, kiu estus pli granda ol iu, kiu havis famon sur Irlando. Ili diris, ke estis potenca miraklo, ke Sankta Jakobo kaj Sankta Finnian per siaj sonoriloj vokis unu al la alia el fore; kaj kelkfoje ili ĉe siaj diservoj anstataŭ propra sonorilo sonorigis Jakobon kaj ĝojis, kiam ĝia granda sonoro disvastiĝis super la maro.

OKA ĈAPITRO

## Pri la restado de Orm ĉe la monaĥoj de sankta Finnian kaj pri tio, kiel miraklo okazis en Jellinge.

Dum ili estis ĉe la monaĥoj de Sankta Finnian, Orm kaj liaj ŝipanoj multe interkonsiliĝis pri tio, kiel ili aranĝu aferojn por si, kiam la sklavoj fortiĝos por plua vojaĝo. Ĉiuj volis hejmen, kaj Orm kaj la aliaj; kaj granda danĝero de piratoj ne ekzistis en tiu sezono, kiam malmultaj ŝipoj estis sur la maro. Sed la vojaĝo estos severa en la vintra vetero, tiel ke eble velkos la sklavoj, kaj tial povus esti avantaĝe fari provon ilin vendi laŭeble plej frue. Por tio ili povus aŭ iri al Limerick, kie estis bone konata la patro de Orm, aŭ iri al Cork, kie Olof kun la Gemoj de longe havas la plej grandan sklavkomercon. Ili informiĝis de la monaĥoj, kiu alternativo estus preferinda.

Kiam komprenis la monaĥoj iliajn demandojn, tiuj parolis inter si kaj ridetis; post tio ilia parolanto diris:

—Oni povas rimarki, ke vi venas de fore kaj ne multe scias pri tio, kiel statas en Irlando nun. Nek en Limerick nek en Cork estos al vi facile negocadi. La potencon en Irlando tenas nun Brian Borhumha; kaj malgraŭ tio, ke vi estas deforaj fremduloj, vi eble aŭdis pri li.

Orm diris, ke li ofte aŭdis sian patron paroli pri iu reĝo Brian, kiu batalis kontraŭ la vikingoj en Limerick.

—Li ne plu batalas kontraŭ ili, diris la monaĥo. Komence li estis ĉefulo de la dalkasoj; tiam la vikingoj en Limerick militis kontraŭ li. Poste li fariĝis reĝo en Thomond; tiam li militis kontraŭ la vikingoj en Limerick. Sed post tio li fariĝis reĝo de tuta Munster; tiam li sturmis Limerick kaj mortigis la plimulton de la vikingoj tie, kaj la restantaj fuĝis. Kaj nun li estas plej granda heroo en Irlando, reĝo de Munster, mastro super Leinster, impostpostula moŝto super ĉiuj fremduloj, kiuj ankoraŭ sidas en siaj urboj ĉe la bordoj; kaj kontraŭ Malachi, ĉefreĝo de Irlando, li nun militas por gajni ties edzinon kaj ties potencon. Olof kun la Gemoj pagas al li imposton kaj devas sendi al li batalulojn por lia militiro kontraŭ Malachi; kaj eĉ Sigtrygg Silkbarbulo de Dublino, kiu estas la plej potenca fremdulo en Irlando, du fojojn pagis al li imposton.

—Tiuj estas gravaj novaĵoj, diris Orm; kaj tiu reĝo Brian ŝajnas potenca mastro, eĉ se povas esti, ke ni vidis pli potencan. Sed eĉ se ĉio tio, kion vi diris, estas vero, kial ni ne povus vendi niajn sklavojn al li?

—Reĝo Brian neniujn sklavojn aĉetas, diris la monaĥo, sed mem prenas tiom, kiom li bezonas kaj de najbaroj kaj de la viroj de Lochlann. Krom tio ĉiuj scias, ke tri aferojn li amas pli ol ĉio, kaj tri aferojn li malamas, kaj tiuj lastaj malfavoras vin. La tri, kiujn li amas, estas jenaj: la plej granda potenco, kaj ĝin li jam posedas; la plej multa oro, kaj ankaŭ ĝi apartenas al li; la plej bela virino, kaj tuta mondo scias, ke ŝi estas Gormlaith, fratino de Maelmora, reĝo de Leinster, kaj ŝin li ankoraŭ ne akiris. Unue ŝi estis edzino de reĝo Olof Kvaran de Dublino, sed tiu ŝin forpuŝis pro ŝia akra lango; nun ŝi estas edzino de Malachi, la ĉefreĝo, kaj tiu nun kareskveradas en ŝia kamero kaj apenaŭ plu havas fortojn eliri batali; kaj kiam Brian venkos Malachi, li akiros Gormlaith; ĉar kion li taskas al si, tion li faras. Sed tiuj tri, kiujn li malamas, estas jenaj: nekristanoj; viroj de

Lochlann; bardoj, kiuj aliajn reĝojn laŭdas. Lia malamo estas tiel forta kiel lia amo, kaj nenio povas lin moderigi en tiuj aferoj; kaj ĉar vi estas kaj nekristanoj kaj viroj de Lochlann, ni ne volas al vi konsili, ke vi proksimiĝu al li, ĉar vian pereon ni ne deziras.

La viroj ĉi tion atente aŭskultis kaj formis la opinion, ke fari komercon kun reĝo Brian ne multe valoras. Orm diris:

—Ŝajnas al mi, ke la sonorilo Jakobo nin gvidis ĝustavoje, kiam ĝi nin gvidis al ĉi tiu insulo kaj ne al la regno de reĝo Brian.

—Ankaŭ la sonorilo de Sankta Finnian kunhelpis, diris la monaĥo; kaj kiam vi nun vidis, kion kapablas fari la sanktuloj, eĉ por nekristanaj homoj, ĉu do ne estus prudente, ke vi ekkredus al Dio kaj fariĝus kristanoj?

Orm diris, ke li ĝis nun ne multe pensis pri la afero kaj ĝi ne ŝajnas al li urĝa.

—Eble ĝi estas pli urĝa ol vi kredas, diris la monaĥo; ĉar nun restas nur dek unu jaroj ĝis pereos la mondo kaj Kristo venos sur nubo kaj juĝos ĉiujn homojn. Antaŭ tiam ĉiuj paganoj devas esti baptitaj, kaj veni inter la lastaj ne estus prudente. La nekristanoj nun aliĝas al Dio pli multnombre ol antaŭe, tiel ke baldaŭ ne multaj restos en mallumo; kaj vere la alveno de Kristo nun estas proksima, kiam la plej pagana el paganoj, reĝo Harald de Danlando, baptiĝis. Tial ankaŭ vi devus nun forlasi viajn falsajn diojn kaj alpreni la veran kredon.

Ĉiuj viroj rigardis al li kun surprizo, kaj kelkaj laŭte ekridis kaj frapis la manojn sur la genuojn.

—Kial vi ne eĉ diras, ke li fariĝis monaĥo kiel vi, diris Toke, kaj razis al si la harojn.

—Ni vojaĝis vaste en la mondo, diris Orm, kaj vi ĉi tie sidas kun viaj fratoj sur soleca insulo; kaj tamen vi povas rakonti la plej bruajn novaĵojn. Sed ne malmulte vi volas kredigi al ni, kiam vi diras,

ke fariĝis reĝo Harald kristano; kaj al mi ŝajnas pli kredeble, ke iu marvojaĝanto tion kredigis al vi por amuziĝi pri via trompiĝemo.

Sed la monaĥo persistis en tio, ke li diris veron kaj ne maristfabelon. Ĉar ĉi tiu granda novaĵo venis al ili de ilia propra episkopo mem, kiam tiu ilin antaŭ du jaroj vizitis; kaj dum sep dimanĉoj ili diris dankojn al Dio pro tiel granda gajno por ĉiuj kristanoj plagataj de normanoj.

Post ĉi tiu konfirmo la ŝipanoj kredis, kion diris la monaĥo, sed tamen trovis malfacile kompreni tiel rimarkindan novaĵon.

—Li ja mem devenas de Odin, ili diris kaj rigardis unu la aliajn; kiel do li povas rifuĝi al alia?

—Kaj dum sia tuta vivo li havis bonŝancon, ili diris, kaj ĝi estis donata al li de la dioj; kaj kontraŭ la kristanoj liaj ŝiparoj sin direktis kaj revenis riĉaj. Kial li havas koncernon pri la dio de la kristanoj?

Ili skuis siajn kapojn kaj sidis surprizitaj.

—Li estas maljuna, diris Rikanlupo; kaj povas ja esti, ke li infaniĝis denove, kiel reĝo Ane en Upsalo en la pasinteco. Ĉar reĝoj trinkas pli fortan bieron ol aliaj viroj kaj havas multajn virinojn; kaj tiaj aferoj povas kun la tempo ilin elĉerpi, tiel ke ilia prudento mallumiĝas kaj ili ne plu scias, kion ili faras. Kaj ĉar ili estas reĝoj, ili tamen faras, kiel ili mem volas, ankaŭ post kiam forlasis ilin la saĝo; kaj devas esti en tia maniero reĝo Harald kaptiĝis en la doktrino de la kristanoj.

La ŝipanoj kapjesis kaj komencis rakonti anekdotojn pri maljunuloj en la hejmregiono, kiuj en sia maljuna aĝo fariĝis strangaj kaj kaŭzis al siaj parencoj ĝenojn per kurbaj kapricoj; kaj ĉiuj pensis, ke ne estas granda gajno vivi, ĝis elfalos la dentoj kaj velkos la prudento. La monaĥo tiam diris, ke al ili pli terure okazos, ĉar en la tago de la juĝo post dek unu jaroj ili estos subite prenitaj for de la tero.

Sed la ŝipanoj respondis, ke tio povos esti konvena jaro por ili kaj ke ili ne faros al si la ĝenon aliĝi al Kristo pro tio.

Orm nun devis multon priatenti; ĉar necesis veni al decido, kiel nun ili faru, ĉar ili ne kuraĝos iri al la irlanda foiro. Fine li diris al siaj ŝipanoj:

—Agrablas esti ĉefulo, kiam predo estas dividata kaj biero disdonata, sed malfacilas, kiam planoj estas elkovotaj; kaj kion mi nun povas elpensi, ne estas rimarkinda. Sed ni devas forveli nun; ĉar la sklavoj estas nun tiel fortaj, kiel ebligas la nutraĵo kaj ripozo, kaj ju pli ni prokrastas, des pli severa estos nia velado. Plej bone ŝajnas al mi, ke ni iru al reĝo Harald; ĉe li troviĝas riĉuloj, kiuj eble je bona prezo aĉetos la sklavojn, kaj ĉar li nun mem estas kristano, ŝajnas al mi, ke ni havas taŭgan donacon por li, tiel ke ni tuj povos altiri lian favoron. Mi volas nun fariĝi lia gvardiano prefere ol sidi plej juna en la bieno de mia patro, se tiu maljunulo kaj Odd, mia frato, ankoraŭ vivas; kaj por vi, se vi havas aferojn hejme, estos facile pluiri al Blekingio, post kiam ni faris nian komercon kaj dividis nian gajnon. Sed plej malfacile estos por ni konservi la sklavojn, ke ili ne mortu, kiam ni atingos la malvarmon.

Post tio li diris al la monaĥoj, ke li nun volas fari komercon kun ili. Ili donu al li ĉiujn kaprofelojn, kiujn ili havas, kaj ĉiujn vestojn, kiujn ili povas malhavi; kaj kontraŭ tio li volas doni al ili la du plej mizerajn sklavojn, ĉar alie tiuj mortos dumvojaĝe, sed povos utili al la monaĥoj, se ili saniĝos; kaj krom tio ankaŭ kelkajn andaluzajn arĝentmonerojn. La monaĥoj ridetis kaj diris, ke tio estas pli bona negoco, ol ejroj kutime faris kun Lochlannach, sed ke ili preferus akcepti la sonorilon Jakobon. Orm respondis, ke la sonorilon li ne povas malhavi; kaj la komerco okazis, kiel li diris, tiel ke la sklavoj estis iom vestitaj por la vintro.

Ili nun fumaĵis fiŝojn kaj kaprokarnon por provianto de vojaĝo

kaj ricevis rapojn de la monaĥoj. La monaĥoj ilin asistis en ĉio kaj estis ĉiam amikaj kaj ne plendis pri tio, ke ilia grego da kaproj malmultiĝis dum la vizito; ilia sola malĝojo estis, ke restos la sankta sonorilo en la manoj de paganoj, kaj ke Orm kaj liaj ŝipanoj ne komprenas, kio estas pli bona por ili, kaj ne kristaniĝos. Ĉe la adiaŭo ili ankoraŭ unu lastan fojon parolis pri Kristo kaj Sankta Finnian kaj la tago de la juĝo, kaj pri ĉio, kio okazos al la forirontoj, se ili malakceptos la veran instruon. Orm respondis al ili, ke nun restas al li malmulte da tempo por aŭskulti tiajn aferojn; sed post tio li aldonis, ke li estus malbona ĉefulo, se li ĉe la foriro sin montrus avara kontraŭ tiaj gastigantoj, kiaj ili estis por li kaj liaj ŝipanoj. Per tiuj vortoj li el sia zono prenis tri ormonerojn kaj donis tiujn al ili.

Kiam Toke tion vidis, li priridis tiun malavaron, sed post tio diris, ke al li eblas malavari tiom, kiom Orm; ĉar en konvena tempo li intencas sin edzigi al iu el la plej bonstataj bienoj en Lister kaj fariĝi grandulo en la regiono. Per tiuj vortoj ankaŭ li donis tri ormonerojn al la monaĥoj, kaj tiuj staris surprizaj pro tia donacemo. La aliaj ŝipanoj ŝajnis malmulte apreci ĉion tion; sed por sia reputacio ankaŭ ili ion donis, ĉiuj krom Rikanlupo. Tiu nun estis mokata de ĉiuj pro sia avareco; sed li rikanis per sia oblikva buŝo kaj gratis al si la vangobarbon kaj havis pacon kun si.

—Mi ne estas ĉefulo, li diris, kaj krom tio mi maljuniĝas; kaj neniu knabino kun bieno sin edzinigos al mi, kaj maljunulino ankaŭ ne. Tial mi kun pravo estas avara.

Post kiam surŝipiĝis la sklavoj kaj estis alligitaj, Orm ekvelis for de la insulo de Sankta Finnian kaj sin direktis sude de Irlando kaj ricevis fortan venton kaj bonan vojaĝon. Ĉiuj suferis pro la aŭtunmalvarmo malgraŭ tio, ke ili sin volvis en la kaprofeloj; ĉar jam tiel longe Orm kaj liaj ŝipanoj restadis en la sudo, ke malvarma vetero pli ol antaŭe tranĉis al ili la haŭton. Sed tamen ĉiuj montris bon-

humoron, kiam la hejmlando tiel alproksimis, kaj timis nur marvojaĝajn samlandanojn, kiajn ili ĉiam rigardoserĉis. Ĉar la monaĥoj diris, ke danaj vikingoj nun pli nombre ol iam antaŭe ariĝis ĉirkaŭ la bordoj de Anglolando, post kiam la potenco de reĝo Brian forbaris al ili Irlandon, kaj, anstataŭ ĝi, Anglolando famiĝis kiel lando plej facile prirabebla. El timo, ke samlandanoj ilin ĉasos, Orm tenis la ŝipon vaste for de la bordo, kiam ili sin direktis tra la angla markolo. Bonŝanco ilin favoris, kaj ili neniujn renkontis; ili atingis la plenan maron kaj sentis la ondoŝaŭmon ĉiam pli malvarmiĝi kaj velis, ĝis ili vidis la bordon de Jutlando. Tiam ili ĉiuj ridis pro ĝojo, ĉar estis agrable denove vidi landon apartenan al la dana regno; kaj ili fingromontris al rekoneblaj distingaĵoj, kiujn ili vidis velante kun Krok antaŭ longe.

Ili pasis Skagen kaj sin direktis suden kaj atingis senventon malantaŭ bordo; kaj nun la sklavoj devis denove remi, kiom ili kapablis, dum kantis ritmon la sonorilo Jakobo. Ili ĉi tie parolis kun viroj en fiŝkaptaj boatoj, kiujn ili renkontis, kaj eksciis, kiom da distanco restas al ili ĝis ili atingos Jellinge, kie sidas reĝo Harald; kaj nun ili poluris siajn armilojn kaj atentis pri siaj vestoj por povi kiel homoj de certa reputacio paŝi antaŭ la reĝon.

En frua mateno ili remante atingis Jellinge kaj albordiĝis ĉe ponto; ili povis vidi la reĝan loĝejon, kiu situis iom distance de la bordo, ĉirkaŭitan de remparo el tero kaj palisaro. Kelkaj kabanoj situis apud la pontoj, kaj homoj eliris el ili kaj prigapis Orm kaj liajn ŝipanojn, kiuj aperis kvazaŭ fremduloj. Ili nun portis la sonorilon sur la teron, kun la platformo kaj la ruliloj, kiujn ili uzis en Asturio; pluraj scivoluloj de la pli proksimaj kabanoj ariĝis por rigardi tian mirandaĵon kaj aŭdi, de kie venas tiuj fremduloj; al Orm kaj liaj ŝipanoj estis mirinde denove aŭdi, post tiel longe inter fremdu-

loj, ke ĉiuj parolas ilian propran lingvon. Ili malkatenis la sklavojn kaj jungis ilin al la sonorilo, ke ili ĝin trenu al la reĝo.

Aŭdiĝis nun kriado kaj bruo de la reĝoloĝejo, kaj ili vidis grasan viron en longa robo veni kurante al ili laŭ la deklivo. Li estis razita kaj portis arĝentokrucon sur la brusto kaj teruron en sia vizaĝo; kun peza spirado li atingis la kabanojn kaj disetendis la brakojn.

—Hirudojn! Hirudojn! li kriis. Ĉu neniu kompatema homo troviĝas havanta hirudojn. Mi bezonas sangosuĉajn hirudojn tuj, sanajn kaj fortajn!

Oni povis aŭdi, ke li estas eksterlandano, sed lia lango kuris rapide en dana lingvo malgraŭ tio, ke li ĉasis la spiron.

—Malsano frapis niajn hirudojn tie supre, li diris, tiel ke ili ne plu mordas. Kaj sole nur hirudoj efikas kontraŭ lia dentdoloro. En la nomo de la Patro, Filo kaj Sankta Spirito, ĉu neniu homo sin trovas, kiu havas hirudojn?

Neniu en la kabanoj havis hirudojn hejme, kaj la grasa pastro ĝemis kaj aspektis senhelpa. Li jam atingis la ponton, kie estis la ŝipo de Orm, kaj nun li ekvidis la sonorilon kaj la virojn ĉirkaŭ ĝi. Surprizite li gapis kaj sin rapide proksimigis.

—Kio estas tio? li kriis. Sonorilo, sankta sonorilo! Ĉu mi sonĝas? Ĉu estas trompaĵo de Satano aŭ vera sonorilo? Kiel ĝi alvenis ĉi tien, al lando de mallumo kaj diabloj? Neniam dum mia vivo mi vidis tiel grandan sonorilon, eĉ ne en la preĝejo de la imperiestro mem en Worms.

—Ĝi nomiĝas Jakobo laŭ apostolo, diris Orm; kaj ni ĝin portis ĉi tien de la preĝejo de la apostolo en Asturio. Ni aŭdis, ke reĝo Harald kristaniĝis kaj pensis, ke tia donaco lin ĝojigos.

—Miraklo, miraklo! kriis la pastro singultante kaj levis la brakojn kontraŭ la ĉielo. La anĝeloj de Dio nin vidis en nia krizo, kiam

malsaniĝis niaj hirudoj. Jen kuraco pli bona ol hirudoj. Sed nun rapidu, rapidu! Malfrui estas danĝere, ĉar turmentas lia doloro.

La sklavoj nun trenis la sonorilon ĝis la reĝoloĝejo, kaj la pastro instigis la ŝipanojn ilin peli per ĉia potenco. Li konstante babiladis, kvazaŭ li estus perdinta prudenton, kaj viŝis al si la okulojn kaj turnis la vizaĝon kontraŭ la ĉielon kaj alvokadis pastrolingve. Orm kaj la aliaj komprenis, ke havas la reĝo dentdoloron, sed neniel ili povis kompreni, je kia utilo povus servi ilia sonorilo en tiu afero. Sed la pastro babilaĉis pro feliĉo kaj ilin nomis senditoj de la ĉielo kaj diris, ke nun ĉio marŝos bele.

—Nur malmultaj dentoj restas en lia buŝo, laŭdata estu la Ĉiopova, li diris; sed kiuj restas, tiuj al ni kaŭzas tiom da ĝenoj, kiom ĉiuj aliaj satanaĵoj en ĉi tiu lando. Ĉar malgraŭ lia aĝo ili ankoraŭ ofte doloras, krom la du bluaj; kaj kiam atakas la doloro, proksimiĝi al li estas danĝere, kaj li blasfemas sen mezuro. Unu fojon en la pasinta somero, dum doloris al li vangodento, li preskaŭ faris fraton Willibald martiro; ĉar tiam li batis al frato Willibald sur la kapon nian grandan krucifikson, kiu helpus moderigi la doloron. Denove estas sana frato Willibald, estu laŭdata la Sinjoro, sed li devis kuŝi turmentiĝante kun severa kapturniĝado. Ni donis al Dio niajn vivojn, frato Willibald kaj mi, kiam ni akompanis episkopon Poppo ĝis ĉi tie en la lando de mallumo kunportante la evangelion kaj nian arton de kuraco; sed tamen ŝajnas malicaĵo esti minacata per martireco pro kelkaj malnovaj dentoj. Kaj eĉ ne nun denton ni rajtas eltiri; tion li malpermesis al ni je perdo de vivo; ĉar li diras, ke li ne volas simili al certa maljuna reĝo ĉe la sveoj, kiu dum sia maljuneco suĉis lakton el korno. En tiaj malfacileco kaj premiteco ni vivas ĉe ĉi tiu reĝo por fari favoron al la regno de Dio: frato Willibald, kiu estas la plej lerta kuracisto en la tuta arĥidiocezo Bremeno, kaj mi, kiu estas kaj kantoro kaj kuracisto kaj min nomas frato Matthias.

Li spiris profunde kaj viŝis al si la ŝviton de la vizaĝo kaj kriis al la sklavoj, ke ili rapidu. Post tio li daŭrigis:

—Plej malfacile por ni kuracistoj en ĉi tiu lando estas, ke ni por nia laboro ne havas relikvojn; eĉ ne unu solan el la dentoj de Sankta Lazaro, kiuj plenfidinde efikas kontraŭ dentdoloro, kaj el kiuj estas abundo multloke en kristanaj landoj. Ĉar ni, kiuj iras al paganoj, ne rajtas kunporti relikvojn, ĉar ili povus fali en la manojn de paganoj kaj profaniĝi. Ni devas fidi niajn preĝojn kaj la krucon kaj la profanajn kuracilojn, sed iufoje tiuj ne sufiĉas. Tial neniu povas kuraci per mirinda kuraco ĉi tie inter la danoj, antaŭ ol estos alireblaj en ĉi tiu lando relikvoj, kaj tion ni devas ankoraŭ longe atendi. Ĉar ja vere jam tri episkopojn kaj multajn ordinarajn predikantojn mortigis la popolo ĉi tie, kaj kelkaj kadavroj de tiuj martiroj estis savitaj kaj estis kristane enterigitaj, tiel ke ni scias ilian lokon; sed la Sankta Eklezio decidis, ke neniuj ostoj de episkopoj kaj martiroj estu elterigitaj por utiligo en kuracado antaŭ ol je tridek ses jaroj post ilia morto; kaj ĝis tiam estos mizere por ni kuracistoj ĉi tie.

Li skuis la kapon kaj malgaje murmuris al si mem; sed post tio li denove montris kontenton:

—Sed post nun, kiam Dio faris ĉi tiun grandan miraklon, estos pli bone por frato Willibald kaj mi. Estas vero, ke mi neniam vidis la erudiciulojn en siaj skribaĵoj aparte mencii Sanktan Jakobon kiel potenculon kontraŭ dentdoloro; sed en lia propra sonorilo, nove veninta de lia sankta tombo, devas tamen loĝi granda forto kontraŭ ĉio malbona, ankaŭ kontraŭ doloraj dentoj. Kaj tial vi, ĉefulo, kun certeco estas sendito de Dio al frato Willibald kaj mi kaj al ĉiu kristana agado en ĉi tiu lando.

—Saĝa majstro, diris Orm, kiel vi kuracas dentdoloron per sonorilo? Mi kaj miaj ŝipanoj vizitis forajn landojn kaj vidis multajn rimarkindajn aferojn, sed ĉi tio ŝajnas al mi plej rimarkinda el ĉio.

—Ekzistas du diversaj manieroj, kiujn konas ni instruituloj, respondis frato Matthias, kaj ambaŭ estas bonaj. Sed laŭ mia penso — kaj frato Willibald certe konsentos en tio — la malnova preskribo de Sankta Gregorio estas la pli bona. Kaj ĝin vi baldaŭ vidos.

Ili nun atingis la remparon kaj la palisaron, kaj la granda ekstera pordo estis malfermita antaŭ ili de maljuna pordogardisto, dum alia blovis en korno kiel signo de tio, ke fremduloj alvenas. Frato Matthias nun metis sin ĉe la pinto de la procesio kaj ekkantis per forta voĉo sanktan kanton: Vexilla regis prodeunt; post li iris Orm kaj Toke, kaj post ili venis sklavoj kun la sonorilo, pelataj de la ceteraj ŝipanoj.

Interne de la palisaro estis multaj domoj ĉiuj apartenantaj al la mastrumo de la reĝo. Ĉar reĝo Harald vivis en pli grandaj potenco kaj riĉeco ol liaj patroj; li konstruigis pli larĝa kaj pompa la grandan festenhalon de reĝo Gorm, kaj al siaj gvardio kaj domanaro li konstruigis grandajn longdomojn. Liajn kuirdomon kaj lavdomon prikantis bardoj, kiam ili estis ĵus konstruitaj, kaj sciantaj viroj opiniis ilin pli grandaj ol tiujn de la reĝo en Upsalo. Frato Matthias gvidis ilin al la dormodomo de la reĝo mem, kie reĝo Harald nun, en la tagoj de sia maljunaĝo, sin tenadis kun siaj virinoj kaj trezorkestoj.

Ĝi estis alta lignodomo kun vastaj spacoj; sed ordinare ĝi ne plu estis tiom homfarĉita kiel antaŭe. Ĉar post oftaj admonoj de episkopo Poppo, ke reĝo Harald en ĉio penu vivi kristanan vivon, tiu forpuŝis la pli multajn el siaj virinoj kaj retenis nur iujn el la pli junaj; tiaj el la pli maljunaj, kiuj naskis al li infanojn, nun loĝis en aliaj domoj. Sed en ĉi tiu mateno estis vivoplene ĉirkaŭ la domo, kaj multaj homoj ĉirkaŭkuris tie en timo kaj urĝo, kaj viroj kaj virinoj. Multaj haltis kaj vidis la venantojn kaj demandis, kio tio povas esti; sed frato Matthias interrompis sian kantadon kaj fervore preterkuris ĉiujn en la kameron de la reĝo, kaj Orm kaj Toke lin sekvis.

—Frato Willibald, frato Willibald, li vokis, ankoraŭ troviĝas balzamo en Gilead! Reĝa moŝto, ĝoju kaj laŭdu Dion, ĉar miraklo okazis por vi, kaj baldaŭ via doloro estos elpelata. Mi estas kiel Saul, filo de Kiŝ; ĉar mi eliris serĉi hirudojn kaj trovis sanktan objekton.

Kaj dum nun la ŝipanoj de Orm kun granda malfacilo portis la sonorilon en la kameron, komencis frato Matthias rakonti, kiel statas ĉio.

Salutante reĝon Harald, Orm kaj liaj ŝipanoj montris grandan respekton, kaj ili ĉiuj lin rigardis kun scivolemo; ĉar dum tiom da tempo, kiom ili memoris, ili aŭdis rakontojn pri li, kaj estis mirinde por ili nun lin vidi turmentata kaj mizera.

Lia lito staris ĉe la mallonga muro renkonte al la pordo. Ĝi estis firme ĉarpentita kaj alta kaj plena de kusenegoj kaj feloj; ĝia spaco estis tia, ke tri aŭ kvar povus kuŝi sen puŝado. Reĝo Harald sidis sur ĝia rando kun kusenegoj ĉirkaŭ si; surkape li portis trikitan flavan lanoĉapon, kaj li estis volvita en longa peltaĵo el lutrofeloj. Sur la planko apud liaj piedoj kaŭris du junaj virinoj, ĉiu kun lia piedo sur la sino, frotante ilin por ilin teni varmaj.

Ĉiu povis vidi, ke reĝo Harald estas granda reĝo, malgraŭ tio, ke lin ne ĉirkaŭas reĝa pompo kaj malgraŭ tio, ke timo estis en liaj okuloj. Kun melankolia espero sed sen granda intereso li ĉirkaŭrigardis per grandaj rondaj okuloj al la homoj en la kamero kaj al la sonorilo, kiu estis enportata, kaj li spiris per mallongaj anheloj, kvazaŭ li estus perdinta la spiron; ĉar nun la doloro momente kvietiĝis, kaj li atendis, ke ĝi denove faros atakon. Li estis granda laŭ kresko kaj fortika, larĝbrusta kaj dikventra; la vizaĝo estis granda kaj ruĝa kun rebrileca haŭto sen sulkoj. Liaj haroj estis blankaj; sed la barbo, kiu estis larĝa kaj densa kaj dispinte pendis antaŭ la brusto, estis blankeflava; kaj meze antaŭe mallarĝa strio malsupren de la suba lipo sin tenis klare flava sen blanko. Malseke estis ĉirkaŭ la buŝo pro ĉio,

kion li enbuŝigis kontraŭ la doloro, tiel ke ambaŭ bluaj okuldentoj, kiuj estis famaj ne nur pro sia koloro sed ankaŭ pro longeco, elbriletis pli ol kutime same kiel la fosdentoj de maljuna virporko. Liaj okuloj elstaris kaj estis sangostriaj; potenco kaj danĝero ŝajnis loĝi en ili, same kiel ankaŭ en liaj larĝa frunto kaj grandaj grizaj brovoj.

Tia sin montris reĝo Harald la Bludenta, kiam Orm kaj liaj ŝipanoj lin unuafoje vidis; kaj Toke diris, ke laŭ lia penso nur malmultaj maljunaj reĝoj kun dentdoloro sin montrus same reĝaj kiel li.

Episkopo Poppo ne estis en la ĉambro, ĉar dum la tuta nokto li maldormis apud la reĝo kaj eldiris preĝojn por li kaj aŭskultis blasfemojn kaj minacajn vortojn, kiam estis akuta la doloro, tiel ke li fine devis foriri por ripozi. Sed frato Willibald, kiu dum la tuta nokto kun frato Matthias provis diversajn kuracilojn, estis ankoraŭ moviĝema kaj optimisma. Li estis ĝis malgrando sekiĝinta viro, tute kalva, kun granda nazo kaj kunpremitaj lipoj; sur lia verto estis ruĝa cikatro. Li insiste kapklinadis aŭskultante la rakonton de frato Matthias kaj levis supren la brakojn, kiam estis enportata la sonorilo.

—Jen vere miraklo, li diris per voĉo akra kaj fervora. Same kiel la korvoj de la ĉielo venis nutri la solan profeton Elia en la dezerto, tiel same venis ĉi tiuj vojaĝantoj kun sankta forto por nia helpo. Uzante profanajn rimedojn ni sukcesis forpeli ĉi tiun doloron nur por mallonga tempo; ĉar tuj kiam nia moŝto la reĝo pro senpacienco malfermis sian buŝon, revenis la doloro: tiel estis dum la tuta nokto. Sed certa estas nun la kuraco. Nun vi, frato Matthias, lavu la sonorilon per la konsekrita akvo; kaj ŝajnas al mi prefere, ke estu metita la sonorilo sur sia flanko, kaj ke vi ĝin lavu interne, ĉar ekstere mi vidas neniom el la polvo, kion ni bezonas. Dume mi miksos la aliajn ingrediencojn.

Estis nun la sonorilo renversita, kaj frato Matthias ĝin lavis per ĉifono, kiun li trempis en konsekrita akvo kaj post la lavado tordis

super pelvo. Sin trovis abunde da malnova polvo en la sonorilo, tiel ke fariĝis la eltordita akvo nigra, kaj pri tio frato Matthias tre ĝojis. Dume frato Willibald komencis sin okupi per siaj kuraciloj, kiujn li tenadis en granda leda kesto, kaj samtempe li instrue parolis al ĉiuj, kiuj volis aŭskulti.

—La malnova gregoria preskribo estas preferinda en kazoj similaj al ĉi tiu, kaj kontraŭ dentdoloro ĝi estas simpla kaj sensekreta. Prunelsuko, porkogalo, salpetro kaj bovsango, pinĉo da kreno kaj kelkaj gutoj da juniperoleo; ĉio miksita en saman kvanton da konsekrita akvo, per kiu estis la sankta relikvo lavita. Estu tenata en buŝo dum tri himnostrofoj; trifoja ripeto. Tio estas la plej efika rimedo kontraŭ dentdoloro, kiun konas la scienco de kuracado; kiam la relikvo estas sufiĉe potenca, ĝi neniam fuŝiĝas. La apuliaj doktoroj de la maljuna imperiestro Otto uzis kun prefero ransangon anstataŭ bovsango, sed nuntempe oni jam forlasis iliajn pensojn en ĉi tiu afero; kaj tio estas bona, ĉar dum la vintro estas malfacile trovi ransangon.

Li prenis el sia kesto du malgrandajn flakonojn el metalo kaj eltiris la ŝtopilojn kaj flaris; li poste skuis la kapon kaj sendis serviston al la kuirejo por venigi freŝan bovsangon kaj freŝan galon.

—Ĉar nur la plej bona estas sufiĉe bona en kazo ĉi tia, li diris, kaj eĉ kvankam la relikvo estas potenca, tamen ankaŭ la aliaj ingrediencoj meritas zorgan atenton.

Nun jam pasis iom da tempo, kaj la doloro videble malpli maltrankviligis reĝon Harald. Li direktis sian rigardon al Orm kaj Toke kaj evidente trovis stranga tion, ke li vidas fremdulojn en eksterlandaj batalkostumoj; ĉar ili portis la ruĝajn mantelojn kaj la ornamitajn ŝildojn de Almansur, kaj iliaj helmoj havis nazoŝirmilojn kaj kovris nukon kaj vangojn. Li faris signon, ke ili proksimiĝu.

—Kies subuloj vi estas? li diris.

—Ni estas viaj subuloj, reĝa mastro, respondis Orm. Sed ĉi tien ni alvenis el Andaluzio. Tie ni servis la potencan mastron Almansur de Kordovo ĝis sango nin dividis de li. Krok el Lister estis nia unua ĉefulo, kaj kun li ni ekspediciis per tri ŝipoj. Sed li mortis kaj multaj kun li; kaj mi estas Orm, filo de Toste, el Kullen en Skanio kaj ĉefulo de tiuj, kiuj restas; kaj al vi ni venis kun ĉi tiu sonorilo. Ni ĝin konsideris deca donaco al vi, reĝa mastro, kiam ni aŭdis, ke vi kristaniĝis. Neniom mi scias pri ĝia efiko kontraŭ dentdoloro, sed sur la maro ĝi forte helpis al ni. Kaj ĝi estis plej granda sonorilo ĉe la tombo de Sankta Jakobo en Asturio, kie sin trovas multaj mirindaĵoj; tien ni venis kun nia mastro Almansur, kiu ĝin opiniis alte valora.

Nenion dirante reĝo Harald kapklinis; sed unu el tiuj du junaj virinoj, kiuj kaŭris ĉe liaj piedoj, turnis la kapon kaj rigardis al Orm kaj Toke kaj diris tre rapide en la araba:

—En la nomo de Allah, la Indulgema kaj Pardonema! Ĉu vi estas gvardianoj de Almansur?

Ili ambaŭ ŝin rigardis, surprizitaj aŭdi tiun lingvon en la domo de reĝo Harald. Ŝia aperaĵo estis bela, kun grandaj brunaj okuloj en larĝa pala vizaĝo; ŝiaj haroj estis nigraj kaj pendis en du longaj plektaĵoj de la tempioj. Toke neniam sukcesis akiri lertecon en babilado de la araba; sed jam longe li ne parolis kun virino, kaj tial rapide pretiĝis lia respondo.

—Vi devenas el Andaluzio, ĉu ne. Tie mi vidis virinojn similajn al vi, sed ne multaj estis tiel belaj.

Per siaj blankaj dentoj ŝi donis al li rapidan rideton, sed tuj revenis ŝia melankolia mieno.

—Vi vidas, ho fremdulo, kiu parolas mian lingvon, kion akiris al mi mia beleco, ŝi diris per sia mola voĉo. Jen mi sidas, andaluza virino de kelbita familio, kiel sklavino inter la paganoj de plej ekstre-

ma mallumo, senhonte malvualita, kaj frotas la putrajn piedfingrojn de ĉi tiu Bludentulo. Nenio troviĝas en ĉi tiu lando krom mallumo kaj malvarmo, feloj kaj pedikoj, kaj nutraĵo, kiun la hundoj de Sevilo elvomus. Vere, mi serĉas rifuĝon ĉe Allah pro tio, kion donis al mi mia beleco.

—Por tio, kio nun okupas vin, vi ŝajnas al mi tro bona, diris amike Toke; vi devus esti kapabla trovi viron, kiu povus ion alian proponi ol piedfingrojn.

Ŝi denove sune ridetis kontraŭ li, malgraŭ tio, ke ĵus venis larmoj al ŝi en la okulojn; sed reĝo Harald nun sin movis kaj diris kun kolero:

—Kiu estas vi, kiu ekgrakas en korvolingvo kun miaj virinoj?

—Mi estas Toke, filo de Griz-Gulle, de Lister, li respondis; kaj mia glavo kaj mia babilkapablo estas ĉio, kion mi posedas. Kaj neniel malrespekti vin mi intencis parolante kun via virino. Ŝi min demandis pri la sonorilo, kaj mi ŝin respondis; kaj ŝi diris, ke laŭ ŝia kredo ĝi estas donaco same bona kiel ŝi mem, kaj ke ĝi estos al vi same utila.

Reĝo Harald nun denove malfermis la buŝon por respondi; sed samtempe lia vizaĝo malheliĝis, kaj farante elkrion li sin ĵetis malantaŭen sur la kusenegojn, tiel ke la du junaj virinoj ĉe liaj piedoj renversiĝis sur la plankon; ĉar denove la doloro atakis en lia malsana dento.

Nun kreiĝis maltrankvilo en la kamero, kaj la plej proksime starantaj apud la lito de la reĝo repaŝis pro lia forta moviĝo. Sed nun la miksaĵo de frato Willibald estis preta, kaj tiu kuraĝe alpaŝis, kun fervora mieno kaj kuraĝigaj vortoj.

—Jen, reĝa moŝto! Jen, reĝa moŝto! li admone parolis kaj faris krucosignon, unue super la reĝo kaj poste super la pelvo kun la mik-

saĵo, kiun li tenis per unu mano. Per sia alia mano li poste prenis malgrandan kornan kuleron kaj daŭrigis per solena voĉo:

Brula turmento
buŝe senlaca
foros el dent' pro
puto kuraca:
sekvos tuj sento
glata kaj paca.

La reĝo algapis lin kaj lian pelvon kaj kolere elsnufis kaj skuis la kapon kaj ĝemis, poste li en sia doloro faris forpuŝojn kaj kriis per potenca voĉo:

—For, pastro! For viaj magiaĵoj kaj buljono! Stalisto Hallbjörn, Arnkel, Grim! Kaptu hakilon kaj frapu la pastropedikon!

Sed liaj subuloj, kiuj ofte lin aŭdis en tia stato, ne priatentis liajn kriojn; kaj frato Willibald ne permesis al si timi, sed daŭrigis per laŭta voĉo:

—Paciencu, reĝa moŝto, kaj eksidu kaj prenu ĉi tion en vian buŝon. Jen estas abunda sanktula forto kaj ĉio, kio apartenas al ĝi. Nur tri kulerojn, moŝto, kaj vi ne bezonas ĝin gluti. Kantu, frato Matthias!

Frato Matthias, kiu portante la grandan krucifikson en la mano sin tenis malantaŭ frato Willibald, nun ekkantis sanktan melodion:

Solve vincla reis,
profer lumen caecis,
mala nostra pelle,
bona cun ???a posce!

La reĝo aspektis subigita de tiu kanto, ĉar nun li pacience sin lasis levi. Rapide frato Willibald ŝovis kulerplenon da miksaĵo en

lian buŝon kaj komencis tuj poste kanti kun frato Matthias, dum ĉiuj en la kamero atendante en granda espero alrigardis. Bluiĝis al la reĝo la vizaĝo pro la forteco de la kuracilo, sed malgraŭ tio li tenis sian buŝon fermita; kaj kiam estis kantitaj tri strofoj, li obee elsputis la miksaĵon, kaj daŭre kantante frato Willibald enŝovis novan kulerplenon.

Ĉiuj spektantoj poste akordis pri tio, ke nur mallongan tempon post kiam la reĝo ricevis la duan kulerplenon en la buŝon, kaj antaŭ ol plena strofo denove estis kantita, la reĝo subite fermis la okulojn kaj rigidiĝis. Post tio li remalfermis la okulojn kaj elkraĉis tion, kio estis en la buŝo; li profunde elspiris kaj alvokis bieron. Frato Willibald rompis sian kantadon kaj fervore sin klinis antaŭen:

—Ĉu reboniĝis, moŝto? Ĉu la doloro ĉesis?

—Ĉesis, diris la reĝo kaj kraĉis denove; via miksaĵo acidis, sed helpis.

Pro feliĉo frato Willibald etendis la brakojn.

—Hosiana! li kriis. Estas finite! Sankta Jakobo de Hispanio nin helpis! Dion laŭdu, reĝa moŝto, ĉar pliheliĝas antaŭ ni. La dentdoloro ne plu mallumigos vian spiriton kaj ne plu kaŭzos timon en la brusto de viaj servistoj.

Reĝo Harald kapklinis kaj forpuŝis siajn lipharojn. Per ambaŭ manoj li prenis spacan trinksiteleton alportitan de servoknabo kaj ĝin levis al la buŝo. Unue li trinkis singarde, timante ke rekomenciĝos la doloro, sed poste li trinkis kun fido, ĝis malpleniĝis la sitelo. Li lasis ĝin tuj repleniĝi kaj etendis al Orm.

—Bonvenu! li diris. Kaj dankon pro helpo!

Orm prenis la sitelon kaj trinkis. Ĝi gustis plej bone el ĉiuj bieroj, kiujn li trinkis: forta kaj nutra, kian fari reĝoj posedas rimedojn, kaj kun bona soifo li trinkis. Toke rigardis kaj ĝemetis; fine li diris:

Lango kaj gorĝo raspiĝas

de l' gasta fremdulo: ho, ke
la reĝo potenca dediĉas
unu pokalon al Toke!

—Se vi estas bardo, vi trinku, diris reĝo Harald; sed trinkinte vi faru poemon. La sitelo estis plenigita por Toke, kaj li ĝin metis ĉe la buŝo kaj trinkis klinante la kapon ĉiam pli malantaŭen; ĉiuj en la kamero de la reĝo apogis la opinion, ke ne multaj siteloj estis malplenigitaj pli rapide ol tiu. Li nun pripensis, dum li forviŝis ŝaŭmon de la barbo, kaj poste eldiris, per voĉo pli laŭta ol antaŭe:

Multe mi ĝemis sen bier' ,
luktis-remis sen bier' ,
gloron, filo de Gormo, kiu
min ne lasemis sen bier' !

La viroj en la kamero trovis bone elpensita la strofon de Toke kaj reĝo Harald diris:

—Malmultas jam poetoj, kaj plej malofte oni nuntempe vidas tiajn, kiuj scipovas fari strofojn sen longdaŭra grublado. Al mi multaj venis kun "drapoj" kaj "flokoj", kaj estis ĉagrene ilin vidi sidantaj kun nazo pendanta en bieron kaj nekapablaj elpremi poemon, post kiam ili eldiris la kunportitan. Mi plej multe ŝatas tiujn, el kiuj verŝiĝas la versoj facile, tiel ke ili povas ĉiutage subteni ĝojon en la halo; kaj ŝajnas al mi, Toke de Lister, ke vi estas pli lerta ol aliaj, kiujn mi aŭskultis de tiam, kiam mi gastigis Einar Tostogajon kaj Vigfus Viga-Glumsson. Vi ambaŭ restos ĉe mi dum la julo, kaj ankaŭ viaj ŝipanoj; kaj bieron vi ricevos el la plej bona, ĉar tiom valora mi opinias vian donacon.

Post tio reĝo Harald vaste oscedis, ĉar li estis tre laca post sia turmenta nokto. Li volvis la peltaĵon ĉirkaŭ si kaj krablis ĝis la mezo

de la lito kaj ekripozis kun la du junaj virinoj apud si; la feloj estis sternitaj supre, kaj frato Matthias kaj frato Willibald faris krucosignon super li kaj elmurmuris preĝon. Ĉiuj eliris el la kamero; kaj la stalisto de la reĝo ekstaris meze sur la korto kun glavo en la mano kaj vokis tri fojojn per laŭta voĉo: —"La reĝo de la danoj dormas!"— por ke nenia bruo ĝenu la trankvilon de reĝo Harald.

NAŬA ĈAPITRO

# Kiel oni pridrinkis julon ĉe reĝo Harald Bludenta.

Grandbienuloj venis al Jellinge el multaj direktoj por pridrinki julon ĉe reĝo Harald, kaj fariĝis puŝiĝe en dormokameroj kaj ĉe la tabloj. Sed Orm kaj liaj ŝipanoj ne plendis pro la interpuŝiĝo, ĉar ili trovis bonan merkaton por siaj sklavoj kaj sukcesis ilin ĉiujn vendi, antaŭ ol komenciĝis la festotagoj. Post kiam Orm disdonis la vendosumon, liaj ŝipanoj sin sentis riĉaj kaj kontentaj; kaj nun ili sopiris veni hejmen al Lister por montri, kion ili akiris, kaj ekscii, ĉu atingis hejmen la du ŝipoj de Berse, aŭ ĉu nur ili solaj travivis la ekspedicion de Krok. Sed dum la festotagoj ili volonte restos en Jellinge; ĉar pridrinki julon ĉe la reĝo de la danoj estas granda honoro, kiu por ĉiam grandigas la reputacion.

Plej elstara inter la gastoj estis la filo de reĝo Harald, reĝo Sven Dubarba, kiu venis de Hedeby kun granda akompanantaro. Li estis filo de kromvirino same kiel ĉiuj gefiloj de reĝo Harald, kaj inter li kaj lia patro estis malbona etoso, tiel ke unu ne volis vidi la alian. Sed ĉe julo reĝo Sven ĉiam kutimis veni al Jellinge, kaj ĉiuj konis la kialon. Ĉar ĉe julo, kiam manĝaĵoj kaj trinkaĵoj estas plej abundaj kaj plej nutraj, ofte okazis, ke maljunuloj urĝe mortis, en lito aŭ ĉe pokalo; tiel okazis al maljuna reĝo Gorm, kiu post grandega porcio da julolardo dum du tagoj kuŝis senvoĉa kaj post tio mortis; kaj reĝo Sven volis sin trovi, kie la trezorkestoj sin trovas, kiam elviviĝos lia

patro. Multajn julojn li ĝis nun venis vane, kaj lia senpacienco kreskis ĉiun jaron. Liaj kunuloj estis egaj bataluloj, malcedemaj kaj memfidaj, kaj al ili estis malfacile havi pacon kun la domanaro de reĝo Harald; kaj tio estis eĉ pli malfacila nun, post kiam reĝo Harald kristaniĝis kaj multaj el liaj kunuloj kun li. Ĉar reĝo Sven sin tenis al la antikva doktrino kaj kolere ridis pri la konvertiĝo de la patro; li diris, ke mokindaĵo tia ne trafus la danojn, se la antikvulo havus saĝon morti en konvena jaro.

Sed ĉi tion li ne laŭte diris restante en Jellinge, ĉar reĝo Harald facile falis en furiozon, kaj tiam estis danĝera por ĉiuj. Salutinte ili havis nenion por diri reciproke al si, kaj sidantaj en siaj ĉefseĝoj en la festenhalo ili ne pli ol necese unu la alian altostis.

En la tago antaŭ julo leviĝis neĝoŝtormo, sed poste sereniĝis kaj fariĝis malvarme, kaj en la mateno de la jultago mem, kiam la pastroj kantadis meson de Kristnasko kaj la reĝbienon envolvis bonodora vaporo, kiun dispelis la preparoj en la kuirdomo, alvenis longŝipo de sude kaj sin direktis kun ŝtormŝirita velo kaj glacikovritaj remiloj al la pontoj. Reĝo Harald sidis aŭskultante la meson, kaj oni lin vekis por prezenti la informon; li faris al si demandojn pri tio, kiuj estas tiuj gastoj kaj iris al la supra galerio por rigardi la ŝipon. Ĝi estis alta ŝipo; kaj la ruĝa drakokapo sidis alte sur kurba kolo kaj portis glacion inter la makzeloj kaŭze de la forta ondado. Oni vidis virojn kun ŝelo de glacio sur la vestoj surtreti la bordon, kaj inter ili venis altkreska ĉefulo en blua mantelo kaj alia en ruĝa; la ruĝe vestita estis eĉ pli alta ol la alia. Reĝo Harald ĉion rigardis tiel nete, kiel eblis distingi je la distanco, kaj diris:

—Aspektas kiel ŝipo de Jomsvikingoj, aŭ ĝi venas de la svea lando; kaj ĝi entenas fierajn homojn, ĉar ĝi venas al la reĝo de la danoj per sola ŝipo ne montrante pacoŝildon. Sole nur tri virojn mi konas, kiuj kuraĝas tion: Skoglar-Toste kaj Vagn Åkesson kaj Styrbjörn. Kaj

la ŝipo alvenas kun la drakokapo neformetita malgraŭ tio, ke oni scias, ke la terkoboldoj tian vidon ne ŝatas; kaj mi konas nur du, kiuj ne atentas pri tio, kion pensas terkoboldoj: Vagn kaj Styrbjörn. Kaj estas videble, ke la ŝipo ne serĉis ŝirmon dum la ŝtormo, kaj mi konas nur unu, kiu ne serĉas ŝirmon dum vetero tia, kia ĝi estis dum la pasinta nokto. Tial laŭ mia kredo la venanto estas Styrbjörn, mia bofilo, kiun mi dum kvar jaroj ne vidis; kaj tio konformas kun la blua mantelo; ĉar li portas bluan mantelon, ĝis li reakiros tion, kion li heredis de sia patro reĝo Erik. Kiu estas la alia, kiu estas almenaŭ tiom altkreska kiel li, tion mi ne kun certo povas diri; sed la filoj de Strutharald estas pli altkreskaj ol aliaj, ĉiuj tri, kaj amikoj de Styrbjörn. Ne povas esti Sigvalde Jarlo, ĉar li ne sentas sin komforta ĉe julfestenoj nun pro la moko, kiu lin trafis, post kiam li retroremis ĉe Hjörungavåg; kaj Hemming, lia frato, sidas en Anglolando. Sed la tria estas Thorkel Höge, kaj tiu ĉi povas esti li.

Tiel diris reĝo Harald, kies saĝo estis granda; kaj kiam la fremduloj atingis la reĝodomon kaj fariĝis evidente, ke li pravas, li fariĝis pli gaja ol iam, de kiam alvenis reĝo Sven. Styrbjörn kaj Thorkel li bonvenigis kaj tuj ordonis hejton de la bankabano kaj alvokis bieron al ili ĉiuj.

—Tio povas esti bezonata post tia vojaĝo, li diris, eĉ por batalu-loj plej bravaj; kaj tio estas vero, kion kutimis diri la maljunaj:

> Varma bier' por frida vir' ,
> kaj same por laculo,
> ĉar tio estas korp-inspir',
> mirinda mens-stimulo.

Kelkaj el tiuj, kiuj venis kun Styrbjörn, estis tiel elĉerpitaj, ke ili tremadis; sed kiam trinksiteloj kun varma biero estis alportitaj, iliaj manoj tuj stabiliĝis, tiel ke eĉ ne guto elverŝiĝis.

—Kaj post via ripozo en la bankabano la julfesteno komenciĝos, diris reĝo Harald; kaj al tiu festeno mi havas pli da inklino nun, ol kiam mi nur mian filon povis vidi trans la tablo.

—Ĉu la Dubarbulo estas ĉi tie? demandis Styrbjörn kaj ĉirkaŭrigardis. Kun li mi volonte parolos.

—Estas lia espero, ke li vidos min morti pro multa biertrinkado, diris reĝo Harald; tial li ĉeestas. Sed se mi mortos dum julfesteno, la kaŭzo estos tiu, ke min trafis enuo pro liaj malicaj mienoj. Vi havos parolon kun li en konvena tempo; sed unu aferon mi volas ekscii: ĉu sango estas inter vi kaj li?

—Sango ne estas inter ni, respondis Styrbjörn, sed eble estos. Li promesis al mi helpon de ŝipoj kaj viroj kontraŭ mia parenco en Upsalo, sed neniuj venis.

—Nun estas moro ĉe mi, diris reĝo Harald, ke neniu kverelo devas okazi dum la sanktaj tagoj; kaj mi volas, ke vi jam nun tion sciu, eĉ se tia kvieto estas malfacila por vi. Ĉar mi nun tenas min al Kristo, kiu helpis al mi en multo; kaj Kristo toleras neniun malpacon en la tago de julo, kiu estas la tago de lia naskiĝo, kaj ankaŭ ne en la sanktaj tagoj poste.

—Mi estas homo sen tereno, diris Styrbjörn, kaj paco kostas al mi tro multe; ĉar mi estas tia, ke mi preferas esti korvo ol hakato de korvo. Sed kiam mi estas gasto ĉe vi, mi kredas, ke mi povos teni la pacon same bone kiel iu alia, estru kiuj ajn dioj la feston; ĉar vi estis bona bopatro, kaj kun vi mi neniam kverelis. Sed ja vere, ke mi nun devas diri al vi, ke via filino Tyra mortis; kaj mi preferus, ke mi povus veni al vi kun pli bonaj novaĵoj.

—Tio estas informo por funebro, diris reĝo Harald. Kio ŝin mortigis?

—Ŝin ĉagrenis tio, ke mi prenis al mi vendan kunkuŝulinon, di-

ris Styrbjörn, kaj ŝin kaptis tia furiozo, ke ŝi sputis sangon, kaj post tio ŝi velkis kaj mortis. Sed cetere ŝi estis bona edzino.

—Tion mi jam longe rimarkas, diris reĝo Harald, ke junaj homoj mortas pli facile ol maljunaj. Sed nun ni ne tro lasu tion malheligi niajn pensojn, kiam ni pridrinkos julon; kaj ankoraŭ restas al mi tiom da filinoj, ke mi ne scias, kien meti ilin. Ili ĉiuj estas malhumilaj kaj volas edziniĝi nur al altranguloj kun granda famo; kaj ne longe vi bezonas sidi vidva, se iu plaĉos al vi. Mi ilin ĉiujn montros al vi; kaj povos okazi, ke inter ili mankos Kristnaskpaco pro tio.

—Aliaj aferoj ol edziĝo estas en miaj pensoj, diris Styrbjörn; sed pri tio ni poste parolos.

El malantaŭ pordoj kaj el subtegmentejoj multaj okuloj rigardis Styrbjörn, kiam li iris al la bankabano kun siaj kunuloj, ĉar li estis malofta gasto kaj la plej granda el ĉiuj bataluloj en la Nordlandoj post tiam, kiam vivis la filoj de Lodbrok. Li havis blondan barbon mallonge tranĉitan, kaj pale bluajn okulojn; kaj tiuj, kiuj neniam antaŭe lin vidis, surprizite murmuris inter si, ke li estas viro svelta kaj gracia. Ĉar ĉiuj sciis, ke li havas forton tian, ke li per sia glavo, kiu nomiĝas Lulkanto, fendas ŝirmilojn kiel panojn, kaj batalkostumitajn virojn de kolo ĝis skroto. Sciantaj personoj diris, ke la tradicia bonŝanco de la Upsala klano sin trovas ĉe li kaj ke ĝi donas al li liajn forton kaj sukceson en ĉiuj riskaj entreprenoj. Sed estis bone konata ankaŭ tio, ke ankaŭ iom el la malbono kaj malnova malbonsorto sin ligis al li; tial li estas senlanda ĉefulo; kaj jen la kaŭzo, kial iujn fojojn laceco kaj granda melankolio lin prenis. Tiam li kutimis sin enfermi sola kaj tagon post tago kuŝi ĝemante kun morna murmurado, tolerante neniun homon en sia proksimo, krom virino, kiu kombis liajn harojn, kaj maljuna harpoludanto, kiu enverŝis al li bieron kaj ludis malgajajn melodiojn. Sed tuj, kiam la melankolio cedis, li rapidis enŝipiĝi kaj entreprenis militirojn, kaj la plej hardi-

tajn el siaj ŝipanoj li tiam povis lacigi kaj timigi per siaj sentimego kaj mizera veterbonŝanco.

Tial lin ĉirkaŭis teruro, kiu superis tiun de la aliaj ĉefuloj, kvazaŭ loĝus en li iom el la potenco kaj danĝero de la dioj mem; iuj kredis, ke li verŝajne iam, kiam lia forto estos plena, iros al Miklagordo kaj eksidos kiel imperiestro tie kaj ĉirkaŭvelados la teran rondon kun multnombregaj ŝiparoj.

Sed aliaj diris, ke ili povas vidi en liaj okuloj, ke li mortos juna kaj en mizero.

Nun ĉio estis preta por julfesteno en la granda halo de reĝo Harald, kaj ĉiuj viroj sidiĝis sur la benkoj tie. Neniuj virinoj kunsidis ĉe tiel granda drinkadkunveno; ĉar estas jam sufiĉe malfacile, opiniis reĝo Harald, teni pacon inter viroj solaj por si, kaj multe pli malfacile estus, se ili dum sia ebrio demonstrus sian bravecon antaŭ virinoj. Post kiam ĉiu ricevis sidlokon, la stalisto de la reĝo proklamis, ke regas en la halo la paco de Kristo kaj reĝo Harald kaj ke neniu eĝa fero estu uzata krom nur por tranĉi la nutraĵon: hakvundo kaj pikvundo, kaj ĉiu sanganta vundo, kiun kaŭzis iu viro al alia per biersitelo aŭ osto, lignotelero, lignokulero aŭ pugno estu kalkulata kiel plena mortigo kaj kiel malrespekto kontraŭ Kristo kaj nekompensebla ago, kaj ĉirkaŭ la kolo de la kulpanto ŝtono estu ligita, kaj li estu dronigita en profunda akvo. Ĉiujn armilojn krom la manĝotranĉiloj oni demetis en la antaŭĉambroj, kaj nur tiuj altranguloj, kiuj sidis ĉe la tablo de reĝo Harald mem, portis siajn glavojn; ĉar oni pensis, ke ili povas sin bridi eĉ drinkinte.

La halo estis konstruita tia, ke sescent povu esti en ĝi sen puŝado, kaj en ĝia mezo staris la tablo de reĝo Harald mem, kie sidis la tridek plej honorataj altranguloj. La tabloj por la aliaj staris transverse en la halo ĉe ĝiaj ambaŭ ekstremoj. Ses ĉeflokoj estis ĉe la tablo de reĝo Harald, ĉe ĉiu flanko tri. Dekstre de reĝo Harald sidis

Styrbjörn kaj maldekstre episkopo Poppo; meze kontraŭe sidis reĝo Sven kaj dekstre de li Thorkel Höge kaj maldekstre maljuna kaj kalva jarlo de la Malgrandaj Insuloj nomiĝanta Sibbe; la aliaj okupis lokojn konformajn al sia reputacio, kaj ĉe ĉi tiu tablo reĝo Harald mem difinis ĉies lokon. Ne estis Orm konsiderata granda ĉefulo, sed li ricevis pli ol atendeble favoran sidlokon kaj Toke same, ĉar reĝo Harald havis dankemon al ili pro la granda sonorilo kaj ŝatis la versfaradon de Toke. Orm sidis tria de la episkopo kaj Toke kvara; ĉar Orm diris al reĝo Harald, ke li ne volonte disigus sin de Toke, ĉar tiu povus kaŭzi ĉagrenojn pro la biero. Meze kontraŭ ili trans la tablo sidis ĉefuloj el la akompanantaro de reĝo Sven.

Nun la episkopo laŭtlegis preĝon, kiun mallongigi petis lin reĝo Harald, kaj post tio tri tostoj estis proklamitaj: je la gloro de Kristo, bonŝanco de reĝo Harald kaj reveno de la suno. Ankaŭ la nekristanoj partoprenis la toston por Kristo, ĉar ĝi estis la unua tosto, kaj ili soifis bieron, sed iuj el ili faris martelosignon super la trinkokruĉo kaj murmuris la nomon de Thor antaŭ ol trinki. Kiam estis trinkata la tosto por la bonŝanco de Harald, biero venis al reĝo Sven en la spirogorĝon, kaj li tusis tiom, ke demandis Styrbjörn, ĉu la gluto estis al li tro forta.

Nun estis enportata la jula lardo; bataluloj kaj ĉefuloj silentiĝis, kiam ili vidis ĝin alveni, kaj ili profunde spiris kaj rikanis pro ĝojo; multaj malligis siajn talirimenojn por plene pretiĝi jam komence. Ĉar malgraŭ tio, ke certaj personoj asertis, ke oni ĉe reĝo Harald, dum lia nuntempa maljuneco, foje povas rimarki avarecon koncerne arĝenton kaj oron, nenio simila vortiĝis koncerne manĝaĵon kaj trinkaĵon, kaj plej malmulte de tiuj, kiuj ĉeestis julfestenon ĉe li.

Kvardek ok porkoj, bone grasigitaj per glanoj, estis la kvanto, kiun reĝo Harald kutimis buĉigi por la julo; kaj li havis la kutimon diri, ke eĉ se tio ne sufiĉas por la tuta julo, ĝi tamen konsistigas io-

man gustumpecon por ĉiu, kaj post ĝi oni kontentiĝu per ŝafoj kaj bovoj. La kuirejaj homoj venis duope en longa vico portantaj inter si grandajn vaporantajn kaldronojn, aliaj portis trogojn kun sangokolbasoj. Kuirejaj knaboj kun longaj forkaj stangoj sekvis; post kiam la kaldronoj estis metitaj apud la tabloj, ili ŝovis la stangojn en la brogaĵon kaj kaptis grandajn pecojn, kiujn ili vice kaj orde metis antaŭ la gastojn, tiel ke neniu estu eksterorde favorata; kaj antaŭ ĉiu ili metis minimume ulnon da sangokolbaso aŭ pli se iu deziris. Panoj kaj frititaj rapoj kuŝis en argilpladoj sur la tabloj; kaj ĉe la tabloekstremoj staris tinoj kun biero, tiel ke kornoj kaj kruĉoj ĉiam povu pleni.

Kiam la lardo venis al Orm kaj Toke, ili sidis senmovaj, turnitaj al la kaldrono, kaj sekvis zorge per la okuloj, kiel la kuirejknabo kaptoserĉis per la stango. Ili ĝemis pro ĝojo, kiam li trovis belajn pecojn de brustlardo por ili; kaj ili reciproke memorigis al si, kiom da tempo pasis de tiam, kiam ili sidis ĉe tia manĝo, kaj ili miris, ke ili dum tiom da jaroj povis elteni en senlarda lando. Sed kiam alvenis la sangokolbaso, venis al ili ambaŭ larmoj en la okulojn, kaj ŝajnis al ili, ke neniun normkvantan manĝoporcion ili ricevis post tiam, kiam ili forvelis kun Krok.

—Superas ĉion tiu odoro, diris Orm kviete.

—Timiano estas en ĝi, diris Toke per singulte rompita voĉo.

Li ŝovis sian kolbason en la buŝon, tiel longe kiel eblis, kaj ĝin mordis kaj ekmaĉis; post tio li rapide sin returnis kaj etendis la manon al la servisto, kiu volis daŭrigi sian iron kun la trogo, kaj pinĉis al li la kamizolon kaj diris:

—Donu al mi tuj pli da kolbaso, se tio ne estas kontraŭ la ordonoj de reĝo Harald, ĉar dum longa tempo mi estis mistraktata en la lando de la andaluzoj, kie ne estas nutraĵo por viroj, kaj la kolbasojn de sep juloj mi sopiris, sed ne gustumis.

—Same estas al mi, diris Orm.

La servisto ridis kaj diris, ke reĝo Harald havas sufiĉe da kolbasoj por ĉiuj. Li metis antaŭ ilin po unu plenan kolbason de la plej dika speco, kaj nun ili sentis sin trankvilaj kaj komencis manĝi serioze.

Nun ne multe estis parolata dum iom longa tempo, nek ĉe la tablo de la reĝo nek ĉe la aliaj, krom kiam viroj alvokis pli da biero aŭ inter la glutoj laŭdis la julmanĝojn de la reĝo.

Dekstre de Orm sidis juna viro, kiu tranĉis sian manĝaĵon per tranĉilo kun ornamita arĝenta tenilo; li havis helan haŭton kaj longajn kaj belajn harojn, kiuj estis zorge kombitaj. Li apartenis al la kunularo de Thorkel Höge kaj estis evidente, ke li devenas de altranga familio, ĉar li sidas tiel proksime al la reĝo malgraŭ tio, ke li ankoraŭ estas senbarba; tion oni povis konkludi ankaŭ el tio, ke li portis delikatajn vestojn kaj glavozonon el arĝento. Kiam la plej diligenta manĝado jam ĉesis, li sin turnis kontraŭ Orm kaj diris:

—Ĉe festenoj estas bone sidi apud viroj vaste veturintaj; kaj ĉu mi ne aŭdis, ke vi kaj via najbaro estis pli distance for ol la pli multaj.

Orm respondis, ke tiel estas kaj ke li kaj Toke pasigis sep jarojn en Hispanujo.

—Ĉar el pluraj kaŭzoj, li diris, nia vojaĝo fariĝis pli longdaŭra ol ni atendis; kaj ĝin entreprenis multaj, kiuj ne revenis.

—Do vi havas por rakonti, diris la alia; sed malgraŭ tio, ke mi ne estis tiel longe for kiel vi du, mi tamen partoprenis vojaĝon, de kiu malmultaj revenis.

Orm demandis, kiu li estas kaj kiu estis lia vojaĝo.

—Mi venas de Bornholmo, diris la alia, kaj nomiĝas Sigurd, kaj Bue Dika estis mia patro. Pri li vi eble ion aŭdis malgraŭ tio, ke vi longe estis eksterlande. Mi kunestis ĉe Hjörungavåg, kie li mortis,

kaj tie mi kaptiĝis kun Vagn kaj aliaj. Kaj mi nun ne sidus ĉi tie kaj parolus kun vi pri tio, se ne estus miaj haroj longaj; ĉar miaj haroj savis mian vivon, kiam estis mortigotaj la kaptitoj.

Nun pluraj ĉe la tablo komencis satiĝi kaj fariĝi parolemaj; kaj Toke miksiĝis en la interparolon kaj diris, ke tio, kion rakontis la bornholmano, estas mirinda kaj certe estas aŭskultinda rakonto; ĉar li mem konsideris longajn harojn pli malutilaj ol utilaj por batalu- loj. Thorkel Höge sidis pikpurigante la dentojn en tiu kortega ma- niero, kiu fariĝis kutima inter vojaĝintaj altranguloj, forturnante la buŝon kaj kovrante ĝin per la mano; li aŭdis ĉi tiun konversacion kaj diris, ke longaj haroj pli ol unu fojon pereigis batalulon, kaj ke tial prudentaj viroj ĉiam ligas la harojn sub la helmo, sed el la rakonto de Sigurd Buesson, li diris, eblas lerni, ke longaj haroj ankaŭ povas havi utilon por saĝa viro, kaj li esperas, ke ĉiuj en la halo havu eble- con aŭskulti tiun rakonton.

Reĝo Sven nun estis en bona humoro, kvankam li komence es- tis malkompleza vidinte Styrbjörn; li sin klinis malantaŭen en sia ĉefloko kaj rodis porkopiedon kaj elkraĉis ostetojn sur la plankopaj- lon, dum li kun kontento vidis kiel reĝo Harald, kiu parolis kun Styr- björn pri virinoj, ankoraŭ ĉiam manĝis kaj trinkis pli ol iu alia. Li aŭskultis tion, kion oni diris pri longaj haroj kaj ekparolis pri tio kaj opiniis, ke prudenta batalulo devas pensi ankaŭ pri sia barbo; ĉar dum batalo en blova vetero la barbo facile povas ventleviĝi al ies okuloj, ĝuste kiam iu devus atenti pri bato aŭ ĵeto, kaj tial, li diris, li mem frue kutimiĝis je tio, ke la barbo li dum batalekspedicioj te- nas plektita. Sed nun li volonte aŭdos, kiel utilis la haroj al Sigurd Buesson; ĉar viroj, kiuj alestis ĉe Hjörungavåg, ofte havas interesajn aferojn por rakonti.

Episkopo Poppo ne kapablis manĝi ĉion, kion oni metis antaŭ lin, kaj nun li sidis hikante pro la biero, sed tamen havis zorgon pa-

roli. Li diris, ke li voleme rakontus al ili ĉiuj pri la reĝido Abŝalom, kiun trafis malbonsorto pro liaj longaj haroj; tio, li diris, estas bona kaj instrua rakonto, kiu estas skribita en la sankta libro de Dio mem. Sed reĝo Sven diris, ke tion oni rakontu al virinoj kaj infanoj, se ili havas paciencon aŭskulti; kaj inter li kaj la episkopo leviĝis kverelo pri tio. Tiam diris reĝo Harald:

—Tempo restas por multaj rakonti ĉe festeno kiel tiu ĉi, kiu daŭros dum ses tagoj; kaj malmultaj aferoj estas pli ĝuaj ol aŭskulti bonajn rakontojn, post kiam oni manĝis ĝis satiĝo kaj kiam ankoraŭ estas biero en la kruĉo. Ĉar tiel oni facile pasigas la horojn inter la manĝoj kaj malpli da kvereloj estas ĉe la tabloj. Kaj tion mi volas diri aldone al la honoro de la episkopo, ke li scikapablas bonajn rakontojn; ĉar multajn el ili mi mem aŭskultis kun ĝuo, pri sanktuloj kaj apostoloj kaj antikvaj reĝoj en la Oriento. Multe li rakontis al mi pri unu, kiu nomiĝis Salomono, kiu estis amata de Dio kaj simila al mi, kvankam estas vero, ke li havis pli da virinoj. Kaj nun estas mia penso, ke la episkopo rakontu la unua, antaŭ ol li laciĝos pro la manĝo kaj biero; ĉar ĉe juldrinkado li ne sentas saman komforton kiel ni, pro tio ke ne sufiĉe frue li alkutimiĝis. Kaj post li aliaj rakontu siajn: tiuj, kiuj estis ĉe Hjörungavåg aŭ kun Styrbjörn inter la vendoj aŭ en aliaj direktoj. Kaj ĉi tie ankaŭ sidas viroj, kiuj forestadis ĝis la malproksimo de Hispanujo kaj alvelis al mi kun sankta sonorilo, kiu tre utilis al mi; kaj ankaŭ ilin ni volonte aŭskultos dum la daŭro de ĉi tiu festeno.

Ĉiuj tenis la opinion, ke reĝo Harald saĝe parolis, kaj kiel li diris, tiel fariĝis, kaj en tiu vespero, post kiam estis enportitaj la torĉoj, la episkopo rakontis pri la reĝo David kaj lia filo Abŝalom. Li parolis laŭte, tiel ke ĉiuj povis lin aŭdi, kaj kun multa saĝo; kaj ĉiuj krom reĝo Sven ŝatis lian rakonton. Kiam finparolis la episkopo, reĝo Harald

diris, ke tiu rakonto estas bone memorinda, kaj por unu kaj por alia; kaj Styrbjörn ridis kaj tostis kun reĝo Sven kaj diris:

—Eble estas bona konsilo al vi, ke vi post nun tranĉu viajn harojn tiel mallongaj, kiel la episkopo tranĉas la siajn.

Reĝo Harald ŝatis tiun diron kaj frapis al si la femurojn kaj falis en tian ridon, ke skuiĝis la ĉefbenko; kaj kiam liaj kunuloj kaj tiuj de Styrbjörn vidis siajn mastrojn ridi, ili ĉiuj kunridis, ankaŭ tiuj, kiuj nenion aŭdis, tiel ke la tuta halo tremis. Sed la kunuloj de reĝo Sven tion malŝatis; kaj li mem fariĝis pala pro furiozo kaj ion murmuris kaj mordis al si la lipharojn kaj aspektis danĝera, kvazaŭ li estus preta sin ĵeti de la sidloko kaj fariĝi perfortema. Styrbjörn sidis antaŭenklinita kaj rigardis al li per siaj palaj okuloj, kiujn neniu palpebrumo fermis, kaj ridetis; kaj estis nun granda malkvieto en la halo, kaj ŝajnis, ke marŝas la julpaco renkonte al ĥaoso. La episkopo etendis siajn manojn kaj ion kriis, kion aŭdis neniu, kaj viroj tenis unu la aliajn sub rigardo trans la tabloj kaj palpis por plej proksima frapilo. Sed la du amuzistoj de reĝo Harald, du nanaj ejraj viroj, kiuj havis vastan famon pro siaj artifikoj, nun saltis sur la tablon de la reĝo, en buntaj kamizoloj kaj kun plumoj en la haroj, kaj komencis flugile bati per siaj larĝaj manikoj kaj ŝveligis la bruston kaj alte levis la piedojn kaj etendis la kolon kaj kriis unu al la alia kiel kokoj, tiel ke ĉiuj pensis, ke ili neniam aŭdis kokon krii same bone; kaj baldaŭ ĉiuj jam forgesis sian koleron kaj sidis senpovaj pro rido ĉe iliaj artifikoj. Kaj tiel finiĝis la unua festentago.

En la sekvanta tago, kiam oni jam manĝis, kaj la torĉoj estis enportitaj, rakontis Sigurd Buesson pri tio, kion li travivis ĉe Hjörungavåg, kaj kiel utilis liaj longaj haroj. Ĉiuj bone konis tiun batalekskurson: kiel Jomsvikingoj kaj viroj de Bornholmo kaj Skanio elveladis kun granda ŝiparo sub la filoj de Strutharald kaj Bue Dika kaj Vagn Åkesson por akiri Norvegujon de Håkan Jarlo, kaj kiel nur

malpluraj revenis de tiu klopodo; kaj Sigurd ne multon diris pri tio kaj nenion pri tio, kiel fuĝis Sigvalde kun siaj ŝipoj el la batalo. Ĉar estus malĝentile paroli pri Sigvalde, kiam sidas Thorkel Höge inter la aŭskultantoj, kvankam ĉiuj sciis, ke Thorkel estas kuraĝa viro kaj ke en la batalo granda ŝtono frapis al li la kapon, kiam la ŝiparoj lokiĝis unu laŭlonge la alian, kaj li ne havis konscion, kiam lia frato remis for.

Sigurd estis en la ŝipo de sia patro kaj sin tenis al tio, kion li mem travivis. Li rakontis pri la morto de sia patro: kiel Bue, post grandega batalo, kiam la interpuŝado de norvegoj fariĝis granda en lia ŝipo, ricevis sur la vizaĝon glavohakon, kiu deprenis de li la nazon kaj pli grandan parton de la mentono, kaj kiel li tiam levis sian grandan trezorkeston kaj saltis en la maron; kaj kiel la prubatalisto de Bue, Aslak Holmskalle, berserkis sen helmo kaj ŝildo, jen io, kion oni ne ofte vidas nuntempe, kaj hakis per ambaŭ manoj kaj rezistis feron, ĝis bardo el Islando, kiu akompanis Erik, filon de Håkan Jarlo, levis amboson de la ferdeko kaj fendis lian kranion.

—Kaj ni, kiuj restis vivantaj en la ŝipo de mia patro, diris Sigurd, ne multon povis fari; ĉar ni estis malmultaj kaj tre lacaj; kaj ĉiuj niaj ŝipoj nun estis senhomigitaj krom tiu de Vagn mem, kie okazis ankoraŭ batalo. Ni estis premitaj al la pruo, kaj baldaŭ ni povis levi nek manon nek piedon; fine restis naŭ el ni, ĉiuj vunditaj, kaj tie ni estis premitaj inter ŝildoj kaj kaptitaj. Senarmilaj ni estis metitaj surteren; kaj baldaŭ venis ankaŭ la lastaj de la ŝipo de Vagn kaj inter ili Vagn mem. Li estis portata de du viroj, kaj glavoj kaj lancoj jam markis lin, kaj li estis laca kaj pala kaj nenion diris. Ni estis sidigitaj sur trunko apud la strando, kaj niaj kruroj estis kunligitaj per longa ŝnuro, sed niaj manoj estis sen katenoj; kaj tie ni sidis atendante, dum iuj faris demandojn al Håkan Jarlo pri tio, kio okazu al ni. Lia decido estis, ke ni estu tuj mortigitaj; kaj Erik Jarlo, lia filo,

venis vidi, kaj multaj kun li; ĉar la norvegoj estis scivolemaj vidi, kiel Jomsvikingoj sin tenas antaŭ la morto. Ni estis tridek sur la trunko, naŭ de la ŝipo de Bue, ok de tiu de Vagn, la ceteraj de aliaj; Vagn mem sidis plej dekstre. Kaj tiujn, kiujn mi konas el tiuj, kiuj sidis tie, mi nun nomos.

Post tio li nomadis ĉiujn, kies nomojn li sciis, laŭ la vico, en kiu ili sidis sur la trunko; kaj ĉiuj en la halo atente aŭskultis, ĉar multaj el tiuj, kiujn li menciis, estis konataj viroj, kaj iliaj parencoj estis inter la aŭskultantoj.

—Venis nun viro kun hakilo, daŭrigis Sigurd Buesson, kaj li haltis antaŭ Vagn kaj diris: ”Ĉu vi scias, kiu mi estas”? Vagn lin rigardis, sed ne montris atenton pri li kaj nenion respondis, ĉar li estis tre laca. La alia diris: ”Mi estas Thorkel Leira, kaj eble vi memoras la promeson, kiun vi faris, ke vi min mortigos kaj enlitiĝos kun mia filino Ingeborg”. Veron li parolis, ĉar tiun promeson Vagn faris antaŭ la ekspedicio, aŭdinte ke la filino de Thorkel estas la plej bela junulino en Norvegujo kaj ankaŭ unu el la plej riĉaj. ”Sed nun”, Thorkel Leira diris kun larĝa rikano, ”pli kredeblas, ke mi mortigos vin”. Vagn respondis ridetante: ”Ne mortis ankoraŭ ĉiuj Jomsvikingoj”. ”Sed baldaŭ mortos”, diris Thorkel, ”kaj mi mem zorgos pri la afero, por ke ĝi ne estu fuŝata; ĉiujn viajn batalulojn vi vidos morti sub mia mano, kaj tuj poste vi ilin sekvos”. Tion dirinte, Thorkel iris al la alia fino de la trunko kaj komencis senkapigi la kaptitojn, viron post viro laŭ sidvico; bonan hakilon li havis kaj estis fervora kaj neniam bezonis dufoje haki saman viron. Laŭ mia kredo la spektantoj ne povis diri alie, ol ke sin tenis la viroj de Vagn kaj Bue bone antaŭ la morto. Du, kiuj sidis proksime al mi, konversaciis pri tio, ĉu oni ion povas senti sen kapo, kaj akordis pri tio, ke estas malfacile anticipe ion scii pri tiaj aferoj. Unu diris: ”Jen, en mia mano estas buko, kaj se mi, perdinte la kapon, ion scias, mi ĝin penetros en la teron”.

Thorkel venis al li; kaj post la hako la buko tuj falis el la mano. Post tio restis du, antaŭ ol venis Thorkel al mi.

Sigurd Buesson ridetis al la aŭskultantoj, kiuj sidis silentaj kaj streĉitaj, kaj levis sian bierkruĉon kaj profunde trinkis. Diris reĝo Harald:

—Mi vidas, ke restas al vi la kapo, kaj la klukado pruvas, ke senmanka estas via gorĝo; sed el via situacio sur la trunko estas malfacile konjekti, kiel vi povis savi tiujn du, kian ajn longon havis viaj haroj. Ĉi tiun rakonton mi nomas bona, kaj ne plu atendigu nin pri la fino.

Ĉiuj opiniis kiel reĝo Harald, kaj Sigurd Buesson daŭrigis:

—Kiam mi sidis tie sur la trunko, mi ne timis pli ol la aliaj, mi pensas; sed ŝajnis al mi ĉagrene morti ne farinte ion rakontindan. Tial mi diris al Thorkel, kiam li venis: ”Mi havas zorgon pri miaj haroj kaj ne volas, ke sango makulu ilin.” Tion dirante mi ilin ŝovis antaŭen super la kapon; kaj viro, kiu paŝis malantaŭ Thorkel — oni poste diris al mi, ke estis lia bofrato — venis antaŭen kaj volvis miajn harojn ĉirkaŭ siaj manoj kaj diris al Thorkel: ”Nun frapu!” Tion li faris; kaj en tiu momento mi altiris al mi la kapon laŭkapable rapide, tiel ke la hakilo trafis inter mi kaj la bofrato kaj dehakis ambaŭ liajn manojn. Unu restis pendanta en miaj haroj.

Ĉiuj en la halo brue ekridis, kaj Sigurd mem ridis kaj daŭrigis:

—Jes, vi ridu; sed vi ne povas ridi tiom, kiom la norvegoj ridis, kiam ili vidis la bofraton de Thorkel ruliĝi sur la grundo kaj Thorkel prigapadi lin; iuj falis pro rido. Jarlo Erik alpaŝis min kaj diris: ”Kiu vi estas?” Mi diris: ”Sigurd mi nomiĝas, kaj Bue estis mia patro; kaj ne mortis ankoraŭ ĉiuj Jomsvikingoj.” La jarlo diris: ” Mi rimarkas, ke vi estas parenco de Bue; ĉu vi volas akcepti vian vivon de mi?” ”De viro kiel vi mi ĝin akceptas”, mi respondis. Kaj mi estis malligita de la ŝnuro. Sed Thorkel tion malŝatis kaj kriis: ”Ĉu nun

komenciĝu tiaj aferoj? Tiakaze mi prefere ne prokrastu la aferon de Vagn." Tion dirante, li levis la hakilon kaj kuris kontraŭ lin, kiu sidis ĉe la fino de la trunko. Sed unu el la ŝipanoj de Vagn, Skarde, sidis kvara antaŭ Vagn; kaj ŝajnis al li maljuste, ke Vagn estu hakita antaŭ sia ordo en vico. Tial li sin ĵetis antaŭen, kiam Thorkel preterkuris, kaj Thorkel falis antaŭen super li, rekte antaŭ Vagn. Vagn sin klinis kaj kaptis la hakilon; kaj nenia laco estis rimarkebla ĉe li, kiam li hakis ĝin en la kapon de Thorkel. "Jen la duono de la promeso", diris Vagn; "kaj ne mortis ankoraŭ ĉiuj Jomsvikingoj." Nun la norvegoj ridis eĉ pli ol ĵus; kaj Erik Jarlo diris: "Ĉu vi volas akcepti vian vivon, Vagn?" "Mi volas", diris Vagn, "se tio validos por ni ĉiuj." "Tiel estu", diris la jarlo; kaj ĉiuj estis malligitaj. Dek du ni estis, kiuj vivaj forlasis la trunkon.

Sigurd Buesson multan laŭdon ricevis pro sia rakonto, kaj ĉiuj laŭdis lian manieron utiligi siajn harojn. Leviĝis nun multe da konversacio ĉirkaŭ la tabloj pri tio, kion li rakontis kaj pri lia propra bonŝanco kaj pri tiu de Vagn; kaj Orm diris al Sigurd:

—Multo, kion ĉiuj aliaj scias, estas nekonata por mi kaj Toke, ĉar ni estis ekster la lando dum tiom longa tempo. Kie nun estas Vagn, kaj kio okazis al li post tiam, kiam li sin savis de la trunko? El via rakonto ŝajnas al mi, ke lia bonŝanco estas pli favora ol ies, pri kiu mi aŭdis.

—Verŝajne vi prave prijuĝas, respondis Sigurd, kaj ne duonvoje haltas lia bonŝanco. Li ĝuis abundan favoron de Erik Jarlo, kaj post kelka tempo li vizitis la filinon de Thorkel Leira kaj ŝin trovis pli bela ol li kredis; kaj ŝi ne malvolis lin helpi plenumi la restantan duonon de la promeso, kaj nun ili estas geedzoj kaj ĝuas komforton. Li planas iri kun ŝi al Bornholmo, tuj kiam permesos tempo; sed kiam laste iu aŭdis pri li, li ankoraŭ restadis en Norvegujo kaj plendis pri tio, ke ankoraŭ ne eblas al li foriri de tie. Ĉar tiom da bienoj

li ricevis kun la knabino kaj tiom da moveblaj propraĵoj, ke ne eblas ĉion rapide vendi kontraŭ altaj prezoj; kaj al Vagn ne estas kutimo, ke li sen neceso vendas malkare.

—Estas en via rakonto unu afero, al kiu mi ne povas ne fiksi la pensojn, diris Toke al Sigurd; kaj ĝi estas la trezorkesto de via patro Bue, kiun li prenis kun si en la maron. Ĉu vi sukcesis ĝin suprenlevi antaŭ ol vi forlasis Norvegujon, aŭ ĉu iu alia ĝin levis? Se ĝi ankoraŭ kuŝas sur la marfundo, mi scias, kion fari, se venos mi al Norvegujo: mi serĉus per graplo la keston; ĉar la arĝento de Bue valorus la penon.

—Tre serĉadis tiun keston, diris Sigurd, kaj la norvegoj kaj ni, kiuj restis post Bue. Multaj graploserĉis per alhokiloj el fero, sed nenio alkroĉiĝis; kaj viro de Viken plonĝis kun ŝnuro kaj ne estis plu vidata. Post tio ĉiuj kredis, ke Bue estas potenca reteni sian keston tie malsupre kaj forte ekpreni tiujn, kiuj provas ĝin tuŝi. Ĉar li estis viro tre forta kaj tre domaĝis sian arĝenton. Kaj sciantaj homoj akordas pri tio, ke la forto de tiuj, kiuj loĝas en teraj tombaltaĵoj, estas pli granda ol tiu de la vivantoj; kaj tio povas validi ankaŭ por Bue malgraŭ tio, ke li ne sidas en tombaltaĵo, sed sur la marfundo apud sia kesto.

—Domaĝe pri la arĝento, diris Toke; sed tio estas vero, ke eĉ la plej brava viro povus deziri al si ĉion alian prefere ol senti ĉirkaŭ si la brakojn de Bue Dika sub la akvo.

Per tio tiu vespero finiĝis; kaj en la sekvanta vespero reĝo Harald deziris aŭdi pri la aventuroj de Styrbjörn inter vendoj kaj kuroj. Styrbjörn diris, ke li mem ne estas kompetenta rakontanto; sed islandano en lia akompanantaro ekparolis. Li nomiĝis Björn Åsbrandsson kaj estis fama batalulo kaj ankaŭ granda poeto samkiel ĉiuj vojagantaj viroj de Islando; kaj malgraŭ tio, ke li nun estis iom ebria, li komence kun granda lerteco eldiris versojn al reĝo Harald

en metro nomata toeglago. Ĝi estis la plej moderna kaj plej malfacila versmetro ĉe islandaj poetoj, kaj la versoj estis tiel arte kompilitaj, ke malmulto estis komprenebla el ilia enhavo. Ĉiuj aŭskultis kun saĝa mieno, ĉar nekompreno de poezio donis malbonan reputacion; kaj reĝo Harald laŭdis la versojn kaj donis al la poeto oran ringon. Toke sin apogis kontraŭ la tablo kun la kapo sur la manoj kaj suspiris; li malgaje murmuris, ke tio estas vera poeteco; kaj nun li komprenas, li diris, ke li mem neniam kapablos fari versojn tiaspecajn, kiuj alportas orajn ringojn.

La viro de Islando, kiun iuj nomis Björn Bredvikingakappe, kaj kiu pasigis du somerojn kun Styrbjörn, post tio daŭrigis rakontante pri la militiroj de Styrbjörn kaj rimarkindaj aferoj, kiuj dum tiuj okazis; bone kaj longe li parolis sen tio, ke iu enuiĝis aŭskulti; kaj ĉiuj sciis, ke tio, kion li rakontas, estas vero, ĉar Styrbjörn mem aŭskultis. Multon li povis diri pri bravaj entreprenoj kaj pri la granda bonŝanco de Styrbjörn kaj ankaŭ pri riĉaĵoj, kiujn akiris liaj ŝipanoj. Li metis finon al sia rakonto eldirante malnovan poemon pri la prapatroj de Styrbjörn, ekde la dioj ĝis lia onklo Erik, kiu nun sidis en Upsalo; kaj la lastan strofon li mem aldonis:

For al nord'  
hered-eltordi  
Styrbjörn cent  
kilfortojn remas;  
bravaj viroj  
venkoravaj  
lordos tuj  
sur Erik-bordoj.

Per laŭta jubilo oni salutis tion; kaj multaj eksaltis de siaj sidlo-

koj kaj tostis por la bonŝanco de Styrbjörn. Styrbjörn alvenigis multekostan trinkpokalon kaj ĝin donis al la poeto kaj diris:

—Ĉi tio ne estas plena poetrekompenco por vi; pli vi ricevos, kiam mi sidos en Upsalo. Tie estos bona rekompenco al ĉiu, kiu min akompanos, ĉar mia onklo Erik estas ŝparema homo, kiu multon staplis, kio povos fariĝi utila. Printempe mi iros tien por malfermi liajn kestojn, kaj kiuj volas partopreni, tiujn mi bonvenigas.

Inter la viroj de reĝo Harald kaj de reĝo Sven sin trovis multaj, kiuj sentis ekscitiĝon pro tio kaj tuj kriis, ke ili volas partopreni; ĉar famo ĉirkaŭis la riĉaĵon de reĝo Erik, kaj neniam post la epoko de Ivar Vidfamne Upsalo estis prirabita. Jarlo Sibbe de la Malgrandinsuloj estis ebria, kaj estis malfacile al li regi la stiradon de siaj kapo kaj bierkruĉo; sed li tamen per laŭta voĉo kriis, ke li intencas akompani Styrbjörn kun kvin ŝipoj; ĉar li nun komencis sin senti laca kaj ne tute sana, kaj estus pli bone morti inter bataluloj ol kiel bovino sur pajlo. Reĝo Harald diris, ke li siaparte estas tro maljuna por militekskursi; kaj siajn proprajn virojn li bezonas hejme por regi maltrankvilulojn; sed li nenion kontraŭdiros, li diris, se Sven volas helpi al Styrbjörn per ŝipoj kaj ŝipanoj.

Reĝo Sven kraĉis pensmiene kaj trinkis gluton kaj ludis per sia barbo kaj diris, ke al li estas maloportune malhavi siajn ŝipojn kaj ŝipanojn, ĉar ĉiuj el ili estos bone uzataj kontraŭ saksoj kaj obotritoj.

—Ŝajnas al mi plej akcepteble, li diris, ke mia patro donu tiun helpon; ĉar nun, kiam li estas maljuna, liaj viroj havas malmultan okupon krom sin adapti al manĝohoroj kaj aŭskulti pastran babilaĉon.

Kolero kaptis reĝon Harald ĉe tiu parolo, tiel ke granda malkvieto leviĝis en la halo, kaj diris la reĝo, ke li facile komprenas, ke Sven volas, ke li sidu sen armiloj en la lando.

—Sed nun estos tiel, kiel diras mi, li kriis kaj lia vizaĝo estis tre ruĝa; ĉar mi kaj neniu alia estas dana reĝo; kaj vi, Sven, donos al Styrbjörn ŝipojn kaj ŝipanojn.

Reĝo Sven sidis silenta, ĉar li havis timon pro la kolero de sia patro; kaj oni povis rimarki, ke multaj el liaj viroj deziras kuniri al Upsalo. Tiam Styrbjörn diris:

—Min ĝojigas vidi, ke vi ambaŭ havas fervoron havigi al mi helpon; kaj por mi estos plej avantaĝe ke vi, Harald, decidu, kion sendu Sven, kaj ke vi, Sven, diru, kioman helpon donu via patro.

Ĉe tio multaj ekridis kaj la konkordo ree pliboniĝis; kaj fine estis decidite, ke Harald kaj Sven asistu al Styrbjörn per po dek du ŝipoj, bone ekipitaj, krom la ŝipoj kaj ŝipanoj, kiujn li povos ricevi de la skanianoj; kaj kompense Harald kaj Sven havu parton de la trezoroj de Erik. Kaj per tio finiĝis tiu vespero.

En la sekvanta tago la julolardo estis jam elĉerpita; anstataŭe brasiksupo kaj ŝafoviando estis metitaj sur la tabloj, kaj ĉiuj trovis tion bongusta ŝanĝo. En tiu vespero viro de Halland rakontis pri granda geedziĝo, kiun li partoprenis en Finnveden ĉe la sovaĝaj smolandanoj. Tie leviĝis malkonkordo pri ĉevalnegoco, kaj rapide enmaniĝis la tranĉiloj; kaj la ekedzino kaj la fraŭlinoj ridis kaj aplaŭdis per la manoj kaj kuraĝigis la kverelantojn. Sed kiam la edzino, kiu devenis de bonreputacia familio, vidis unu el la parencoj de la edzo elpremi okulon de ŝia onklo, ŝi kaptis al si torĉon de la muro kaj frapis per ĝi la edzon sur la kapon, tiel ke ekbrulis liaj haroj; kaj rimedkonscia fraŭlino sian jupon volvis ĉirkaŭ lian kapon kaj forte ĝin alpremis kaj tiel savis lian vivon, kvankam li multe kriis kaj estis bruliĝinta nigra kaj kalva, kiam li ree montris la kapon. El tio venis fajro en la plankopajlon; kaj dek unu ebriaj kaj vunditaj mortis en la flamoj; tiel ke tiu geedziĝo ĉe ĉiuj homoj en Finnveden posedis la reputacion, ke ĝi estis plenvalida grandgeedziĝofesto, pri kiu

indas paroli. Kaj la edzino nun feliĉe vivas kun sia edzo, kvankam novajn harojn anstataŭ la brulintaj li ne ricevis.

Kiam finiĝis ĉi tiu rakonto, reĝo Harald diris, ke li ŝatas aŭdi tiajn gajajn aferojn pri la vivado de la smolandanoj, kiuj laŭ naturo estas friponoj kaj perfortuloj; kaj episkopo Poppo devas danki al Dio kiel eble plej ofte, li diris, ke li venis al decaj homoj en Danlando kaj ne al la malica rabistaro en Finnveden aŭ Värend.

—Kaj nun, reĝo Harald daŭrigis, mi volas, ke ni morgaŭ aŭdu pri la lando de la andaluzoj kaj pri ĉio rimarkinda, kio okazis al Orm Tostesson kaj Toke Grågullesson dum ilia vojaĝo; ĉar mi pensas, ke tio povos esti plezuro por ni ĉiuj.

Per tio finiĝis tiu vespero; kaj en la sekvanta mateno Orm kaj Toke konsiliĝis pri tio, kiu rakontu.

—Vi estas nia ĉefulo, diris Toke; kaj tial vi parolu.

—Vi partoprenis antaŭ ol mi aliĝis al la vojaĝo, diris Orm; kaj vi estas pli babilema ol mi; kaj jam urĝas, ke vi parolu ĝissate; ĉar ŝajnis al mi, ke foje dum ĉi tiuj vesperoj estas al vi malfacile silenti, dum aliaj rakontas.

—Paroli mi ne timas, diris Toke; kaj mi kredas, ke mia lango estas same eltenema kiel tiu de la pli multaj. Sed tamen sin trovas en tiu afero malfacilaĵo por mi. Mi ne povas paroli ne trinkante multe da biero, ĉar sekeco ekestas en mia gorĝo; kaj ĉi tiu rakonto estos longa. Kvar vesperojn jam mi estis sukcesa, tiel ke neebria kaj pacema mi forlasis la tablon de la reĝo, kaj tamen estis malfacile malgraŭ tio, ke ne multe mi parolis. Kaj estus malbone, se mi nun falus en malbonhumoron kaj ricevus reputacion pri malbona konduto, kiam mi sidas ĉe tablo de reĝoj.

—Ni havu esperon, diris Orm; kaj eĉ se vi fariĝos ebria ĉe la rakontado, vi apenaŭ povos fariĝi malbonhumora kaj batalema pro tiel bona biero.

—Estu, kiel estos, diris Toke kun dubo kaj skuis la kapon.

En tiu vespero Toke rakontis pri la ekspedicio de Krok kaj ĉion pri ĝi: kiel Orm enŝipiĝis, kaj kiel ili trovis la judon en la maro kaj pri la granda prirabo de la fortikaĵo en la regno de Ramiro; kaj post tio pri la batalo kontraŭ la andaluzoj kaj kiel ili malbonfartis kiel remsklavoj kaj pri la morto de Krok. Post tio li rakontis, kiel ili liberiĝis de la remado kaj pri la amikeco de la judo kaj kiel ili ricevis siajn glavojn de Subaida.

Kiam li venis al tiu punkto, reĝo Harald kaj Styrbjörn volis vidi la glavojn; kaj Orm kaj Toke pasigis Blulangon kaj Ruĝbekon laŭlonge de la tablo. Reĝo Harald kaj Styrbjörn ilin elingigis kaj pesis per mano kaj zorge ilin ekzamenis; kaj ambaŭ tenis la opinion, ke ili neniam vidis pli bonajn glavojn. Post tio la glavoj pasis ĉirkaŭ la tablo, ĉar multaj scivolemis pri tiaj armiloj; kaj Orm sidis maltrankvila, ĝis ili revenis, ĉar li sin sentis soleca kaj duone nuda sen Blulango.

Oblikve kontraŭ Orm kaj Toke sidis du fratoj, kiuj nomiĝis Sigtrygg kaj Dyre kaj apartenis al la sekvantaro de reĝo Sven; Sigtrygg estis prubatalulo en la ŝipo de reĝo Sven mem. Li estis granda kaj fortika kaj portis larĝan kaj senbride kreskintan barbon, kiu atingis ĝis liaj okuloj. Dyre, lia frato, estis pli juna, kaj ankaŭ li estis konsiderata unu el la plej bravaj viroj de reĝo Sven. Orm rimarkis, ke Sigtrygg de post kelka tempo rigardis malice lin kaj Toke, kaj kiam nun la glavoj venis al li, li zorge ilin ekzamenis kaj kapklinis kaj aspektis, kvazaŭ estus por li malfacile ilin transdoni.

Reĝo Sven, kiu ŝatis aŭskulti rakontojn pri foraj landoj, nun instigis Toke daŭrigi; kaj Toke, kiu diligente ĝuis bieron dum sia ripozpaŭzo, diris, ke li estas preta daŭrigi, tuj kiam la viroj kontraŭ li ĉesos prigapi lian glavon kaj tiun de Orm. Tiam Sigtrygg kaj Dyre

transdonis la glavojn, nenion dirante, kaj Toke rekomencis sian rakonton.

Li nun rakontis pri Almansur kaj ties potenco kaj riĉaĵoj, kiel ili ekservis en lia gvardio kaj devis partopreni la adoradon de lia Profeto per sinklinoj kaj abnegacioj kaj pri la militiroj, kiujn ili partoprenis, kaj pri la predo, kiun ili akiris. Li venis al ilia marŝo tra la Malplena Lando kontraŭ la tombon de Sankta Jakobo kaj rakontis, kiel Orm savis la vivon de Almansur kaj ricevis danke la grandan orĉenon. Tiam reĝo Harald diris:

—Se vi ankoraŭ posedas tiun ĉenon, Orm, mi tre deziras, ke vi ĝin montru; ĉar se ĝi estas same bonkvalita inter kostaĵoj kiel viaj glavoj inter armiloj, tiam ĝi estas vidinda.

—Mi ankoraŭ ĝin posedas, respondis Orm, kaj intencas ĝin posedi ĉiam; kaj ĉiam ŝajnis al mi plej saĝe ĝin kiel eble malplej montri; ĉar sufiĉe bona ĝi estas por veki deziron ĉe ĉiuj krom reĝoj kaj plej altrangaj granduloj. Sed estus malbonkondute, se mi rifuzus ĝin montri al vi, reĝa mastro, kaj al reĝo Sven kaj al reĝo Styrbjörn kaj al la jarloj; sed estus bone, se vi ne pasigus ĝin al la aliaj.

Ĉe tiuj vortoj Orm malligis sian vestaĵon kaj elprenis la ĉenon, kiun li portis ĉirkaŭ sia kolo, kaj ĝin transdonis al Hallbjörn stalisto, kiu sidis dekstre de li; Hallbjörn ĝin etendis trans la loko de episkopo Poppo al reĝo Harald; ĉar la loko de la episkopo estis malplena, ĉar li malfortiĝis pro la juldrinkado kaj kuŝis en lito flegata de frato Willibald.

Reĝo Harald ekzamenis la ĉenon kaj ĝin levis kontraŭ la lumon por pli bone vidi ĝian belecon. Li diris, ke dum sia tuta vivo li kolektis juvelojn kaj kostaĵojn kaj ke li tamen ne vidis ion pli belan ol ĉi tiun. La ĉeno konsistis el dikaj platoj el pura oro; ĉiu plato havis longon de pli ol unu colo kaj larĝon de poleksungo meze, kie ĝi estis plej larĝa, kaj estis malpli larĝa ĉe la finoj; tie estis ringetoj, kiuj

ĝin fiksis al proksimaj platoj. Kune la ĉeno konsistis el tridek ses platoj, kaj ĉiu dua havis sur sia mezo ruĝan juvelŝtonon, kaj la aliaj havis verdan.

Kiam Styrbjörn ricevis la ĉenon en sian manon, li diris, ke ĝi vere estas forĝaĵo de Vaulunder, sed ke li kredas, ke same belaj ornamaĵoj troviĝas en la kestoj de lia onklo; kaj reĝo Sven opiniis, kiam ĝi venis al li, ke ĝi estas trezoro tia, por kiu batalulo volonte verŝus sian sangon, kaj reĝofilinoj fordonus sian virgecon.

Post kiam Thorkel Höge ekzamenis la ĉenon kaj ĝin laŭdis kiel la aliaj, li ĝin etendis diagonale trans la tablo al Orm. Tiam Sigtrygg sin klinis antaŭen kaj provis ĝin pinĉi, sed Orm estis pli rapida kaj ĝin altiris al si.

—Kion vi provas? li diris al Sigtrygg. Mi ne aŭdis, ke vi estas reĝo nek jarlo, kaj aliaj ĝin ne fingrumu.

—Mi volas batali kontraŭ vi pri la ornamaĵo, diris Sigtrygg.

—Povas esti, ke vi volas, diris Orm; ĉar vi ŝajnas al mi avida homo sen prudento. Sed mia konsilo estas, ke vi tiru viajn fingrojn al vi kaj lasu prudentajn homojn en paco.

—Vi timas lukti kun mi, kriis Sigtrygg; sed vi luktu, aŭ transdonu la ĉenon; ĉar mi havas kverelkaŭzon kontraŭ vi jam de longe, kaj la ĉenon mi postulas kiel rekompencon.

—Devas esti, ke vi malbone toleras bieron, tiel ke vi parolas en deliro, diris Orm; ĉar neniam mi vin vidis antaŭ ĉi tiu festeno, kaj tial ne eblas, ke vi havas kverelkaŭzon kontraŭ mi. Kaj nun, li daŭrigis kun komenciĝanta malpacienco, vi agas plej saĝe, se vi sidas silenta kaj vin tenas kvieta, antaŭ ol mi petas permeson de reĝo Harald tordi al vi la nazon. Mi estas pacemulo, kaj ne volonte tuŝas tian nazon kiel la vian; sed ŝajnas al mi, ke vi bezonas riproĉon eĉ de la plej tolerema persono.

Sigtrygg estis grandega batalulo, timata pro siaj forto kaj per-

fortemo, kaj ne kutimis al tia alparolo. Li eksaltis de la benko kaj blekis kiel bovo kaj kriis insultojn; sed eĉ pli potence sonis la voĉo de reĝo Harald, kiam li kolera ordonis trankvilon kaj demandis, kio kaŭzas la tumulton.

—Ĉi tiu viro, reĝa mastro, diris Orm, freneziĝis pro via bongusta biero kaj sia propra avido; ĉar li krias pro mia ĉeno kaj diras, ke li havas kverelkaŭzon kontraŭ mi, malgraŭ tio, ke mi lin neniam vidis.

Reĝo Harald plendis, ke ĉiam la viroj de Sven kaŭzas ĝenojn, kaj per severa voĉo li demandis Sigtrygg, kial li ne prudente povas sin regi, post kiam li tamen aŭdis, ke la paco kaj de Kristo kaj de reĝo Harald regu en la halo.

—Reĝa mastro, diris Sigtrygg, mi diros kiel ĉio estas, kaj vi trovos, ke mia rajto havas bazon. Antaŭ sep jaroj mi suferis damaĝon, kaj nun mi aŭdis, ke ĉi tiuj du personoj parte kaŭzis ĝin. En tiu somero mi hejmenvojis de la sudlandoj kun kvar ŝipoj, Bork Hvenske kaj Silverpalle kaj Faravid Svensson kaj mi; ni tiam renkontis tri ŝipojn kaj parolis kun ili, kaj el la rakonto de Toke mi nun scias, kiuj estis la ŝipoj. Kaj en mia ŝipo estis sklavo de Hispanujo, nigrahara kaj flavhaŭta; li saltis en la maron dum la interparolo kaj prenis kun si mian bofraton Oskel, bravan viron, kaj ni ne vidis ilin poste. Kaj nun ni ĉiuj aŭdis, ke tiu sklavo enŝipiĝis ĉe ili kaj estis tiu, kiun ili nomas judo Salaman, kaj kiu estis al ili utila. Tiuj du, kiuj nun sidas ĉi tie, Orm kaj Toke, lin tiris el la maro; ni tion aŭdis el la buŝo de unu el ili. Tia sklavo povus doni al mi grandan profiton; kaj tiu Orm nun estas ĉefulo super tiuj, kiuj estis en la ŝipo de Krok kaj ankoraŭ vivas, kaj tial estas juste, ke li kompensu min pro la damaĝo, kiun mi suferis. Tial mi postulas de vi, Orm, ke vi donu al mi la ĉenon kiel kompensaĵon pro la sklavo kaj mia bofrato, egale ĉu vi donos ĝin propravole al mi aŭ ĉu vi min renkontos por lukto ekstere, sur pla-

tigita grundo, kun ŝildo kaj glavo, nun tuj. Vin mortigi mi ĉiukaze devas, post kiam vi diris, ke vi volas tordi mian nazon; ĉar al mi, Sigtrygg, filo de Stigand, prubatalulo de reĝo Sven, neniu diris insultajn vortojn kaj poste vivis ĝis la fino de la tago.

—Du aferoj min konsolas, kiam mi aŭdas vin paroli, diris Orm. Unu estas, ke la ĉeno apartenas al mi kaj ankaŭ apartenos, egale kiu ajn saltis en la maron el via ŝipo antaŭ sep jaroj. La dua estas, ke ankaŭ mi kaj Blulango havas ian influon al tio, ĉu vi aŭ mi vivos pli longe. Sed nun ni komence aŭskultu, kion diras reĝo Harald pri ĉi tio.

Ĉiuj en la halo ĝojis pro tio, ke sin prezentas ebleco de interlukto; ĉar lukto inter du tiaj viroj, kiaj Orm kaj Sigtrygg, estos certe vidinda. Reĝo Sven kaj Styrbjörn esprimis, ke tio estos bonvena interrompo en la juldrinkado; sed reĝo Harald sidis pensema karesante la barbon kaj aspektis hezitema. Fine li diris:

—Malfacile estas juĝi juste en tio ĉi; kaj al mi ne aperas certe, ke Sigtrygg rajte povas postuli kompensaĵon de Orm pro damaĝo ne kaŭzita de Orm. Sed estas vero, ke neniu volas perdi bonan sklavon kaj bofraton ne dezirante eblecon postuli kompensaĵon pro tia damaĝo. Kaj nun, post interŝanĝo de insultoj, estos en ĉiu kazo batalo inter ĉi tiuj du, tuj kiam ili estos ekster mia vido; kaj tia ĉeno, kiun Orm portas, certe jam multajn murdojn kaŭzis kaj tre verŝajne kaŭzos pliajn. Tial estas same bone, ke ili luktu tie ĉi, plezure por ni ĉiuj; kaj vi, Hallbjörn, zorgu pri tio, ke luktospaco ekstere estu ebenigita kaj markita, kie estas plej plata la grundo. Kaj dismetu torĉojn ĉirkaŭe kaj anoncu, kiam ĉio estas preta.

—Reĝa mastro, diris Orm per ĉagrena voĉo, tian duelon mi ne volas partopreni.

Ĉiuj lin rigardis, kaj Sigtrygg kaj multaj el la sekvantoj de reĝo Sven ridis. Reĝo Harald skuis la kapon kaj diris:

—Se vi timas lukton, mi alian eblecon ne vidas ol tiun, ke vi transdonu al li la ĉenon, ĉu utile aŭ ne por vi. Ŝajnis al mi, ke ĵus vi pli kuraĝe parolis.

—Ne pri la lukto mi pensas, diris Orm, sed pri la malvarmo. Ĉiam mi havis delikatan sanon, kaj malvarmon mi malplej toleras; kaj nenio por mi estas pli danĝera ol de varmo kaj biero iri al vespera malvarmo, precipe nun, kiam mi longe estis en la sudaj landoj kaj ne havas kutimon je vintra malvarmo. Kaj ne estas juste, ke mi pro tiu Sigtrygg suferu tusadon dum la resto de la vintro; ĉar tusado ordinare dum longa tempo sin kroĉas al mi, kaj ofte mia patrino diris, ke tusado kaj reŭmatismo kaŭzos mian morton, se ne mi min zorge gardos. Kaj se mi rajtus decidi, reĝa mastro, mi juĝus preferinde, ke la lukto okazu ĉi tie en la domo, antaŭ via tablo, kie estas sufiĉa spaco. Kaj tiel vi mem povus vidi la lukton sen ĉia ĝeno.

Multaj ridis pro la timo de Orm; sed Sigtrygg ne plu ridis, sed furioze kriis, ke li nuligos ĉiujn ĉagrenojn de Orm pri tusado. Sed Orm ne atentis pri li, sed sidis turniĝinta al reĝo Harald atendante lian decidon. Reĝo Harald diris:

—Estas ĉagrene, ke la junuloj komencas febliĝi kaj ne plu estas tiaj, kiaj en pasinta tempo. La filoj de Lodbrok ne pensis pri sano kaj vetero, kaj ankaŭ mi ne dum mia juneco; sed inter junuloj mi konas preskaŭ neniun krom Styrbjörn, kiu estas laŭ nia speco. Sed estas vero, ke nun je mia aĝo estas preferinde por mi rigardi la lukton de mia sidloko. Kaj bone estas, ke la episkopo estas en sia lito, ĉar li oponus tion ĉi. Sed laŭ mia penso la paco en la halo ne estos rompita de tio, kion mi mem permesas; kaj mi ne kredas, ke Kriston ofendos duelo, se ni ĉion aranĝos laŭ leĝo kaj moro. Tial Orm kaj Sigtrygg luktu tie ĉi en la ĉambro antaŭ mia tablo per glavo kaj ŝildo, helmo kaj maŝkiraso; kaj neniu donu al ili asiston en io alia ol en la sinvestado per la batalkostumo. Kaj se unu mortos, ĉio estas bona; sed se unu ne

plu kapablos stari sur siaj piedoj, aŭ forĵetos sian glavon aŭ fuĝos ĝis sub la tabloj, li ne plu estu atakata de la alia; sed la lukton li en tiu kazo malgajnis kaj kun ĝi la ĉenon. Kaj mi kaj Styrbjörn kaj Hallbjörn ĉefstalisto zorgos, ke ĉio okazu juste.

Nun viroj iris alporti la batalkostumojn al Orm kaj Sigtrygg; kaj granda bruo okazis en la halo, kaj multaj vokis unu al aliaj. La viroj de reĝo Harald juĝis Orm pli bona el la du; sed la viroj de reĝo Sven laŭdis Sigtrygg kaj diris, ke li faligis naŭ kontraŭulojn en dueloj, ricevante mem eĉ ne unu vundon bezonanta bandaĝon. Inter la plej parolemaj estis Dyre; li demandis Orm, ĉu li timas tusi en la tombo, kaj poste li sin turnis al sia frato kaj petis lin kontentiĝi ricevante mem la ĉenon kaj doni al li, Dyre, la glavon de Orm.

Post kiam okazis la interompo en lia rakontado, Toke sidis melankolia kaj murmuris por si kaj drinkis; sed kiam li aŭdis la vortojn de Dyre, vivo vekiĝis en li. Sian manĝotranĉilon li hakis en la tablotabulon antaŭ Dyre tiel forte, ke ĝi restis staranta profunde en la ligno, kaj ĵetis sian glavon, ankoraŭ en sia ingo, apud la tranĉilon; post tio li sin ĵetis trans la tablon tiel rapide, ke al Dyre ne restis tempo sin forklini, kaj kaptis lin je la oreloj kaj je la vangobarbo kaj premis lian vizaĝon malsupren kontraŭ la armilojn kaj diris:

—Jen vi vidas armilojn same bonajn kiel tiuj de Orm; sed ilin vi akiru mem, se vi ilin deziras; ne petu almoze de alia.

Dyre estis forta viro, kaj li metis siajn manojn ĉirkaŭ la manartikojn de Toke kaj forte tiris; sed tio kaŭzis dolorojn en barbo kaj oreloj, kaj li ĝemis kaj ne povis sin liberigi.

—Jen mi vin tenas en interparolo tre amika, diris Toke; ĉar la reĝan pacon ĉi tie mi ne volas ĝeni. Sed mi ne lasos vin, antaŭ ol vi promesos lukti kontraŭ mi; ĉar en senokupo Ruĝbeko ne trovas komforton, kiam ŝia fratino sin okupas.

—Lasu min, diris Dyre kun la buŝo premata al la tablo, mi vin mortigos, tuj kiam mi vin atingos.

—Nun vi promesis, diris Toke; ĉe tiuj vortoj li lin lasis kaj forblovis de siaj manplatoj iom da barbo, kiu malfiksiĝis.

La oreloj de Dyre estis ruĝaj, sed cetere li estis blanka pro furiozo kaj komence aspektis kvazaŭ malkapabla paroli. Li sin levis kaj diris:

—Ĉi tion mi reguligos kun vi tuj; kaj tio estas preferinda, ĉar tiel mi kaj mia frato ricevos po unu el la hispanaj glavoj. Ni iru pisi kune ne forgesante kunporti la glavojn.

—Ĝuste vi parolis, diris Toke, ĉar inter ni solenaĵoj ne estas bezonataj. Kaj pro tio mi estos al vi danka tiel longe, kiel vi vivos; kaj kiel longe, tion ni vidos.

Ili iris ambaŭ laŭ sia flanko de la reĝa tablo kaj post tio ŝultro ĉe ŝultro laŭ la irejo malantaŭ la perpendiklaj tabloj kaj eksteren tra unu el la pordoj en la gabla domoflanko. Reĝo Sven ilin rigardis kaj ridetis; ĉar li ŝatis, ke liaj subuloj aldonu al sia famo kaj al timego, kiun ili disvastigis.

Nun Orm kaj Sigtrygg sin vestis por lukto; kaj la plankon oni balais, kie ili luktos, tiel ke ili ne stumblu en la pajlo aŭ super ostoj ĵetitaj al la hundoj de reĝo Harald. La viroj en ambaŭ ekstremoj de la halo sin interpuŝis ĝis kie ili vidos pli bone kaj stariĝadis dense sur benkoj kaj transversaj tabloj ambaŭflanke de la malplena spaco kaj malantaŭ la tablo de reĝo Harald kaj laŭ la muro de la kvara domoflanko. Reĝo Harald nun montris plej gajan humoron kaj havis fervoron vidi la batalon; kaj kiam li hazarde sin turnis kaj vidis iujn el siaj virinoj malfermeti pordon kaj enrigardi, tiam li ordonis, ke liaj virinoj kaj filinoj envenu kaj rigardu; ĉar estus senkompate, li opiniis, rifuzi al ili tian spektaklon. Li cedis al iuj el ili sidspacon sur la ĉefbenko ĉe sia flanko kaj sur la malplena loko de la episkopo; kaj

du el la plej belaj filinoj ricevis sidlokon apud Styrbjörn kaj ne plendis pri manka spaco; ili karesiĝeme ridis, kiam li ilin regalis per biero, kaj ili brave trinkis. Al tiuj virinoj, kiuj ne trovis spacon sur la ĉefbenko, alia benko estis metita malantaŭ la tablo, kie la ĉefbenko ne ĝenis la vidon.

Stalĉefo Hallbjörn ordonis blovadon de korno kaj silenton kaj proklamis, ke neniu moviĝadu dum la lukto kaj ke neniu rajtas kriadi konsilojn al la batalantoj aŭ ĵeti objektojn sur la batalejon. Ambaŭ nun estis pretaj kaj eniris la batalspacon unu kontraŭ la alia; kaj kiam oni vidis Orm teni la glavon en sia maldekstra mano, aŭdiĝis fervora murmurado; ĉar lukto inter dekstramanulo kaj maldekstramanulo estas tre malfacila por ambaŭ, ĉar tiam la hakoj venas de inversa flanko, kaj la ŝildoj malpli bone ŝirmas.

Ambaŭ aperis kiel bataluloj, kiujn malmultaj renkontus propravole, kaj ĉe neniu el ili estis rimarkebla timo pri la fino. Orm estis duonkapon pli alta ol Sigtrygg kaj havis pli longajn brakojn; sed Sigtrygg estis pli fortika kaj aspektis pli forta. Ili tenis la ŝirmilojn bone kovrantaj la bruston kaj sufiĉe alte por rapide povi kovri la kolon kaj fiksis la rigardon unu sur la alia por sin teni preta kontraŭ ĉiu atako. Tuj kiam ili interproksimiĝis, Orm atakis kontraŭ la kruroj de Sigtrygg; sed tiu rapide flankensaltis kaj rebatis per frapo, kiu brue trafis la helmon. Post tio ambaŭ fariĝis singardaj kaj kaptis ĉiujn hakojn per la ŝildoj; kaj reĝo Harald klarigis al siaj virinoj, ke estas avantaĝo, kiam spertuloj luktas, ĉar ili ne forgesas pro fervoro sin gardi, kaj pro tio la plezuro daŭras pli longe.

—Antaŭdiri estas malfacile ankaŭ por tiu, kiu multon vidis, kiu ĉi tie venkos, li diris; sed la ruĝulo ŝajnas al mi esti unu el la plej lertaj viroj, kiujn mi vidis, malgraŭ tio, ke li timas malvarmon; kaj povas esti, ke Sven perdos subulon en ĉi tio.

Reĝo Sven, kiu same kiel ambaŭ jarloj eksidis sur tablorando

por sidi turnita al la lukto, malestime ridetis kaj diris, ke neniu konanta Sigtrygg bezonas sin ĉagreni pri tio.

—Kaj malgraŭ tio, ke miaj bataluloj ne timas duelojn, li diris, mi malofte iun tiamaniere perdas, krom kiam ili duelas inter si.

Nun Toke revenis. Li lamis kaj oni aŭdis lin murmuri versaĵon; kaj kiam li faris paŝon trans la benko al sia sidloko, fariĝis videble, ke sango fluas de unu femuro.

—Kiel pri Dyre? demandis Sigurd Buesson.

—Li rabis tempon, diris Toke; sed nun li finpisis.

Nun ĉies okuloj sin direktis al la lukto, kies finon Sigtrygg ŝajnis urĝe alstrebi. Li kolere atakis kaj provis trafi la krurojn kaj vizaĝon de Orm kaj la fingrojn de lia glavmano. Orm sin sukcese defendis kontraŭ la hakoj, sed ŝajnis, ke li mem ne multon faras, kaj rimarkeble la ŝildo de Sigtrygg lin ĝenis. Ĝi estis pli granda ol lia kaj konsistis el rezistema ligno kovrita de alnajlita dika ledo, kaj nur la meza umbo estis el fero; estus danĝere, se la glavo fiksiĝus en la ŝildrando, ĉar en tiu kazo ĝi povus rompiĝi aŭ esti tordita el la mano. La ŝildo de Orm konsistis tute el fero kaj havis akrepintan pikilon.

Sigtrygg rikanis kontraŭ Orm kaj demandis, ĉu al li estas sufiĉe varme.

Sango fluis sur la vango de Orm post la unua frapo sur la helmo, kaj li ankaŭ estis ricevinta pikon en la kruro kaj tranĉon sur la mano; Sigtrygg ankoraŭ estis nevundita. Orm nenion respondis, sed cedis futon post futo malantaŭen laŭlonge de unu transversa tablo. Sigtrygg kaŭris malantaŭ sia ŝildo kaj sin ĵetis antaŭen kaj flanken kaj atakis ĉiam pli intense, kaj por la plimulto lia venko ŝajnis proksima.

Subite Orm faris salton antaŭen kaj deturnis la hakon de Sigtrygg per la glavo kaj per sia tuta forto puŝis sian ŝildon kontraŭ lian, tiel ke la ŝirmilpikilo penetris tra ledo kaj ligno kaj firme fik-

siĝis. Li premegis la ŝildojn suben tiel forte, ke la ŝildoteniloj de ambaŭ rompiĝis, kaj ambaŭ nun retropaŝis kaj ekhavis spacon por ataki per la glavoj, kaj ili samtempe hakis. La hako de Sigtrygg trafis la flankon de Orm kaj faris truon en la maŝkiraso kaj profundan vundon; sed la hako de Orm trafis la kolon; kaj laŭta krio sonis en la halo, kiam la kapo dekoliĝis kaj faris resalteton sur la tablorando kaj falis en la bierbarelon ĉe la ekstremo de la tablo.

Orm ŝanceliĝis kaj sin apogis kontraŭ la tablon; li viŝis la glavon glitigante ĝin sur la genuo kaj ĝin repuŝis en la ingon kaj rigardis la senkapan korpon ĉe siaj piedoj.

—Jen vi vidas, li diris, kies la ĉeno.

DEKA ĈAPITRO

## Kiel Orm perdis sian kolĉenon.

La duelon pro la kolĉeno oni multe priparolis en la domoj de la reĝo, en la halo kaj en la kuirejo kaj en virinkameroj. Ĉiuj, kiuj vidis la lukton, zorge enmemorigis ĉion, kio okazis kaj kion oni diris, por ke ili havu interesaĵon por rakonti estontece al aliaj. La kapto de la ŝildo fare de Orm ricevis multan laŭdon, kaj la islandano de Styrbjörn la sekvintan vesperon eldiris versojn en ljodahatro pri la damaĝo perdi sian kapon en bierbarelon. Ĉiuj tenis la opinion, ke oni eĉ ĉe reĝo Harald ne ĉiujare tiel bone celebras julon.

Sed Orm kaj Toke devis kuŝi en litoj kun siaj vundoj kaj havis malmultan komforton dum kelka tempo malgraŭ tio, ke frato Willibald ilin prizorgis per siaj plej efikaj ungventoj. Ŝvelaĵo ekestis en la vundo de Toke, tiel ke li de tempo al tempo deliris kaj fariĝis danĝera kaj kvar viroj devis lin teni, kiam la vundo estis prizorgata; kaj Orm, al kiu estis dishakitaj du ripoj kaj kiu perdis multe da sango, sin sentis dolora kaj senfortega kaj ordinaran apetiton ne havis. Li tion konsideris malbona signo kaj fariĝis pezhumora.

Reĝo Harald disponigis al ili bonan kameron kun varmo venanta el masonita fajrujo kaj kun fojno en la litoj anstataŭ pajlo. Multaj el la subuloj de la reĝo kaj de Styrbjörn venis tien la unuan tagon por babili pri la lukto kaj ŝerci pri la kolero de reĝo Sven, kaj la kamero estis plena de viroj kaj bruo, ĝis frato Willibald per akra voĉo ilin ĉiujn elpelis; kaj Orm kaj Toke ne estis certaj, ĉu al ili estas mal-

pli komforte, kiam ili havas societon aŭ kiam ili estas solaj. Nun ili ankaŭ disiĝis de siaj kunŝipanoj, kiuj nun post la julfesteno volis hejmeniri; ĉiuj krom Rapp, kiu ne ĝuis pacon en sia hejmregiono kaj tial restis. Ĉar post malmultaj tagoj, kiam jam ŝtormo blovadis, la glacio disfendiĝis, kaj reĝo Sven mornmiena forlasis Jellinge al neniu dirinte multajn vortojn. Styrbjörn adiaŭis reĝon Harald, ĉar li havis urĝon ĉirkaŭkuri por kunvoki ŝipanojn por sia ekspedicio; kaj la ŝipanoj de Orm ricevis spacon en lia ŝipo kontraŭ la kompenso, ke ili remu kiel la aliaj. Styrbjörn volonte havus Orm kaj Toke inter siaj propraj ŝipanoj; li mem ilin vizitis en ilia kamero kaj diris, ke ili bone aldonis al la julplezuroj kaj ke ili nun ne longe kuŝu kun siaj vundetoj frotante la fojnon.

—Kaj mi vin vidu sur Bornholmo, kiam la gruoj ekflugos, li diris; ĉar por tiel bravaj viroj mi havas spacon en la pruo de mia propra ŝipo.

Li foriris ne atendante respondon, fervore okupata de urĝaj aferoj; kaj jen ĉio, kion ili parolis kun Styrbjörn. Ili dum kelka tempo kuŝis silentaj; post tio Toke diris:

> Ĝoja por mi estos hor',
> kiam mi vidos, ke
> gru', cikoni', anser'
> flugas al nord' okaze.

Sed Orm melankolie respondis post pripenso:

> Fi al gruo; ĉar for
> estos mi en pere',
> kien talpo sub ter'
> palpas mortinton naze.

Kiam la plimulto de la gastoj jam forvojaĝis kaj la urĝo en la

kuirejo malkreskis, tiam frato Willibald kuirigis buljonon du fojojn ĉiutage al la du vunditoj por nutri iliajn fortojn; kaj tiam pro scivolemo kelkaj el la virinoj de la reĝo faris al si pretekston eniri ilian kameron kun la brogaĵo. Tion ili povis fari senĝene; ĉar reĝo Harald nun kuŝadis post la julmanĝado, kaj fratoj Willibald kaj Matthias plej ofte sin tenis ĉe li kune kun la episkopo por eldiri preĝojn kaj doni al li rimedojn purigajn por la sango kaj intestoj.

Kiu unua enŝovis sian kapon, estis la juna maŭra virino, kiun ili vidis, kiam ili unuafoje alpaŝis reĝon Harald; Toke laŭte vokis, kiam li ŝin ekvidis kaj ŝin petis proksimiĝi. Kun kruĉo kaj kulero ŝi envenis kaj eksidis ĉe Toke kaj komencis lin nutri; kaj kun ŝi alia envenis, kiu eksidis ĉe Orm. Estis juna virino, alta, belkreska kaj palhaŭta, kun grizaj okuloj kaj granda bela buŝo; ŝi havis malhelajn harojn kaj sukcenan ligilon ĉirkaŭ ili. Orm antaŭe ne ŝin vidis, sed estis videble, ke ŝi ne apartenas al la servistinoj.

Gluti la brogaĵon estis por Orm malfacile, ĉar pro sia vundo li ne povis sidi, kaj buŝpleno eniris lian spirgorĝon, kaj li ektusis. Ekdoloris tiam la vundo, tiel ke li fariĝis malbonhumora kaj ĝemis. La junulino ridetis, kaj Orm ŝin morne alrigardis. Kiam la tusado forlasis lin, li diris:

—Kiel ridkaŭzo mi ne kuŝas ĉi tie. Kiu vi estas?

—Mi nomiĝas Ylva, ŝi diris; kaj ke vi estas ridkaŭzo, tion mi ne sciis antaŭ nun. Kiel eblas, ke vi plendopepas pro kulereto da varma supo, vi, kiu senkapigis la plej lertan batalulon de mia frato Sven?

—Ne pro la supo, diris Orm; eĉ virino devus kompreni, ke vundo, kian mi havas, doloras. Sed se vi estas fratino de reĝo Sven, vi eble min regalas per malbona supo; mi la guston ne ŝatas. Ĉu vi venis por venĝi pro la damaĝo, kiun mi kaŭzis al via frato?

La junulino ekstaris kaj ĵetis kruĉon kaj kuleron en la direkto de

la fajrujo, tiel ke la supo disŝprucis, kaj poste staris kolere rigardanta al Orm; sed poste ŝi mildiĝis kaj ekridis kaj denove eksidis sur la litrando.

—Vi ne timas montri, ke vi timas, ŝi diris, tiun laŭdon mi donas al vi; sed al kiu el ni ambaŭ pli multe mankas prudento, jen io, kio ŝvebas en malcerto. Sed mi vidis vian lukton kun Sigtrygg, kaj tio estis bona lukto; kaj tion sciu, ke neniu fariĝas mia malamiko pro tio, ke li damaĝas al mia frato Sven. Kaj Sigtrygg jam tro longe atendis sian morton. Fetoris el lia faŭko jam je distanco, kaj inter li kaj Sven okazis paroloj, ke li ricevu min kiel edzinon. Se tiel malfavore okazus, li dum multaj noktoj kiel edzo ne vivus, ĉar min ne kontentigas kiu ajn bruto. Sed nun mi ŝuldas al vi grandan dankon pro via helpo en ĉi tiu afero.

—Vi estas aroganta kaj senhonta kaj eble pli gratema ol multaj aliaj, diris Orm; sed supozeble reĝfilinoj estas tiaj. Kaj mi ne volas nei, ke vi ŝajnas al mi tro bona por tia, kia Sigtrygg. Sed al mi mem tiu lukto kaŭzis grandan damaĝon, kaj mi nun ne scias, kiaj estos por mi la sekvoj.

Mordante la pinton de sia lango per la dentoj Ylva kapjesis kaj aspektis pensema.

—Eble pli multaj ol vi kaj Sigtrygg kaj Sven suferis damaĝon kaj perdon pro tiu lukto, ŝi diris. Mi aŭdis pri via kolĉeno, kiun Sigtrygg deziris; laŭdire vi ĝin ricevis de la reĝo de la Sudlando, kaj ĝi estas plej bela el ĉiuj ornamaĵoj. Nun mi volas, ke vi ĝin montru al mi; kaj vi ne bezonas timi, ke mi ĝin prenos kaj forkuros, malgraŭ tio, ke ĝi povus esti mia, se Sigtrygg estus venkinta.

—Estas malavantaĝo ion posedi, kion ĉiuj volas palpi, diris Orm malgaje.

—Kial vi ĝin ne donis al Sigtrygg? diris Ylva. Tiukaze vi malhavus la ĉagrenon.

—Unu aferon mi jam scias, diris Orm, kvankam ne de longa tempo mi vin konas: kiu vin edzinigos, tiu nur malofte diros la lastan vorton.

—Mi ne kredas, ke vi ricevos peton elprovi la ĝustecon de via konjekto, diris Ylva; ne tia, kia vi aspektas, eĉ se vi havus kvin kolĉenojn. Kial vi ne petis al iu lavi viajn harojn kaj barbon? Vi ja aspektas pli malzorgita ol smolandano. Sed nun diru: ĉu vi montros al mi la kolĉenon aŭ ne?

—Estas malbona ago al malsanulo lin kompari kun smolandano, diris Orm. Miaj gepatroj ambaŭ devenas de respektindaj familioj; kaj Sven Ratnazo en Geingio estis duonfrato de la patro de mia avino, kaj lia avino apartenis al la familio de Vidfamne. Kaj nur pro mia malsano mi vin toleras kaj rezignas vin forpeli. Sed estas vero, ke mi volonte estus lavita malgraŭ tio, ke mi estas mizera; se vi faros al mi tiun servon, mi vidu, ĉu vi tion kapablos pli bone ol doni al mi supon. Sed ja povas esti, ke reĝofilino ne taŭgas por tiel utilaj aferoj.

—Vi taskas al mi servistinan okupon, diris Ylva, kaj tion neniu antaŭ vi kuraĝis; supozeble pro tio, ke vi devenas de Vidfamne. Sed estas vere, ke mi volonte vidus, kiel vi aspektas lavita; kaj mi venos frue morgaŭ matene, kaj tiam vi vidu, ĉu mi taŭgas por tio same bone kiel iu alia.

—Kombadon mi ankaŭ deziras, diris Orm; kaj kiam ĉio estos farita, tiel ke mi estos kontenta, tiam mi montros al vi la kolĉenon.

Nun regis maltrankvilo ĉe la lito de Toke. Li kapablis sidi kaj estis bonhumora pro la supo kaj la proksimo de virino. Ili interparolis en ŝia lingvo, kaj tion Toke faris stumble; sed des pli brave li uzis siajn manojn kaj klopodis ŝin tiri al si. Ŝi sin defendis kaj lin frapis sur la fingrojn per la kulero, sed ŝi ne sin fortiris pli ol necese kaj ne

aspektis malĝoja; kaj Toke laŭdis ŝiajn belaĵojn kiom li kapablis kaj malbenis sian vunditan gambon, kiu malhelpis al li sin movi.

Orm kaj Ylva sin turnis al ili, kiam ilia ludo fariĝis brua; Ylva ridetis, sed Orm montris malkontenton kaj kriis al Toke, ke li kondutu prudente kaj lasu la virinon.

—Kion vi kredas, ke reĝo Harald diros, li diris, se li aŭdos, ke vi karesis lian virinon super la genuoj?

—Eble li diros kiel vi, Orm, diris Ylva, ke estas malavantaĝo ion posedi, kion ĉiuj volas palpi. Sed de mi li nenion aŭdos, ĉar li havas tro da virinoj konsidere al sia aĝo, kaj ŝi, kompatindulino, sentas malmultan komforton ĉe ni kaj ofte ploras kaj estas malfacile konsolebla, ĉar ŝi malmulte komprenas, kion ni diras. Tial ne ŝin malhelpu petoli kun tiu, kun kiu ŝi povas paroli kaj kiu aspektas brava viro.

Sed Orm insistis, ke Toke devas sin reteni en tiaj aferoj, dum ili estas gastoj de reĝo Harald.

Toke jam reakiris sian trankvilon kaj retenis la virinon nur je unu ŝia harplektaĵo. Li havis la opinion, ke Orm sen neceso faras al si ĉagrenojn.

—Ĉar ne multo povos okazi, kion oni povos priklaĉi, li diris, dum mia kruro estas tia, kia nun; kaj vi mem, Orm, aŭdis la malgrandan pastron diri, ke la reĝo ordonis, ke ĉion oni faru, por ke ni havu komforton, pro la ĉagreno, kiun ni kaŭzis al reĝo Sven. Kaj mi tiel statas, kiel ĉiuj scias, ke mi havas malmultan komforton sen virinoj; kaj tiu ĉi ŝajnas al mi senkompara, malgraŭ mia malsano, kaj plej efika kuracilo, tiel ke mi jam min sentas pli sana. Mi diris al ŝi, ke ŝi venu ĉi tien kiel eble plej ofte por rapidigi mian saniĝon, kaj mi ne kredas, ke ŝi min timas malgraŭ tio, ke mi ŝin karesis.

Orm melankolie grumblis; sed fine estis decidite, ke ambaŭ virinoj venos venontmatene por lavi iliajn harojn kaj barbojn. Nun

frato Willibald venis en granda urĝo por flegi iliajn vundojn; li kolere kriis pro la elverŝita supo kaj elpelis la virinojn, kaj eĉ ne Ylva kuraĝis kontraŭdiri al li, ĉar ĉiuj timas tiun, kiu havas potencon super vivo kaj sano.

Kiam Orm kaj Toke ekestis solaj, ili kuŝis silentaj kaj havis iom por pripensi. Tiam Toke diris:

—Nun nia bonŝanco estas favora, de kiam virinoj trovis vojon al ni. Nun en la menso pli bona sento.

Sed Orm diris:

—Nun malbonŝanco estas proksima, se vi, Toke, ne povos bridi vian lascivon. Kaj estus bone, se mi estus pli certa, ke vi povos.

Toke diris, ke li havas bonan esperon pri la afero, se li nur serioze klopodos.

—Sed estas vero, li diris, ke ŝi apenaŭ havus emon rezisti, se mi estus sana kaj persista. Maljuna reĝo ne multe taŭgas por virino kiel ŝi, kaj oni rigore ŝin gardas ekde tiam, kiam ŝi venis ĉi tien. Ŝi nomiĝas Mirah kaj venas de Rhonda kaj de nobla familio; norduloj alvenintaj dum nokto ŝin rabis kaj forportis ŝin kaj multajn aliajn kaj ŝin vendis al la reĝo en Cork. Kaj tiu ŝin donis kiel amikdonacon al reĝo Harald pro ŝia beleco. Ŝi diras, ke ŝi taksus tiun honoron pli valora, se ŝi estus donita al iu pli juna, kun kiu ŝi povus paroli. Ne ofte mi vidis virinon bonegan kiel ŝi, tiel bele kreskintan kaj kun tiel glata haŭto. Sed ankaŭ tiu, kiu eksidis ĉe vi, indas laŭdon malgraŭ tio, ke ŝi eble ŝajnas al vi iom tro svelta kaj malgrasa. Ŝi ŝajnas favore agordita al vi; kaj eĉ tie ĉi oni povas rimarki, kiaj viroj ni estas, kiam ni kuŝante vunditaj akiras favoron de tiaj virinoj.

Sed Orm diris, ke li tute ne pensas pri amo de virinoj, ĉar li sin sentas ĉiam pli laca kaj pli mizera kaj eble ne longe restos vivanta.

Venontmatene, tuj kiam lumo aperis, la virinoj venis laŭpromese kaj kunportis varman lesivon, akvon kaj viŝtukojn; kaj al Orm kaj

Toke haroj kaj barboj estis lavitaj kun granda zorgo. Orm, kiu ne povis sidi, spertis ĝenon; sed Ylva lin subtenis kaj lin delikate traktis kaj laŭdinde plenumis sian taskon, tiel ke al li nek en la okulojn nek en la buŝon venis lesivo, kaj tamen li fariĝis pura. Poste ŝi eksidis metante lian kapon sur sian sinon kaj komencis lin kombi. Ŝi demandis, ĉu li malkomforte kuŝas; sed Orm respondis, ke li devas rekoni, ke li komforte kuŝas. Kaŭzis al ŝi penon trakombi liajn harojn, kiuj estis densaj kaj hirtaj kaj tufiĝis post la lavo; sed ŝi kun pacienco ilin disigis, tiel ke li pensis, ke li neniam estis pli bone kombata. Ŝi nun familiare babilis kun li, kvazaŭ ili jam longe estus amikoj; kaj Orm sentis, ke li havas bonan komforton havante ŝin ĉe si.

—Kredeble ankoraŭ unu fojon viaj kapoj estos malsekigitaj, antaŭ ol vi staros sanaj, ŝi diris, ĉar la episkopo kaj liaj subuloj ŝatas bapti tiujn, kiuj estas malsanaj, kaj estas rimarkinde, ke ili ne jam sin trudis al vi. Tion ili faris al mia patro, kiam li estis severe malsana kaj kredis, ke li ne resaniĝos. Al la plimulto ŝajnas dum la vintro preferinde akcepti la bapton en la lito kiel malsanuloj; ĉar tiam la pastroj verŝas akvon nur sur la kapon, alie oni devas trempiĝi tuta en la maro, kaj malmultaj tion ŝatas, kiam la akvo estas glacie malvarma. Ankaŭ al la pastroj tio estas ĝena; iliaj vizaĝoj bluiĝas, kiam ili staras en akvo ĝis la genuoj, kaj iliaj dentoj klakas tiel rapide, ke apenaŭ ili kapablas elbuŝigi siajn benojn. Tial ili preferas bapti malsanulojn dum la vintro; sed min la episkopo baptis en la somermeza tago, kiun ili nomas Tago de l' Baptisto, kaj tiam ne estis ĝene. Ni kaŭris ĉirkaŭ li en niaj ĉemizoj, mi kaj miaj fratinoj, dum li eldiris benojn por ni; kaj kiam li levis sian manon ni kunpremis la nazon per niaj fingroj kaj nin trempis; mi el ĉiuj plej longe min tenis sub la akvo, tiel ke oni konsideras mian bapton unu el la plej bonaj. Post tio ni ricevis benitajn vestojn kaj po unu malgrandan kruceton, kiun ni pendigu surbruste; kaj neniu el ni suferis damaĝon el tio.

Orm respondis, ke li bone konas ĉiuspecajn strangajn morojn, ĉar li vizitis kaj la Sudlandon, kie neniu rajtas manĝi lardon, kaj monaĥojn en Irlando, kiuj trude insistis, ke ili lin baptu.

—Kaj estas por mi malfacile kompreni, li diris, kian utilon tiaj aferoj alportas al homoj, aŭ kian ĝojon al dioj. Kaj mi volus vidi tiun episkopon aŭ kiun ajn piulon, kiu povus persvadi min eksidi en malvarma akvo ĝis super la oreloj, ĉu ĝi okazu somere aŭ vintre. Kaj mi ankaŭ ne havas inklinon permesi al ili verŝi akvon sur mian kapon, dum ili eldiradas benojn por mi. Ĉar mi havas tiun kredon, ke oni zorge devas eviti ĉiaspecajn benojn kaj magiojn.

Ylva diris, ke kelkaj el la viroj de reĝo Harald plendis pro dorsdoloro post sia bapto kaj postulis punpagon de la episkopo pro tio, sed cetere nenian damaĝon oni povis rimarki; eĉ kontraŭe, nuntempe multaj tenas la opinion, ke baptoj utile influas la sanon. Lardon la pastroj ĉi tie neniel kontraŭas, kiel Orm povis mem rimarki dum la julo, kaj ili ne tre sin koncernas pri tio, kion manĝas la homoj. Nur se oni proponas al ili ĉevalviandon, ili kutimas kraĉi kaj fari krucosignojn, kaj iujn fojojn oni aŭdis ilin murmuri, ke oni prefere ne manĝu viandon en vendredoj; sed ŝia patro diris, ke tiajn parolojn li ne plu volas aŭdi. Rilate al si mem ŝi ne rimarkis malavantaĝon pro la nova instruo. Sed kelkaj asertis, ke la rikoltoj fariĝis malpli abundaj kaj la lakto de bovinoj malpli grasa, post kiam oni komencis neglekti la malnovajn diojn.

Ŝi malrapide tiris la kombilon tra tufo, kiun ŝi malimplikis, kaj ĝin levis kontraŭ la taglumon kaj ĝin zorge ekzamenis.

—Mi ne scias la kaŭzon, ŝi diris, sed ŝajnas, ke eĉ ne unu pediko troviĝas en via hararo.

—Tiel ne povas esti, diris Orm; devas esti, ke la kombilo estas maltaŭga. Kombu pli forte.

Ŝi respondis, ke la kombilo estas bona pedikkombilo, kaj ŝi tiom premis, ke la haŭto doloris. Sed neniu pediko estis trovebla.

—Do mia stato estas severa, diris Orm, pli severa ol mi pensis. Ĉar malsano penetris en la sangon.

Ylva opiniis, ke eble la afero ne evoluis ĝis tiu stato, sed Orm estis trafita en sia interno. Li kuŝis silenta dum la resto de la kombado kaj melankolie gruntis responde al ŝia babilado. Des pli babilis Toke kaj Mirah kaj ŝajnis ĉiam pli grandan komforton trovi kune.

Fine Orm estis finkombita, en siaj haroj kaj barbo, kaj Ylva kontente rigardis la rezulton.

—Nun vi malpli aspektas kiel kampara fantomo kaj pli kiel ĉefulo, ŝi diris. Malmultaj virinoj forkurus de vi nun, kaj mi estas tiu, kiu meritas dankon pro tio.

Ŝi prenis lian ŝildon kaj ĝin frotis per la maniko, kie ĝi malplej multe estis tranĉita de hakoj, kaj ĝin tenis antaŭ li. Orm vidis sin sur ĝi kaj kapklinis konsente.

—Mi estas bone kombita, li diris, kaj mi ne kredis reĝofilinon kapabla je tio. Sed eble vi estas pli kapabla ol la plimulto. Kaj vi nun meritas, ke mi vin kontentigu montrante la ornamaĵon.

Li malligis sian kamizolon ĉe la kolo kaj eltiris la kolĉenon kaj ĝin transdonis al ŝi. Ylva krietis, kiam ŝi ĝin prenis per siaj manoj kaj pesis ĝin kaj vidis ĝian belecon; kaj Mirah forlasis Toke kaj urĝe alvenis por vidi, kaj ankaŭ ŝi ekkriis laŭte. Orm diris al Ylva:

—Pendigu ĝin ĉirkaŭ via kolo.

Ŝi tion faris. La kolĉeno estis longa kaj pendis ĝis sur la mamringoj de ŝia korsaĵo, kaj ŝi urĝe apogis la ŝildon sur la ĉemuran benkon kaj sin spegulis.

—Ĝia longo sufiĉas por ĝin porti duobla ĉirkaŭ la kolo, ŝi diris kaj ne povis fordirekti rigardon kaj fingrojn de ĝi. Kiel ĝi estu portata?

—Almansur ĝin tenis en kesto, diris Orm, kaj tie neniu povis ĝin vidi. De kiam ĝi fariĝis mia, mi ĝin portis sub la kamizolo, ĝis ĝi frotis al mi la haŭton, kaj mi ne sen neceso ĝin montris antaŭ nun dum la julo. Kaj tiam ĝi tuj kaŭzis al mi damaĝon. Nun ĉiu devas konsenti, ke ĝi trovis lokon pli konvenan; kaj nun Ylva, ĝi apartenas al vi, kaj vi povas ĝin porti tiel, kiel al vi ŝajnas prefere.

Ŝi tenis la kolĉenon per ambaŭ manoj kaj lin rigardis per grandaj okuloj.

—Ĉu vi perdis la prudenton? ŝi diris. Kion mi faris, por ke vi donu al mi tian donacon? Plej nobla reĝino kuŝus kun berserko por pli simpla ornamaĵo ol ĉi tiu.

—Vi min bone kombis, diris Orm kaj ridetis. Kaj ni familianoj de Vidfamne donas valorajn amikdonacojn aŭ neniujn.

Ankaŭ Mirah volis provi la kolĉenon, sed Toke ordonis al ŝi reveni al li kaj lasi la ornamaĵon; kaj li jam atingis tian potencon super ŝi, ke ŝi obeis. Ylva diris:

—Eble mi devas ĝin kaŝi sub la kamizolo, mi kiel vi; ĉar miaj fratinoj kaj ĉiuj virinoj en la korto volos elgrati al mi la okulojn pro ĝi. Sed kial vi ĝin donas al mi, tion mi ne komprenas, kiom ajn vi estu familiano de Vidfamne.

Orm suspiris kaj diris:

—Kiel ĝi estos utila al mi, kiam la herboj ĝermos super mi? Nun mi scias, ke mi mortos, ĉar eĉ ne unu pediko prosperas ĉe mi; kaj tion mi divenis jam antaŭe. Povas esti, ke vi ĝin ricevus, ankaŭ se mi ne estus markita de la morto, sed tiam mi dezirus rekompencon de vi. Ŝajnas al mi, ke vi valoras tian ornamaĵon, kaj laŭ mia kredo vi bone kapablas vin defendi, se iu volas vin grati. Sed por mi estus pli bone vivi kaj vidi vin porti ĝin.

DEK UNUA ĈAPITRO

## Pri la kolero de frato Willibald kaj pri tio kiel Orm svatiĝis.

Post ne longa tempo okazis tio, kion antaŭdiris Ylva, ke la episkopo komencis mencii deziron, ke ambaŭ vunditoj estu baptitaj; sed rilate neniun el ili li rikoltis sukceson. Orm rapide senpacienciĝis kaj diris, ke li ne volas aŭdi pri tiaj aferoj, ĉar li en ĉiu okazo baldaŭ mortos; kaj Toke diris, ke li nenion el tio bezonos, ĉar li sentas, ke li baldaŭ saniĝos. La episkopo taskis al frato Matthias ilin persvadi per pacienco kaj instrui al ili la ĝustan doktrinon; kaj post kiam tiu kelkajn fojojn, ne obeante iliajn admonojn ilin lasi en paco, faris provojn instrui al ili la kredon, Toke venigis al si bonan ĵetlancon, mallarĝklingan kaj akre-eĝan, kaj kuŝis apogita sur la kubuto kaj pesis ĝin per la mano, kiam frato Matthias la sekvan fojon venis ilin instrui.

—Malbonkondute estas rompi la pacon en la korto de la reĝo, diris Toke, sed neniu povas riproĉi, kiam malsanuloj tion faras pro neceso. Kaj ankaŭ estus malbonkondute malpurigi la kameron per grasulo kiel vi, kiu supozeble enhavas multe da sango; sed mi pensis jene, ke se mi povos vin alfiksi al la muro per ĉi tiu lanco, la sangelfluo eble ne estos abunda. Tio ne estos facila ago por viro kuŝanta en lito, sed mi faros mian plejbonon; kaj mi ĝin faros nun, tuj kiam vi malfermos la buŝon por elbabilaĉi tion, kion ni petis malhavi.

Frato Matthias staris pala kaj tenis la manplatojn antaŭ si kaj aspektis, kvazaŭ li volus ion diri; post tio lin trakuris tremo, kaj li urĝe retroiris el la kamero kaj sukcesis fermi post si la pordon. Post tio li ne plu ĝenis ilin. Sed frato Willibald, kiu neniam montris ian signon de timo, venis kiel kutime kaj flegis iliajn vundojn kaj ilin severe riproĉis pro tio, ke ili metis timon en fraton Matthias.

—Vi verdire estas viro malgraŭ tio, ke vi estas malgranda, diris Toke; kaj estas rimarkinde, ke mi pli ŝatas vin ol la aliajn de via speco malgraŭ tio, ke vi estas malĝentila kaj kolerema. Sed la kaŭzo eble estas, ke vi ne klopodas nin persvadi al kristaniĝo, sed nur flegas niajn vundojn.

Frato Willibald respondis, ke li pli longe ol la aliaj loĝadis en ĉi tiu lando de mallumo kaj tial liberiĝis de infanecaĵoj.

—Komence, li diris, mi estis same fervora kiel iu ajn alia el la frataro de sankta Benedikto por bapti ĉiujn paganojn. Sed nun mi scias, kio estas utila kaj kio estas nur vanta. La infanoj en ĉi tiu lando estu baptitaj, kaj ankaŭ virinoj, kiuj ne tro sin ruladis en pekoj, se eblas trovi tiajn; sed la plenkreskaj viroj en ĉi tiu lando plene apartenas al la diablo kaj devos pro la justeco de Dio bruli en la fajro de la infero, kiom ajn baptitaj ili estu; ĉar nenia elaĉeto sufiĉos por ili. Tio estas mia kredo, ĉar mi ilin konas nun. Tial mi ne perdigas mian tempon klopodante persvadi vin.

Li parolis ĉiam pli fervore kaj kolere alrigardis jen unu jen la alian kaj baraktis per la brakoj kaj kriis:

—Sanglupoj, murdantoj, maliceguloj, koitantoj kun putinoj, gadaranaj porkoj, okuljuveloj de Baal-Zebub, trudkreskaĵoj de Satano, fiidoj de viperoj kaj baziliskoj, ĉu purlavu vin la bapto, ĉu starus vi neĝe blankaj inter la sanktuloj de Dio? Ne, mi diras: neniam. Jam de longe mi min turnas en la mondo, tro multe mi vidis, mi vin konas; neniu episkopo kaj neniu patriarko povus planti en mi tian kredon.

Kiel oni povus enlasi normanojn en la ĉielregnon? Kun maldecaj vortoj vi etendus viajn manojn kontraŭ sanktajn virgulinojn, vi elgorĝus batalkriojn kontraŭ serafojn kaj arĥianĝelojn kaj krie alvokus bieron antaŭ la vizaĝo de Dio mem. Ne, ne, mi scias pri kio mi parolas: sole nur la infero estas ĝusta loko por vi, ĉu vi estos baptitaj aŭ ne, estu laŭdata la Ĉiopova dum eterneco de la eternecoj, amen.

Kolera li ŝirfosadis inter siaj ujoj kaj bandaĝoj kaj iris ungventi la vundon de Toke.

—Kial vi faras kiom eble por nin kuraci, diris Orm, kiam via kolero kontraŭ ni estas tiel granda?

—Tion mi faras, ĉar mi estas kristano kaj scias kiel rekompenci malbonon per bono, li respondis; kaj tio estas pli ol vi iam lernos. Ĉu mi ne ankoraŭ portas cikatron sur mia kapo, kie reĝo Harald frapis min per la sankta krucifikso; kaj tamen mi ĉiutage plenzorge flegas lian maljunan ruinan korpon. Sed krome povas esti tre utile, ke grandaj bataluloj kiel vi konservas la vivon en ĉi tiu lando; ĉar vi sendos multajn de via propra speco en la inferon, antaŭ ol vi mem iros tien, tiel kiel mi vidis vin fari nun dum la julfesteno. Lupo disŝiru lupon, tiel ke mildiĝos la sorto de la ŝafidoj de Dio.

Post lia foriro Toke diris, ke laŭ lia penso la malgranda viro freneziĝis pro la bato sur la kapon, kiam la reĝo frapis lin per la kruco, ĉar la plimulto de lia kriado ne estas komprenebla; kaj Orm konsentis pri tio. Sed ambaŭ rekonis, ke li estas fervora en kuracado kaj tre diligente ilin flegis.

Toke nun komencis saniĝi kaj baldaŭ kapablis lami en la kamero kaj ankaŭ ekster ĝi, kaj Orm tiam kuŝis sola kaj enua, krom kiam lin vizitis Ylva. Kiam ŝi sidis apud lia lito, li komencis pensi malpli pri sia morto, ĉar ĉiam ŝi estis vigla, gaja kaj babilema, kaj li ŝatis ŝin aŭskulti; sed li malgajiĝis, kiam ŝi diris, ke li aspektas pli bonfarta kaj

baldaŭ denove estos sana. Pri tio, li diris, li mem plej certe scias. Sed baldaŭ li kapablis sidi sur la lito sen gravaj doloroj; kaj kiam Ylva sekvan fojon lin kombis kaj trovis pedikon grandan kaj sanan kaj sangoplenan, li fariĝis pensema kaj diris, ke li ne scias, kion kredi.

—Nun vi ne malĝoju pro la kolĉeno, diris Ylva. Vi ĝin donacis al mi kredante, ke vi mortos, kaj nun tio forŝtelas vian ĝojon, kiam vi rimarkas, ke vi vivos. Sed volonte mi ĝin redonos al vi malgraŭ tio, ke ĝi estas pli belega ol io alia vidata en ĉi tiu lando. Ĉar mi ne volas krei la onidiron, ke mi forlogis de vi vian oron, kiam vi kuŝadis malforta pro vundoj. Kaj tion mi tamen jam aŭdis pli ol unu fojon.

—La vero estas, ke estus bone reteni tian ornamaĵon en la familio, diris Orm; sed plej bona negoco por mi estus reteni kaj vin kaj la ornamaĵon, kaj en alia maniero mi ne volas ĝin repreni. Sed antaŭ ol fari demandon al via patro pri tiu afero, mi volonte ekscius, kion vi mem pensas. Ĉar kiam ni la unuan fojon interparolis, vi diris, ke vi intencus puŝi ponardon en Sigtrygg en la nuptolito, se vi estus edzinigita al li; kaj estus bone scii, ĉu vi estus pli favora al mi.

Ylva larĝe ridis kaj diris, ke li ne sin sentu tro sekura.

—Ĉar pli kolerema mi estas ol vi povas scii, kaj malfacile estas min kontentigi. Kaj reĝofilinoj agas aliel ol aliaj kiel edzinoj, tiel ke ili eĉ malvivigas reĝojn, kiam tiuj ne plaĉas al ili. Ĉu vi aŭdis, kio okazis al Agne, la reĝo de la sveoj, post kiam li akiris al si kontraŭvolan reĝofilinon el regiono oriente de la maro? La unuan nokton li dormis kun ŝi en tendo sub arbo; kaj kiam li jam profunde endormiĝis, ŝi fiksis ŝnuron al lia kolringo, kaj lin pendigis en la arbo malgraŭ tio, ke li estis granda reĝo, kaj ŝin asistis ĉe la ŝnuro nur unu servistino. Tial vi zorge pripensu, antaŭ ol vi faros provon kun mi.

Ŝi sin klinis antaŭen kaj karesis lian frunton kaj pinĉis al li orelon kaj ridetante rigardis al li en la okulojn; kaj tiam Orm sin sentis pli sana, ol li faris dum longa tempo.

Sed post tio ŝi serioziĝis kaj aspektis pensema kaj diris, ke tio ĉi estas vana babilo, antaŭ ol ŝia patro faris eldiron pri la afero; kaj ŝi kredas, ke estos malfacile akiri lian konsenton, se Orm ne estas pli bonstata je tero kaj brutoj kaj oro ol la plimulto.

—Ofte li plendas pri tio, ke li havas multajn senedzajn filinojn, ŝi diris; sed malprosperas al li la trovado de edzoj al ni, kiuj laŭ lia opinio estas sufiĉe riĉaj kaj reputaciaj. Esti reĝofilino ne estas tiel amuza, kiel homoj kredas; ĉar multaj bravaj junaj viroj kaŝe faras al ni mienojn kaj provas kapti niajn juprubandojn kiam neniu vidas, sed malmultaj kuraĝas paroli kun nia patro; kaj tiuj, kiuj kuraĝas, venas kun taŭzita kresto de la konversacio. Estas granda domaĝo, ke li tiom zorgas pri riĉaj edzoj al ni; tamen estas vero, ke malbone taŭgus por mi malriĉulo. Sed vi, Orm, kiu povas fordonaci tian kolĉenon kaj kiu estas parenco de Vidfamne, certe estas unu el la plej riĉaj grandbienuloj en Skanio, ĉu ne?

Orm respondis, ke li esperas akordiĝi kun reĝo Harald, ĉar li havas ties favoron kaj pro la sonorilo de Jakobo kaj pro la duelo.

—Sed kiel riĉa mi estas en Skanio, li diris, tion mi ne scias, ĉar pli ol ses jaroj pasis jam de mia foriro; kaj ekde tiam mi nenion scias pri miaj parencoj. Povas esti, ke malpli multaj vivas nun, ol kiam laste mi vidis ilin, kaj ke mia parto de la heredaĵo kreskis de tiam. Sed pli da oro ol la kolĉenon mi portas hejmen de la Sudlando; kaj eĉ se mi posedus nur tion, kion mi portas de tie, mi ne estus malriĉulo. Kaj pli oni povus gajni en sama maniero.

Ylva malgaje kapklinis kaj diris, ke tre bonaŭgure tio ne sonas konsiderante la severon de ŝia patro; kaj Toke, kiu enpaŝis dum ilia interbabilo, saman opinion tenis kaj diris, ke jen necesas saĝaj konsiloj.

—Kaj tiel bonŝance estas nun, li diris, ke mi povas instrui al vi pri tio, kiel oni plej certe akiras riĉan kaj nobelan junulinon, kiam

la patro kontraŭas, sed ŝi mem ne. Mia avo nomiĝis Tönne sur la Terkolo kaj komercadis kun la smolandanoj; li posedis malgrandan bienon kaj dek du bovinojn kaj grandan prudenton; kiam li iun fojon komercvojaĝis en Värend kaj tie malkovris knabinon nomata Gyda, filino de altrangulo, li decidis ŝin akiri, kaj ĉar li volis pliigi sian honoron kaj ĉar li havis ŝaton por ŝia bela staturo kaj dikaj ruĝaj harplektaĵoj. Sed ŝia patro — Glum li nomiĝis — estis fiera homo kaj diris, ke Tönne ne sufiĉe taŭgas kiel bofilo malgraŭ tio, ke la knabino tenis alian opinion. Nu, Gyda kaj Tönne ne lasis fali la manojn malĝojante pri la kontraŭemo de la maljunulo, sed baldaŭ trovis elturnon kaj renkontiĝis en la arbaro, kiam ŝi kolektis nuksojn kun la servistinoj; kaj pro tio ŝi fariĝis graveda, kaj Tönne dufoje interbatalis kun ŝia frato, tiel ke ambaŭ portis cikatrojn ĝis morto. Post kiam ŝi naskis ĝemelojn, la maljunulo ekopiniis, ke kontraŭbarakto estos vana; kaj ili geedziĝis kaj ĉiam vivis en akordo kaj ricevis ankoraŭ sep infanojn; kaj ĉiuj en la ĉirkaŭaĵo laŭdis la prudenton kaj bonŝancon de mia avo, tiel ke lia reputacio multe grandiĝis, plej multe kiam li ricevis riĉan heredaĵon post la maljunulo Glum. Kaj se mia avo ne estus trovinta tiel prudentan vojon al edziĝo, mi ne nun sidus tie ĉi kaj donus al vi utilajn konsilojn; ĉar mia patrino estis unu el la ĝemeloj de la nuksarbustoj.

—Se devas esti ĝemeloj por efiki, diris Ylva, tiam estas pli facile aprobi la konsilon ol ĝin sekvi. Kaj cetere estas diferenco inter bienulo en Värend kaj la reĝo de la danoj, kaj tial ne estas certe, ke tia provo estus same sukcesa por ni.

Orm opiniis, ke eblus ion diri kaj favore kaj kontraŭe al la konsilo de Toke, kvankam ĝi apenaŭ valoras la atenton de malsana kaj senpotenca viro; sed unue, li diris, li volas saniĝi ĝis promenkapablo kaj paroli kun reĝo Harald.

Tio ankoraŭ prokrastiĝis; sed fine li saniĝis, kun kuraciĝinta

vundo, kaj komencis ree fortiĝi; tiam la vintro jam proksimiĝis al sia fino. Reĝo Harald nun estis vigla kaj bonhumora kaj tre okupita per la ekipado de ŝipoj; ĉar li intencis iri al Skanör por kolekti la haringo-imposton kaj sendi al Styrbjörn la ŝipojn, kiujn li promesis al li. Orm lin alpaŝis kaj eldiris sian aferon. Reĝo Harald nenian malamikecon montris pro lia postulo, sed tuj demandis, kian bonstaton li havas, kuraĝante pensi pri tiel altranga edzino. Orm klarigis, kia estas lia stato koncerne parencojn kaj devenon kaj propraĵon de lia patro, kaj kion li mem alportis hejmen el eksterlando.

—Kaj krom tio troviĝas tero en Geingio, kiun atendis heredi mia patrino, li diris, sed pri ĝi mi malmulton scias. Mi ankaŭ nenion scias pri tio, kiaj estas la nunaj cirkonstancoj de miaj parencoj, aŭ kiuj ankoraŭ vivas. Ĉar dum sep jaroj multo povis okazi hejme.

—La ornamaĵo, kiun vi donacis al la junulino, estas donaco de altrangulo, diris reĝo Harald; kaj al mi vi faris bonajn servojn, kiujn mi ne forgesas. Sed edziĝo al filino de la reĝo de la danoj estas pinto de la alstrebo de kiu ajn viro; kaj neniu alpaŝis min kun tia postulo ne posedante pli ol vi elnombris. Kaj krom tio frato staras inter vi kaj la bieno de via patro. Se tiu vivas kaj havas filojn, per kio do vi povos vivteni mian filinon? Mi iomete maljuniĝas, kvankam oni eble ne laŭaspekte tion povas vidi, kaj mi volonte vidus miajn filinojn bonstataj edzinoj, dum mi ankoraŭ povas avantaĝe aranĝi por ili. Ĉar Sven malmulton faros por ili, kiam mia vivo finiĝos.

Orm devis rekoni, ke malmulton validan li povis oferti en svato tia, kiel tiu ĉi.

—Sed povas ja esti, ke la tuta heredaĵo estos mia, kiam mi venos hejmen, li diris. Mia patro komencis maljuniĝi jam antaŭ sep jaroj; kaj mia frato Odd pasigis ĉiujn somerojn sur Irlando kaj havis nenian inklinon eksidi hejme. Kaj mi aŭdis, ke dum la lastaj ja-

roj estis malfavoraj konjunkturoj por mia popolo sur Irlando, post kiam reĝo Brian kaptis la potencon tie.

Reĝo Harald kapjesis kaj diris, ke reĝo Brian elvivigis multajn danojn sur Irlando kaj multajn marveturantojn ĉirkaŭ ĝiaj bordoj, kaj farante tion li iufoje estis utila, ĉar inter tiuj troviĝis multaj viroj, kiuj nur kaŭzis ĉagrenojn hejme en Danlando.

—Sed sur tiu Brian, reĝo de Munster, li daŭrigis, la kresto ŝvelis pro fiero de troa sukceso, tiel ke li ne nur postulas imposton de reĝo Olof de Cork, kiu estas mia amiko, sed ankaŭ de reĝo Sigtrygg de Dublino, kiu estas mia parenco. Ne decas tia plenbloviteco ĉe ejra reĝo, kaj tial mi en konvena tempo sendos ŝiparojn al la insulo por meti finon al lia orgojlo. Estus bone, se oni lin kaptus kaj lin metus ĉenita apud la pordo en la halo, ne nur por amuzigi miajn kortanojn ĉe ilia biertrinkado, sed ankaŭ por fari al li lecionon pri kristana humileco kaj por aliaj reĝoj kiel averto. Ĉar ĉiam estis mia penso, ke la reĝo de la danoj estas plej glorinda el ĉiuj reĝoj.

—Estas mia kredo, ke vi estas plej granda el ĉiuj reĝoj, diris Orm; kaj eĉ inter andaluzoj kaj bluuloj troviĝas homoj, kiuj konas vian nomon kaj viajn agojn.

—Jen vi bele plektis viajn vortojn, diris reĝo Harald; sed cetere vi montras al mi malmultan respekton, kiam vi min alpaŝas postulante unu el miaj plej belaj filinoj eĉ ne sciante, kiel statas via heredo kaj posedo. Pro via juneco kaj senpripensemo mi ne riproĉos al vi pro tio. Sed vian peton mi nun ne respondas per jes nek per ne; sed tio ĉi estas mia decido: Revenu aŭtune, kiam mi denove estos ĉi tie, kaj vi pli bone scios, kia estas via stato; kaj se mi tiam trovos vian riĉecon sufiĉa, vi ricevos la knabinon pro mia amikeco al vi, kaj aliel vi ĉiam povos ricevi bonan postenon en mia gvardio. Kaj ĝis tiam vi devos pacienci.

Ylva perdis sian bonhumoron, kiam Orm rakontis pri la inter-

parolo; larmoj venis al ŝi en la okulojn, kaj ŝi kriis, ke la maljunulon ŝi tiros je la barbo pro tia avareco kaj obstino kaj post tio tuj sekvos la konsilon de Toke. Sed retrovinte sian trankvilon ŝi trovis preferinde sin deteni de tiu plano.

—Lian koleron mi ne timas, ŝi diris, eĉ ne kiam li blekas kiel bovo kaj ĵetas la biersitelon kontraŭ min; ĉar pli rapida ol li mi estas, kaj ĝis nun li ne trafis min, kaj tia kolero baldaŭ pasas. Sed tiun kvaliton li havas, ke se oni serioze spitas lin pri decido, kiun li jam faris, tiam lia kolero daŭras, kaj li neniam rezignas sin venĝi. Plej prudente tial estas ne lin inciti pri tio ĉi, ĉar tiam li povus ekmalami nin ambaŭ kaj min fordoni al kiu ajn el siaj gvardianoj nur por kaŭzi ĉagrenojn kaj montri, kiu faras la decidojn. Sed tion vi sciu, Orm, ke mi neniun alian deziras ol vin; kaj por mi vi valoras atendon ĝis la aŭtuno malgraŭ tio, ke tio estos enuiga. Kaj se li ankaŭ tiam obstinos, mi ne plu atendos, sed vin akompanos, kien ajn vi volos.

—Sentiĝas al mi pli agrable, post kiam vi tion diris, Orm respondis.

DEK DUA ĈAPITRO

# Kiel Orm revenis hejmen de sia longa vojaĝo.

Reĝo Harald ekipis dudek ŝipojn por sia ekspedicio. El ili dek du iros al Styrbjörn, kaj kun la aliaj li intencis albordiĝi ĉe Skanör, kie necesis granda akompanantaro por kolekti la haringo-imposton. Li zorge elektis ŝipanojn; kaj ĉiuj preferus ricevi lokon en la ŝipoj irontaj kun Styrbjörn, ĉar tie abunda predo estis antaŭvidebla.

Multaj homoj venis al Jellinge por preni lokon en la ŝiparo de reĝo Harald; kaj Orm kaj Toke serĉis inter la restantoj por dungi remistojn por la hejmeniro en sia propra ŝipo; sed remistoj multekostis, kaj ili trovis tiun koston doloriga; ĉar tiel proksime al hejmo avido ilin kaptis, kiam ili pensis pri elspezoj por la vojaĝo. Por eviti elspezadon ili fine interkonsentis kun viro de Fueno nomata Åke, ke li aĉetos la ŝipon kaj rekompence havigos ŝipanaron kaj transportos ilin ambaŭ hejmen, Orm al Kullen kaj Toke al Lister, kaj provizos nutraĵon dum la vojaĝo. La marĉandado pri tio estis longdaŭra kaj preskaŭ finiĝis per interbatalo inter Toke kaj Åke; ĉar Toke krome deziris sumon da mono, ĉar la ŝipo, laŭ lia opinio, estis en stato kiel nova kaj stabila kaj bele velanta kvankam malgranda; sed Åke volis nenion pagi, ĉar ĝi estis fremdlanda kaj mallerte konstruita kaj malmulte valora, tiel ke li opiniis, ke li tamen riskas malgajnon en la komerco. Fine ili elektis Hallbjörn Staliston arbitraciulo, kaj la

negoco finiĝis sen interbatalo, sed kun malmulta gajno por Orm kaj Toke.

Neniu el ili havis inklinon iri kun Styrbjörn, ĉar ambaŭ pensis pri aliaj aferoj; kaj la fortoj de Orm nur malrapide revenis, tiel ke li kredis, ke li ĉiam havos delikatan sanon. Ankaŭ pezis al li, ke li devos disiĝi de Ylva; kaj reĝo Harald taskigis iujn maljunulinojn ŝin gardi, por ke ili ne tro ofte renkontiĝu. Sed kvankam la maljunulinoj estis rapidmovaj, ili tamen plendis, ke la reĝo donis al ili okupon malfacilan por iliaj maljunaj piedoj.

Kiam estis forirpreta la ŝiparo, reĝo Harald igis la episkopon beni ĉiujn ŝipojn; sed li ne volis, ke li akompanu dum la vojaĝo pro la manka veterbonŝanco, kiu karakterizas ĉiujn pastrojn. La episkopo volis veturi al Skanio por tie inspektadi siajn pastrojn kaj preĝejojn kaj nombri la konvertitojn, sed reĝo Harald diris, ke tio prokrastiĝu ĝis ŝipoj sekvan fojon iros tien; li mem intencis neniam akompanigi sin per episkopo sur la maro, eĉ ne per ordinara pastro.

—Ĉar tro maljuna mi estas por ludi kun la malfortuno, li diris; kaj ĉiuj marveturantoj scias, ke la marspiritoj kaj martroloj kaj ĉiuj aliaj potencoj en la maro malamas la razitojn pli ol aliajn homojn; tiujn ili volas dronigi tuj, kiam ili venas sur la maron. Harald Ors, mia nevo, iufoje velis hejmen de Bretonlando kun multaj nove kaptitaj sklavoj ĉe la remiloj, kaj lin trafis ŝtormo kaj kirloneĝo kaj plej neimagebla ondado, kvankam estis frua aŭtuno; kaj kiam lia ŝipo estis pereonta, li ĉirkaŭrigardis kaj trovis du razitojn inter siaj remistoj; kaj ilin ĵetinte en la maron li estis karesata de dorlotvetero dum la restanta vojaĝo. Tiel povis agi li, kiu estis pagano; sed por mi estus maldece ĵeti episkopon en la maron por kvietigi la veteron, kaj tial li devas resti ĉi tie.

En tiu mateno, kiam la ŝiparo estis preta forveli, kaj Orm kaj Toke kun ĝi, reĝo Harald venis en blanka mantelo kaj arĝenta hel-

mo laŭ la kajoj survoje al sia propra ŝipo kun granda sekvantaro kaj sia emblemo antaŭ si. Kiam li venis tien, kie estis la ŝipo de Orm, li haltis kaj atendigis sian sekvantaron kaj iris sola sur la ŝipon por diri kelkajn vortojn.

—Ĉi tiun honoron mi volas montri al vi, li diris, tiel ke oni rimarku nian amikecon kaj tiel ke neniu kredu, ke ia malico troviĝas inter ni pro tio, ke mi ĝis nun ne donacis al vi mian filinon Ylva. Ŝi nun sidas enfermita ĉe la virinoj kaj faras bruon kun ili; ĉar tia ŝi estas, ke ŝi tre facile povus ekhavi la impulson alkuri vian ŝipon, tuj kiam mi turnis al ŝi la dorson, kaj vin tenti al ŝia forporto; tio estus malbona por ŝi kaj por vi. Nun ni disiras por kelka tempo; kaj mi nun ne havas donacon al vi por rekompenci al vi pro la sonorilo; sed pli favora estos espereble la bonŝanco aŭtune.

Estis bela printempa mateno kun serena ĉielo kaj milda vento, kaj reĝo Harald estis gajhumora. Li zorge ekzamenis la ŝipon kaj rimarkis ĝian fremdan konstruon; li havis konojn pri ĉio kaj komprenis tabulmuntadon kaj remiltenilojn same bone kiel ŝipkonstruisto kaj vidis plurajn aferojn, kiujn li trovis menciindaj.

Dume Toke, klinita sub granda kesto, venis sur la ŝipon. Vidante reĝon Harald li surpriziĝis kaj metinte la keston sur la ferdekon, li lin salutis.

—Vi multon alportas, diris la reĝo. Kio estas en ĝi?

—Estas iom da bagateloj, kiujn mi ŝanĝakiris al la maljunulino hejme, mia patrino, se ŝi ankoraŭ vivas, diris Toke. Iom alporti hejmen al ŝi povas esti ĝusta, kiam iu forestis tiel longe kiel mi.

Reĝo Harald kapjesis kaj opiniis, ke estas bona ago, kiam junuloj havas prizorgemon kaj amikecon por siaj gepatroj; siaparte, li diris, li neniam rimarkis multon de tiu speco.

—Kaj nun, li diris kaj eksidis sur la kesto, mi soifas kaj volas gluton da biero antaŭ ol ni disiros. Krakis en la kesto sub lia pezo, kaj

Toke aspektis maltrankvila kaj faris paŝon proksimen; sed la kesto rezistis. Orm verŝis bieron el barelo kaj etendis al la reĝo, kiu eltrinkis tostinte por bona vojaĝo. Li forviŝis la ŝaŭmon de la barbo kaj diris, ke estas rimarkinde, ke biero ĉiam gustas plej bone sur la maro; kaj tial li volis la kruĉon plenigita ankoraŭ unu fojon. Tiel estis, kaj li ĝin malrapide malplenigis; post tio li adiaŭante kapklinis kaj surtretis la teron kaj foriris al sia granda reĝoŝipo, kie nun estis metita lia emblemo, kiu estis farita el ruĝa silko kaj konsistis el du korvoj kun etenditaj flugiloj broditaj per nigraj fadenoj.

Orm rigardis al Toke.

—Kial vi estas tiel pala? li diris.

—Mi havas ĉagrenojn same kiel aliaj, Toke respondis. Ankaŭ vi mem ne aspektas tre floranta.

—Mi scias, kion mi forlasas, diris Orm; sed kiom ajn saĝa mi estu, mi tamen ne povus scii, al kio mi revenos, aŭ ĉu mi revenos en tiu tempo, kiun mi planas.

Nun ĉiuj ŝipoj sin fordirektis de la bordo kaj stiris laŭ diversaj vojoj.

Reĝo Harald kaj liaj ŝipoj iris suden inter la insuloj, sed la ŝipo de Orm estis remata en la kontraŭa direkto por veni norde de Selando. La vento favoris la ŝipojn de la reĝo, tiel ke ili baldaŭ estis longe for.

Toke staris rigardanta post ili, ĝis etiĝis la veloj; tiam li diris:

Kia risk’,
ke l’ reĝo dana
grasis sur
fragila klapo.
Ĉu l’ pakaĵ’
kredeble krevus

pro l' postaĵa
prem' Bludenta?

Li alpaŝis la keston kaj ĝin malfermis kaj elprenis la enhavon, kiu estis la maŭra virino. Ŝi estis elĉerpita kaj mizera, ĉar estis malvaste kaj sufoke en la kesto, kaj en ĝi ŝi kuŝis dum kelka tempo. Kiam Toke ŝin starigis, ŝi refalis pro malforteco kaj kuŝis spireganta kaj tremanta kaj aspektis duone mortinta, ĝis li denove helpis al ŝi ekstari. Ŝi komencis plori kaj ĉirkaŭrigardis.

—Vi ne plu bezonas timi, diris Toke. Li estas longe for.

Pala kaj grandokula ŝi sidis rigardante la ŝipon kaj la virojn nenion dirante; kaj ankaŭ la viroj ĉe la remiloj aspektis grandokulaj kaj sin demandis, kion ĉi tio signifas. Sed tiu, kiu sidis plej pala kaj rigardis plej vastokule, estis Orm, kvazaŭ lin frapus granda malfortuno.

La ŝipestro Åke staris pensema kaj gratis al si la barbon.

—Pri tio vi nenion menciis, kiam ni faris komercon, li diris al Orm, ke virino kunveturos. Kaj nun mi malpli ne postulas, ol ke vi diru al mi, kiu ŝi estas kaj kial ŝi alportiĝis en kesto.

—Jen io, kio vin ne koncernas, morne diris Orm. Vi prizorgu la ŝipon, kaj lasu al ni prizorgi niajn aferojn.

—Kiu ne volas respondi, tiu certe kaŝas danĝerajn aferojn, diris Åke. Fremdulo mi estas en Jellinge kaj malmulton scias pri la aferoj tie; sed kiu ajn povas vidi, ke jen maljustaĵo okazas, kiu tre facile kaŭzos al mi malavantaĝon. De kiu ŝi estas ŝtelita?

Orm sidis sur rulaĵo de ŝnuro kun la manoj plektitaj antaŭ la genuoj kaj kun la dorso turnita al Åke; li respondis per egaltona voĉo sen turni la kapon:

—Nun mi donas al vi du elekteblecojn, li diris. Aŭ vi vin tenos

silenta; aŭ mi vin ĵetos en la maron kapon antaŭe. Elektu, kion vi volas, kaj faru tuj; ĉar vi bojetas kiel hundaĉo kaj min ĝenas.

Åke sin forturnis kaj ion murmuris kaj kraĉis en la maron; kaj estis rimarkeble, ke li, staranta ĉe la stiroremilo, estis malserena pro cerbumado kaj malkvieta laŭ humoro. Sed Orm daŭre sidis kiel li antaŭe sidis, absorbita de siaj pensoj kaj rigardanta rekte antaŭen.

Post kiam la virino de Toke venkis sian elĉerpitecon kaj ricevis ion per kio sin fortigi, ŝi tuj fariĝis mizera pro marmalsano kaj lamentante pendadis sur la ŝiprando sen atento al iuj ajn konsolaj vortoj de Toke. Fine li alligis ŝin per ŝnuro kaj iris sidi apud Orm.

—La plej malfacila jam pasis, li diris; sed estas certe, ke havigo de virino en tia maniero kaŭzas kaj malkvieton kaj ĝenon. Tion ne multaj kuraĝus entrepreni; sed povas esti, ke mia bonŝanco superas tiun de la plimulto.

—Ĝi superas la mian, mi rekonas, ke pri tio vi pravas, diris Orm.

—Tio ne estas certa, diris Toke, ĉar via bonŝanco ĉiam vin favoris; kaj akiro de reĝofilino superas mian akiron. Kaj vi ne malĝoju, ke ne eblis al vi agi kiel al mi en ĉi tiu afero; ĉar tio estus tro malfacila, kiam la knabino estis tiel zorge gardata.

Orm ridis inter siaj dentoj. Li sidis silenta kaj poste ordonis al Rapp, ke tiu transprenu la stiroremilon de Åke, tiel ke ties oreloj ne tro kresku.

—Mi kredis, li poste diris al Toke, ke la amikeco inter ni du estas firma, post tio, ke ni kunvivis tiel longe; sed estas vera, kion la antikvuloj kutimis diri, ke longe oni provu viron; kaj en ĉi tiu frenezaĵo, kiun vi nun realigis, vi agis, kvazaŭ mi ne ekzistus aŭ estus inda je konsidero.

—Io troviĝas ĉe vi, kio ne estas ĉefuleca, diris Toke, kaj tio estas via ofendiĝemo. Multaj min laŭdus pro tio, ke mi sola ŝtelis la virinon, neniun alian ĝenante per la afero; sed tia vi estas, ke vi opi-

nias, ke mi montris al vi malrespekton pro tio, ke mi ne ĉion malkaŝis al vi dekomence. Amikecon, kiu ne koleriĝas pro tia afero, mi taksas plej alte.

Blanke pala pro kolero Orm lin rigardis.

—Estas malfacile konservi paciencon antaŭ stulteco tia kiel la via, li diris. Kiom koncernas min tio, kiel vi agis por ŝteli vian virinon aŭ kiom vi sekretis pri la afero? Sed io min koncernas, kaj tio estas, ke vi nun tre malamikigis al mi reĝon Harald kaj nin faris senprotektaj en lia regno. Vi prenis vian virinon kaj min forbaris de mia. Nenia ofendiĝemo estas necesa por trovi mankon en tia amikeco.

Toke ne havis multon, per kio sin defendi, ĉar li devis konfesi, ke pri tio li ne pensis. Li klopodis mildigi Orm dirante, ke reĝo Harald estas kaduka kaj ne povos longe vivi; sed tio ne tre konsolis Orm; kaj ju pli da tempo pasis, des pli forbarita li sentis sin de Ylva kaj des pli forta lia kolero.

Albordiĝinte por la nokto en ŝirmata golfo ili ekbruligis du fajrojn. Apud unu sidis Orm kaj liaj kunuloj, apud la alia sidis Åke kaj liaj ŝipanoj. Neniu ĉirkaŭ la fajro de Orm estis parolema, sed ĉirkaŭ la alia Åke kaj liaj ŝipanoj havis multon, kion diri al si. Ili mallaŭte interparolis, tiel ke nenio estis aŭdebla apud la fajro de Orm.

Manĝinte la virino, kovrita per mantelo, endormiĝis apud la fajro. Orm kaj Toke sidis silentaj unu iom for de la alia dum la krepusko venis. La maro griziĝis sub malvarma vento, kaj ŝtormonuboj sin montris super la horizonto okcidente. Orm suspiris plurfoje kaj forte tiris sian barbon; Toke pikpurigis la dentojn. Ambaŭ estis plenaj de kolero.

—Estus bone, se tio ĉi finiĝus, diris Orm.

—Diru, kiel vi volas ĝin fini, diris Toke.

Rapp forestis por kolekti hejtaĵon; li nun revenis kaj aŭdis iliajn

vortojn. Li estis tre malbabilema viro, kiu malofte sin miksis en aferojn de aliaj. Sed nun li diris:

—Estus bone, se vi du prokrastus vian batalon, ĉar ĉi tie estos io alia farenda. La ŝipanoj estas dek kvar kaj ni estas tri, kaj tio estas sufiĉa diferenco.

Ili lin demandis, kiujn novaĵojn li alportas.

—Ili intencas nin ataki pro la virino, respondis Rapp; multon ili esperas akiri el tio. Mi tion aŭdis, kiam mi iris inter la arboj kolektante lignon.

Orm ridis.

—Ĉiam pli bele sin disvolvas tio, kion vi aranĝis, li diris al Toke.

Toke skuis la kapon kaj ĉagrenite rigardis la dormantan virinon.

—Statas kiel statas, li diris; kaj nun necesas trovi taŭgajn elirojn. Al mi ŝajnas preferinde, ke ni frapu al ili tuj, kiam ili sidas trankvilaj kaj planas nian pereon. Ili estas multnombraj; sed multo mankas, ke ili estus tiaj viroj kiel ni.

—Aspektas, ke estos severa vetero, diris Rapp; tial ne estas oportune forigi multajn el ili; ĉar ni bezonos ilin sur la ŝipo, por ke ne estu maleble foriri de tie ĉi. Sed plej bone estus tuj fari tion, kio farendas, ĉar alie nia nokta ripozo estos ĝenata.

—Ĉi tiuj estas stultaj homoj de Fueno, diris Toke; kiam Åke estos mortigita kaj ankoraŭ kelkaj, certe la aliaj volonte nin obeos. Sed nun vi, Orm, diru kion fari; ĉar eble estus preferinde provi ilin frapi, kiam ili dormos.

Orm sin sentis pli malsevera laŭ humoro nun, kiam li havis ion por fari. Li leviĝis kaj ekstaris por pisi, tiel ke li nerimarkite povis vidi la alian fajron.

—Ili estas dek du ĉirkaŭ la fajro, li diris residiĝinte; tio devas signifi, ke ili, nerimarkite de ni, sendis du por alvoki helpon. Tiam baldaŭ pli granda svarmo sin ĵetos sur nin, kaj tial estas preferinde

nun tuj fari finkalkulon kun ili. Ili estas homoj sen zorgemo kaj kun malmulta energio; ĉar alie ili provus vin frapi, Rapp, kiam ĵus vi promenis sola. Sed nun ni instruos al ili, ke estas necese vigle atenti, kiam oni havas aferon kun ni. Mi volas, ke vi du silente sekvu min, kiam mi atingos ilin kaj babilos kaj iliaj rigardoj estos fiksitaj al mi; rapide kaj akre vi haku, por ke ni havu sukceson. Mi devas iri senŝirmila, sed tio estas neevitebla.

Li prenis mane trinksitelon, en kiu antaŭe estis biero por la vespermanĝo, kaj iris ĝis la fajro de Åke por ĝin plenigi el la barelo, kiu estis lokita tie. Iuj el la viroj ĉirkaŭ la fajro jam kuŝiĝis por dormi, sed la plimulto sidis veka kaj tenis la okulojn al Orm. Pleniginte la sitelon li forblovis la ŝaŭmon kaj trinkis gluton.

—El malbona ligno via barelo, li diris al Åke. Via biero jam gustas je ligno.

—Biero, kiu sufiĉe bongustis al reĝo Harald, povas sufiĉe bongusti al vi, kolere respondis Åke. Sed tion mi promesas al vi, ke vi ne bezonos trinki pli da tiu speco.

Pro tiuj vortoj la viroj ridis, sed Orm etendis al li la sitelon ŝajnigante nekomprenon.

—Mem gustumu, ĉu mi ne pravas, li diris.

Sidante Åke akceptis la sitelon. Post kiam li ĝin levis ĝis la buŝo, Orm frapis ĝian fundon per piedbato, tiel ke la vangoj fendiĝis kaj la mentono falis malsupren sur la bruston.

—Ĉu vi rimarkas la lignoguston? diris Orm; kaj sammomente li eltiris sian glavon kaj hakis viron, kiu sidis plej proksime kaj ĵus ekstaris.

La viroj ĉirkaŭ la fajro surpriziĝis je tio kaj apenaŭ enmanigis siajn armilojn, antaŭ ol Toke kaj Rapp de malantaŭe sin ĵetis sur ilin; kaj post tio ne restis la ili multe da tempo por montri sian kapablon. Krom Åke kvar estis mortigitaj, du fuĝis en la arbaron, kaj la restan-

taj kvin estis pelitaj sur la ŝipon kaj preparis sin por defendi sin tie. Orm kriis al ili, ke ili forĵetu siajn armilojn; tiam li indulgos al ili vivon. Ili hezitis je tio.

—Ni ne povas scii, ĉu vi tenos vian vorton, ili diris.

—Tiel estas, li diris; sed vi povas esperi, ke mi ne estas same perfida kiel vi mem.

Ili interkonsiliĝis kaj opiniis, ke tio ne donas al ili grandan sekurecon; ili preferus, ili diris, foriri kun siaj armiloj kaj lasi al Orm la ŝipon kaj ĉion alian.

—Do mi anstataŭe donas al vi tiun sekurecon, diris Orm, ke vi ĉiuj estos mortigitaj tie, ke vi staras, se vi ne tuj obeas. Kaj eble tio estas pli oportuna por vi.

Tion dirinte li paŝis sur la ŝipon kaj iris kontraŭ ili, ne atendante Toke kaj Rapp. Perdinta la helmon pro ŝtonĵeto, kolerokula kaj kun Blulango sanga en sia mano, li aliris ilin kvazaŭ por puni hundojn; kaj nun ili obeis al li kaj ĵetis siajn armilojn dirante malicajn vortojn pri Åke; ĉar ili estis senkuraĝaj pro tio, ke ĉio iris alie ol tiu estis dirinta al ili.

Estis nun krepusko kaj la vento forte blovis, sed laŭ Orm ne estis konsilinde resti en tiu loko. Ĉar, li diris, baldaŭ venos tumulte duonkantono da selandanoj por rekapti la propraĵon de reĝo Harald. Tial ili nun devas elprovi sian bonŝancon sur la maro, en mallumo kaj severa vetero kaj kun tro malmulte da brakoj, pro tiu okazintaĵo, kies sekvojn ili certe longe rimarkos.

Nun ili sin urĝis kaj transportis sur la ŝipon nutraĵkeston kaj bierbarelon; la virino silente ploris kaj klakis per la dentoj antaŭ tia vojaĝo, sed venis sen plendo. Per sia glavo Orm gardis la kaptitojn, kiujn ili metis ĉe la remilojn, dum Toke kaj Rapp levis la bieron sur la ŝipon; Toke estis mallerta kaj fuŝmana, kaj Orm kriis al ili, ke ili rapidu.

—Fariĝas ŝmire, kie mi prenas, kaj la fingroj glitas, diris malgaje Toke; ĉar mia mano estas distranĉita.

Orm neniam lin aŭdis tiel deprimita. Lia glavomano estis distranĉita apud la longa fingro, tiel ke la fingroj dismontris duope.

—Sango ne mankas al mi, diris Toke; sed por remado la mano malbone taŭgas ĉivespere; kaj tio estas maloportuna, ĉar estos necesaj penoj por eliri el la golfo.

Li lavis la manon en la akvo kaj sin turnis al la virino.

—Vi, kompatinda, jam helpis al mi multon malordigi, li diris, sed povas esti, ke vi malpli kaŭzis ol mi; nun mi vidu, ĉu vi ankaŭ en tio ĉi povas min helpi.

La virino viŝis al si la larmojn kaj lin alpaŝis. Ŝi mallaŭte ĝemis, kiam ŝi vidis kiel granda estas la vundo, sed montris kapablon prizorgante ĝin. Plej multe ŝi dezirus havi vinon por lavado kaj araneaĵon por surmeto, sed manke de ili ŝi helpis sin per akvo kaj graminoj kaj maĉita pano, kaj post tio ŝi forte bandaĝis per strioj, kiujn ŝi ŝiris de sia ĉemizo.

—Eĉ la plej senutila povas ekservi utile, diris Orm; kaj nun ni ambaŭ estas maldekstramanaj.

Estis rimarkeble en lia voĉo, ke lia kolero al Toke malkreskis.

Ili nun forbordiĝis kun sep remantoj kaj kun Toke ĉe la direktilo; kaj eliri el la golfo kaj ĉirkaŭremi la terlangon estis peno pli severa ol Orm iam spertis, post kiam li sidis remsklavo. Li tenis lancon preta por marki la unuan el la kaptitoj, kiu ne montrus diligenton; kaj kiam remilo glitis en akvovalo, kiu antaŭis ondon, kaj la remanto falis surdorse, tiam ĉi lasta rapide eksidis kaj rekaptis la remilon. La virino kaŭris ĉe la piedoj de Toke kaj kovris la okulojn pro timo kaj mizero. Toke ŝin puŝis per la piedo kaj ordonis al ŝi preni la ĉerpsitelon kaj esti utila. Sed kvankam ŝi klopodis lin obei,

ŝi nenion kapablis, kaj la ŝipo estis duone plena de akvo, kiam ili fine estis pasintaj la terlangon kaj levintaj la velon kaj povis ekĉerpi.

Nun ili drivis dum la tuta nokto sub la ŝtormo, kaj Orm mem staris ĉe la direktilo. Eblis al li nur direkti la ŝipon nordorienten kaj esperi, ke ĝi ne estos ĵetata kontraŭ la bordon antaŭ la tagiĝo. Neniu havis grandan esperon travivi tian veteron, kiu estis pli severa ol io, kion ili spertis vojaĝante al Irlando; kaj Rapp diris:

—Jen estas nun kvin kaptitoj sur la ŝipo, senarmilaj kaj tute sub nia mano. Ĉu ili ankoraŭfoje utilos ĉe la remiloj ne estas certe; sed ili povas utili al ni kvietigante la veteron, se ni ilin donos al la marpopolo.

Toke diris, ke tiu plano ŝajnas al li bona kaj justa, sed ke oni komence eble povus meti limon je unu aŭ du kaj vidi, ĉu tio helpos.

Sed Orm diris, ke nenio tia estas farebla je la kvin kaptitoj, ĉar li promesis al ili, ke li indulgos la vivon.

—Kaj se vi, Toke, iun volas doni al la marpopolo, li diris, mi ne scias elturnon alian, ol ke vi donu vian virinon. Kaj povus esti avantaĝe por ni ĉiuj liberiĝi de persono, kiu kaŭzis al ni tiom da damaĝo.

Sed Toke diris, ke tiel ne okazos dum li vivos kaj ankoraŭ havas unu manon taŭgan por levi la glavon.

Nenion plian ili parolis pri tio. Tage venis granda pluvo, kiu estis kvazaŭ fumo ĉirkaŭ ili, kaj la ŝtormo komencis kvietiĝi. Kiam heliĝis, ili vidis la bordon de Halland kaj lacaj atingis riverbuŝon kun la ŝipo akvoplena kaj la velo ŝirita.

—Ĉi tiuj tabuloj min portis de la tombo de Sankta Jakobo ĝis tie ĉi, diris Orm, kaj ĝis hejme longa distanco ne restas. Sed mi revenas hejmen sen la kolĉeno kaj sen la sonorilo de Jakobo; kaj grandan profiton mi ne gajnis fordonante ilin dumvoje.

—Unu glavon kaj unu ŝipon vi portas hejmen de via vojaĝo, di-

ris Toke, kaj unu glavon kaj unu virinon mi havas; kaj tiel bone ne finiĝis por multaj el tiuj, kiuj remis kun Krok.

—La kolero de granda reĝo ankaŭ akompanas nin hejmen, diris Orm; kaj akiraĵon pli malbonan neniu povas kunporti.

Nun la penoj kaj kontraŭoj de la vojaĝo pasis; la kvin kaptitojn ili albordigis kaj permesis al ili forkuri; kaj kiam ili post tio ripozis kaj riparis la ŝipon kaj la velon, ili ricevis belan veteron kaj veladis kun malforta vento suden laŭ la bordo. Eĉ la virino nun montris bravan animon kaj povis asisti en io kaj alia, tiel ke Orm trovis, ke li povas ŝin toleri pli bone ol antaŭe.

En la vespero ili albordiĝis apud la plataj rokoj sub la bieno de Toste, kie staris la ŝipoj de Krok, kiam ili laste vidis la lokon, kaj ili laŭiris la vojeton ĝis la bieno. Orm iris unua. Post kelka distanco la vojeto pasis rapidfluan rivereton; tie troviĝis ponteto el tri trunkoj. Orm diris:

—Atentu la maldekstran. Ĝi estas putra kaj glitiga.

Post tio li rigardis la trunkon kaj diris:

—Ĝi estis putrinta jam longe antaŭ ol mi foriris, kaj ĉiufoje, kiam mia patro pasis ĉi tie, li diris, ke ĝi estu riparita plejeble baldaŭ. Kaj ĝi ankoraŭ ne estas riparita, kaj ĝi ankaŭ ne malsuprenfalis, kaj tamen ŝajnas al mi, ke mi longe estis for. Do eble ankaŭ la maljunulo vivas.

Post ankoraŭ ioma distanco troviĝis nesto de cikonio en alta arbo; staris cikonio en la nesto. Orm haltis kaj fajfis, kaj la cikonio frapis per la flugiloj kaj klakigis la bekon.

—Ĝi min rekonas, diris Orm, kaj estas la sama cikonio; kaj nun ŝajnas al mi, ke ni hieraŭ interparolis, ĝi kaj mi.

Post tio ili pasis tra barila kradpordo. Orm diris:

—Zorge fermu la pordon; ĉar mia patrino afliktiĝas, kiam la ŝa-

foj elkuras, kaj la vespermanĝo fariĝas malpli bongusta, kiam ŝi koleras.

Hundoj ekbojis, kaj domanoj staris gvatante ĉe la pordo, kiam ili proksimiĝis al la bieno. Virino trapuŝis al si vojon inter la viroj kaj venis al ili renkonte. Estis Åsa. Ŝi estis pala, sed cetere aspektis same vigla kiel antaŭe.

—Nun mi revenis, diris Orm.

—Orm! ŝi diris, kaj ŝia voĉo tremis. Post tio ŝi aldonis: Dio min aŭdis kvankam longe atendigis.

—Ŝajnas, ke li multajn devas aŭskulti nuntempe, diris Orm; sed neatendita tio estis, ke vi kristaniĝis.

—Mi estis sola, diris Åsa; sed nun ĉio estas bona.

—Ĉu viaj viroj jam forvelis? Orm demandis.

—Neniuj restas al mi, ŝi diris. Odd malaperis en la jaro post vi; kaj Toste mortis antaŭ tri jaroj, en tiu sama vintro, kiam la granda brutmalsano furiozis. Sed mi povis vivi, post kiam mi lernis la veron de la kristanoj; ĉar mi sciis, ke vi revenos pro miaj preĝoj.

—Estas multo pri kio paroli, diris Orm, sed estus bone antaŭe manĝi. Ĉi tiuj estas miaj viroj; sed la virino estas fremdlanda kaj ne mia.

Åsa diris, ke Orm nun estas la mastro de la bieno kaj ke ĉiuj liaj amikoj estas ŝiaj amikoj, kaj ili ricevis regalon plej bonan; larmoj estis en ŝiaj okuloj, kiam ŝi alportis manĝaĵon tian, pri kiu ŝi sciis, ke Orm ĝin ŝatas plej multe. Multo estis rakontinda, tiel ke sufiĉis por pluraj vesperoj; sed nenio estis dirita pri tio, kiel Toke akiris sian virinon, ĉar Orm ne volis nebuligi la ĝojon de sia patrino tuj post la hejmreveno. Åsa tuj ekŝatis Toke kaj flegis lian dishakitan manon kun granda zorgemo, tiel ke ĝi baldaŭ komencis kuraciĝi; kaj kontraŭ Mirah ŝi estis patrineca kaj tenera malgraŭ tio, ke ili ne multe povis interparoli, kaj laŭdis ŝian belecon kaj nigrajn harojn. Ŝi opi-

niis domaĝe, ke Orm kaj lia societo ne volis danki al Dio kune kun ŝi pro la sukcesa hejmreveno; sed ŝi estis tro ĝoja por malbonhumoriĝi pro tio, kaj diris, ke kaj Orm kaj la aliaj pli bone komprenos, kiam ili atingos pli maturan aĝon.

Orm komence sin sentis iom fremda antaŭ Åsa pro ŝiaj ĝojo kaj mildeco; kaj nur en la sesa tago li ekaŭdis ŝin per akra lango ataki la servistinojn kaj opiniis, ke ŝi komencas denove simili al si mem.

Inter Orm kaj Toke estis paco kaj nenion ili diris pri Ylva. Kiam ili rakontis al Åsa pri tio, kio okazis al ili post la ekvojaĝo de Krok, Orm sentis la malnovan amikecon al Toke kaj multon diris laŭde pri li; sed kiam li ekpensis pri Ylva, lia humoro ŝanĝiĝis kaj la vido de Toke kaj lia virino lin malplej multe ĝojigis. Mirah nun tagon post tago ĉiam pli beliĝis kaj ridis kaj kantis; ŝi kaj Toke sentis tian komforton kune, ke ili malmulte rimarkis la ĉagrenojn de aliaj. Åsa kredis, ke ili ricevos belajn infanojn kune, kaj Mirah sune ridetis kaj diris, ke ili faras kiom eblas por tion akceli. Åsa diris, ke ŝi nun intencas serĉi edzinon al Orm kiel eble plej frue, sed Orm kun morna mieno respondis, ke urĝo ne necesas.

Pro la stato de la aferoj Toke ne povis daŭrigi sian hejmreiron sur la maro, kiam reĝo Harald troviĝis apud Skanör; li decidis iri sur la tero al Lister, sola kun la virino (ĉar Rapp restis ĉe Orm), kaj aĉetis ĉevalojn por la marŝo. Frue matene ili foriris kaj Orm ilin akompanis laŭ certa distanco por montri al ili la ĝustan vojon.

—Tie ĉi ni disiras, diris Orm; kaj bonan vojaĝon mi povas deziri al vi. Sed kio poste venos, pri tio estas malfacile diveni favore; ĉar reĝo Harald serĉos vin, kie ajn vi vin trovos.

—Estas nia sorto, diris Toke, ke ni havas malbonajn rilatojn kun reĝoj, kvankam ni estas same pacamaj kiel aliaj. Almansur kaj reĝo Sven kaj reĝo Harald: por ni finiĝis same kun ili ĉiuj, kaj kiu al ili

portus niajn kapojn, tiu estus riĉe kompensita. Sed mi tamen klopodos konservi la mian.

Per tio ili disiris. Toke kaj Mirah rajdis orienten kaj malaperis inter la arboj; kaj Orm rerajdis al la bieno por rakonti pri la malpaco, kiu pro la kolero de reĝo Harald ilin minacos.

DUA PARTO

# En la regno de reĝo Ethelred

UNUA ĈAPITRO

# Pri la batalo kiu okazis ĉe Maeldun kaj kio el ĝi elvenis.

En tiu printempo multaj ŝipoj estis ĉarpentitaj laŭ la bordoj de la Nordo, kaj kiloj de longe sekiĝantaj estis gudrataj; golfoj kaj markoloj elsputis ŝiparojn, portantajn en si reĝojn kaj ties kolerojn; kaj dum tiu somero granda malkvieto estis sur la maroj.

Styrbjörn frue remis norden sur la Balta Maro kun multaj ŝipoj, kun ŝipanoj el Jomsburgo, Bornholmo kaj Skanio, kaj sin direktis en lagon Mälaren kaj venis al la ebenaĵo apud Upsalo; tie leviĝis batalo inter li kaj reĝo Erik. Tie li falis komence de la batalo; kaj oni diris, ke li falis ridante. Ĉar kiam li vidis la batalantaron de la sveoj marŝi antaŭen ariĝinte laŭ antikva kutimo, malantaŭ ĉevalkapoj alte portataj sur stangoj, kaj kun reĝo Erik mem en malnova sankta bovtirata ĉaro en la mezo de la formacio, li ĵetklinis la kapon malantaŭen kaj larĝe ekridis; kaj en tiu momento lanco penetris inter barbo kaj ŝirmilrando kaj trafis lin en la kolo. Tiam nuliĝis la kuraĝo de liaj batalantoj, kaj kelkaj tuj fuĝis; kaj tie reĝo Erik grande venkis.

Poste reĝo Sven Dubarba velis suden inter la danaj insuloj, kun ŝipoj el Fueno kaj Jutlando, por kapti reĝon Harald, kiu sidis kalkulante haringo-monon en Skanör; ĉar reĝon Sven nun jam tro tedis tio, ke lia patro ĉiam plu rifuzis morti. Sed reĝo Harald eskapis al Bornholmo kaj sukcesis tie kolekti ŝipojn; kaj inter tiuj du nun leviĝis akraj bataloj, ĝis reĝo Harald vundiĝis kaj fuĝis al Jomsburgo.

Tiam regis kverelo en multaj regionoj de la Dana regno; ĉar multaj sin tenis al reĝo Harald, aliaj sekvis reĝon Sven; kaj aliaj volis akceli sian propran fortunon, kiam la lando sin etendis senmastra inter militantaj reĝoj.

Sed kiam la somero floradis, reĝo Erik de Upsalo venis, kun pli granda batalantaro ol surmarigis dum longa tempo la sveoj, kaj pelis antaŭ si la restaĵojn de la ŝiparo de Styrbjörn, kiu rabadis liajn bordojn por venĝi sin pro la morto de sia mastro. Li volis sin venĝi kaj kontraŭ reĝo Harald kaj kontraŭ reĝo Sven pro la asisto, kiun ili donis al Styrbjörn; kaj al multaj ŝajnis, ke apenaŭ valoras la penon kontraŭstari tiun, kiu supervenkis Styrbjörn kaj kiun oni komencis nomi Multvenka. Li postsekvis reĝon Sven, kiam tiu retiriĝis al la insuloj kaj al Jutlando, kaj kien li alvenis, tie li enoficigis siajn proprajn jarlojn. Diskuris nun baldaŭ la famo, ke reĝo Harald pro siaj vundoj mortis kiel senlanda rifuĝinto en Jomsburgo, forlasita de tiu bonŝanco, kiu antaŭe ĉiam lin akompanis; sed inter la du aliaj la batalo kontinuis. Reĝo Erik superregis, sed reĝo Sven obstine kontraŭis. Oni diris, ke la reĝbieno en Jellinge foje estis en la mano de unu, foje en la mano de la alia; sed oni opiniis plej kredeble, ke reĝo Sven estis tiu, kiu unua malfermis la arĝentkestojn de reĝo Harald.

En Skanio sidis grandbienuloj, kiuj malmulte emis sin miksi en ĉion tion ĉi, kaj preferis, ke la reĝoj mem reguligu la aferojn inter si, por ke ili mem sin okupu per aferoj pli profitaj. Inter tiuj estis Thorkel Höge, kiu ne volis esti partiano de reĝo Sven kaj eĉ malpli volis akcepti ŝrumpintan potencon sub reĝo Erik. Li dissendis mesaĝon al ĉefuloj kaj grandbienuloj, ke li intencas forveli eksterlanden, al Frislando kaj Anglolando, se li trovos kontentigan akompantaron. Multaj konsentis pri tiu plano, ĉar Thorkel estis ŝatata ĉefulo, kaj oni konsideris lian bonŝancon favora ekde tiam, kiam li evitis vivperdon en Hjörungavåg. Ankaŭ senmastruloj de la ekspedicio de

Styrbjörn, kiuj evitis reĝon Erik, aliĝis al li, kaj baldaŭ li kun dudek du ŝipoj sin trovis en la Sundo ĉe insulo Hven, sed tamen ne opiniis sin sufiĉe forta por forveli.

Unu el tiuj, kiuj tie aliĝis al li, estis Orm la Ruĝa, filo de Toste de Kullen, kun granda kaj bone homekipita ŝipo; lin Thorkel ekkonis dum la julfesteno ĉe reĝo Harald kaj lin salutis kun ĝojo.

Jam post ne longe Orm tediĝis sidante hejme, regante super bovinoj kaj servistoj; kaj estis al li malfacile dum longa tempo senti komforton kune kun Åsa malgraŭ tio, ke ŝi ĉiam bonvolis al li. Antaŭ ŝi li daŭre estis nur duonkreskinta knabo, kaj ŝi konstante lin superŝutis per bonaj konsiloj, kvazaŭ li mem havus malmulte da prudento. Diri al ŝi, ke li jam de longe havas kutimon decidi kaj por si kaj por aliaj, ne efikis; kaj ŝia fervoro lin kristanigi kaj provizi per edzino ne plibonigis lian komforton.

La sciigo pri la morto de reĝo Harald estis granda malpeziĝo por ili ambaŭ; ĉar kiam Åsa unue aŭdis, kiel Toke havigis al si la virinon, ŝin kaptis timo, kaj ŝi opiniis, ke ili vendu la bienon kaj transmoviĝu al ŝia gepatra heredaĵo en la arbaroj ĉe la limo de Smolando, por tiel esti pli sekuraj kontraŭ la mano de reĝo Harald. Tiu timo malaperis kun reĝo Harald; sed siajn pensojn pri Ylva Orm ne povis malaperigi, kaj tiuj lin plej multe ĉagrenis. Li ofte sin demandis, kia estas ŝia farto post la morto de reĝo Harald; ĉu reĝo Sven nun faras aranĝojn por ŝin edzinigi al iu el siaj berserkoj; aŭ ĉu ŝi falis en la manojn de la sveoj, kio ne ŝajnis al li pli bona. Estante malamiko de reĝo Sven, li sciis nenian rimedon por ŝin retrovi, malplej dum malpaco regas ĉirkaŭ la insuloj.

Nenion pri Ylva li diris al Åsa por eviti ĉiun senutilan babiladon atendeblan pri tio. Sed el tio li malgrandan gajnon tiris; ĉar Åsa havis scion pri pluraj junulinoj en la regiono konvenaj por li, kaj iliaj patrinoj pensis same kiel ŝi kaj vizitis kun siaj filinoj, montrante ilin

novelavitaj kaj kun ruĝaj silkfadenoj en la harplektaĵoj. Ili volonte venis kaj sidis altmamaj kun tintantaj ornamaĵoj kaj kaŝe lin larĝ-okule rigardis; sed la fervoro de Orm restis nerimarkebla, ĉar neniu similis al Ylva nek estis gajhumora kaj vortvigla kiel ŝi; kaj baldaŭ Åsa senpacienciĝis kaj opiniis, ke pli malfacile estas lin kontentigi ol eĉ Odd mem.

Kaj tial, kiam venis la sciigo, ke Thorkel iros eksterlanden gvidante multhoman ekspedicion, Orm ne estis tre tuŝata de la larmoj de Åsa, sed tuj havigis al si bonan ŝipon kaj alvokis virojn en la regiono. Ĉiuj sciis, ke li estas multvojaĝinta homo, kiu hejmenportis abundon da oro, kaj tial ne estis malfacile por li havigi al si elektitajn ŝipanojn. Li diris al Åsa, ke li verŝajne ne restos for same longe ĉifoje kiel la antaŭan fojon, kaj post tio li ĉesos ekspedicii kaj serioze kultivados la teron. Åsa ploris kaj diris, ke ŝi ne povos vivi en tiaj malĝojo kaj forlasiteco; sed li diris, ke ŝi vivos multe pli longe ol li kaj helpos vergi liajn genepojn. Tiam ŝi ploris eĉ pli, kaj tiel ili disiris, kaj Orm veladis al Thorkel.

Dum Thorkel nun ankoraŭ atendadis venton, alvenis dudek ok ŝipoj remataj de sude, kaj emblemoj kaj ŝippruoj montris, ke ili estas sveoj. Estis kvieta vetero, konvena por batalo, kaj ambaŭ partioj sin pretigis; sed Thorkel vokis al la fremduloj kaj diris, kiu li estas kaj ke li volas paroli kun ilia ĉefulo. Ili havis du egale bravajn ĉefulojn; unu nomiĝis Jostein kaj venis de Uplando, la alia nomiĝis Gudmund kaj estis ostrogoto. Ili venis por helpi reĝon Erik rabi en Danlando, kaj ili demandis al Thorkel, kion pli li volas scii.

—Se ni batalos, diris Thorkel, la venkonto malmulton profitos, sed suferos homperdojn, kvankam estas kredeble, ke mi venkos.

—Ni havas kvin ŝipojn pli ol vi, diris la novevenintoj.

—Miaj homoj ripozis kaj ĵus matenmanĝis, diris Thorkel, sed viaj laciĝis pro remado, kaj tiam malkreskas la lerto kun lancoj kaj

glavoj. Sed ni povus agi en alia maniero, kiu estus utila por ni ĉiuj; ĉar ekzistas lokoj, kie rabado estas pli profita ol en Danlando.

—Ni venis por helpi al reĝo Erik, diris la uplandano.

—Tiel estas, diris Thorkel; kaj se mi batalos kontraŭ vi, mi estos same helpa al reĝo Sven. Sed se ni ne batalos, sed velos kune ĝis kie multo estas gajnebla, tiam ni ambaŭ faros same multe por niaj reĝoj, kiel se ni hakus unu la alian tie ĉi; ĉar en tiu okazo ni ĉiuj estos for; kaj tamen estos tiu diferenco, ke ni restos vivantaj kun riĉaĵoj antaŭ ni.

—Vi bele plektas viajn vortojn, diris Gudmund, kaj prudento estas en ili; estas inde, ke ni pli intime parolu pri tio.

—Pri vi du mi aŭdis, ke vi estas grandaj ĉefuloj kaj honestaj homoj, diris Thorkel, kaj tial mi ne timas perfidon, se ni renkontiĝos por interparolo.

—Mi konas vian fraton Sigvalde, diris Jostein; sed mi aŭdis multajn diri, ke vi, Thorkel, ne estas tia kiel li.

Nun oni decidis, ke ili renkontiĝu sur la insulo por interparolo, sur la strando sub la krutaĵo, videble de la ŝipoj: Jostein kaj Gudmund, ĉiu kun tri ŝipanoj en akompano, kaj Thorkel kun kvin, ĉiuj portantaj glavojn, sed sen ĵetarmiloj. Tiel okazis; kaj de la ŝipoj oni vidis, kiel ili komence staris iom distance unu de la aliaj, ĉiu kun siaj ŝipanoj proksime malantaŭ si. Sed poste Thorkel disportigis bieron kaj lardon kaj panon; kaj baldaŭ oni vidis ilin sidi kune kaj konfidence interparoli. Ju pli Jostein kaj Gudmund pripensis la proponon de Thorkel, des pli bona ĝi ŝajnis al ili; kaj Gudmund baldaŭ konsentis la aferon. Jostein komence kontraŭstaris kaj diris, ke reĝo Erik havas kolereman humoron al tiuj, kiuj lin malobeas; sed Thorkel multe parolis pri la bonaj konjunkturoj por marveturantoj okcidenten, kaj Gudmund opiniis, ke nur kiam bezono de tio montriĝos, estos konvena horo por maltrankviligi sin pro la humoro de reĝo

Erik. Ili faris interkonsenton pri tio, kiaj estu potenco kaj gvidado dum la ekspedicio, kaj kiel ili dividos inter si la predon, por ke neniuj kvereloj leviĝu; kaj Gudmund diris, ke lardo kaj babilado kaŭzas fortan soifon kaj laŭdis la bieron de Thorkel. Thorkel skuis la kapon kaj diris, ke certe nenian pli bongustan li povas regali nun, sed ĝi tamen ne estas komparebla kun la biero en Anglolando, kie la plej bonkvalita malto troviĝas; kaj Jostein devis konsenti tion, ke tiu lando valorus viziton. Poste ili premis al si la manojn promesante akompanon kaj vortplenumon; kaj post kiam ili revenis sur la ŝipojn, tri ŝafoj estis buĉitaj sur la pruoj de la ĉefulaj ŝipoj kiel oferaĵoj al la marestaĵoj por veterbonŝanco kaj prospera vojaĝo. Ĉiuj estis tre kontentaj pri la decidoj; kaj la reputacio de Thorkel, kiu jam estis bona inter liaj ŝipanoj, kreskis eĉ pli pro la prudento, kiun li montris tie.

Ankoraŭ kelkaj ŝipoj venis al Thorkel, skaniaj kaj hallandaj; kaj kiam la vento fariĝis favora, la ŝiparo forvelis kun kvindek kvin veloj, kaj rabadis dum tiu aŭtuno en Frislando kaj travintris tie.

Orm demandis Thorkel kaj aliajn, ĉu ili scias, kio okazis al la domanoj de reĝo Harald. Kelkaj aŭdis, ke Jellinge brulis, aliaj, ke episkopo Poppo kvietigis la maron per himnoj kaj fuĝis trans la maron malgraŭ tio, ke reĝo Sven volis lin kapti; sed neniu sciis ion ajn pri la virinoj de la reĝo.

## 2.

En Anglolando denove komencis fariĝi kiel antikve estis, en la epoko de la filoj de Lodbrok, post kiam reĝo Ethelred venis al potenco. Post kiam li fariĝis plenkreskulo kaj mem ekregis, li baldaŭ koniĝis kiel la Sendecida aŭ Hezitema; kaj marveturantaj normanoj ĝojaj ariĝis ĉirkaŭ liaj bordoj por helpi al li meriti la nomon.

Komence ili venis nur en malgrandaj grupoj kaj baldaŭ estis forpelitaj; ĉar post kiam la signalfajroj ekbrulis laŭ la bordoj, kie ili aperis, baldaŭ bravaj kunvokitaj grupoj batalis kontraŭ ili super larĝaj ŝildoj. Sed reĝo Ethelred oscedis ĉe sia tablo kaj ordonis preĝojn kontraŭ la normanoj kaj diligente ekkonis la virinojn de siaj altranguloj; li kolere blekis en sia kamero, kiam sciiĝis, ke la longŝipoj revenis malgraŭ la preĝoj; lace li aŭskultis multajn konsilojn kaj priplendis sian grandan penon kaj ne sciis, kion cetere fari. Tiam la aroj densiĝis kaj venis ĉiam pli ofte, ĝis ne plu sufiĉis la kunvokitoj por la defendo; kaj nun kelkfoje pli grandaj grupoj penetris konsiderindan distancon en la landon kaj pro predaĵoj klinitaj revenis al siaj ŝipoj; kaj famo ekdiskuris, kiun multaj aŭskultis, ke laŭ graso kaj arĝento neniu regno egalas tiun de reĝo Ethelred por bravaj marveturantoj, kiuj alvenas nombre. Ĉar jam longe Anglolando estis prirabata nur laŭ la bordoj.

Granda ŝiparo ankoraŭ ne alvenis, kaj neniuj ĉefuloj ankoraŭ lernis proprigi al si "la imposton al danoj" en formo de stampita arĝento el la kestoj de reĝo Ethelred; sed en la jaro de graco 991 tiu tago estis atingita, kaj post tiam la lernemo ne malkreskis, tiel longe kiel reĝo Ethelred restis vivanta por pagi.

Mallonge post pasko en la jaro, kiu estis la kvina de plenrajta reĝeco de reĝo Ethelred, la signalfajroj laŭ la bordo de Kent estis bruligitaj; la homoj staris palaj en la matenkrepusko gvatante la maron kaj forkuris por kaŝi, kion eblis kaŝi, kaj siajn brutojn peli en la arbaron kaj sin mem kaŝi kun ili; kaj kurieroj rajdis kiom la ĉevaloj kapablis por diri al reĝo Ethelred kaj liaj jarloj, ke ŝiparo tiel nombra, ke dum multaj jaroj oni tian ne vidis, venis laŭ la bordo, kaj ke la paganoj jam vadis al la strandoj.

La kolektiĝintaj kunvokitoj nenion kapablis kontraŭ la fremduloj, kiuj vagis en fortaj grupoj kaj rabis kaj kunpelis kion ili trovis en

la regiono. Kreiĝis granda timo, ke ili nun penetros en la landon, tiel ke la ĉefepiskopo en Canterbury foriris al la reĝo por alvoki helpon por sia urbo; sed post kiam la fremduloj dum kelka tempo agis laŭ sia plaĉo en la bordregiono kaj portis sur siajn ŝipojn tion, kio al ili ŝajnis valora, ili denove forvelis norden laŭ la bordo. Post tio ili albordiĝis ĉe la orientaj saksoj kaj agis same ĉe ili.

Reĝo Ethelred kaj lia ĉefepiskopo, kiu nomiĝis Sigerik, dekretis pli longajn preĝojn ol iam antaŭe; kaj kiam ili baldaŭ aŭdis, ke la paganoj, ruiniginte kelkajn vilaĝojn, denove surmariĝis, ili disdonigis donacojn al tiuj pastroj, kiuj plej diligente preĝis, kaj ili kredis, ke nun ili sin forsavis de tiu plago. Mallonge post tio la normanoj remadis kontraŭ la urbon Maeldun situantan tuj apud la buŝo de la rivero Panto, kaj bivakis sur insulo inter du riverbranĉoj kaj sin pretigis por ataki la urbon.

La jarlo de la orientaj saksoj nomiĝis Byrhtnoth. Li estis fama en la lando, pli altkreska ol aliaj, kaj viro fiera kaj sentima. Multajn li jam kunvokis kaj nun marŝis kontraŭ ilin por provi alian rimedon ol preĝojn kaj atingis Maeldun kaj pretermarŝis la urbon direkte al ilia bivako, ĝis nur la riverbranĉoj dividis la du batalantarojn. Sed nun estis por li malfacile atingi la normanojn malantaŭ la rivero, kaj por ili lin atingi same malfacile. La fluso alvenis kaj plenigis la riverbranĉon ĝisrande; ne pli larĝa ĝi estis, ol ke eblis interŝanĝi ĵetlancojn kaj alvokojn, sed ŝajnis, ke ne pli ol tio povos okazi, kaj la batalantaroj atendante staris unu kontraŭ la alia en ludanta printempa vetero.

Heroldo el la akompanantaro de Thorkel Höge, lingvokapabla homo, aliris la akvorandon kaj levis sian ŝildon kaj kriis trans la akvo:

—Sentimaj marveturantoj min sendis por diri al vi jenon: Donu al ni arĝenton kaj oron, tiam ni donos al vi pacon. Vi estas pli riĉaj

ol ni, kaj estas pli oportune por vi aĉeti pacon per trezoroj ol per lancoj kaj glavoj renkonti virojn, kiaj ni estas. Se vi estas sufiĉe riĉaj, ni ne bezonas mortigi unu la aliajn. Kaj kiam vi aĉetos vian liberecon kaj akiros pacon por vi mem, viaj familioj kaj bienoj kaj ĉio, kion vi posedas, tiam ni estos viaj amikoj kaj iros al niaj ŝipoj kun la elaĉetaĵo kaj forvelos de tie ĉi kaj tenos niajn promesojn.

Sed Byrhtnoth mem paŝis antaŭen kaj skuis sian lancon kaj rekriis:

—Aŭskultu, piratoj, nian respondon! Jen la trezoroj, kiujn ni volas doni al vi: pintoj de lancoj kaj akraj glavoj. Estus maltaŭge, se jarlo kiel mi, Byrhtnoth, filo de Byrhthelm, kun senmakula reputacio, ne defendus la landon mian kaj de mia reĝo. Inter ni solviĝu aferoj nur per pinto kaj eĝo, kaj forte vi devos haki antaŭ ol ion alian trovi.

Tie ili staris unu kontraŭ la alia, ĝis la tajdo sin turnis kaj komencis flui maren; tiam la heroldo de la vikingoj denove kriis trans la rivero:

—Nun ni sufiĉe longe staris senokupaj. Venu al ni kaj ni donos al vi batalspacon ĉi tie; aŭ donu al ni spacon sur via strando, kaj ni iros tien.

Al jarlo Byrhtnoth ŝajnis malprudente travadi; ĉar la riverakvo estis malvarma, kaj liaj bataluloj povus rigidiĝi pro malvarmo kaj peziĝi pro siaj batalkostumoj. Tamen li havis fervoron ekbatali, antaŭ ol liaj bataluloj sentos lacon kaj malsaton. Tial li kriis responde:

—Nun mi cedas al vi lokon: tuj venu batali. Nur Dio povas scii, kiu el ni venkos.

Kaj tiel diras la bardo de Byrhtnoth, kiu partoprenis la lukton kaj evitis vivperdon:

Trempon ne timis forto ŝipula:
vadis sanglupoj uesten trans Panton:
rekte trans brilan akvon riveran
portis tiliajn ŝildojn al bord'.

La batalantoj de Byrhtnoth staris kiel heĝo el ŝildoj, kaj li jam diris al ili, ke ili komence ĵetu siajn lancojn kaj poste antaŭenpaŝu kun la glavoj kaj puŝu la paganojn malantaŭen en la riveron. Sed la normanoj tuj post la alveno rapide formaciiĝis laŭ la riverrando, ĉiu ŝipanaro aparte, kaj poste eligis batalvokojn kaj antaŭenkuris antaŭataj de siaj ŝipĉefuloj. Svarmoj da lancoj falis sur ilin kaj kaŭzis, ke multaj falis kaj restis kuŝantaj, sed la aliaj kuris antaŭen, ĝis ili staris ŝildon kontraŭ ŝildo kun la malamikoj. Nun ekestis forta lukto kun laŭta bruo; kaj dekstre kaj maldekstre la normanoj estis haltigitaj kaj puŝataj. Sed Thorkel Höge kaj tiuj du ŝipĉefuloj, kiuj estis al li plej proksimaj — Orm estis nun el ili, kaj la alia estis Faravid Svensson, fama ĉefulo el Selando, kiun reĝo Harald juĝis senprotekta en tuta Danlando, kaj kiu estis kun Styrbjörn apud Fyris — iris kontraŭ la ŝirmilaron de Byrhtnoth mem kaj ĝin rompis. Thorkel kriis al siaj bataluloj, ke ili faligu la altan viron kun arĝenta helmo kaj tiel akiru la venkon; kaj tie nun leviĝis la plej akra batalo kaj fariĝis malvaste ĉirkaŭ la kubutoj de etkreskuloj. Faravid trarompis al si vojon kaj frapis tiun, kiu portis la signon de Byrhtnoth, kaj faris hakon kontraŭ Byrhtnoth kaj lin vundis, sed mem falis en sama momento kun lanco tra la barbo. Nun bataluloj el la plej elstaraj ambaŭflanke falis; kaj Orm glitis sur perdita ŝildo, kiu estis glitiga pro sango, kaj falis antaŭen sur viron, kiun li ĵus mortigis. Li ricevis frapon de batalklabo sur la nukon, kiam li falis, kaj tuj estis kovrita de ŝildoj, kiujn la proksimuloj el liaj batalantoj ĵetis sur lin por ŝirmi lian dorson.

Kiam li rekonsciiĝis kaj denove ekstaris, helpata de Rapp, la batalo jam translokiĝis, kaj la normanoj superfortis. Byrhtnoth jam falis, kaj multaj el liaj batalantoj fuĝis; sed aliaj kunstaris ringe kaj estis ĉirkaŭitaj kaj ĉiam plu luktis. Supervoĉante la batalbruon Thorkel kriis al ili, ke li volas donaci al ili la vivon, se ili forĵetos siajn armilojn; sed el ilia rondo oni rekriis:

—Des pli taŭge ni trafos, pli forte ni frapos, kun bravo pli kuraĝa, ju malpli multaj ni estos.

Ili plubatalis, ĝis ĉiuj tie kuŝis, kune kun multaj kontraŭuloj, ĉirkaŭ la korpo de sia mastro. Ilia kuraĝo estis tre laŭdata inter la normanoj; sed tiu batalo ĉe Maeldun, tri semajnojn antaŭ pentekosto en tiu jaro 991, estis granda malvenko por reĝo Ethelred kaj fatala por lia regno; kaj vaste ĉirkaŭe la lando nun estis malfermita por la penetro de la fremduloj.

## 3.

La normanoj enterigis siajn mortintojn kaj tostis por ili kaj por la venko. Ili transdonis la korpon de Byrhtnoth al malgajaj senditoj, kiuj venis ĝin venigi al kristana entombigo, kaj mesaĝis al Maeldun kaj aliaj urboj pri fajroimposto kaj elaĉetmono, kiujn ili tuj pagu por eviti aferojn eĉ pli timigajn. Ili ĝojis je la penso pri la riĉaĵoj, kiujn ili jam konsideris siaj, kaj koleriĝis, kiam tagoj pasis dum neniu alvenis kun mono kaj submeto. Tiam ili remis kontraŭ Maeldun kaj bruligis la palisaron ĉe la rivera flanko kaj sturmis la urbon kaj ĝin ruinigis malĝojiĝante poste pri tio, ke multo brulis kaj malmulto postrestis al la predodividantoj. Ili decidis pli singarde bruligi estontece, ĉar arĝenton ili deziris, ne ruiniĝon, en kiu malaperos la arĝento; kaj nun ili diligentis kolektante ĉevalojn de la tuta regiono por establi eblecon rapide atingi regionojn, kie neniuj ilin atendas.

Baldaŭ bandoj rajdis ĉiudirekten kaj revoje portis multon al la bivako; kaj nun la timo en la lando estis tiel granda, ke post la morto de Byrhtnoth neniu ĉefulo sin trovis, kiu volis ilin renkonti en batalo. Kaptitoj diris, ke reĝo Ethelred sidas pala malantaŭ siaj muroj kaj murmuradas kun pastroj kaj ne scias, kion fari.

En la preĝejo en Maeldun, konstruita el ŝtonoj, troviĝis homoj, kiuj fuĝis en la turon je la sturmo, pastroj, virinoj kaj aliaj, kaj tiuj suprentiris al si la ŝtuparojn, tiel ke neniu povis ilin atingi. La normanoj tenis la opinion, ke multajn trezorojn oni portis en la turon, kaj multajn provojn oni faris por malsuprenigi la homojn de tie kaj proprigi al si, kion ili suprenportis. Sed nek per fajro nek per armiloj oni povis ion atingi; kaj tiuj en la turo havis ĉe si manĝaĵon kaj trinkaĵon kaj kantis himnojn kaj ŝajnis kuraĝspiritaj. Kiam la normanoj venis ĝis apud la turo por paroli prudenton en ilin kaj ilin persvadi al malsupreniro kaj transdono de iliaj trezoroj, ili elĵetis ŝtonojn, malbenojn kaj malpuraĵojn sur iliajn kapojn kaj laŭte ĝojis, kiam iu estis trafita. Ĉiuj akordis pri tio, ke ŝtonpreĝejoj kaj iliaj turoj estas la plej ĉagrenaj aferoj troveblaj.

Jostein, kiu estis maljuna hardito kaj tre avida pri trezoroj, diris, ke li scias nur unu, kio povos helpi: oni devus kolekti kaptitojn antaŭ la preĝejo kaj ilin mortfrapi unu post la alia, ĝis tiuj supre cedos antaŭ tiu vido. Iuj akordis kun li, ĉar lia reputacio pro saĝo estis granda; sed Gudmund kaj Thorkel opiniis tion tro malnobla kaj ne volis aprobi. Prefere, diris Thorkel, ili provu ruzon: li havas bonan konon pri pastroj kaj scias kiel konduti kontraŭ ili por ilin devigi al sia volo.

Li malfiksigis grandan krucon, kiu sin trovis super la altaro en la preĝejo. Du viroj ĝin portis antaŭ li; kaj li ekstaris apud la turo kaj suprenkriis, ke li bezonas pastrojn por flego al la vunditoj, kaj eĉ pli por ke li mem ricevu edukon pri la kristana instruo. Dum la lasta

tempo, li diris, li komencis senti fortan sopiron al tio. Kaj li volas agi al ili, kvazaŭ li jam estus kristano kaj permesi al ĉiuj en la turo foriri sen damaĝo.

Kiam li estis dirinta tion, ŝtono venis el la turo kaj trafis lian ŝirmilan brakon ĉe la ŝultro, tiel ke li falis kun brako rompita. La du viroj faligis la krucon kaj helpis lin foriri; kaj la homoj supre en la turo jubilis pro kontenteco. Jostein rigardis kaj ridetis kaj diris, ke elpensi efikajn ruzaĵojn ne ĉiam estas tiel simple, kiel senprudentaj junuloj povas imagi al si.

Furiozo kaptis ĉiujn ŝipanojn de Thorkel pro tio, ke ilia ĉefulo vundiĝis, kaj dense sagoj estis pafitaj kontraŭ la aperturojn de la turo. Sed tio ne utilis kaj la situacio ŝajnis ĉagrena. Orm diris, ke li en Sudlando kelkfoje vidis la soldatojn de Almansur peli kristanojn el preĝejturoj per fumo; kaj tion ili provis. Hejtaĵon kaj malsekan pajlon ili amasigis kaj en la preĝejo kaj ĉirkaŭ la turo kaj fajrigis; sed la turo estis alta kaj vento forblovis la pli grandan parton de la fumo; kaj fine ĉiuj laciĝis kaj decidis, ke ili retenu paciencon, ĝis la homoj tie supre sentos malsaton.

Thorkel malĝojis pro sia malsukcesinta ruzaĵo kaj timis aŭdi mokvortojn pri la afero. Cetere estas malbone, li diris, ke li nun dum kelka tempo ne povos rajdi kun la aliaj, sed devas sidi en Maeldun gardante la bivakon; kaj li volis, ke kurackapablaj homoj venu kaj prizorgu lian vundon. Ankaŭ Orm alpaŝis lin ĉe la fajro, kie li sidis trinkante varman bieron kun pendanta rompita brako; multaj palpis la brakon, sed neniu povis kompreni, kiel oni prefere ĝin splintu.

Thorkel malbele mienis pro la palpado kaj diris, ke nun ili ĉesigu la kuracajn artifikojn kaj anstataŭe vindu kaj apogu lian brakon kiel eble bone kun aŭ sen splintoj.

—Kaj nun veriĝis tio, kion mi diris, li aldonis, ke pastron mi plej multe bezonas; ĉar pastroj ĉi tiajn aferojn komprenas.

Orm kapjesis kaj diris, ke pastroj estas plej eminentaj kuracantoj: post la julfesteno ĉe reĝo Harald, kiam lin suferigis vundo multe pli grava ol tiu de Thorkel nun, pastro lin kuracis; li povus iun bezoni ankaŭ nun, same kiel Thorkel, li diris; ĉar la frapo de fergarnita klabo sur la kranion ĉiam plu kaŭzis al li doloron, tiel ke li de tempo al tempo kredas, ke rompiĝis en la kapinterno io.

—Mi konsideras vin plej saĝa el ĉiuj miaj ŝipĉefuloj, diris Thorkel, kiam ili estis solaj; kaj ankaŭ plej brava batalanto, post kiam mortis Faravid; sed tamen estas evidente, ke vi rapide perdas kuraĝon, kiam io vin kontraŭas, eĉ se ne grava.

—Mi havas la staton, diris Orm, de homo perdinta sian bonŝancon. Antaŭe min favoris la bonŝanco, kaj nevundita mi trapasis pli da aferoj ol la plimulto kaj sukcesis en ĉio. Sed post kiam mi revenis de la Sudlando, ĉio min kontraŭis, tiel ke mi perdis mian oran ĉenon, mian fianĉinon kaj tiun viron, kun kiu mi min sentis plej komforta; kaj en bataloj nun estas tiel, ke tuj kiam mi eltiras la glavon, trafas min damaĝo. Kaj kiam mi konsilas elfumi preĝejan turon, eĉ ne tio estas sukcesa.

Thorkel tenis la opinion, ke li vidis virojn pli fatalfrapitajn ol Orm; sed Orm skuis la kapon kaj lasis al Rapp rabekskurse gvidi la ŝipanojn, kaj mem li restis ĉe Thorkel en la urbo kaj preferis sidi sola kaj pensi pri siaj ĉagrenoj.

En iu mateno la sonoriloj en la turo longe sonoris, kaj la homoj tie diligente kantis himnojn, tiel ke viroj kriis supren kaj demandis, kial ili faras bruon. Ne restis al ili tie supre pli da ŝtonoj, kiujn ili povus ĵeti sur la paganojn; sed ili kriis responde, ke nun estas pentekosto kaj ke tio estas ilia tago de ĝojo.

Tiuj respondoj surprizis ĉiujn; kaj iuj demandis, kion ili priĝojas kaj kiel statas ilia bier- kaj viandprovizo.

Ili respondis, ke estu laŭ eblo tio; ili tamen ĝojas, ĉar Kristo estas en la ĉielo kaj ilin helpos.

La ŝipanoj de Thorkel rostis grasajn ŝafojn en la fajroj, kaj la rostodoro blovis kontraŭ la turon, kie ĉiuj malsatis. La ŝipanoj kriis al ili, ke ili agu kiel prudentaj homoj kaj malsuprenvenu kaj gustumu la rostaĵon; sed ili ne atentis pri tio kaj baldaŭ denove ekkantis.

Thorkel kaj Orm manĝante sidis kune kaj aŭskultis la kantadon en la turo.

—Pli raŭke ol kutime ili kantas, diris Thorkel; sekeco ekestis en iliaj gorĝoj. Daŭros do ne longe, antaŭ ol ili elvenos, se elĉerpiĝis ilia trinkaĵo.

—Ili statas pli mizere ol mi, sed tamen ili kantas, diris Orm kaj rigardis malgaje belan pecon da ŝafviando, antaŭ ol li ĝin ŝovis en la buŝon.

—Supoze estas tiel, diris Thorkel, ke vi malbone konvenus kiel kantisto en preĝejturo.

## 4.

Meze en la sama tago Gudmund revenis de ekspedicio en la landon. Li estis altkreska kaj gajhumora viro kun vizaĝo stria de cikatroj kaŭzitaj de ungoj de urso; ebria kaj babilema li nun enrajdis la bivakon kun kara skarlata mantelo pendanta de la ŝultroj kaj du pezaj arĝentaj zonoj ĉirkaŭ la talio kaj larĝa rideto en sia flava barbo.

Tio ĉi, li kriis tuj kiam li vidis Thorkel, estas lando laŭ lia ŝato kaj gusto kun riĉaĵoj superantaj ĉian komprenon; kaj dum ĉiuj vivotagoj li dankos al Thorkel, ke tiu lin logis tien. Naŭ vilaĝojn kaj unu foirtransporton li rabis kaj perdis kvar virojn; la ĉevaloj genufleksis

sub siaj ŝarĝoj malgraŭ tio, ke nur la plej valoran ili portis, kaj poste iris bovĉaroj kun forta biero kaj aliaj aferoj. Estas tre necese, li diris, jam frue serĉi pli da ŝipoj kun vasta ŝarĝospaco por povi hejmenporti ĉion, kion ili kun malmulta peno povis kolekti en ĉi tiu lando.

—Cetere mi ankaŭ trovis bandon da homoj survoje, li diris; du episkopoj kaj iliaj sekvantoj. Ili diras, ke ili estas senditoj de reĝo Ethelred, kaj mi regalis al ili bieron kaj venigis kun mi. La episkopoj estas maljunaj kaj malrapide rajdas, sed ili baldaŭ alvenos; kaj kion ili volas ĉe ni, tio ne estas facile komprenebla. Ili diris, ke ili alportas pacon de sia mastro; sed ja estas ni kaj ne li, kiu decidas kiam estos paco. Povas esti, ke ili volas instrui al ni kristanecon; sed ne restos al ni multe da tempo por aŭskulti, kiam ĉie estas tiel bonaj rabeblecoj.

Thorkel ekĝojis kaj diris, ke pastron li plej multe bezonas ĝuste nun, por ke lia brako havu flegon; kaj ankaŭ Orm volis interparoli kun pastro pri sia doloranta kapo.

—Sed eble ilia vera komisio estas elaĉeti kaptitojn kaj la homojn en la turo, kredis Thorkel.

Post mallonge la episkopoj enrajdis la bivakon. Respektindaj viroj ili estis kun bastonoj kaj kapuĉoj kaj multaj akompanantoj, antaŭrajdantoj kaj pastroj, kelneroj, vinservistoj kaj muzikistoj; kaj ili proklamis pacon de Dio al ĉiuj, kiujn ili renkontis. La ŝipanoj de Thorkel, kiom da ili estis en la urbo, venis ilin prigapi; sed kelkaj el ili repaŝis, kiam la episkopoj levis manon al ili; kaj la homoj en la turo laŭte ekkriis ĉe ilia vido kaj komencis denove sonigi siajn sonorilojn.

Thorkel kaj Gudmund montris al ili gastigemon ĉiaspecan; kaj ripozinte kaj dankinte Dion pro bona vojaĝo, ili eldiris sian aferon.

Tiu el la episkopoj, kiu laŭ aspekto estis pli maljuna kaj kiun oni

nomis episkopo de la tombo de Sankta Edmund, ekparolis antaŭ Thorkel kaj Gudmund kaj aliaj, kiuj alvenis por aŭskulti. Li diris, ke la tempoj estas malbonaj kaj ke estas malĝojo por Kristo kaj lia eklezio, ke la homoj ne komprenas vivi pace unuj kun la aliaj en toleremo kaj amo. Tamen estas nun ĉi tie en Anglolando tiel prospere, ke la lando havas reĝon, kiu plenkore amas la pacon malgraŭ sia granda potenco kaj tiuj legioj da batalantoj, kiujn li povus kunvoki, kaj kiu preferus akiri simpation de siaj malamikoj ol ilin frapi per glavo. Reĝo Ethelred konsideris la normanojn fervoraj junaj viroj sen instruantoj, sensciaj pri sia propra avantaĝo; kaj aŭskultinte saĝajn konsilantojn li tial ĉifoje trovis ĝuste ne agi kun severo sed anstataŭe gvidi milde admonante. Tial li nun elsendis siajn senditojn, ke ili elserĉu, kiel eblas kontentigi la noblajn ĉefulojn kaj ties batalulojn kaj forkonduki ilin de iliaj danĝeraj vojoj. Jen kion deziras reĝo Ethelred: ke ili reiru al siaj ŝipoj kaj forlasu liajn bordojn kaj restu hejme en sia propra lando en paco kaj prospero; kaj por faciligi por ili tion, kaj akiri por ĉiam ilian amikecon, li volas doni al ili tiajn donacojn, ke ili ĉiuj estos plenaj de ĝojo kaj dankemo. Eble de tio iliaj koroj estos molaj, tiel ke ili lernos ami la leĝon de Dio kaj la evangelion de Kristo. Tiam vere la ĝojo de la bona reĝo Ethelred estos granda, kaj lia amo al ili ankoraŭ kreskos.

La episkopo estis kurba pro aĝo kaj sendenta, kaj nemultaj komprenis lian parolon; sed liaj vortoj estis interpretataj de lerta pastro el lia sekvantaro, kaj ĉiuj aŭskultantoj sin rigardis reciproke ĉe tia mesaĝo. Gudmund sidis sur bierbarelo, ebria kaj kontenta, kaj frotadis malgrandan krucon el oro, por ke ĝi brilu; kompreninte la parolon de la episkopo li komencis balanciĝi tien-reen pro kontento. Li kriis al Thorkel, ke tiu respondu je tiel bela parolado.

Thorkel ĝentilvorte ekparolis kaj diris, ke la aŭditaj vortoj vere estas pripensindaj. En la dana regno reĝo Ethelred jam ĝuas favo-

ran reputacion; sed nun ŝajnas, ke li estas eĉ pli bona ol oni povis kredi; kaj lia intenco transdoni al ili donacojn bone akordas kun tio, kion ili mem dekomence pensis.

—Ĉar ni diris al jarlo Byrhtnoth, kiam ni interparolis trans la rivero, ke vi en ĉi tiu lando estas riĉaj, kaj ke ni malriĉaj marveturantoj volas esti viaj amikoj, se vi forcedos parton de viaj trezoroj. Nun estas bonfartige aŭdi, ke reĝo Ethelred mem pensas same; kaj li estas tiel riĉa kaj potenca kaj plena de saĝo, ke li certe sin montros malavara. Kiom li intencas doni al ni, tion ni ankoraŭ ne aŭdis; sed multo estas necesa por nin plenigi per ĝojo, ĉar ni estas melankolia tribo; kaj estas preferinde, ke ĉio estu donita al ni en formo de oro kaj monstampita arĝento, ĉar tiel estos al ni plej facile ĝin kalkuli kaj porti hejmen. Kaj ĝis ĉio estos preta, ni volas sidi ĉi tie sen ĝenoj kaj en la regiono preni tion, kion ni bezonas por vivteno kaj komforto. Sed ekzistas alia, al kiu apartenas tiom da decidrajto en ĉi tiu afero, kiom al Gudmund kaj mi, kaj tiu estas Jostein. Li rabekspedicias kun multaj ŝipanoj, kaj ĝis li revenos, ni devos prokrasti la decidon pri tio, kiel granda estu la donaco. Sed pri unu afero mi volas tuj informiĝi, nome, ĉu troviĝas kurackapabla pastro en via sekvantaro; ĉar mi havas ĉi tiun vunditan brakon, kiu bezonas flegon.

La alia episkopo respondis, ke du homoj spertaj pri kuracado ilin akompanas, kaj ke li volonte permesos al ili flegi la vundon de Thorkel. Sed rekompence li volonte vidus, ke la enfermitoj en la turo ricevu permeson malsupreniri kaj sen ĝenoj iri, kien ili volas; ĉar estas preme, li diris, scii, ke malsato kaj soifo ilin turmentas.

—Tre volonte mi permesas al ili eliron, tuj kiam ili deziras, diris Thorkel. Ĝuste al tio ni klopodis inklinigi ilin, de kiam ni okupis ĉi tiun urbon; sed ili obstine kontraŭis spite niajn konsilojn, kaj ili disfrapis mian brakon. Duonon de iliaj trezoroj en la turo ili trans-

donu al mi; tio estas malgranda rekompenco por mia brako kaj ĉia ĉagreno, kiun ili kaŭzis. Kaj post tio ili povos iri, kien ili volas.

Tre baldaŭ ĉiuj malsupreniris el la turo, palaj kaj elsuĉitaj. Kelkaj el ili ploris kaj sin ĵetis antaŭ la piedojn de la episkopoj; aliaj vokis por akvo kaj nutraĵo. La ŝipanoj de Thorkel ĉagreniĝis trovante malmulte da valoraĵoj en la turo; sed ili donis manĝon al ili kaj ilin ne ĝenis.

Orm preterpasis akvotrogon, kie multaj el la estintoj en la turo staris trinkante; inter ili estis malgranda kalva viro en pastra kaftano, kun longa nazo kaj ruĝa cikatro sur la verto. Surprize Orm rigardis kaj alpaŝinte lin kaptoprenis.

—Vin mi ĝoje revidas, li diris; kaj mi ŝuldas al vi dankon, de kiam ni laste nin vidis. Sed neatendite estas renkonti la kuraciston de reĝo Harald ĉi tie. Kiel vi alvenis ĉi tien?

—Ĉi tien mi alvenis de la turo, respondis kolere frato Willibald; tie mi pro paganoj kaj perfortuloj sidis dum dek kvar tagoj.

—Mi havas multon, pri kio paroli kun vi, diris Orm. Akompanu min kaj vi ricevos manĝaĵon kaj trinkaĵon.

—Mi havas nenion, pri kio paroli kun vi, respondis frato Willibald. Ju malpli mi vidas danojn, des pli bone, tiom mi lernis nun. Kaj manĝaĵon kaj trinkaĵon mi ricevos aliloke.

Orm ektimis, ke la malgranda pastro pro kolero forkuros de li kaj malaperos; li tial levis lin kaj forportis kun si promesante, ke nenia malbono okazos al li. Frato Willibald fervore kontraŭbaraktis kaj severe kriegis, ke li volas liberiĝi kaj ke lepro kaj danĝeraj ulceroj estas plej milda puno por tiu, kiu perfortas kontraŭ pastro; sed Orm lin portis en domon, kiun li elektis por si post la konkero de la urbo, kie nun restis nur kelkaj vunditoj de liaj ŝipanoj kaj du tri maljunulinoj.

Estis tre videble, ke la malgranda pastro estis malsatega; sed

kiam viando kaj biero staris antaŭ li, li dum kelka tempo sidis senmova antaŭ plado kaj kruĉo kaj rigardis kun indigna mieno la nutraĵon. Post tio li suspiris kaj ion murmuris por si mem kaj signis krucon super la nutraĵo kaj komencis avide manĝi. Orm plenigis lian bierkruĉon kaj pacience atendis, ĝis li kvietigis sian malsaton. La bongusta biero ne kapablis mildigi lian mienon, kaj nenia favoro koloris lian voĉon; sed nun li konsentis respondi la demandojn de Orm, kaj baldaŭ li parolis kun fervoro.

Li sin forsavis el Danlando kun episkopo Poppo, kiam la malica kaj nekristana reĝo Sven proksimiĝis al Jellinge por pereigi ĉiujn servantojn de Dio tie; kaj la episkopo sidis malforta kaj kaduka ĉe la abato de Westminster kaj funebris sian vanigitan laboron inter la danoj. Sed tio ĉi, kredis frato Willibald, eble ne valoras multan funebron, kiam oni ĝuste pripensas la aferon; ĉar certe ĉio okazinta estas signo de Dio, ke la homoj en la Nordlandoj tute ne devas konvertiĝi, sed prefere estu lasataj por si mem, tiel ke ili pereigu unu la alian per sia malico, kiu vere estas senlima. Kaj li, siaparte, neniam plu intencas alstrebi konvertojn ĉe tiu popolo, tion li estas preta je kruco kaj sufero de Kristo laŭte proklami antaŭ kiu ajn volanta lin aŭskulti, eĉ se tiu estus la ĉefepiskopo mem de Bremeno.

Kun fulmaj okuloj li malplenigis sian kruĉon kaj ŝmacis kaj diris, ke biero pli utilas ol viando por tiu, kiu longe malsatis. Orm enverŝis pli al li, kaj li daŭrigis sian rakonton.

Kiam episkopo Poppo aŭdis, ke danaj vikingoj alteriĝis sur la orienta bordo, li volis havigi al si fidindajn novaĵojn el la dana regno: ĉu ankoraŭ troviĝas iuj kristanoj vivantaj tie, kaj ĉu estas vera tiu famo, kiu sciigis la morton de reĝo Harald, kaj aliajn similajn aferojn. Sed la episkopo mem sin sentis tro malforta por tia danĝera vojaĝo, kaj tial frato Willibald devis vojaĝi.

—Ĉar la episkopo diris al mi, ke malmulte minacos min danĝero

inter la paganoj, eĉ se ili sin trovas en furiozo: ili min bonvenigos al si kiel kuraciston, kaj eble mi estas estimata de multaj, kiuj min vidis en la korto de reĝo Harald. Mi havis miajn proprajn pensojn pri tio, ĉar mi vin konas pli bone ol povas koni vin li, kiu estas tro bona por tiu ĉi mondo; sed ne estas dece kontraŭdiri episkopon en tiaj aferoj, kaj tial mi faris laŭ lia volo. Laca mi alvenis al tiu ĉi urbo en iu vespero, kaj post la vesperdiservo mi ekdormis en la gastigejo de la preĝejo; kaj tie vekis min krioj kaj densa fumo, kaj homoj venis kurante duonnudaj en fajrolumo kaj kriis, ke la diabloj nin atakas. Sed ne estis diabloj, sed pli terure; kaj ŝajnis al mi ne penvalore iri renkonte al ili kun salutoj de episkopo Poppo. Mi sukcesis fuĝi kun la aliaj supren en la turon; kaj tie mi estus pereinta, kaj ankaŭ ĉiuj aliaj, se Dio ne nin savus el la danĝero en tiu ĉi sankta pentekosta tago.

Li kapjesis kaj trinkis kaj rigardis al Orm per lacaj okuloj.

—De tiam pasis dek kvar tagoj, kaj mi ne multe dormis dum tiu tempo. Kaj la korpo estas malforta ... ne, malforta ĝi ne estas, ĝi estas forta, same forta kiel la spirito, sed ne kiom ajn forta.

—Poste vi povos dormi, diris Orm senpacience. Ĉu vi havas sciojn pri Ylva, la filino de reĝo Harald?

—Tiom mi scias, respondis frato Willibald sen hezito, ke ŝi iros en la inferon pro siaj malhumilo kaj malico, se ŝi ne baldaŭ korektos sin. Sed kiu povas atendi sinkorekton ĉe filino de reĝo Harald?

—Ĉu vi koleras ankaŭ al virinoj? diris Orm. Kiun malbonon ŝi faris al vi?

—Ne gravas, kion ŝi faris al mi, diris amare la malgranda pastro; sed vere estas, ke ŝi nomis min kalva kaj maljuna strigo, kiam mi ŝin minacis per la kolero de Dio.

—Ĉu vi ŝin minacis, pastro? diris Orm sin levante. Kial vi ŝin minacis?

—Ŝi kriis, ke ŝi intencas agi laŭ sia volo kaj sin edzinigi al pagano, eĉ se ĉiuj episkopoj en la mondo kontraŭbaraktos.

Orm per mano tiris sian barbon kaj larĝokule lin rigardis kaj denove eksidis.

—Estas mi, al kiu ŝi sin edzinigos, li diris kviete. Kie ŝi estas?

Sed al tiu demando Orm ricevis nenian respondon en tiu vespero; ĉar frato Willibald malrapide mallevis la kapon kaj ĝin apogante sur siaj brakoj ekdormis. Orm klopodis lin veki, sed tio ne naskis sukceson, kaj fine li lin portis al la dormobenko kaj lin metis tie kaj lin kovris. Kun miro li rimarkis, ke li ŝatas tiun malgrandan kolereman pastron; sed sidante dum longa tempo sola ĉe sia biero en dormemo, lia malpacienco kreskis tro, kaj li alpaŝis la benkon kaj forte skuis la dormanton.

Sed frato Willibald nur sin turnis dormante kaj murmuris per knara voĉo:

—Pli teruraj ol diabloj.

## 5.

Kiam la malgranda pastro fine vekiĝis en la sekva mateno, li estis iom pli milda laŭ humoro kaj aspektis komforta kie li sidis; kaj Orm ne malfruis informiĝi pri ĉio, kion la pastreto sciis pri Ylva. Ŝi fuĝis kun la episkopo preferante tion ol resti hejme sub la rego de sia frato Sven; kaj nun ŝi restis kun li dum la vintro, tre malpacience sopirante reiron al Danlando, tuj kiam venos favoraj novaĵoj de tie. Sed famo ĵus dismesaĝis, ke reĝo Harald mortis forpelita; kaj tiam Ylva ekpensadis pri vojaĝo norden al sia fratino Gunhild, kiu estas edzino de la dana jarlo Palling en Northumberland. La episkopo ne volis, ke ŝi entreprenu tian danĝeran vojaĝon, sed preferis, ke ŝi edziniĝu al altrangulo en la lando, kiun elekti li povus helpi. Sed aŭ-

dante tian parolon ŝi paliĝis pro kolero kaj ekinsultis kiun ajn, eĉ la episkopon mem.

Tio estis, kion la malgranda pastro povis diri pri Ylva. Orm kontente aŭdis, ke ŝi sin forsavis de reĝo Sven kaj liaj partianoj, sed peze lin premis, ke li ne sciis pri ebleco ŝin atingi. Sed ankaŭ ĉagrenis lin la frapo, kiu trafis lin sur la nukon, kaj la doloro, kiu ankoraŭ postrestis, sed frato Willibald malestime kurbigis la lipojn pri tio kaj diris, ke kranioj de tiu speco rezistas pli ol tiom. Post tio li metis hirudojn malantaŭ liaj oreloj, tiel ke li baldaŭ sentis sin pli sana. Tiam la pensoj pri Ylva venis al li ĉiam pli; prefere li persvadus Thorkel kaj la aliajn fari grandan rabekspedicion kontraŭ Londono kaj Westminster por tiel ŝin atingi. Sed inter la ĉefuloj kaj la senditoj nun estis longaj intertraktoj pri la donaco de reĝo Ethelred; kaj ĉiuj bataluloj sidis senokupaj atendante kaj manĝis kaj trinkis kaj multe interbabilis pri tio, kiom tiel elstara reĝo laŭ justo devus pagi.

Ambaŭ maljunaj episkopoj virece porstrebis sian aferon kaj tre kontraŭargumentis la sumojn, kiuj ŝajnis al la ĉefuloj konvenaj: ni volas instrui al vi, ili diris, ke troviĝas ol arĝento pli valoraj aferoj, kiuj ne apartenas al ĉi tiu mondo, kaj ke al homo posedanta abundan riĉecon estas pli malfacile atingi la ĉielregnon ol estas malfacile al bovo trairi fumtruon. La ĉefuloj tion aŭskultis kaj diris, ke ili havas volon preni sur sin la damaĝon kun la utilo kaj restu sen ŝanĝo la sumo de ili postulata; kaj se pri la ĉielregno kaj la fumtruo cirkonstancas tiel, kiel diris la episkopoj, ili konsideras sin utilaj helpi al reĝo Ethelred, kiam ili prenas sur sin parton de liaj pezaj apartenaĵoj.

Dum multa suspirado la episkopoj devis altigi sian oferton kaj fine oni ekakordis pri la sumo. Ĉiu ŝipano ricevu ses markojn da arĝento krom tio, kion li jam akiris rabante. Ĉiu ŝipdirektisto ricevu dek du markojn, kaj ĉiu ŝipĉefulo sesdek; kaj Thorkel kaj Gudmund

kaj Jostein ricevu po tri cent markojn. La episkopoj diris, ke ili apenaŭ scias, kion diros la reĝo pri tia sumo, tiom pli, ke li samtempe havas traktantojn ĉe norvega ĉefulo nomata Olaf, filo de Tryggve, kiu kun ŝipanaro prirabis la sudan bordon. Estas necerte, ili diris, ĉu eĉ la riĉaĵoj de reĝo Ethelred sufiĉos por ĉio tio.

Aŭdinte tiun novaĵon la ĉefuloj ektimis, ke ili postulis tro malmulte kaj ke la norvego ilin antaŭos. Konsilinte inter si pri tio, ili diris al la episkopoj, ke ili restos fidelaj je tio, kio estas konsentita, sed ke la episkopoj nun devas rapidi al la reĝo por venigi la arĝenton, kaj ke ili mem estos tre malkontentaj, se la norvego antaŭ ili ricevos sian parton.

La episkopo de Londono, amika kaj ridetanta homo, kapjesis aŭdante tion kaj promesis, ke ili faros, kion ili laŭ eblo povas.

—Sed rimarkinde estas, li diris, vidi tiajn bravajn ĉefulojn havi maltrankvilon pro tiu norvega ĉefulo, kies ŝiparo estas malpli nombra ol la via. Ĉu ne estus bona afero por vi remi al la suda bordo, kie sin tenas tiu ĉefulo, kaj rapide vin ĵeti sur lin kaj akiri ĉiujn liajn trezorojn. Li alvenis de Bretonlando kun belaj ŝipoj kaj oni diras, ke li multon gajnis tie. Kaj tio estus ago, kiu ankoraŭ pli kreskigus la amon, kiun mia reĝa mastro havas por vi; kaj poste estus por li facile disdoni la grandan donacon, kiam li ne devus kontentigi ankaŭ tiun norvegon.

Thorkel kapjesis kaj aspektis hezitema, kaj Gudmund ridis kaj diris, ke pri tio oni povas pensi.

—Mi neniam estis kun norvegoj, li diris; sed ĉiuj scias, ke ĉe renkontoj kun ili leviĝas bona batalo kaj multo rakontinda okazas. Hejme ĉirkaŭ Bråviken multaj diras, ke apenaŭ aliaj ilin superas ol ostrogotoj; kaj estus bone, se ni povus elprovi la aferon. Kaj inter la miaj estas berserkoj de Åland, kiuj komencas diri, ke ĉi tiu ekspedi-

cio donas al ili bonan predon kaj plej bonan bieron, sed nur malmultan batalon; kaj tio estas por ili nekutima, ili diras.

Thorkel diris, ke li estis kun norvegoj kaj ne maldeziras ilin renkonti denove, se nur lia brako estos taŭga; ĉar jen estas akirebla kaj gloro kaj riĉaĵo.

Sed Jostein laŭte ridis kaj deprenis de si la ĉapelon kaj ĝin ĵetis sur la grundon antaŭ si. Li ĉiam portis malnovan ruĝan ĉapelon kun larĝaj randaĵoj, kiam li ne sin trovis en batalo, ĉar la helmo lin frotvundis.

—Rigardu min, li diris, maljuna kaj kalva mi estas; kie aĝo, tie saĝo, rimarkeblas tio nun. Vin, Thorkel kaj Gudmund, la piulo povas forlogi per sia ruzo, sed ne min; ĉar mi estas saĝa samkiel li. Por li kaj lia reĝo estus bone, se ili povus bataligi nin kontraŭ la norvego kaj ni nin pereigus reciproke; tiel li sin liberigus de ni kaj ne bezonus malŝpari arĝenton por la restintoj. Sed tiel ne okazos, se mi rajtos decidi.

Kaj Gudmund kaj Thorkel devis rekoni, ke ili ne pensis pri tio kaj ke Jostein estas plej saĝa el ili; kaj la senditoj trovis, ke nenion plian ili povis fari. Ili tial sin ekipis por reiri al reĝo Ethelred por raporti kiel ĉio okazis kaj por realigi la transpagon de la arĝento kiel eble plej baldaŭ.

Sed antaŭ tio ili sin vestis per siaj plej belegaj ornatoj kaj akompanigis sin per sia sekvantaro kaj sin tiris al la kampo, kie okazis la batalo. Tie ili eldiris sanktajn vortojn por la mortintoj, kiuj nun kuŝis duone kaŝitaj de abundkreskaj graminoj, dum kornikoj kaj korvoj ĉirkaŭflugis sennombre, raŭke kriante pro la ĝeno.

DUA ĈAPITRO

# Pri spiritaj aferoj.

Granda jubilo leviĝis inter la batalantoj, kiam ili eksciis pri la interkonsento inter la ĉefuloj kaj la senditoj. Ĉiuj laŭdis la ĉefulojn pro tiu traktado kaj reĝon Ethelred kiel plej superan el ĉiuj reĝoj por malriĉaj marveturantoj de Nordlandoj. Oni gajis kaj drinkis kaj esprimis dezirojn pri grasaj ŝafoj kaj junaj virinoj; kaj scioplenaj homoj sidis penseme kune apud la fajroj, kie estis fritataj la ŝafoj, kaj klopodis elkalkuli la sumon por ĉiu ŝipo, kaj ofte leviĝis kverelo pri tio, kiu plej ĝuste kalkuladis; sed ĉiuj akordis pri tio, ke neniu povis kredi, ke tiom da arĝento troviĝas en la mondo, krom eble ĉe la imperiestro en Miklagordo. Kelkaj trovis aferon, kiun kritiki, nome ke la direktistoj tian grandan parton ricevos malgraŭ tio, ke ilia tasko estas facila kaj ili neniam bezonas sidi ĉe la remiloj; sed la direktistoj opiniis, ke ĉiu ĝuste pensanta homo povas kompreni, ke nur ili meritas pli.

Malgraŭ tio, ke la biero estis abunda kaj forta kaj la bruo laŭta, serioza kverelo pri tiuj aferoj ne leviĝis; ĉar ĉiuj nun sin sentis riĉaj kaj trovis vivon bona kaj tial malpli nun ol alitempe inklinis uzi armilojn.

Sed Orm sidis malserena grublante kun la malgranda pastro kaj opiniis, ke malmultaj statas tiel ĉagrene kiel li.

Frato Willibald trovis multon por fari, ĉar multaj vunditoj bezonis flegon kaj al tio li sin dediĉis serioze kaj diligente. Li ankaŭ

ekzamenis la brakon de Thorkel kaj faris komentojn pri la kuracistoj de la episkopoj kaj ilia maniero ĝin flegi; ĉar por li estis malfacile kredi, ke iu alia havas prudenton kaj komprenon pri kuracado. Li diris, ke li intencas vojaĝi kun la episkopoj, sed Orm ne volis lin forlasi de si.

—Ĉar estas bone havi kuraciston ĉe si, li diris, kaj povas esti prava via penso, ke vi estas plej lerta el ĉiuj. Estas vero, ke mi volonte sendus vin kun sciigo al Ylva, la filino de reĝo Harald, ĉar vi estas la sola, kiun mi povas sendi; sed tiam mi neniam vin revidus pro via malamo al ni normanoj, kaj mi neniam ekscius ŝian respondon. Kaj tial mi nun sidas ne sciante kion fari, tiel ke manĝemo kaj dormemo svenas.

—Ĉu vi intencas min reteni kiel kaptito tie ĉi? demandis indigne frato Willibald. Tamen oni ofte diras ĉe vi, ke via fidelo al promesoj estas tiel granda kiel via vireca kuraĝo; kaj ĉiuj ni, kiuj estis en la turo, ricevis promeson iri kien ajn ni volas. Sed tion vi eble forgesis?

Orm malĝoje rigardis antaŭen kaj diris, ke li ne facile forgesas ion ajn.

—Sed estas malfacile lasi vin foriri, li daŭrigis; ĉar estas kvazaŭ vi estus helpo por mi, eĉ kiam vi nenion povas fari en tio ĉi. Sed vi estas saĝa homo, malgranda pastro, kaj nun aŭskultu, kion mi diras: Se vi vin trovus en miaj vestoj kaj estus en tiaj cirkonstancoj kiel mi nun, kion vi farus?

Frato Willibald ridetis kaj amike rigardis al Orm kaj skuis la kapon.

—Ŝajnas, ke via koro forte ligiĝis al tiu juna virino, malgraŭ ŝia kolera humoro, li diris; kaj tio estas rimarkinda afero, ĉar vi senpiaj perfortuloj ja volonte prenas virinojn laŭ hazardo ne montrante korinklinon al iu aparte. Ĉu estas tiel, ĉar ŝi estas reĝfilino?

—Ŝi ne povas havi heredaĵon en atendo post tio, kio okazis al ŝia patro, respondis Orm; kaj el tio vi povas scii, ke ne riĉaĵojn mi aspiras, sed ŝin mem deziras. Sed ne estas malavantaĝo, ke ŝi devenas de altranga familio; mi mem devenas de altranguloj.

—Povas esti, ke ŝi donis al vi amorvekan trinkaĵon, diris frato Willibald, kaj estas ĝi, kiu donas tian firmecon al via inklino.

—Unu fojon ŝi donis al mi por trinki, diris Orm, kaj neniam plu; kaj tio okazis, kiam mi la unuan fojon ŝin vidis kaj ĝi estis viandbrogaĵo. Sed preskaŭ nenion el ĝi mi glutis, ĉar ŝi koleriĝis kaj forĵetis de si kruĉon kaj brogaĵon. Kaj vi mem ordonis, ke tiu brogaĵo estu kuirita por mi.

—Mi ne ĉeestis, kiam ĝi estis kuirita kaj enportita, diris pense frato Willibald; kaj por juna viro malmulte da tia trinkaĵo estas necesa, kiam la virino mem estas juna kaj belforma. Sed se ŝi metis magiaĵojn en la brogaĵon ŝanĝo ne eblas; ĉar kontraŭ amortrinkaĵoj alia rimedo ol amo ne ekzistas, tion diras ĉiuj plej erudiciaj kuracistoj el la antikveco.

—Ĝi estas la kuraco, kiun mi serĉas, respondis Orm; kaj nun mi vin demandas, ĉu vi povas doni al mi konsilon pri tio ĉi.

Frato Willibald instrue levis la montrofingron kaj patrecmiene parolis.

—Nur unu farenda estas, kiam homo havas malfacilaĵojn kaj ne scias, kion konsili al si; kaj vi, kompatinda idoladoranto, estas en mizera stato. Ĉar la farenda afero estas peti Dion pri helpo, kaj tion vi ne povas.

—Ĉu li ofte helpas vin? demandis Orm.

—Li min helpas, kiam miaj petoj estas prudentaj, respondis frato Willibald decide, kaj tio estas pli ol viaj dioj faras por vi. Li ne aŭskultas, kiam mi plendas pro bagateloj, pri kiuj li opinias, ke mi ilin eltenu; kaj mi mem vidis la sanktan piulon episkopo Poppo, ki-

am ni fuĝis trans la maro, fervore alvoki kaj Dion kaj Sanktan Petron por ricevi helpon kontraŭ sia marmalsano sen resulto. Sed kiam mi estis kun la aliaj en la turo tie ĉi, kaj nin minacis malsato kaj soifo kaj glavoj de paganoj, kaj ni alvokis Dion en nia krizo, tiam Li nin aŭskultis malgraŭ tio, ke ne troviĝis inter ni piulo antaŭ Dio kia episkopo Poppo. Ĉar tiam venis la senditoj kaj nin savis; nu vere, ke ili estas senditoj de reĝo Ethelred al la militĉefuloj, sed ili ankaŭ estas senditoj de Dio por nia helpo, pro niaj multaj preĝoj.

Orm kapjesis kaj rekonis, ke tio povas esti sufiĉe kredebla, ĉar li mem vidis, kiel ĉio okazis.

—Kaj nun mi pli bone komprenas, kial ni ne sukcesis vin peli per fumo el la turo, li diris; ĉar povas esti Dio aŭ iu alia, kiun vi alvokis, kiu sendis venton por forpeli la fumon.

Frato Willibald respondis, ke ĝuste tiel estis: la fingro de Dio nuligis tiaspecajn satanaĵojn.

Orm sidis pensante kaj hezite tiris al si la barbon.

—Mia patrino kristaniĝis nun en sia maljunaĝo, li diris. Ŝi lernis du preĝojn kaj ilin ŝi ofte uzas kaj juĝas ambaŭ bonaj. Ŝi diras, ke tiuj preĝoj tenis min viva kaj revenigis min al ŝi el multaj danĝeroj, kvankam eble Blulango kaj mi asistis en tiu afero, kaj ankaŭ vi, malgranda pastro. Nun mi mem povus havi inklinon peti Dion pri helpo, kiam li laŭdire estas tiel helpema. Sed kion li postulas rekompence, mi ne scias, kaj ankaŭ ne kiel mi parolu al li.

—Antaŭ ol vi kristaniĝos vi ne povos peti Dion pri helpo, diris frato Willibald; kaj kristano vi ne estos antaŭ ol vi estos baptita; kaj vi ne povos esti baptita antaŭ ol vi forĵuros viajn falsajn Diojn kaj alkonfesos vin al la Patro kaj la Filo kaj la Sankta Spirito.

—Tiom da artifikoj ne estis necesaj por paroli al Allah kaj lia profeto, diris Orm malgaje.

—Allah kaj lia profeto? diris la malgranda pastro kun surprizo. Kion vi scias pri ili?

—Pli malproksimen en la mondo mi estis ol vi, respondis Orm; kaj kiam mi estis ĉe Almansur en Andaluzio, ni alvokis Allah kaj lian profeton du fojojn tage, kaj kelkfoje tri. Kaj tiujn preĝojn mi ankoraŭ scias, se vi volas ilin aŭdi.

Frato Willibald etendis la brakojn supren pro teruro.

—En la nomo de Dio Patro, kaj de la Filo, kaj de la Sankta Spirito! li kriis. Nin gardu de la agoj de la diablo kaj la ruzaĵoj de Muĥammad, la malbenito. Via stato estas pli terura ol tiu de iu alia, ĉar aŭskulti Muĥammad estas pli terura ol ĉio. Ĉu vi ankoraŭ estas kaptita de liaj instruoj.

—Mi tenis min je ili dum mi estis ĉe Almansur, ĉar li ordonis tion, diris Orm; ĉar li estis viro, kiun kontraŭdiri ne estis konsilinde. De tiam mi nenian Dion havas, kaj eble tial malbonoj min trafis.

—Estas rimarkinde, ke episkopo Poppo ne eksciis tion, kiam vi estis ĉe reĝo Harald, diris frato Willibald. Se li aŭdus, ke vi konfesis la instruon de tiu nigra trompanto, li tuj vin baptus estante pia kaj plena de fervoro, eĉ se li bezonus alvoki dek du el la bataluloj de reĝo Harald por vin teni. Estas ago bona kaj bena savi ordinaran animon el mallumo kaj blindeco, kaj povas esti, ke ankaŭ normanoj apartenus al tiu kategorio, sed tion mi malfacile kredas post ĉio, kion mi spertis; sed ĉiuj sanktuloj akordas pri tio, ke estas sepoble pli merite savi iun, kiu metis sin sub Muĥammad. Ĉar nenio kaŭzas al la diablo tiom da ĉagreno, kiel tio.

Nun Orm faris demandojn pri la diablo, kaj frato Willibald lin fervore instruis pri tiu.

—Ŝajnas, ke mia stato estas tiu, diris Orm, ke mi nesciante in-

citis la diablon per tio, ke mi ne plu tenas min al Allah kaj la Profeto; kaj el tio devenas miaj misfortunoj.

—Tiel estas, diris la malgranda pastro; kaj estas bone por vi, ke vi ekkomprenis tion. Neniu stato povas esti pli terura ol via nuna; ĉar la diablo vin persekutas kolere, kaj nenian ŝirmon de Dio vi havas. Sed dum vi vin tenis al Muĥammad — malbenita li estu! — la diablo estis via amiko, kaj tial ĉio tiam iris glate por vi.

—Estas kiel mi kredis, diris Orm, malmultaj tiel malbonstatas kiel mi. Kaj tiun tro multe kontraŭas, kio kontentigas nek Dion nek diablon.

Iomatempe li sidis pensante.

—Nun mi volas, ke vi min akompanu al la senditoj, li poste diris. Ĉar mi volas paroli kun tiuj, kiuj estas potencaj antaŭ Dio.

## 2.

La episkopoj jam revenis de la batalkampo, kie ili benis la mortintojn; kaj nun ili intencis venonttage ekvojaĝi hejmen. La pli aĝa el ili estis laca pro la veturo kaj jam ekripozis; sed la episkopo de Londono estis invitinta Gudmund al sia loĝejo kaj manĝis kaj trinkis kun li en fina provo inklinigi lin al kristaniĝo.

Ekde sia alveno en Maeldun la du episkopoj klopodis laŭ sia eblo decidigi la ĉefulojn al la kristanismo; tiel reĝo Ethelred kaj lia ĉefepiskopo ordonis al ili, ĉar tiel la honoro de la reĝo multiĝus antaŭ Dio kaj la homoj. Thorkel ne estis tre influita; li respondis, ke lia armilbonŝanco sufiĉas kaj superas tiun de la kristanoj, kaj tial li ne sentas bezonon de novaj dioj. Kaj ankaŭ Jostein ili ne sukcesis influi: li sidis muta kaj aŭskultis kun la manoj apogataj sur tiu batalhakilo, kiun li ĉiam portis kaj kiun li nomis Vidvinfunebro, kaj rigardis al ili el sub sulkitaj brovoj, dum ili klarigis al li pri Kristo kaj pri la

regno de Dio. Poste rido lin kaptis, kaj li ĵetis sian ĉapelon sur la plankon kaj ilin demandis, ĉu ili opinias lin sen prudento.

—Mi estis pastro ĉe la granda ofero en Upsalo dum dudek sep vintroj, li diris; kaj malmulte da honoro vi montras venante al mi kun tia parolo, kiu povas taŭgi por infanoj kaj maljunulinaĉoj. Per tiu ĉi hakilo, kiun vi jene vidas, mi hakis tiujn, kiujn ni oferis por bona rikolto kaj kiujn ni poste pendigis en la sankta arbo antaŭ la templo; kaj kristanoj estis inter ili, ankaŭ pastroj, nudaj surgenue en la neĝo lamentante; kaj diru al mi, kiun favoron al ili donis ilia Dio.

Tiam la du episkopoj tremis kaj signis krucojn antaŭ si kaj komprenis, ke ne penvaloras ion trudi al tia viro.

Sed pri Gudmund ilia espero daŭris, ĉar li estis amika kaj ĝojhumora kaj volonte aŭskultis, kion ili diris; kelkfoje, konsuminte multe da biero, li kortuŝite ilin dankis por tio, ke ili tiel bele parolas kaj zorgas pri lia prospero. Tamen li ne ĝis nun volis ion promesi al ili; kaj nun la episkopo de Londono surmetis sur la tablon la plej bonajn fluajn kaj solidajn varojn el sia provizejo, por lin decidigi.

Gudmund volonte prenis el tio, kion oni regalis; kaj post kelka tempo la ludistoj de la episkopo ludis antaŭ li tiel bele, ke larmoj ruliĝis al li sur la barbon. Post tio la episkopo komencis persvadi lin kun sia plej milda voĉo kaj per vortoj, kiujn li zorgeme elektis. Gudmund aŭskultis kaj kapjesis kaj rekonis, ke multo estas ĉe la kristanoj, kion li ŝatas.

—Vi estas bona homo, li diris al la episkopo; vi estas gastama kaj sperta kaj trinkas virece kaj estas plezure aŭdi vin paroli. Tial mi volus vin kontentigi, sed ne pri malmulto vi min petas: ĉar por mi estus malbone veni hejmen kaj renkonti ridojn, kaj de domanoj kaj de najbaroj, ĉar mi lasis min logi de pastraj babiladoj. Sed tamen estas mia kredo, ke tia viro kiel vi havas grandan potencon kaj sci-

as multajn sekretojn; kaj jen afero, kiun mi antaŭ nelonge trovis, kiun mi volas, ke vi benu.

El sub sia kamizolo li elprenis la malgrandan oran krucon kaj ĝin tenis antaŭ la episkopo.

—Ĝin mi trovis en domo de riĉulo; al du viroj ĝi kaŭzis vivperdon, kaj pli belan ludilon mi neniam vidis. Mi ĝin donos al mia fileto, kiam mi revenos hejmen. Folke li nomiĝas, kaj la virinoj lin nomas Filbyter. Li estas kuraĝa bravuleto kaj tre alte taksas arĝenton kaj oron kaj kion li prenas, tion li firme tenas. Kontraŭ ĉi tiu kruco li etendos ambaŭ siajn manojn. Kaj se vi povas enmeti bonŝancon en ĝin estas bone; ĉar mi volas, ke li estu riĉa kaj potenca, tiel ke li povos sidi honorata hejme en la bieno kaj vidi siajn rikoltaĵojn prosperi kaj siajn brutojn grasaj kaj ne bezonos sin ŝovi tienreen sur la maro por akiri sian panon kaj mistraktiĝi inter fremduloj kaj ties armiloj.

La episkopo ridetis kaj murmuris super ĝi, kaj kontente Gudmund ĝin reenmetis.

—Vi revenos al via bieno kiel riĉulo, diris la episkopo, pro la granda malavaremo de reĝo Ethelred; sed kredu al mi, kiam mi al vi jenon diras: via bonŝanco estos ankoraŭ pli granda, se vi transiros al Kristo.

—Neniam oni disponas pri tro da bonŝanco, diris Gudmund kaj penseme gratis al si la barbon. Mi jam scias, de kiuj najbaroj mi aĉetos la teron kaj kia estos la nova domo; mi ĝin konstruos spaca kaj el plej bona kverkoligno. Estos bezonata multa arĝento, por ke ĝi fariĝu laŭ mia deziro. Kaj kiel ajn mi nun agas ĉi tie, eble neniu min pririďos hejme, se nur mi estos sufiĉe riĉa kaj arĝento restas al mi en la kesto. Tial estu laŭ via volo: vi min baptu, kaj mi min tenos al Kristo estontece, se vi al mia parto aldonas cent markojn da arĝento.

—Tio, diris milde la episkopo, ne estas la ĝusta animstato de tiu,

kiu estos enkorpigita en la eklezio de Kristo. Sed mi ne vin riproĉos, ĉar vi ne povas scii, ke estas dirite: Feliĉaj estas la malriĉuloj; kaj mi bezonus longan tempon por klarigi al vi la veron. Sed vi devas pripensi, ke vi jam ricevos abundan riĉaĵon de reĝo Ethelred, pli grandan ol iu alia povus doni al vi; kaj certe li estas granda kaj potenca reĝo, sed ankaŭ liaj kestoj havas fundon. Tial ne eblas al li doni al vi tiom, eĉ se li tre volus tion. Baptodonacon de dudek markoj mi povas promesi al vi tial, ke vi estas granda ĉefulo, sed tio estas la maksimumo; kaj jam tion li eble opinios troa. Sed nun vi gustumu la trinkaĵon, kiu nun venas kaj kiu eble ne estas konata en via lando: ĝi estas varmega vino kun aldonitaj mielo kaj maloftaj spicaĵoj el Oriento nomataj cinamo kaj kardamono. Spertuloj pri tiaj aferoj opinias, ke neniu trinkaĵo estas pli agrabla por la lango kaj pli efike mildiganta grubladon kaj melankolion.

Gudmund trovis la trinkaĵon bongusta kaj saniga; sed la oferto de la episkopo ŝajnis al li tro malalta: por tia sumo li ne volas endanĝerigi sian bonan reputacion en la hejmĉirkaŭo.

—Sed pro tiu granda amikeco, kiun mi sentas al vi, li diris, mi ĝin faros por sesdek markoj. Neniam pli malkare vi min havos.

—Ankaŭ mi sentas grandan amikecon al vi, diris la episkopo; kaj tiel granda estas mia deziro vidi vin kristano kaj aparteni al la ĉielregno, ke mi volonte donacus al vi el mia propra poŝo por vin kontentigi. Sed mi ne multon posedas da mondaj trezoroj kaj nur dek markojn mi povas aldoni.

Je tio Gudmund skuis la kapon kaj dormeme palpebrumis. Tien ili jam atingis, kiam bruo leviĝis ĉe la pordo; kaj Orm envenis kun frato Willibald, kiun li firme tenis je la brako, kaj kun du pordogardistoj, kiuj sin kroĉis al liaj vestoj kaj kriis, ke la episkopo ne estu ĝenata.

—Sankta episkopo, li diris, mi estas Orm, filo de Toste, de Kul-

len en Skanio, unu el la ŝipĉefuloj de Thorkel Höge. Mi volas baptiĝi kaj akompani vin al Londono.

La episkopo surprizite lin algapis, kaj komence aspektis kvazaŭ li ektimus. Sed kiam li rimarkis, ke Orm estas nek ebria nek berserka, li volis ekscii, kion tio povas signifi; ĉar ordinare normanoj ne trudis sin al li kun tia deziro.

—Mi volas veni sub ŝirmon de Dio, diris Orm, ĉar mia stato estas pli malbona ol tiu de iu ajn alia. Tiu ĉi pastro povas ĉion klarigi al vi, pli bone ol mi mem.

Frato Willibald petis la episkopon pardoni, ke li partoprenas en tiu entrudo; ĝi ne okazis pro lia propra volo, sed pro tio, ke li estis devigita de barbara forto kaj furiozo kaj trenata preter la pordogardistoj malgraŭ tio, ke li aŭdis, ke grava kaj privata konversacio daŭras.

La episkopo amike petis lin ne pensi pri tio. Li montris al Gudmund, kiu nun, helpite de unu lasta kruĉeto da spicvino, sidante ekdormis.

—Mi multe penis klopodante persvadi lin kristaniĝi, li diris, kaj tamen mi ne sukcesis, ĉar lia animo estas tute katenita al mondaj posedaĵoj. Kaj nun Dio sendas al mi alian, kiu venas nevokita. Estu bonvena, ĉefulo! Ĉu vi estas tute preta?

—Mi estas, respondis Orm; ĉar antaŭe mi servis la profeton Muĥammad kaj lian dion, kaj nun mi komprenis, ke nenio estas pli danĝera ol tio.

La okuloj de la episkopo rondiĝis, kaj li frapis krucon antaŭ si tri fojojn kaj alvokis konsekritan akvon.

—Muĥammad kaj lian dion, li diris al frato Willibald. Kiel tio povas esti?

Ili nun helpis unu la alian por ĉion klarigi al la episkopo. Tiu diris, ke li vidis multe da pekado kaj mallumo, sed ankoraŭ neniam

homon, kiu servis Muĥammad. Kiam estis alportita la konsekrita akvo, li prenis malgrandan fasketon, kiun li trempis en la akvo kaj per kiu li aspergis Orm, dum li eldiris la preĝojn, kiuj elpelas malicajn spiritojn. Ĉe tio Orm paliĝis; li poste diris, ke tiu aspergo estis malfacile eltenebla, ĉar li tremis per la tuta korpo kaj sentis kvazaŭ levus sin la nukharoj. La episkopo diligente daŭrigis tion dum kelka tempo, sed fine ĉesis kaj diris, ke nenio el tio plu necesas.

—Vi ne bavas kaj ne falas konvulsiante, kaj eĉ ne malbonodoro rimarkeblas, kaj tio montras, ke la malica spirito jam forlasis vin; kaj pro tio vi laŭdu Dion.

Li nun aspergis iom sur Gudmund, kiu tuj stariĝis kaj kriis, ke oni malhisu la velon, kaj poste denove refalis sur la benkon kaj daŭrigis sian dormon.

Orm viŝis la gutojn for de la vizaĝo kaj demandis, ĉu tio utilas same kiel bapto.

La episkopo respondis, ke la diferenco estas granda, kaj tiel simple oni ne estas baptita, malplej tiu, kiu servis Muĥammad.

—Unue vi devas forĵuri viajn falsajn diojn, li diris, kaj konfesi vian kredon je la Patro, la Filo kaj la Sankta Spirito. Kaj krom tio vi devas ricevi instruadon pri la kristanismo.

—Mi ne havas diojn, kiujn mi devas forĵuri, diris Orm, kaj nun mi volas teni min je Dio kaj lia filo kaj ilia spirito. Kaj instruadon pri la kristanismo mi ofte devis aŭskulti: unue ĉe monaĥoj sur Irlando, poste ĉe reĝo Harald kaj hejme ĉe mia maljuna patrino tiom, kiom ŝi mem povis ĝin kompreni, kaj nun tie ĉi de tiu ĉi malgranda pastro, kiu estas mia amiko kaj kiu instruis al mi multon pri la diablo. Tial mi kredas, ke mi pri tio estas tiel sperta kiel la plimulto.

La episkopo kapjesis kaj diris, ke estas bone tion aŭdi kaj ke ne ofte oni renkontas paganojn, kiuj aŭskultis tiom da instruado pri sanktaj aferoj. Post tio li frotis al si la nazon kaj aspektis pensanta;

li rigardis al Gudmund, kiu profunde dormis, kaj poste denove al Orm.

—Estas ankoraŭ unu afero, li diris malrapide kaj kun seriozeco. Vi estis submetita al pli teruraj aferoj ol iu alia, kiun mi vidis, per tio, ke vi servis la falsan profeton, kiu estas la plej nigra ĉefulo de la diablo. Kaj kiam vi nun post tia abomenaĵo volas veni sub la ŝirmon de la vivanta dio, decas, ke vi kunportu donacon al li kaj lia eklezio por montri, ke via intenco estas serioza kaj via koro purigita.

Orm respondis, ke ĝusto postulas, ke li ion donacu por pli favora bonŝanco kaj la ŝirmo de Dio. Li demandis, kio estas konvena donaco.

—Tio dependas de riĉeco kaj deveno kaj de kioma pekanto temas, diris la episkopo. Foje mi baptis danan ĉefulon, kiu akceptis heredaĵon en ĉi tiu lando; li donis kvin bovojn kaj unu barelon da biero kaj dudek funtojn da vakso al la eklezio. Sed en antikvaj skriboj oni povas legi pri viroj altrangaj, kiuj donis dek markojn da arĝento, kaj krom tio konstruigis preĝejon; sed tiam ili lasis sin bapti kun sia tuta domanaro.

—Mi ne volas malsuperi aliajn, diris Orm; mi parencas al Vidfamne. Mi konstruigos preĝejon reveninte hejmen kaj mi volas, ke vi ricevu dek kvin markojn el mia arĝento; sed tiam mi volas, ke vi diru bonon pri mi ĉe Dio.

—Vere vi estas ĉefulo, ĝoje diris la episkopo, kaj mi agos por vi laŭ kapablo plej bone.

Nun ambaŭ estis tre kontentaj; sed la episkopo demandis, ĉu Orm serioze intencas, ke lia tuta ŝipanaro baptiĝu.

—Mem kristano, diris Orm, mi ne povas reteni paganojn en la ŝipo; kion Dio pensus pri tio? Estu same por ĉiuj; kaj kiel mi diros al mia ŝipanaro, tiel estos. Kelkaj en la ŝipo jam estas baptitaj, eĉ dufoje; sed ankoraŭ unu fojo ne povas damaĝi.

Nun li volis, ke ambaŭ episkopoj kaj ĉiuj iliaj akompanantoj en la sekvonta tago enŝipiĝu sur lian ŝipon, tiel ke li veturigu ilin al Londono kaj Westminster. Poste ĉiuj povos baptiĝi tie.

—Mi havas grandan kaj bonan ŝipon li diris. Kun tiom da gastoj estos malvaste inter ni; sed la vojaĝo estos mallonga kaj la vetero estas senŝanĝa kaj bela.

Li estis fervora pri tio; sed la episkopo respondis, ke li ne povas decidi pri tiel grava afero sen konsiliĝi kun sia kolego kaj la aliaj. Tial Orm devos atendi ĝis la venonta tago; eldirinte dankojn li foriris de la episkopo kaj reiris al sia loĝejo kun frato Willibald. Antaŭ la episkopo tiu ne multon diris, sed nun li kluke ridis por si mem.

—Kio kaŭzas al vi tian plezuron? demandis Orm.

—Multon vi faras por meti la manojn sur la filinon de reĝo Harald, respondis la malgranda pastro. Kaj ŝajnas al mi, ke vi tion bone faras.

—Se ĉio iros bone, ne mankos al vi rekompenco, diris Orm; ĉar mi kredas, ke mia bonŝanco komencis pliboniĝi ekde kiam mi renkontis vin tie ĉi.

Kiam la episkopo denove estis sola, li ridetis pensante kaj poste ordonis al siaj servistoj veki Gudmund. Tion ili sukcesis fari post kelka tempo malgraŭ tio, ke li grumblis pro la ĝeno.

—Mi multe pensis pri la afero, kiun ni priparolis, diris la episkopo; kaj helpate de Dio mi povas promesi al vi kvardek markojn, se vi lasos vin bapti.

Je tio Gudmund tuj plene vekiĝis; kaj post kelka tempo ili akordiĝis pri kvardek kvin markoj plus unu funto da spicaĵoj de tiu speco, kiun la episkopo havis en sia vino.

## 3.

En la sekva tago okazis interkonsiliĝo ĉe Thorkel pri la propono de Orm kaj pri foriro de la episkopoj. Gudmund diris, ke li intencas kunveli; ĉar havante tiel bonan garantion, kian donas la senditoj, kaj ĉar ĉiuokaze kreiĝas paco inter ili kaj reĝo Ethelred, li tre deziras partopreni kaj vidi la pesadon de la arĝento de la reĝo, tiel ke ĉio okazu ĝuste kaj juste.

Al Thorkel tio ŝajnis konvena kaj li diris, ke volonte li mem partoprenus, se lia brako estus pli funkcianta. Sed Jostein diris, ke sufiĉas, ke unu el la tri gvidantoj foriras; ĉar tio ĉiam povas logi la malamikon ataki, kaj ili ne devas malfortigi sin en la bivako, antaŭ ol la arĝento estas en iliaj manoj.

Pro la bela vetero la episkopoj ne kontraŭis veturi marvoje, se ili nur povus sin senti sekuraj kontraŭ marrabistoj; kaj fine oni decidis, ke Gudmund kaj Orm, ĉiu el ili kun sia ŝipo, velu al Westminster kun la episkopoj. Tie ili agu diligente por rapidigi la arĝento-transdonon; kaj se la reĝo sin trovas tie, ili lin danku pro la donaco kaj diru, ke ili intencas denove rabadi, pli ol antaŭe, se ĝi prokrastiĝos.

Nun Orm kunvokis siajn ŝipanojn kaj diris, ke ili velados al Westminster montrante pacoŝildon kaj kun la sanktaj senditoj de reĝo Ethelred en la ŝipo.

Pluraj el liaj ŝipanoj maltrankviliĝis pro tio. Ili diris, ke estas riske havi pastrojn en la ŝipo, kiel ĉiuj marveturantoj scias, kaj kun episkopoj la afero eble statas eĉ pli malbone.

Orm ilin trankviligis kaj diris, ke ĉio iros glate; ĉar tiuj piuloj estas tiel sanktaj, ke ilin ne trafos damaĝo, kion ajn volas la marpopolo fari kontraŭ ili. Post tio li daŭrigis:

—Kiam ni alvenos al Westminster mi lasos min bapti. Ĉar post interparoloj kun la sanktuloj mi trovis, ke pli bone estas sin teni al Kristo, kaj tion mi intencas fari post nun. Estas pli bone, ke akordo

regas en ŝipo kaj multo estas sama por ĉiuj; kaj tial mia deziro estas, ke vi ĉiuj estu baptitaj kun mi. Tio estas pli bona ankaŭ por vi mem, tion vi povas fidi, kiam mi, kiu scias, tion diras. Kaj se iu ne konsentas pri tio ĉi, li tion eldiru nun; en tia kazo li forlasu la ŝipon kun siaj propraĵoj kaj ne plu apartenu al mia ŝipanaro.

Iuj el la ŝipanoj hezite rigardis unu la alian kaj gratis sin malantaŭ la oreloj; sed Rapp la Unuokula, kiu estis stiristo de la ŝipo kaj timata de la plimulto, staris plej antaŭe en la grupo kaj trankvile kapjesis responde al la vortoj de Orm, ĉar li jam unu fojon travivis similajn aferojn. Post tio neniu kontraŭdiris.

—Mi ja scias, ke inter vi troviĝas homoj, kiuj estis baptitaj jam hejme en Skanio, daŭrigis Orm, kaj kiuj eble ricevis ĉemizon aŭ kamizolon pro la ĝeno aŭ malgrandan kruceton, kiun pendigi per rubando ĉirkaŭ la kolo; kaj okazas, ke oni aŭdas tiajn homojn diri, ke ne estas rimarkebla granda utilo de la bapto. Sed tiuj baptoj estis malkaraj kaj pleje celis virinojn kaj infanojn; nun ni estos baptitaj en alia maniero, de pli sanktaj homoj, tiel ke ni ricevos ŝirmon de Dio kaj nia bonŝanco pliboniĝos por la tuta vivo. Kaj ne estus juste ricevi tian privilegion donace. Mi mem pagos por mi multon; kaj inter vi ĉiu viro pagu du oerojn.

Ĉe tiuj vortoj murmurado leviĝis inter la ŝipanoj. Oni aŭdis kelkajn diri, ke tio estas novaĵo, ke oni devas pagi por tio kaj ke du oeroj ne estas malgranda sumo.

—Neniun mi devigas, diris Orm. Ĉiu, kiu trovas tro multkosta tion, kion mi ĵus diris, povas ŝpari sian monon per tio, ke li min renkontos duele tuj post nia bapto. Se li venkos, li ne bezonos pagi; kaj se li malvenkos, li same ne bezonos pagi.

Plej multaj trovis tion bona parolo kaj ili multe ekkriis al la ŝparemuloj, ke ili sin tenu pretaj. Sed la vokitoj honteme rikanis kaj opiniis, ke ili preferas rezigni pri ŝparo.

Gudmund kaj Orm dividis inter si la piulojn, tiel ke la pli maljuna episkopo kun siaj akompanantoj suriris la ŝipon de Gudmund, kaj la episkopo de Londono suriris tiun de Orm; lin akompanis ankaŭ frato Willibald. La episkopoj benis la ŝipojn kaj eldiris preĝojn por bona vojaĝo kaj starigis siajn standardojn; kaj poste la ŝipoj elhaveniĝis kaj ricevis favoran venton kaj belan veteron, tiel ke la ŝipanoj kun kreskanta respekto rigardis la episkopojn, kaj ili sin direktis en la riveron Tamizo kun la fluso. Tie ili tranoktis malantaŭ la riverbuŝo; kaj en la posta mateno, en hela sunleviĝo, ili komencis remi.

Suspekteme gvatante la homoj staris apud kabanoj inter la veproj de la riverstrando, kaj fiŝistoj sur la rivero urĝiĝis foriri el vidodistanco de la ŝipoj, sed trankviliĝis, kiam ili vidis la rekonilojn de la episkopoj. En iuj lokoj videblis brulintaj vilaĝoj, dezertaj post vizitoj de normanoj; kaj poste ili venis al loko, kie la rivero estis palisita per kvarobla palisaro, kun nur unu mallarĝa trairejo meze. Tie estis tri grandaj gardoŝipoj, plenaj de armitaj ŝipanoj; kaj tie ili estis haltigitaj kaj la gardoŝipoj sin metis meze antaŭ la trairejo kun ĉiuj siaj ŝipanoj pretaj.

—Ĉu vi estas sen vidkapablo aŭ sen prudento? kriis Gudmund al ili. Ĉu vi ne vidas, ke ni venas kun pacoŝildo kaj havas sanktajn episkopojn en la ŝipoj?

—Nin vi ne trompos, venis respondo el la gardoŝipoj. Neniaj rabistoj estos permesitaj trapasi tie ĉi.

—La senditoj de via propra reĝo venas kun ni, kriis Gudmund.

—Ni konas vin, aŭdiĝis la respondo. Vi estas plenaj de ruzo kaj satanaĵoj.

—Ni venas por akcepti bapton, senpacience kriis Orm.

Ĉe tiuj vortoj leviĝis rido en la gardoŝipoj, kaj voĉo kriis:

—Ĉu tedas vin la diablo, via mastro kaj patro?

—Jes, kriis Orm kolere; kaj ĉe tiu respondo la rido sonis eĉ pli laŭte.

Nun batalo prepariĝis; ĉar Orm malŝatis la ridadon kaj ordonis al Rapp, ke tiu aldirektu kaj alflankiĝu al la plej proksima ŝipo, el kiu plej multe sonis rido. Sed la episkopoj nun urĝe sin vestinte jam portis siajn ornatojn, kaj levinte siajn bastonojn ili kriis al ĉiuj, ke oni sin tenu kvietaj. Orm kontraŭvole obeis, kaj ankaŭ Gudmund opiniis, ke tio estas malfacile eltenebla. Nun la episkopoj ekparolis aŭtoritate al siaj samlandanoj, tiel ke tiuj baldaŭ ekkomprenis, ke la sanktuloj vere estas ekleziuloj kaj ne kaptitoj aŭ trompvestitaj rabistoj. La ŝipoj nun estis tralasitaj, kaj nenio okazis krom akra kverelo inter la ŝipanaroj, kiam ili preterremis.

Orm staris kun lanco en la mano kaj rigardis la gardoŝipojn ankoraŭ pala pro kolero.

—Al tiuj mi volonte lecionus pri prudento, li diris al frato Willibald, kiu staris apud li kaj ne montris tre grandan maltrankvilon, kiam batalo ŝajnis proksima.

Orm suspiris kaj formetis la lancon.

—Kiam mi havos ŝin, mi estos pacema, li diris. Sed la malgranda pastro kun dubo skuis la kapon.

—Ĉu linko povas ŝanĝi siajn makulojn? li demandis. Ĉu la bluulo povas ŝanĝi sian haŭton? Ankaŭ tiel estas skribite. Sed danku al Dio kaj al la sanktaj episkopoj, kiuj nun vin helpis.

Baldaŭ ili pasis kurbon de la rivero kaj vidis dekstre antaŭ si Londonon. Tio estis vido, kiu kaŭzis surprizon ĉe la ŝipanaro; ĉar la urbo estis tiel granda, ke oni de la rivero ne povis vidi ĝian limon; kaj la pastroj diris, ke laŭ la opinio de la instruituloj pli ol tridek mil homoj vivas en tiu urbo. Multaj el la ŝipanoj ne facile povis kompreni, kiel ĉiuj homoj povas trovi per kio sin vivteni en tia homdenso, sen kampoj kaj sen bovinoj. Sed la saĝuloj povis rakonti, ke tiaj ur-

bologôantoj estas malicaj kaj trompemaj homoj, kiuj kapablas trompe akiri abundan vivtenon de honestaj kamparanoj, sed mem evitante iam ajn preni en la mano plugilon aŭ klabon por ĉeni bovinon. Tial estas bone, diris la saĝuloj, ke aŭdacaj marveturantoj de tempo al tempo vizitas tiajn homojn kaj forprenas de ili tion, kion ili eltrompis el aliaj; — kaj ĉiuj seriozmiene rigardis la urbon, dum ili malrapide remis kontraŭflue, kaj opiniis, ke vere tie ĉi devas esti multo, kies kolekton oni povus prizorgi.

Sed Orm kaj Rapp la Unuokula diris, ke ili vidis urbojn pli grandajn kaj ke tiu ĉi mezuriĝas malgranda kompare al Kordovo.

Ili nun alvenis la grandan ponton konstruitan de grandegaj trunkoj, kaj sub kiu la plej grandaj ŝipoj povis esti remataj kun mallevita masto. Tie multaj homoj ekvidinte ilin alkuris, kaj multaj armitaj viroj, kiuj laŭte kriadis pri paganoj kaj diabloj; sed ili ĉiuj ekjubilis aŭdinte sian episkopon per laŭta voĉo krii, ke ĉio statas bone kaj ke akordo pri paco estis akirita kun la alvenintoj de la maro. Kiam la ŝipoj proksimiĝis, homoj staris dense ĉie sur la ponto por ilin vidi de proksime; kaj kiam la ŝipanoj ekvidis kelkajn belajn junulinojn, ili fervore kriis al ili, ke ili kaptu la okazon kaj saltu en la ŝipojn; ĉar jen sin proponas edziniĝoj favoraj, arĝento kaj gajeco kaj bravaj viroj, kaj abundas pastroj, kiuj povas ilin beni tuj en plej bonkvalita kristana maniero. Kaj iuj el la junulinoj gaje ridetis kaj respondis, ke ili tre inklinus provi, sed ke la alteco por salto estas troa; post tio ilin tuj kaptis je la haroj seriozaj parencoj, kiuj al ili promesis vipadon sur nuda haŭto pro tia lasciva klaĉado kun paganoj.

Frato Willibald skuis sian kapon kaj diris, ke nuntempe la junularo komencas degeneri ankaŭ ĉe la kristanoj. Kaj ankaŭ Rapp ĉe la stirilo skuis la kapon, kiam la ŝipo elvenis trans sub la ponto kaj malgaje opiniis, ke virinoj ĉiam similas inter si senutile babilante.

—Ili devus teni fermita la buŝon, li diris, kaj salti tuj laŭ admono.

Ili nun proksimiĝis al Westminster kaj komencis vidi altajn turojn sin suprenetendi el sub la arboj. La episkopoj denove sin vestis en plena ornato; kaj la pastroj ilin akompanantaj post tio ekkantis malnovan himnon, kiun Sankta Columbanus kutimis kanti baptante paganojn:

Jen velas la bando savita nur
— akceptu, Disinjor'! —
naĝinta danĝerspita sur la flu'
de la pek-horor'.
Rigardas al kruco ĉe l' tera lim'
ĉi homoj kaj nomas vin kun estim',
havintaj diablon ĵus en anim':
akceptu, Disinjor'!

La kanto bele dissonis super la rivero en la klara vesperiĝo; kaj kaptinte la takton la viroj ĉe la remiloj bone ĝin sekvis kaj opiniis, ke tiu kanteto ne malbone servas instigile por la remado.

Kiam la kantado ĉesis ili albordiĝis dekstre ĉe la kajoj sub la ruĝaj muroj de Westminster.

TRIA ĈAPITRO

## Pri geedziĝo kaj bapto kaj la arĝento de reĝo Ethelred.

Reĝo Ethelred la Hezitema sidis melankolia en Westminster, ĉirkaŭata de multaj konsilantoj kaj atendante tion, kion povus alporti lia intertraktado kun la normanoj. Li kuntiris ĉirkaŭ si militulojn, kaj por sin mem protekti en tiuj malfacilaj tempoj kaj por teni sub sia rigardo la popolon en Londono, kiu komencis ĝermigi malbonan humoron post la malvenko ĉe Maeldun. Li havis ĉe si sian ĉefepiskopon por helpo kaj konsolo, sed malmulte tiu kapablis fari, kaj la maltrankvilo de la reĝo estis tiel granda, de kiam la senditoj foriris, ke li ne plu foriris ĉasi kaj jam perdis la emon deziri foirojn kaj virinojn. Plej ofte li sidis tenante muŝfrapilon, kiun li kapablis manipuli tre lerte.

Li nun leviĝis el sia melankolio, kiam li aŭdis, ke la senditoj revenis kaj ke paco kontraktiĝis kun la normanoj; sed lia ĝojo fariĝis eĉ pli granda pro la mesaĝo, ke ĉefuloj kaj ŝipanoj venis por lasi sin bapti. Li tuj ordonis, ke sonoru ĉiuj sonoriloj kaj ke la fremduloj ricevu plej taŭgan regalon; sed poste li denove maltrankviliĝis, kiam li aŭdis, ke du fortaj ŝipanaroj alvenis, kaj ne sciis, ĉu li timu aŭ ĝoju pro tio. Li gratis al si la barbon kaj pridemandis siajn pastrojn, kortanojn kaj ĉambristojn pri tio, kion ili pensas pri la afero; kaj fine estis decidite, ke la normanoj bivaku ekster la urbo kaj ne havu permeson eniri, kaj ke la gardistoj sur la muroj plinombriĝu; kaj ankaŭ,

ke en ĉiuj preĝejoj estu proklamite, ke multnombre kolektiĝas la paganoj por bapto kaj boniĝo, pro kio ĉiuj homoj devas laŭdi kaj danki Dion kaj sian reĝon.

Kaj en la sekvonta mateno li deklaris, post kiam li ĝuis iom da kvieto kaj ripozo, ke la senditoj aŭdiencu ĉe li kaj akompanigu sin per la ĉefuloj, kiuj estos baptitaj. La normanoj iris al sia kampo de bivako, kaj la oficistoj de la reĝo ekurĝiĝis por havigi al ili, kion ili kiel gastoj de la reĝo bezonas. Baldaŭ fajroj brulis, kaj buĉotaj brutoj blekis; kaj oni multe vokadis pri blankaj panoj, grasaj fromaĝoj, mielo, ovokukoj, freŝa lardo kaj tia biero, kian reĝoj kaj episkopoj ordinare trinkas. La ŝipanoj de Orm plej multe bruis kaj estis plej malfacile satigeblaj; pro tio, ke ili estis baptotaj, ili opiniis, ke ili plej multe indas prizorgon.

Sed Orm pensis pri io alia ol la nutraĵo de siaj ŝipanoj kaj havis urĝon iri alidirekten kun frato Willibald, kiun li ne volis forlasi. Li sin sentis mizera maltrankvilante pri Ylva kaj malfacile kredis, ke ŝi vere sin trovas en ĉi tiu loko malgraŭ tio, kion diris Willibald. Ŝajnis al li pli facile kredi, ke ŝi edziniĝis aŭ forkuris aŭ estis forrabita; aŭ ke la reĝo, kiu laŭdire havas pasion por virinoj, ekvidis ŝin kaj prenis ŝin al si.

Ili pasis tra la urbopordo sen haltigo, ĉar la gardistoj ne volis malhelpi fremdulon akompanatan de pastro; kaj frato Willibald lin gvidis laŭ la vojo al la granda monaĥejo, kie loĝis episkopo Poppo kiel gasto de la abato kaj ĝuste revenis de la vesperdiservo. Li aspektis pli maljuna kaj pli magra, ol kiam Orm lin vidis ĉe reĝo Harald, sed lia vizaĝo eklumis ĝoje, kiam li vidis fraton Willibald.

—Pro tio ĉi mi volas danki al Dio, li diris. Vi longe forestis, kaj mi kredis, ke akcidento vin trafis dum via vojaĝo. Nun estos multo, pri kio mi vin demandos; sed kiu estas tiu, kiu vin akompanas?

—Apud sama tablo ĉe reĝo Harald ni sidis, diris Orm, tiufoje

kiam vi rakontis pri la reĝido, kiu pendiĝis en siaj haroj. Sed tie multaj sidis, kaj multo okazis de tiam. Mi nomiĝas Orm, filo de Toste, kaj kondukas ŝipon sub Thorkel Höge en ĉi tiu ekspedicio. Kaj ĉi tien mi alvenis por baptiĝi kaj preni mian virinon.

—Antaŭe li servis Muĥammad, diris kun fervoro frato Willibald. Sed nun li volas eskapi la diablon. Lin mi kuracis post la lasta julfesteno ĉe reĝo Harald tiun fojon, kiam ili skermis per glavoj en la halo antaŭ la ebriaj reĝoj; kaj tiu kaj lia kamarado minacis per lancoj fraton Matthias por eviti aŭskultadon de la instruoj de Kristo. Sed nun li volas baptiĝi.

—En la nomo de la Patro kaj la Filo kaj la Sankta Spirito, kriis la episkopo. Ĉu li servis Muĥammad?

—Li estas ekzorcita kaj aspergita de la episkopo de Londono, trankvilige diris la malgranda pastro. Sed nenia malica spirito restas en li.

—Ylvan, la filinon de reĝo Harald, mi volas preni, diris Orm. Ŝi estas promesita al mi kaj de si mem kaj de reĝo Harald.

—Kaj tiu nun estas mortinta, diris la malgranda pastro; kaj la paganoj batalas inter si en Danlando.

—Sankta episkopo, diris Orm, mi volonte volas ŝin renkonti tuj.

—Multon vi alportas, diris la episkopo kaj admonis ilin eksidi.

—Li venis por baptiĝi kun tuta sia ŝipanaro pro ŝi, diris frato Willibald.

—Kaj li servis Muĥammad! diris la episkopo. Ĉi tio estas granda kaj mirinda signo; kaj Dio do ne envias al mi ankoraŭ unu ĝojon malgraŭ tio, ke mi sidas ĉi tie kiel rifuĝinto kun tuta mia laboro pereinta.

Li enportigis bieron kaj komencis ilin demandi pri ĉio, kion ili scias pri Danlando kaj pri tio, kio interkonsentiĝis ĉe Maeldun.

Frato Willibald havis multon por diri; kaj Orm helpis informadi

tiom, kiom li sciis, malgraŭ sia senpacienco; ĉar la episkopo estis milda kaj respektinda homo, kies scivolemon kontentigi ne estis malfacile.

Fine la episkopo jam ricevis ĉiujn novaĵojn, kiujn ili alportis. Li tiam sin turnis al Orm:

—Kaj nun vi venas volante forpreni de mi mian baptinfanon Ylva. Ne estas bagatela afero aspiri reĝidinon. Sed iom el tio mi aŭdis de ŝi mem; kaj ververe ŝi estas homo, kiu scias, kion ŝi volas, Dio helpu al ni ĉiuj!

Li skuis la kapon kaj ridetis kviete.

—Ŝi estas tia, ke ŝi povas maljunigi sian protektanton pli ol la jaroj postulas, li diris. Kaj se vi povos ŝin estri, vi kapablos pli ol forpasinta reĝo Harald kaj pli ol mi. Sed Nia Sinjoro Dio agas laŭ mirindaj vojoj; kaj kiam vi fine estos baptita, mi ne kontraŭstaros en tio, kaj kiam ŝi edziniĝos, tiam peza ŝarĝo estos levita for de miaj maljunaj ŝultroj.

—Sufiĉe longe ni estis apartaj, ŝi kaj mi, diris Orm. Permesu al mi ŝin vidi nun.

La episkopo aspektis hezitema kaj diris, ke tia fervoro apartenas al juneco, sed ke nun estas malfrue kaj eble preferinde prokrasti renkontiĝon ĝis post la bapto. Sed li tamen estis tuŝita en sia kompato kaj alvokis diakonon el sia akompanantaro kaj ordonis al li, ke li kun kvin viroj iru al sinjorino Ermentrude kunportanta episkopan saluton petante, ke ili malgraŭ la malfrua horo rajtiĝu venigi la filinon de reĝo Harald.

—Mi klopodis ŝin teni sub bona protekto, li diris post kiam foriris la diakono; kaj tio estas necesa por junulino kiel ŝi kaj en loko kiel tiu ĉi, nun kiam alvenis ĉi tien la reĝo kaj liaj kortanoj kaj ĉiuj bataluloj. Ŝi loĝas ĉe la monaĥinoj de la benita reĝino Bertha, tute ĉi apude; kaj tie ŝi estas tre ĝena gasto, sed ĉiuj monaĥinoj ŝin amas.

Du fojojn ŝi provis forkuri, ĉar ŝi tro enuadas, ŝi diris; kaj unufoje — antaŭ ne tre longe — ŝi delogis du junajn virojn de nobla deveno, kiuj ŝin vidis en la ĝardeno de la monaĥinoj kaj parolis kun ŝi trans la muro, en frua mateno engrimpi kun servistoj kaj akompanantoj kaj batali, unu kontraŭ la alia per glavo inter la herbobedoj de la monaĥinoj pri tio, kiu el ili svatiĝu al ŝi, dum ŝi ridetante sidis ĉe sia fenestro kaj rigardis, ĝis ambaŭ estis forportitaj havantaj grandajn sangantajn vundojn. Estas malbone okazigi ion tian apud monaĥinejo, ĉar de tio la animoj de la piaj fratinoj povas grave damaĝiĝi. Sed estas vero, ke ĉe ŝi tiajn aferojn kaŭzas senpripenso pli ol malica volo.

—Ĉu ambaŭ mortis? demandis Orm.

—Ili saniĝis malgraŭ tio, ke iliaj vundoj estis severaj, diris la episkopo. Mi mem asistis preĝante por ili. Mi tiam estis laca kaj malsana kaj peze sentis la ŝarĝon havi tian protektatinon kiel ŝi; mi multe admonis ŝin kaj petis ŝin, ke ŝi sin edzinigu al iu el tiuj du pro tio, ke ili tiel fervore luktis pro ŝi kaj estas de altranga deveno. Mi diris al ŝi, ke mi pli kviete mortos, kiam ŝi estos edzino. Sed tiam ŝi fariĝis kolera al mi kaj diris, ke ĉar ambaŭ junaj viroj ankoraŭ vivas, ili luktis kun malmulte da seriozo; kaj ŝi entute ne volas societi kun ili. Ŝi diris, ke ŝi pli ŝatas tiaspecajn virojn, kiuj bezonas nek vindojn nek preĝojn postlukte. Kaj tiam mi ion eklernis pri vi.

La episkopo faris amikan kapklinon al Orm kaj petis, ke li ne forgesu sian bieron.

—Restis al mi ankaŭ aliaj ĉagrenoj pri tio, li daŭrigis; ĉar pro tiu duelo la abatino, la pia sinjorino Ermentrude, volis regali al ŝi vipadon sur nuda haŭto. Sed pro tio, ke mia kompatinda baptinfano estas nur gasto en la monaĥinejo, mi sukcesis deturni tion, tamen nur post multa peno; ĉar abatinoj ne volonte aŭskultas konsilojn kaj ne multe fidas prudenton de viro, eĉ kiam li estas episkopo. Fine

estis decidite pri fasto kaj preĝado dum tri tagoj, kaj laŭ mia kredo tio estis pli bona. Ĉar certe la pia sinjorino Ermentrude estas virino kun potenca volo kaj granda muskolforto, larĝbrusta pli ol la plimulto; sed tamen nur Dio scias, kiu el ili suferigus la haŭton de la alia, se ŝia volo estus ekreginta kaj ŝi farus provon per la vergoj. Tiukaze la lasta eraro estus pli fatala ol la unua.

—Kiam ni unuafoje interparolis, ŝi kaj mi, diris Orm, kaptis min la penso, ke eble neniam trafis ŝin la vergoj malgraŭ tio, ke bezono estis. Sed poste mi neniam ekpensis pri tiu afero, kiam mi ŝin vidis; kaj mi kredas, ke mi povos ŝin estri estontece, eĉ se ŝi iafoje baŭmos.

—La saĝa reĝo Salomono parolis jene, diris la episkopo: Bela virino sen bonmoro estas kvazaŭ porkino kun ororingo en la nazaĉo. Tio devas esti vero, ĉar la saĝa reĝo Salomono havis fundajn sciojn pri virinoj; kaj fojojn mi ĉagrene meditis tiun vorton, kiam ŝi kaŭzis al mi afliktojn. Sed estas rimarkinde, ke mi tamen ne povis senti koleron al ŝi. Tial mi volonte kredas, ke ĉio dependas nur de la petolemo kaj senpripenso de ŝia juneco; kaj povas esti, ke vi povos ŝin estri sen bastonadoj, ankaŭ post ŝia edziniĝo.

—Aldone al tio ekzistas ankaŭ alia afero pripensinda, kiun mi ofte rimarkis, diris frato Willibald. Post la unuaj tri aŭ kvar naskoj multaj virinoj trankviliĝas laŭ humoro. Mi ofte aŭdis edzojn diri, ke se Dio ne kreus la cirkonstancojn tiaj, estus malfacile elteni.

Orm kaj la episkopo kapjesis; kaj nun pasoj aŭdiĝis kaj Ylva envenis. Estis mallume en la kamero; ĉar ankoraŭ neniu fajro lumis; sed ŝi tuj ekvidis Orm kaj kriante kuris kontraŭ li. Malgraŭ sia aĝo la episkopo rapide ekstaris kaj interiris ilin kun etenditaj brakoj.

—Ne tiel, ne tiel! li pete insistis. Vin trankviligu en la nomo de Dio! Ne vin pendigu ĉirkaŭ lia kolo sub vido de pastroj en sankta ĉambro de monaĥejo. Kaj li ankoraŭ estas nebaptita, tion vi pripensu.

Ylva klopodis forpuŝi la episkopon, sed tiu kuraĝe kontraŭstaris; kaj frato Willibald lin asistis prenante ŝian brakon. Ŝi cedis kaj feliĉe ridis al Orm trans la ŝultro de la episkopo.

—Orm! ŝi diris. Mi vidis la ŝipojn veni kun viroj de hejmloke. Kaj en unu mi vidis ruĝan barbon apud la stiristo. Kaj tiam mi eksploris. Ĉar aspektis kiel vi; kaj tamen ne povus esti vi. Kaj la oldulinaĉo ne volis ellasi min.

Ŝi metis la vizaĝon kontraŭ la brakon de la episkopo kaj skuiĝis de singultoj.

Orm alpaŝis kaj karesis ŝiajn harojn; sed li ne sciis kion diri, ĉar li malbone komprenis virinploron.

—Mi vergos la maljunulinaĉon, se vi volas, li diris, se vi nur ne malĝojos.

La episkopo klopodis lin forŝovi kaj sidigi Ylvan, dum li parolis vortojn de konsolo.

—Kompatinda infano, ne ploru nun, li diris. Vi estis sola inter fremduloj, sed Dio estis bona kontraŭ vi. Nun eksidu ĉi tie  surla benko,  kaj vi ricevos varman vinon kun mielo. Willibald tujvenigos ĝin, kun multe da mielo; kaj belajn kandelojn ankaŭ. Kaj vi gustumos mirindajn nuksokernojn de la Sudlando, kiuj nomiĝas migdaloj kaj kiujn mi ricevis de mia frato la abato. Vi manĝu tiom, kiom vi volas.

Ylva eksidis kaj viŝis al si la vizaĝon per la maniko kaj ekridis laŭte.

—La maljuna stultkapulo estas same malsaĝa kiel vi, Orm, ŝi diris, malgraŭ tio, ke li estas plej bona el ĉiuj piuloj. Li kredas, ke mi malĝojas kaj volas min konsoli per nuksoj. Sed eĉ ne en la ĉielo de la sanktuloj povas sin trovi multaj same ĝojaj kiel mi nun.

Brulantaj vakskandeloj estis enportitaj, tre belaj kaj tre lumaj; kaj frato Willibald venis kun la varma vino. Li ĝin verŝis en trinkpo-

kalojn el verda vitro severvoĉe deklarante, ke ĝi devas trinkiĝi rapide, por ke oni povu ĝui ĝiajn plenajn forton kaj bonguston; kaj neniu kuraĝis malobei al li en tiaj aferoj.

Orm diris:

Belas la bril'
de l'kandelbrul',
suda glas'
kaj bon' piula;
tamen plej la brila lum'
sub la plor'
en in-okul'.

—Ili estas la unuaj versoj, kiuj venis al mi depost longe, li aldonis.

—Se mi kapablus kunmeti tiajn, diris Ylva, ankaŭ mi volus kompili versojn pri ĉi tiu momento. Sed mi ne kapablas; tion mi nun scias, ordonita foje al tritaga preĝo kaj fasto kaj peninte dum tiu tuta tempo fari insultversojn pri la abatino sen sukceso. Kaj tamen mia patro klopodis min instrui kelkfoje, kiam li estis en sia bona humoro. Li mem ne kapablis, sed li sciis, kiaj ili devus esti. El ĉio tiufoje plej ĉagrena estis tio, ke mi ne kapablis fari insultversojn. Sed nun estas egale, ĉar de nun mi neniam plu estos gardata de maljunulinaĉoj.

—Vi ne estos, diris Orm.

Li nun havis multon, pri kio li volis demandi kaj la episkopo kaj Ylva povis multon rakonti pri tio, kio okazis dum ilia lasta tempo en Danlando kaj dum ilia forfuĝo de reĝo Sven.

—Kaj mi faris unu aferon, diris Ylva, kiam Sven estis proksima kaj mi ne sciis, ĉu mi lin eskapos; kaj tio estis la kaŝo de la kolĉeno. Ĉar kion ajn alian mi preferus deziri, ol ke ĝi falu en lian manon. Kaj

poste nenia tempo restis por ĝin repreni, antaŭ ol ni enŝipiĝis. Tio eble malĝojigas vin, Orm, sed mi ne sciis, kion alian fari.

—Estas pli bone havi vin sen kolĉeno ol la kolĉenon sen vi, li respondis; sed ĝi estas reĝa ornamaĵo, kaj mi kredas, ke vi sentas la perdon pli severe ol mi. Kie vi ĝin kaŝis?

—Tion mi ja povas diri, ŝi diris, ĉar ĉi tie neniu sin trovas, kiu disklaĉos tion. Iom ekster la granda pordego troviĝas malgranda deklivo kun juniperdensaĵoj kaj eriko, dekstre tutapud la vojo al la ponto; kaj sur tiu deklivo estas tri ŝtonoj kune sub la branĉetoj. Du estas grandaj kaj penetras profunde en la teron, tiel ke ne multo el ili estas videbla, kaj apoge al ili la tria sin klinas kaj havas grandecon tian, ke mi povas ĝin levi. Volvinte la kolĉenon en tuko kaj la tukon en felo mi ĝin metis sub la stonon. Estis peze ĝin tie forlasi, ĉar nur tiu memoraĵo restis de vi. Sed mi kredas, ke tie ĝi sekure konserviĝas, kaj pli sekure ol se mi ĝin portus fremdlanden; ĉar sur tiu deklivo promenas neniu, eĉ ne la bovinoj.

—Mi konas tiujn ŝtonojn, diris frato Willibald. Mi tie prenis gnafaliojn kaj timianon kolektante herbojn kontraŭ pirozo.

—Bone, ke vi ĝin kaŝis ekster la remparo, diris Orm; kaj tamen povos montriĝi malfacile ĝin repreni, tiel proksime al la lupa nesto.

Malpeziginte tiel la koron Ylva fariĝis eĉ pli feliĉa; kaj subite ŝi ĉirkaŭbrakis al la episkopo la kolon kaj enŝtopis migdalojn en lian buŝon kaj komencis petadi lin, ke li nun tuj diru benojn kaj ilin geedzigu. La episkopo pro teruriĝo misglutis migdalon kaj gestis forpuŝe per ambaŭ manoj.

—Mi opinias kiel ŝi, diris Orm. Dio mem helpis al nia rekuniĝo, kaj nun ni ne plu intencas disiri.

—Vi ne komprenas pri kio vi parolas, diris la episkopo. Tio ĉi estas inspirita de la diablo.

—Al la maljunulinaĉo mi ne reiros, diris Ylva, kaj tie ĉi mi ne

povas resti. Mi iros kun Orm, kaj tiam estas pli bone, ke vi nin benu antaŭe.

—Li estas ankoraŭ nebaptita, kriis la episkopo en malespero. Ĉu mi povus edzinigi vin, mian propran baptinfanon, al pagano? Kaj vere estas senhonto vidi junulinon tiel brula de deziro. Ĉu vi lernis absolute neniom da hontemo?

—Ne, respondis Ylva decidvoĉe. Mia patro instruis al mi multon, sed pri hontemo li malmulton sciis. Sed kiel mia deziro edziniĝi povas esti io malbona?

Orm elprenis el sia zono ses ormonerojn el tiuj, kiujn li portis de Andaluzio kaj metis ilin sur la tablon antaŭ la episkopo.

—Al episkopo mi pagas mian bapton, li diris. Kaj ne tia estas mia mizero, ke mi ne povas pagi al alia mian edziĝon. Se vi diros bonajn vortojn por mi antaŭ Dio kaj aĉetos kandelojn al lia preĝejo por tio ĉi, ne povas esti grave, ĉu mi unue edziĝos kaj poste baptiĝos.

—Vidfamne estis lia parenco, diris Ylva fiere. Kaj se estas por vi malfacile edzigi nebaptiton, vi ja povas mem lin bapti nun. Lasu alporti akvon, kaj lin baptu, kiel vi kutimis bapti malsanulojn hejme. Ĉu gravos do, se li baptiĝos ankoraŭfoje kun la aliaj antaŭ la reĝo? Dufoja bapto ne povas malsuperi unufojan.

—Oni ne rajtas misuzi la sakramentojn, diris la episkopo. Kaj mi ne scias, ĉu li estas plene preparita.

—Li estas preparita, diris frato Willibald. Kaj eble li povus esti primsignita nun malgraŭ tio, ke tio ne estas kutimo nuntempe. Al primsignita viro kristana virino povas edziniĝi.

Orm kaj Ylva admirante rigardis fraton Willibald, kaj la episkopo plektis siajn manojn kaj aspektis pli ĝoja.

—La aĝo komencas krei forgesemon ĉe mi, li diris. Aŭ eble ĉi tiu bongusta vino malgraŭ tio, ke ĝi estas tiel saniga. Iam estis kutimo,

ke oni primsignas tiujn, kiuj ankoraŭ ne volis lasi sin bapti, sed kiuj tamen montris al Kristo honoron. Estas bone por ni ĉiuj, ke ni tian helpanton havas, kiel frato Willibald.

—Por li mi longe sentis amikecon, diris Orm, kaj ĝi ne malkreskas pro ĉi tio. Kaj de la horo, kiam mi lin renkontis, mia bonsanĉo estis favora.

La episkopo nun sendis por venigi la abaton kaj du kanikojn, kaj ili volonte venis por lin helpi kaj por vidi la fremdan ĉefulon. Vestiĝinte per sia ornato la episkopo trempis la manon en konsekrita akvo kaj signis krucon sur Orm, sur lia frunto kaj brusto kaj manoj, dum li eldiris benojn.

—Mi jam kutimiĝas, diris Orm post la benado; ĉar tio ĉi ne estis tiel malfacila, kiel kiam la alia min aspergis per balailo.

Ĉiuj estis en akordo pri tio, ke estas neeble edzigi nebaptiton en la monaĥeja kapelo kaj ke ĉio okazu en la kamero de la episkopo. Orm kaj Ylva genufleksis sur du preĝbenketoj antaŭ la episkopo.

—Fari tion vi certe ne havas kutimon, diris Ylva.

—Pli ol la plimultaj mi genufleksis, diris Orm, kiam mi vivis inter la andaluzoj; sed estas bona afero, ke mi ne bezonas frapi la frunton kontraŭ la plankon.

Kiam la episkopo venis ĝis tie en la admonoj kaj ordonis al ili, ke ili multigu sin kaj akordiĝu bone en la vivo, ili kapjesis konsente. Sed kiam li ordonis al Ylva, ke ŝi subiĝu sub sia edzo en ĉio, ili rigardis unu la alian.

—Mi faros mian plejeblon, diris Ylva.

—Estos laŭpove en la komenco, diris Orm, ĉar tiun kutimon ŝi certe ne abunde posedas. Sed se bezone, mi helpos al ŝi memori tiun ordonon.

Kiam ĉio estis preta kaj ĉiuj deziris al ili bonan feliĉon kaj multajn infanojn, la episkopo komencis maltrankviligi sin pri ilia nup-

tonokto. Ĉar en la monaĥejo io tia ne povus okazi, eĉ ne en ĝia gastigejo; kaj li sciis pri neniu loko en la urbo, kie ili povus loĝi.

—Mi iros kun Orm, diris senzorge Ylva. Kio taŭgas al li, tio taŭgas al mi.

—Vi ne povas dormi kun li inter la viroj ĉe la bivakfajroj, diris time la episkopo. Sed Orm diris:

Venis viro
de l' mara sin',
bona plugint'
sur kamparo aŭka;
kaj la nuptlito
por lia princin'
estas ol pajl'
aŭ ol plumoj pli taŭga.

Frato Willibald ilin akompanis al la urbopordego por malfermigi al ili la flankan pordon. Tie ili post dankadoj foriris de li kaj malsupreniris al la ŝipkajoj. Rapp metis du ŝipanojn sur la ŝipo por ĝin gardi kontraŭ ŝtelistoj; ili diligente drinkis en sia soleco, tiel ke ilia dormo aŭdiĝis distance. Orm ilin sukcesis veki kaj ilin ordonis asisti lin, movante la ŝipon sur la riveron; kaj malgraŭ tio, ke ili mallertumis, ili fine sukcesis. La ankro estis mallevita, kaj la ŝipo rajdadis kontraŭ la fluo.

—Kaj nun mi ne bezonas vin tie ĉi, li diris.

—Kiel ni atingas la bordon de tie ĉi, ili diris.

—Mallonga distanco por bravaj naĝantoj, li diris.

Ambaŭ diris, ke ili estas ebriaj kaj ke la akvo estas malvarma.

—Estas al mi maloportune atendi ĝis pliboniĝos tiuj aferoj, diris Orm.

Dirinte li kaptis unu je la nuko kaj zono kaj lin kapantaŭe ĵetis

en la riveron; la alia tiam sekvis ne atendante plian persvadon. El la mallumo oni aŭdis ilin tusante kaj snufante naĝi kontraŭ la bordo.

—Neniu nin ĝenas nun, diris Orm.

—Pri ĉi tia nuptolito mi ne plendas, diris Ylva.

Ili ekdormis malfrue en tiu vespero kaj bone dormis.

## 2.

Kiam la senditoj en la posta tago paŝis ĝis antaŭ reĝo Ethelred, kun Gudmund kaj Orm en sia akompano, la reĝo estis plej bonhumora kaj amike ĉiujn akceptis. Li laŭdis ambaŭ ĉefulojn pro ilia sopiro al la bapto kaj volis ekscii, ĉu ili sin sentas komfortaj en Westminster. Gudmund en la antaŭa vespero havis grandan ebrion kaj ankoraŭ parolis malklare; kaj ambaŭ opiniis, ke ili bone povas jesi la demandon de la reĝo.

La du episkopoj devis rakonti pri sia misio kaj kiel ĉio kontraktiĝis inter ili kaj la fremduloj, kaj ĉiuj en la halo zorgeme tion aŭskultis. La reĝo sidis sub baldakeno, kun krono sur la kapo kaj sceptro en la mano. Orm opiniis, ke tio estas por li novspeca reĝo post Almansur kaj reĝo Harald. Li estis altstatura kaj impona viro, volvita en velurmantelo kaj palhaŭta, kun maldensa bruna barbo kaj grandaj okuloj.

Kiam la episkopoj en sia raportado venis al la arĝento, kiu estu pagita, reĝo Ethelred subite per granda forto frapis sian sceptron sur la brakapogilon de la trono, kaj ĉiuj en la halo skuiĝis.

—Vidu, li diris al la ĉefepiskopo, kiu sidis apud li sur pli malalta seĝo: kvar muŝojn unufrape; kaj tamen tio ĉi estas malbona frapilo.

La ĉefepiskopo diris, ke li ne kredas, ke multaj reĝoj povas tion ripeti kaj ke ĝi atestas pri bona lerto kaj favora bonŝanco. La reĝo

kontente ridis; kaj post tio la senditoj daŭrigis sian raportadon, kaj ĉiuj denove aŭskultis.

Kiam ili finis, la reĝo ilin dankis laŭdante iliajn saĝon kaj diligenton kaj demandis la ĉefepiskopon, kion oni pensu pri tio, kio kontraktiĝis. La ĉefepiskopo respondis, ke tio certe estas ŝarĝo, sed sendube la plej eble bona; kaj la reĝo kapjesis.

—Kaj estas bona afero, diris la ĉefepiskopo, dolĉa por ĉiuj kristanoj kaj tre plaĉa por Dio, ke niaj piaj senditoj sukcesis varbi grandajn militĉefulojn kaj multajn virojn por Kristo; kaj pro tio ni ĉiuj ĝoju.

—Tiel estas, diris la reĝo.

Nun la episkopo de Londono murmuris al Gudmund, ke li estas en vico paroli, kaj Gudmund voleme paŝis antaŭen. Li dankis la reĝon pro ties gastigemo kaj malavaro kaj diris, ke lia famo post tio ĉi atingos ĝis Ostrogotio kaj eĉ pli foren. Sed pri unu afero li volus informiĝi, por ke neniaj malamikaĵoj leviĝu, nome kiom longe daŭros, ĝis la arĝento venos en iliajn manojn.

La reĝo lin atente rigardis dum li parolis, kaj demandis, kiajn markojn li havas sur sia vizaĝo.

Gudmund respondis, ke ili estas markoj de urso, kiun li foje ĉasis en malprudenta maniero, tiel ke la urso rompis la lanctenilon, post kiam la lanco trafis al ĝi en la bruston, kaj frapis lin per siaj ungegoj, antaŭ ol li trovis tempon haki per la hakilo.

Reĝo Ethelred malheliĝis aŭdinte tion.

—En ĉi tiu lando neniuj ursoj estas, li diris, kaj tio estas granda manko. Sed mia frato, reĝo Hugo de Franklando, sendis al mi du ursojn, kiuj povas danci je granda amuziĝo, kaj ilin mi volonte montrus al vi. Sed nun statas tiel malbone, ke mia plej kompetenta ursodresisto eliris kun Byrhtnoth kaj malaperis en la batalo. Kaj ne

malgrandan perdon mi per tio suferis; ĉar nun ili malmulte dancas aŭ tute neniom, kiam aliaj ilin instigas.

Gudmund konsentis, ke tio estas malbonŝanco.

—Sed ĉiuj havas siajn proprajn ĉagrenojn, li diris; kaj la nia estas tiu ĉi: kiam ni ricevos la arĝenton?

Reĝo Ethelred gratis al si la barbon kaj rigardis la ĉefepiskopon.

—Estas granda sumo, diris la ĉefepiskopo, kaj eĉ ne la potenca reĝo Ethelred tenas tiom en siaj kestoj nun. Tial oni devas dissendi kolektantojn al ĉiuj partoj de la lando por kolekti kiom estas bezonata. Tio povas daŭri du monatojn, eble tri.

Gudmund skuis pro tio la kapon.

—Nun vi devas min helpi, skaniano, li diris; ĉar tia atendo estos tro longa, kaj mi parolis ĝis seko en la gorĝo.

Orm alpaŝis kaj diris, ke li estas juna kaj ne tre altranga kaj tial ne devus paroli antaŭ tiel altranga mastro kaj tiel saĝaj homoj; sed ke li tamen diros laŭ sia kapablo.

—Ne estas bagatelo, li diris, atendigi la ĉefulojn kaj la ŝipanojn tiel longe je tio, kio estas promesita al ili. Ĉar ili estas viroj kun ŝanĝiĝema humoro kaj malmulta pio, kaj povas okazi, ke ili baldaŭ senpacienciĝos sidante nenifaraj en atendo, havinte tian prosperon kaj sciante, ke abunda rabotaĵo troviĝas ĉiudirekte. Tiu Gudmund, kiun vi jen vidas, estas milda kaj gaja dum ĉio marŝas laŭ lia volo; sed kolera li kaŭzas teruron en eĉ la plej sentimaj ĉirkaŭ tuta Balta Maro kaj kurante renversas kaj ursojn kaj virojn; kaj lin akompanas berserkoj preskaŭ same danĝeraj kiel li mem.

Ĉiuj rigardis al Gudmund, kiu ruĝiĝis kaj klarigis al si la gorĝon; kaj Orm daŭrigis:

—Kaj Thorkel kaj Jostein estas samspecaj, kaj iliaj ŝipanoj estas same nebrideblaj kiel tiuj de Gudmund. Tial estus bone, se vi povus

liveri la duonon de la sumo nun tuj. Tiam la pacienco povus daŭri pli bone, ĝis la resto estos kolektita.

Aŭdinte tion la reĝo kapjesis kaj rigardis la ĉefepiskopon kaj denove kapjesis.

—Ĉar kaj Dio kaj vi, mastro reĝo, ĝojas pro tiuj, kiuj venis por lasi sin bapti, eble estus saĝe doni al ili ilian plenan parton nun tuj. Tiam multaj inter la aliaj pripensos, ke kristaniĝo estas bona afero.

Gudmund laŭte kriis, ke tiuj vortoj estis kvazaŭ liaj propraj pensoj.

—Kaj se okazos kiel nun dirite, li diris, mi povas promesi, ke ĉiu ŝipano, kiu akompanis min ĉi tien, kristaniĝos kun mi.

La ĉefepiskopo diris, ke estas dolĉe tion aŭdi kaj ke bonaj instruistoj tuj iros por ilin prepari. Post tio estis decidite, ke ĉiuj, kiuj alvenis al la reĝo ricevos sian arĝenton post la bapto; kaj al la batalantaro ĉe Maeldun triono estu tuj sendita, kaj la restaĵo post ses semajnoj.

Kiam ili postaŭdience foriris, Gudmund multon diris al Orm dankante pro la helpo.

—Pli saĝajn vortojn mi neniam aŭdis de tiel juna viro, li diris; kaj certe estas, ke vi naskiĝis ĉefulo. Estas granda gajno por mi, ke mi ricevos ĉiun mian arĝenton nun; ĉar povas okazi, ke ĉe la fino la partoj de multaj estos malabundaj. Tial mi kun volonto volas vin rekompenci pro tio; kaj ricevinte la mian mi donos al vi kvin markojn.

—Unu aferon mi rimarkis, diris Orm, nome ke vi estas homo tro modesta malgraŭ via saĝo. Se vi estus ordinara ĉefuleto kun kvin aŭ ses ŝipoj, kaj sen granda famo, tiam vi povus doni al mi kvin markojn pro tia servo. Sed al persono tiel fama kiel vi, vaste trans la limoj de Sveoregno, tio ne decas, kaj ankaŭ ne decas al mi ĝin akcepti. Ĉar tio malpliigus vian reputacion.

—Povas esti vero tio, kion vi diras, diris Gudmund. Kion vi farus, se vi estus mi?

—Mi konas homojn, kiuj donus dek kvin markojn pro tia servo, diris Orm. Tion Styrbjörn farus. Kaj Thorkel donus dek du. Kaj mi konas iujn, kiuj nenion donus. Sed mi ne volas konsili al vi en tio ĉi; kaj ni estos same bonaj amikoj, kiel ajn vi faros.

—Ne estas facile mem precize scii, kiel fama oni estas, diris ĉagrene Gudmund kaj foriris pensante.

En la sekva dimanĉo ĉiuj estis baptitaj en la granda preĝejo. La plimulto de la pastroj volis, ke la bapto okazu ĉe la rivero, kiel de antikve estis la kutimo ĉe paganbaptoj; sed kaj Gudmund kaj Orm firme deklaris, ke al nenia trempado ili sin submetos. Tiuj du marŝis unuaj, sen kapvestoj kaj kun longaj blankaj manteloj kun ruĝaj krucoj alkudritaj antaŭe; malantaŭe sekvis iliaj ŝipanoj kaj ankaŭ ili portis mantelojn en tia nombro, kiom sufiĉis por tiel granda aro. Neniu el ili demetis siajn armilojn; ĉar Orm kaj Gudmund diris, ke ili malofte formetas siajn glavojn, kaj plej malofte en fremda lando. La reĝo mem sidis en la absido, kaj la preĝejo estis plena de homoj; kaj inter la spektantoj troviĝis ankaŭ Ylva. Orm timis ŝin elmontri, ĉar li nun opiniis, ke ŝi estas pli bela ol iam, kaj timis, ke ŝi estos forŝtelita. Sed ŝi deklaris, ke ŝi volas ĉeesti en la preĝejo por vidi kiom pia Orm aspektos, kiam akvo fluetos laŭ lia nuko. Ŝi sidis kun frato Willibald, kiu malpermesis al ŝi ridi pri la blankaj manteloj; kaj episkopo Poppo oficis inter la baptantoj malgraŭ tio, ke li sin sentis kaduka. Li baptis Orm, kaj la episkopo de Londono baptis Gudmund; kaj post tio ses pastroj eklaboris baptante la ŝipanojn laŭ ebla rapido.

Post la bapto Gudmund kaj Orm alpaŝis la reĝon. Li donacis al ĉiu el ili ororingon esprimante deziron, ke Dio estontece ŝirmu ilin,

kaj volis, ke ili baldaŭ venu por vidi liajn ursojn, kiuj rimarkinde plibonigis sian dancadon.

En la posta tago la arĝento estis pagita al la baptitoj fare de la skribistoj kaj trezormastro, kaj granda ĝojo regis en ĉiuj. Malplej ĝojis la ŝipanoj de Orm, el kiuj ĉiu devis pagi al li du oerojn pro sia bapto; sed neniu elektis la malpli karan anstataŭan elvojon lukti kontraŭ li.

—Per tio mi konstruigos preĝejon hejme, diris Orm, kiam li formetis tiun monon en sian keston.

Post tio li metis dek kvin markojn en saketon kaj iris kun ili al la episkopo de Londono kaj ricevis de li bonkvalitan benon; kaj posttagmeze Gudmund surtretis la ŝipon de Orm tenante la saman sakon enmane, tre ebria kaj en luma animstato. Li diris, ke nun ĉio lia estis kalkulita kaj enpakita, kaj tio estis peza taglaboro.

—Kaj mi pripensis viajn vortojn, li diris, kaj vi prave diris, ke mi, havante mian reputacion, ne povas donaci al vi kvin markojn. Jen mi anstataŭe donas al vi dek kvin; kaj tio des pli decas, nun kiam Styrbjörn forpasis.

Orm diris, ke jen io neatendita, sed ke li ne volas rifuzi tian donacon de tia homo. Redonace li donis al Gudmund sian andaluzan ŝildon, la saman kiun li portis en la lukto kontraŭ Sigtrygg en la halo de reĝo Harald.

Ylva diris, ke ŝi ĝojas vidante, ke Orm montras lertecon je kolektado de arĝento; ĉar ŝi ne kredas, ke ŝi mem estas tre kapabla pri tio, kaj ŝajnas al ŝi probable, ke ili havos multajn infanojn.

Tiuvespere Orm kaj Ylva sidis ĉe episkopo Poppo adiaŭante lin; ĉar nun ili havis urĝon veli hejmen. Ylva ploris kaj trovis malfacile disiĝi de la episkopo, kiun ŝi nomadis sia dua patro, kaj ankaŭ li ekhavis larmojn en la okuloj.

—Se mi estus malpli kaduka, li diris, mi akompanus vin, ĉar en

Skanio mi eble ankoraŭ povus esti utila. Sed ĉi tiuj maljunaj kruroj al nenio taŭgas nun.

—Sed frato Willibald taŭge vin anstataŭas, diris Orm, kaj kun li ni sentas nin bone, kaj Ylva kaj mi. Kaj estus bone, se li volus nin akompani, kiam vi mem ne povas, por fortigi en ni la kristanecon, kaj eble ankaŭ en aliaj. Domaĝe, ke li sin sentas tiel malkomforta inter normanoj.

La episkopo diris, ke Willibald el liaj pastroj estas la plej saĝa kaj ĉiam tre utila en sia agado.

—Plej sukcesa li estas en konvertado, li diris, malgraŭ tio, ke li pro siaj grandaj fervoro kaj ardo havas fortan inklinon grumbladi pri peko kaj malforto. Prefere ni lin mem demandu pri tio ĉi; ĉar nevolontulan pastron mi ne volas doni al vi.

Enveninte kaj informiĝinte Willibald kun ĉagrena tono demandis, kiam ili intencas forveli. Orm respondis, ke kredeble morgaŭ, se la vetero restos bona.

Frato Willibald skuis la kapon.

—Estas malbone doni al mi tiel mallongan tempon por meti ĉion en ordo, li diris. Mi volas kunporti abundon da ŝmiraĵoj kaj kuraciloj, kiam mi iros en la landon de la mallumo kaj perfortuloj. Sed ĉio pretiĝos, per helpo de Dio, se mi rapidos; ĉar kun vi du mi volonte vojaĝos.

KVARA ĈAPITRO

## Kiel frato Willibald instruis al reĝo Sven vorton el la Skribo.

Orm iris al Gudmund kaj petis lin, ke li transdonu al Thorkel saluton, ke Orm ne revenos al la batalantaro, sed intencas reiri hejmen nun. Gudmund malĝojiĝis pro tio kaj provis persvadi lin ŝanĝi sian intencon; sed Orm diris, ke lia bonŝanco lastatempe estis tiel favora, ke ĝi ne povos resti tia dum longe.

—Nenio restas al mi farenda en ĉi tiu lando, li diris. Kaj se vi mem havus tian virinon en la ŝipo kiel Ylva, vi ne volus ŝin kunporti al hordo de senokupaj viroj, kiuj kun lango ekster buŝo postkuras ĉiun virinon, kiun ili vidas. Tio kaŭzus al mi multajn luktojn kaj mi volas pace esti kun ŝi nun. Kaj tion ankaŭ ŝi volas.

Gudmund rekonis, ke kiu ajn viro povus duonfreneziĝi nur rigardante al Ylva, eĉ dum nur mallonga tempo. Kaj post ĝusta pripensado, li diris, ankaŭ li mem preferus hejmenveli al Bråviken nun, ĉar la abundo da arĝento en la ŝipo kaŭzas timan senton en li. Sed li devas reiri al siaj aliaj ŝipanoj, kaj liveri informon al Thorkel kaj Jostein pri tio, kio estas decidita pri la arĝento.

—Ĉi tie miaj ŝipanoj nun estas prirabataj de lertaj virinoj, kiuj ariĝas ĉirkaŭ iliaj riĉaĵoj kaj ebriiginte ilin serĉadas arĝenton en pantalonoj kaj kamizoloj. Tial estas preferinde, ke mi remu kun vi, se mi ĝustatempe povas trovi miajn ŝipanojn.

Ili iris adiaŭi reĝon Ethelred kaj la ĉefepiskopon kaj vidis la ur-

sojn danci tre mirinde sur iliaj postaj piedoj. Poste ili blovigis kornojn, kaj la ŝipanoj eksidis ĉe la remiloj, kie multaj komence mallertadis pro laco kaj ebrio. Ili rapide moviĝis laŭ la direkto de la fluo, kaj ĉi tiun fojon la gardoŝipoj ne blokadis al ili la vojon malgraŭ tio, ke la ŝipanaroj transkriis multajn bonajn konsilojn. La nokton ili pasigis malantaŭ la riverbuŝo; kaj tie Gudmund kaj Orm disiris kaj sin direktis ĉiu laŭ sia direkto.

Ylva bone eltenis la ondadon; sed ŝi tamen deziris, ke la vojaĝo ne daŭru longe, ĉar estis por ŝi malvaste en la ŝipo. Orm ŝin konsolis, dirante ke la vetero ordinare estas plejeble bona en ĉi tiu sezono kaj apenaŭ kaŭzos malfruon.

—Kaj cetere ni nur havas nian aferon sur la ŝtondeklivo apud Jellinge, li diris, kaj tio ne multe plilongigas la vojon.

Ylva dubis, ĉu estas prudente preni la kolĉenon nun, kiam neniu scias kiel statas la aferoj en Jutlando kaj eĉ ne kiu sidas en Jellinge. Sed Orm diris, ke li volas tion fari nun tuj.

Kaj kiu ajn okupas Jellinge nun, li diris, ĉu estas reĝo Sven aŭ reĝo Erik, plej neverŝajna estas lia sidado tie dum tiu ĉi sezono, kiam ĉiuj reĝoj preferas batali. Ni albordiĝos tie en la nokto, kaj se ĉio marŝos bone, neniu nin ĝenos.

Frato Willibald trovis bonan komforton en la ŝipo malgraŭ tio, ke li ne trovis vundojn kaj malsanojn per kiuj sin okupi. Li volonte sidis ĉe Rapp, kiam tiu stiris, kaj demandis lin pri la Sudlando kaj liaj aventuroj tie; kaj malgraŭ tio, ke Rapp neniam diris multajn vortojn sinsekve, estis videble, ke tiuj du komencis bone amikiĝi.

Ili rondiris terlangon de Jutlando kaj sin direktis suden laŭ la bordo renkontante neniajn ŝipojn; sed nun devigis ilin kontraŭa vento al forta remado, kaj unu fojon ili devis albordiĝi atendante pli favoran veteron. Ili en nokta mallumo remis kontraŭ la riverbuŝo ĉe Jellinge, sed jam ekkrepuskis iomete kiam Orm albordigis la ŝipon

iom distance de sia celo. Li ordonis, ke frato Willibald kaj Rapp kun du bonaj ŝipanoj lin akompanu; sed Ylva restu en la ŝipo. Pri tio ŝi ne estis kontenta, sed li diris, ke tiel estos.

—Pri tiaj aferoj mi decidas, li diris, kiel ajn estos pri aliaj. Frato Willibald konas la lokon same bone kiel vi; kaj se ni renkontos virojn kaj estos batalo, nun kiam jam komencis tagiĝi, estas pli sekure havi vin tie ĉi. Ni baldaŭ revenos.

Ili iris de la strando kontraŭ la reĝbieno kaj pasis agrojn sude de ĝi. Frato Willibald diris, ke restas nur mallonga distanco ĝis la deklivo, kiam paŝoj kaj vokoj de viroj subite aŭdiĝis de la ponto en la maldekstra flanko.

Brutaro venis, pelata de pluraj viroj.

—Pli bone ilin mortigu, diris Rapp kaj pesis sian lancon en la mano.

Frato Willibald tuj kaptis lian brakon kaj severe malpermesis al li tian perforton kontraŭ homoj, kiuj nenion malamikan faris. Orm diris, ke apenaŭ necesos, se ili rapidos.

Ili nun kuris kontraŭ la deklivo, kaj la viroj malantaŭ la bovinoj haltis kaj rigardis ilin kun surprizo.

—Kies homoj vi estas? ili demandis.

—De reĝo Harald, diris Orm.

—La malgranda pastro! kriis unu el la bovpelantoj. Estas la malgranda pastro, kiu estis ĉe reĝo Harald! Ili estas malamikoj! Kuru veki la homojn!

Rapp kaj tiuj du ŝipanoj, kiuj akompanis lin, nun persekutis la bovpelantojn; sed la brutoj blokis la vojon, tiel ke la distanco inter ili longiĝis. Orm kuris al la deklivo kun frato Willibald, kaj tiu tuj montris la tri ŝtonojn. Tie estis la kolĉeno, kie ĝi estis metita.

—Nun ni devas kuri, diris Orm kaj ĝin metis sub la vestojn.

En la reĝbieno aŭdiĝis nun bruo kaj krioj; kaj kiam ili atingis

Rapp kaj liajn du ŝipanojn, tiu grumblis pro tio, ke li ne ĝustatempe atakis la bovpelantojn. Sian lancon li pro ĉagreno forĵetis sur unu el ili, kiu nun kuŝis antaŭ la pordo.

—Sed tio ne multe utilis, li diris, kaj mi perdis bonan lancon.

Ili nun rekuris laŭ plejebla kapablo tra la agroj, kaj baldaŭ ili aŭdis laŭtajn vokojn malantaŭ si kaj ĉevalajn hufofrapojn. Rapp estis, kun sia nura okulo, akrevida homo; li kaj Orm rerigardis superŝultre dum la kuro.

—Jen venas reĝo Sven mem, diris Orm; ne malgranda honoro tio estas.

—Kaj lin urĝo pelas, diris Rapp, ĉar li forgesis plekti la barbojn.

Frato Willibald ne estis tiel juna kiel la aliaj; sed li brave kuris per siaj mallongaj kruroj kun sia pastromantelo alte fiksita.

—Jen ili estas nun! kriis Orm. Marku ilin nun per la lancoj!

En sama momento li mem ekhaltis kaj ĵetis sian lancon kontraŭ la plej proksima, viro sur granda ĉevalo, kiu preterpasis reĝon Sven. La viro sukcesis baŭmigi la ĉevalon, kiam li vidis la lancon veni; ĝi profunde penetris la bruston de la ĉevalo, kiu falis antaŭen kaj ruliĝis kun la viro sub si. La viroj kun Rapp ĵetis kontraŭ reĝo Sven, sed ne trafis, kaj nun tiu estis tre proksima al ili, kaj ne restis pli da lancoj.

Frato Willibald sin klinis kaj trovis bonan ŝtonon kaj ĝin ĵetis per ĉiuj siaj fortoj.

—Amu vian proksimulon, li kriegis ĵetante.

La ŝtono trafis kun krako al reĝo Sven sur la buŝon, kaj meze en krio de kolero li malrektiĝis sur la ĉevalo kaj glitis sur la grundon.

—Jen pastro, kiun mi nomas bona, diris Rapp.

La aliaj en la akompano urĝiĝis zorgante pri reĝo Sven, kaj Orm kaj liaj ŝipanoj atingis la ŝipon, spiregantaj sed sen vundoj. Orm kriis al la remantoj, ke ili tuj ekiru, dum li kaj la aliaj elvadis kaj estis ti-

rataj en la ŝipon; kaj ili jam formovis sin je kelka distanco, kiam rajdantoj fariĝis videblaj sur la strando. Jam komenciĝis blovi denove en la krepusko, kaj nun la vento blovis de ĝusta direkto, kaj ili rapide moviĝis for, pelataj kaj de remiloj kaj de velo.

Orm donis al Ylva la kolĉenon kaj diris al ŝi, kio okazis; kaj Rapp estis malpli ŝparvorta ol kutime, kiam li rakontis pri la ĵeto de la malgranda pastro.

—Mi esperas, ke estis dolora frapo, diris Ylva.

—Kaskadis sango ĉirkaŭ la faŭko, kiam li falis, diris Rapp. Mi distinge vidis.

—Malgranda pastro, diris Ylva, mi vere emas vin kisi pro tiu frapo.

Orm ridis.

—Jen kion mi ĉiam plej timis, li diris, ke vi komencos amikumi kun pastroj pro via pieco.

Frato Willibald deklaris tre decide, ke li ne aspiras kison; sed li ne aspektis malkontenta pri la laŭdo, kiun li aŭdis.

—Tiun kison reĝo Sven ne baldaŭ forgesos, diris Orm; laŭ sia kutimo li ne lasas tiajn aferojn sen venĝo. Se ni sukcese revenos hejmen, mia patrino devas urĝe ekpaki; ĉar por ni estos plej sekure en la arbaroj, kien neniu reĝo venas. Kaj supozeble tie mi devos konstruigi mian preĝejon.

Kaj pri tio, kio poste okazis al Orm, en la arbara regiono apud la limo, ankaŭ estos rakontate: pri lia fervoro por la kristanismo, kaj la sukcesa konvertado de frato Willibald; pri iliaj ĉagrenoj kaŭzataj de la smolandanoj, kaj luktoj kontraŭ ili; kaj pri tio, kiel revenis la urobovoj.

http://www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-010-4